# Kara kamarado,

Verkis: **Faustino Castaño Vallina**

*Titolo:* **Kara kamarado,**
*Esperantlingva letero-kolekto kaj raportaĵo*
*Verkita, kompilita kaj presigita de:*
Faustino Castaño Vallina
c/Magnus Blikstad, 17 - 4° J.
33207-GIJON ASTURIAS
ESPAÑA HISPANIO
*Ellaborita fine de la jaro 1993*
*destine al* Igorj Karatuŝin (Rusio)

# Antaŭparolo

Kara kamarado,
Mi skribas ĉi-antaŭparolon kiam mi vidis la definitivan formon -de libro!- kiun akiris mia skribaĵo al vi. Kiam mi komencis ĝin skribi, la 29-an de novembro, mi havis neniun konkretan planon pri ĝi, mi nur intencis respondi vian lastan leteron kiom amplekse estu necesa, sed mi vere ne pensis ke fine ĝi rezultus vera libro.
Okazas ke poste mi enkondukis en ĝin, miksite kun mia nuntempa skribado, fragmentojn de antaŭaj verkaĵoj miaj: raportojn pri la krizo de mia lando kaj de la fabriko kie mi laboras, artikolojn kiujn mi verkis kaj kiuj temas pri aferoj pritraktataj nun, partojn de skribaĵoj al miaj gekorespondamikoj, kaj eĉ tekstojn el miaj taglibraj notoj. El ĉio-ĉi rezultis miksaĵo, krome iom senorda, kiu, tamen, celas dokumenti kaj ilustri mian argumentadon pri la temoj de nia korespondado.
Kvankam mi ne devis reskribi denove la transskribitajn partojn de miaj antaŭaj skribaĵoj, tial ke mi havas ilin en la diska arkivo de mia komputoro, mi devis tamen multe kaj intense labori dum la lastaj semajnoj por ellabori ĉi libreton. Mi restos kontenta, tamen, se tiu ĉi materialo alportas al vi ian utilon aŭ iun interesan instruon.
Kun tiu espero kaj tiu deziro, mi ĝin sendas al vi, salutante vin kamaradece kaj amike, kaj dezirante al vi sukceson en viaj klopodoj por la bono de via popolo.

Gijón, la 19-a de decembro - 1993

Gijon, la 29-an de novembro - 1993

Kara kamarado Igorj,

Saluton kaj bondezirojn. Mi tre dankas al vi pro via letero de la 4-a ĉi-monate, kiun mi ricevis antaŭ tri tagoj. La temoj pritraktataj de vi estas por mi ege interesaj, kaj mi dediĉas al ili specialan atenton; per ĉi letero mi eksponos al vi mian sinceran opinion pri ili.

Unue mi dankas al vi ankaŭ pro tio ke vi akurate respondis mian demandon pri la "afero Lyssenko". Via informo pri tiu temo sufiĉe klarigas al mi diversajn aspektojn, pri kiuj mi deziris ekscii.

Mi gratulas vin pro via kapablo sintezi per malgranda teksto komplikajn ideojn kaj kompleksajn temojn. Per dupaĝa letero vi lerte pritemis la kernon kaj la esencajn ideojn de mia longa letero de la 16-a de septembro kaj de kelkaj artikolojn kiujn mi sendis al vi. Estas evidenta ke mi ne posedas tiun kapablon; miaj skribaĵoj kutime estas longegaj; miaj leteroj ofte ampleksas kiom raportoj, kaj foje miaj respondoj al miaj fremdaj korespondamikoj estas veraj libroj, ĉefe se la pritratita temo rilatas al politiko. Mi esperas ke se la temoj interesas al vi, mia skribaĵo almenaŭ ne estos por vi teda kaj enuiga.

Vi pravas dirante ke estas multo komuna en niaj politikaj opinioj. Speciale ĝojigas min tiu teniĝo via, ke vi ne konsideras la kapitalismon kiel idealo kaj fina celo de la homaro. Tamen mi devas ankaŭ esprimi mian malakordon kun via aserto ke, la vojo de via lando al la kapitalismo estas vojo antaŭen, nepre irendan por atingi pli altan celon. Mi penos montri al vi ke tre estas erara tia opinio, kaj ke la nuna agado tiusence en via lando estas/os domaĝa ne nur por la rusa loĝantaro sed ankaŭ por la malriĉularo de la tuta mondo.

Vi diris: *Per liberigo de homoj, per agnosko (komence eĉ nur formala) de homaj rajtoj, per demokratio, eĉ malperfekta, ĝi rektigas subpremitajn homojn, civitanigas ilin. Plimulto ni estas venenigitaj per timo, kutimiĝis al rezignemo...*

En ĉi tiu malgranda paragrafo estas multe diskutebla, diskutinda kaj diskutenda, kaj mi certe faros tion laŭlonge de ĉi-skribaĵo. Sed, eĉ supozante (kaj estas nur supozo) ke tiu ideo pri demokratiigo estus justa, kial vi foroferas la socialistajn atingaĵojn de la soveta etapo por pagi tiun demokratiig-procezon? Vi estas sufiĉe inteligenta por kompreni ke en via rezonado estas stranga miksaĵo inter via demokratiemo kaj la rezigno pri la reirado al la kapitalismo. Kial vi interrilatigas la sociekonomian sistemon de Sovetio kun la politika situacio? Sovetio povis esti (kaj fakte estis) malevoluinta sistemo de politika-demokratia vidpunkto, kaj tamen esti samtempe tre evoluinta lando de sociekonomia vidpunkto. La evoluo kaj la progresado de la homaj aferoj estas malegala, malekvilibra, senharmonia... Oftege en la pasinto kaj en la nuntempo okazis tiaj paradoksoj. Mi eksponos al vi kelkajn ekzemplojn pri tio.

En via skribaĵo oni povas percepti ian memsenton de malsupereco. Ekzemple, kiam vi diras: *...nia vojo al kapitalismo estas vojo antaŭen. Aliaj landoj jam delonge pasis ĝin, sed ni estas nur en komenco.* evidentigas ke vi konsideras tre interesa imiti tion kion aliaj landoj faris jam antaŭe. Estas kvazaŭ vi supozus ke la rusa gento povas iniciati nenion indan je imitado fare de aliaj popoloj, kaj ke ĉiuj bonaĵoj venos al vi -al la rusoj- de ekstere, konkrete de Okcidento. Estas bone ke vi -la rusoj- estu pretaj ricevi la progresajn ideojn venintaj de ekstere. De ekstere vi -la rusoj- ricevis la Kristanismon antaŭ 1000 jarojn, kaj la Marksismon antaŭ cent jarojn. Via reĝo Petro la Granda, kaj poste ankaŭ la reĝantino Katarino la Granda, serĉis kaj prenis el Okcidento teknikaĵojn kaj politikajn instituciojn por ilin apliki al Rusio, kaj tiel farante ili atingis de la Historio la titolon de "Granda". Se nun vi -la rusoj- konsideras ke en la politika heredaĵo de Okcidento estas io kio povas konveni al via popolo, vi prenu ĝin kaj ĝin aplikadu saĝe kaj prudente al via rusa realaĵo. Sed mi solene deklaras al vi ke inter la imitindaj aferoj de Okcidento ne troviĝas la sociekonomia sistemo nomata kapitalismo. Tiurilate estas ni, la okcidentanoj, kiuj devas imiti -kaj efektive imitis-la rusojn. Kvankam tio eble rezultas al vi ne-kredebla, ankaŭ la rusoj de la 20-a jarcento p.K. portis la torĉon de la homa progreso kaj civilizacio en iu konkreta temo, kaj kvankam tio ne plaĉas al vi, mi aldonu ke tiu glora alportaĵo de via popolo estis faraĵo de tiu kolektivo -kiun vi ne sufiĉe favore taksas- de la bolŝevistoj-komunistoj gviditaj de Lenin, Stalin, Kruŝĉev, Breznev...

Eble vi konas la universalan historion sufiĉe por scii ke antaŭ 2000 jarojn, je la komenco de la Krista erao, la superreganta kulturo de la tiama

Mediteranea civilizacio estis la tiel nomata Greka-romia kulturo. Ĝi estis atinginta grandan progreson en la sciencoj kaj la artoj. La Greka-romia arto estis la klasikismo kiun Eŭropo volis rehavi fine de Mezepoko, en la t.n. Renesanca periodo. La greka filozofio estis vere serioza kaj grava afero. De politika vidpunkto, la Romia Imperio estis la kulmino de la evoluo de ĉiuj formoj provitaj de ĉiuj ĝistiamaj apud-Mediteraneaj civilizacioj. La romianoj disvolvis ankaŭ la tiam plej perfektan juĝ-sistemon. La samon oni povas diri pri la arto de la regado sur la popoloj, pri la tekniko de la milito... Resume, la tiamaj romanoj estis plenkonvinkitaj ke ili ne-diskuteble portadis la torĉon de la homa progreso, kaj la submetitaj popoloj estis tre influitaj de la prestiĝo de la Roma potenco kaj la Greko-romia kulturo. Nun vi imagu la senton de la judoj de tiu epoko. Ili aprtenis al unu el la multegaj popoloj vole-nevole enkadrigitaj en la Romian Imperion. Ili havis neniun signifon en la terenoj de la artoj kaj la filozofio kaj la sciencoj. Ankaŭ de politika kaj militista vidpunkto la tiutempaj judoj estis tre malgravaj. Oni povas konkludi ke je ilia memtaksado kompare al la romanoj kaj la grekoj ili sin devus senti tiom malfieraj kiom vi rilate al la kulturo de Okcidento. Kaj tamen en iu konkreta temo la judoj estis tiam la plej grava popolo el la tuta mondo. Konkrete, ili estis tre superaj al la cetero de la homaro en kio koncernas al la religio. Tiam ili estis la sola monoteisma (t.e. kredantoj je unusola Dio) popolo. Hodiaŭ, post 20 jarcentoj, ankoraŭ ekzistas la juda popolo kaj ilia religio; kaj aliaj nun ekzistantaj religioj kiel la Kristanismo kaj la Islamismo originiĝis el la judismo kaj ĉi ties religia kulturo; kaj aliaj antikvaj religioj nun ekzistantaj, kiel ties de Japanio kaj Hindio, evoluas rapide al monoteismaj formoj. Tamen restas nun nenio el la politeisma religio de la Grek-Romia kulturo kaj tute malaperis la Romia Imperio kaj eĉ la Roma popolo kaj ties leĝoj kaj politikaj formoj; kaj ĉiuj aspektoj de tiu civilizacio estis tre preterpasitaj de la atingaĵoj de la modernaj socioj.

Mi metis ĉi ekzemplon en mian skribaĵon por montri al vi ke la homa antaŭenirado en ĉiu ajn popolo ne okzas egale kaj samtempe en ĉiuj terenoj, kaj ke ĉiu konkreta popolo povas esti multe progresinta en iu fako kaj tamen resti malevoluinta en aliaj fakoj. Al tiu ekzemplo oni povus aldoni multegajn aliajn; mi aldonos kromajn du apartenantaj al nia epoko.

Eble vi estas preta ĵuri ke, en kio koncernas al la egalrajteco inter viroj kaj virinoj, la usona socio troviĝas inter la plej evoluintaj, aŭ eĉ ke ĝi estas sendube la socio kie la virinoj atingis pli altan nivelon en la konkerado de iliaj (Iŝiaj) rajtoj. Verdire, neniu kuraĝus nei tion. En Usono la virinoj ĝuas saman rajton ol la viroj en ĉiuj terenoj: Ili (Iŝi) partoprenas en ĉiutipaj laboraĵoj; multaj inoj eĉ gvidas entreprenojn kaj agentejojn. Estas multaj virinoj kuracistoj, advokatoj, ĵurnalistoj... En la lernejoj oni provizas saman klerigadon al la infanoj kaj al la infaninoj. Laŭ la Konstitucia Leĝaro, ĉiu virino povas partopreni en la politika vivo en samaj kondiĉoj ol la viroj. Ankaŭ en la tereno de la seksa vivo la usonaj virinoj ĝuas plej grandan liberecon ol ĉiuj inoj en la cetero de la mondo. Nun vi komparu tiun situacion de la usonaj inoj kun ties de la virinoj de, ekzemple, la muzulmanaj landoj. En ĉi lastaj socioj la virinoj havas neniun rajton; ili (iŝi) estas kvazaŭ propraĵo de la viroj (t.e. de la patro aŭ de la edzo). En iuj lokoj oni eĉ devigas al ĉiu ino kovri ŝian vizaĝon per veluro por eliri el la hejmo. En iuj mahometaj landoj (ekzemple Arabio) oni punas je morto la edzinon kiu adultas... Nu, mi volas nun montri al vi iun strangan paradokson pri tiu temo de la inaj rajtoj en la mondo: en Usono, spite al la leĝa teoria egaleco inter viroj kaj virinoj, dum la pli ol 200 jaroj de la historio de tiu lando neniam estis Prezidantino, ankaŭ ne Vic-prezidantino, nek aliaj altrangaj politikaj postenoj. Dume en Hindio regis dum multaj jaroj S-ino Indira Gandi, kaj nuntempe en islama lando kia Pakistano regas S-ino Benazir Ali-Butto. Eĉ la eks-tiranaĉo de Ugando, Idi Amin Dada, havis ministrinon. Ankaŭ ne povas esti pastrinoj en la RomKatolika Eklezio, kies papo Wojtila tiom zorgis pri la "demokratiigo" de la socialisma bloko. En Usono tre estis malfacile al S-ro Kennedj fariĝi prezidanto estante religie katoliko. Tamen la Irakia diktatoro Sadam Husein havas kristanajn ministrojn en lando majoritate muzulmana. En Sovetio alvenis al la plej alta pinto de la ŝtat-povo iu georgiano kiel Stalin, kaj lasttempe estis ministro pri Eksteraj Aferoj alia georgiano kiel Severnaze. Dume en Usono estas neimagebla ke alvenu al tiom altaj postenoj iu indiano aŭ iu nigr-rasulo.

Tiajn ekzemplojn mi prezentas al vi por ke vi komprenu kiom malperfektaj estas niaj mezuriloj kiam ni intencas taksi kiun estas vera signo pri demokratieco kaj pri kultura supereco, kaj kiom malfacile estas taksi ĉu iu konkreta loĝantaro estas klinita aŭ rektigita.
Kaj ankaŭ por ke vi komprenu la relativecon kaj feblecon de viaj kriterioj por pritaksi kiun kulturon estas supera al alia. Hodiaŭ vi, ruso, kaj mi, hispano, interkomunikiĝas pere de la Internacia Lingvo Esperanto, kreaĵo de D-ro Zamenhof, pola judo kiu naskiĝis kaj vivis en lando de la Rus-Carisma imperio, kaj kiu studis



L. L. Zamenhof, 1887

en Moskvo. Laŭ via kriterio pri la supereco de Okcidento, tia geniaĵo kia la Internacia Lingvo devus esti inventita en Okcidento, konkrete fare de anglo-saksa aŭ okcident-eŭropa civitano, eble protestanto aŭ katoliko, studinta en Harvard aŭ en la Sorbono. Tamen, kiel diras la Biblio, **La Spirito blovas kie Ĝi volas**, kaj en la kazo de la Internacia Lingvo la Spirito blovis en la koro de juda polo, kaj en la kazo de la batalo por la socialismo en la mondo, la ilo de la Dia Spirito en nia jarcento estis la rusaj bolŝevistoj-komunistoj. Mi konsentas kun vi pri tio ke estis multaj malpuraĵoj en tiu soveta sistemo; sed vi ne faras bone forĵetante la suĉinfanon kune kun la malpura akvo. La suĉinfano meritis esti lavita kaj vivi kaj kreski. Per tiu ĉi skribaĵo mi intencos montri al vi la gravajn sekvojn kiuj por la mondo estas rezultantaj de la buĉado de tiu infaneto.

La 30-an de novembro - 1993

Kara kamarado,
Hodiaŭ mi volas pritrakti vian aserton ke *en eksSU ne ekzistis vere komunista reĝimo*. Mi ne povas konsenti kun tiu enormaĵo. Se vi dirus al mi ke en Sovetio ne ekzistis Komunismo, bone, jes, mi konsentas kun tio. La Socialismo estas vojo, irado al la Komunismo, sed ne estas ankoraŭ Komunismo. Mi povas konsenti kun tio ke la irado al la Komunismo estis sufiĉe haltigita dum la longdaŭra regado de Breznev, kaj eĉ kun tio ke, en multaj aspektoj, oni ne trairis la ĝustan vojon por alveni al tiu sankta idealo. Mi tute samopinias kun vi abomenante pri la malatento de la soveta sistemo al la disvolvigo de iuj sciencoj kaj teknikoj kiel la elektroniko, kibernetiko...
Sed, tion dirite, en Sovetunio ekzistis vera komunista reĝimo; ne Komunismo, sed komunista reĝimo. La sociekonomiaj strukturoj estis Socialistaj, sed la reĝimo politika estis komunista, t.e. ĝi, la reĝimo (la partio, la sovietoj...) estis subjektiva faktoro por la batalo favore al la Komunismo en la mondo. Nek la despotismo de Stalin nek la malefiko de la etapo Breznev-Ĉernenko kapablis demeti de la soveta sistemo tiun karakteron kiun Lenin presigis sur ĝi.
Se vi daŭre insistas pri tio ke ne ekzistis tia komunista reĝimo, al vi rezultos tre malfacile eksplikі al mi kion estas detruante Jelcin, tiom pene kaj per tiom da leĝoj kaj dekretoj, dum ĉi-jaroj. Mi deziras al via partio la kapablon fari bonajn analizojn de la situacio. Ĉu vi intencos konvinki min ke la celo de Jelcin estas detrui la antikvan diktatorecan sistemon por konstrui demokration? Ĉiutage la presaro publikigas disponojn liajn kiuj celas la malon: la plifortigon de lia persona povo. Sed ankaŭ ĉi-tiu ne estas la sola nek la ĉefa el liaj klopodoj. Li estus povinta ĝui tian personan povon ene de la soveta sistemo, kiun, tamen, li preferis detrui. Sendube li havas personan ambicion, sed li havas ankaŭ iun politikan planon kies realigo postulas la detruadon de tio ekzistinta antaŭe. Nu, tio, kion li detruas estas la menciitaj strukturoj socialistaj

kaj la reĝimon komunistan. Mia opinio estas tiu ke dum li, kaj Popov k.a. bone scias kion ili volas detrui, vi kaj viaj sampartianoj, kaj la rusa socio ĝenerale, ne bone scias kion vi devas defendi.

Kaj se vi daŭre insistas pri tio ke ne ekzistis tia komunista reĝimo en SovetUnio, al vi tre rezultos malfacile ekspliki al mi kontraŭ kio estis batalante dum sep-dek jaroj la potenca kapitalista sistemo. Kontraŭ kio la kapitalismo armigis la eŭropajn faŝismojn de la tria jardeko de nia jarcento? Kontraŭ kio starigis la usona imperiismo la militistajn blokojn: NATO, SEATO, CENTO... Kontraŭ kio batalis la potenca CIA, la brita kaj aliaj spion-agentejoj, la propagand-agentejoj kiuj disaŭdigadis radio-programojn al la loĝantaro de la socialistaj landoj...? Kontraŭ kio mobilizis ĉiujn ideologiajn rimedojn tiel la imperiismaj centroj kiel la plej reakciaj sektoroj de la Vatikano? Kaj fine, -kaj ĉefe-, kontraŭ kio oni starigis en Eŭropo tiun sistemon de la Komfort-Socio kaj konsum-socio? La tuta penado de ĉi-longa verkado mia celas klarigi al vi pri tiu ĉi punkto: kion vi devis/as konservi el la heredaĵo de Lenin?

Nun, antaŭ la daŭrigo de mia rezonado, mi volas ke vi tralegu la suban artikolon, kiun mi verkis lasttempe por ties publikigo en esperantlingvaj gazetoj, kaj hispanlingve en dokumentoj de mia urba Kom.Partia organizaĵo.

### Finiĝo de la Komfort-socio

Tre ofte dum la lasta tempo la informiloj: presaro, televido, k.a. prezentas la deklaraciojn de ekonomiistoj, politikistoj k.s., kiuj asertas ke finiĝas aŭ elĉerpiĝas tiu modelo de socio, aŭ periodo, nomata **Komfort-Socio**. Pli kaj pli ofte, hispanaj ministroj, kaj eĉ la Registar-Prezidento de nia lando, lasttempe informadas ke alvenas dura etapo por nia ekonomio, kaj ke jam ne plu eblas subteni la sociajn servojn kiuj karakterigis la tiel nomatan **Komfort-Socio**. Surprizige, tiuj pesimismaj anoncoj subite ek-komenciĝis post periodo dum kiu oni optimisme anoncis la aperon de **Nova Internacia Ordo**, kaj oni prezentis tiun novan etapon kiel feliĉa mondo de paco kaj ekonomia prospero.

En tiu ĉi kunteksto konvenas klarigi kio estas, aŭ pli ĝuste, kio estis la Komfort-Socio, kaj kion ĝi signifis dum la kelkaj jardekoj de ĝia ekzistado. La termino venis el la traduko de la angllingva esprimo *Welfare state*, kaj per ĝi oni intencis difini iun konkretan socio-tipon kiu ekzistis ekde la fino de la Dua Mondmilito en Okcidenta Eŭropo, kaj kies specifaj trajtoj estis la socia paco, la plenlaboreco kaj relative alta konsum-socio, samkiel la ekzistado de alta ŝtata interveno en la produktad-procezo kaj fortaj publikaj, ŝtataj, sociaj servoj. Iamaniere la Komfort-socio signifis interkonsento inter la sociaj klasoj, surbaze de *ekonomia disvolviĝo*. La posedantaj klasoj akceptis la redistribuadon, pere de la ŝtato, de la sociaj rentoj favore al la salajroj, kaj fiska politiko serve de tiu celo por certigi la socian pacon. Kiel pago de tiu cedo, la posedantaj klasoj postulis la ne-tuŝeblecon de la fundamentoj de la kapitalisma produktado: la senlima privata propraĵo de la produktad-rimedoj. Sur tiu bazo ili rekonis la politikajn kaj sindikatajn instituciojn de la proletaro. Ĉi tiu, siavice, akceptis tiun politikon de rentoj, kiu ebligis la kreskiĝon de ilia konsum-nivelo, kaj prokrastigis aŭ provizore forgesis la politikan diskutadon de la fundamentoj de la privata kapitalismo, t.e. ili, la laboristoj, prokrastigis la aferon de la socia revolucio, kaj atingis la rekonon de siaj propraj organizaĵoj -partioj, sindikatoj, k.s.- kiuj enkadriĝis en la institucioj de la ŝtato.

Tamen, kiam la popoloj de la malevoluintaj landoj de la Tria Mondo volis partopreni en la ĝuado de la fruktoj de la ekonomia disvolviĝo, al kiu multaj el ili kontribuis per sia nafto kaj aliaj krud-materialoj, oni perceptis la limojn de la Komfort-Socio. Laŭ la planoj de la superregantaj klasoj de la sistemo, tiuj popoloj devus por ĉiam resti en sia mizera stato. Sed en Okcidenta Eŭropo kaj aliaj privilegiitaj zonoj, tiu politiko de la Komfort-Socio ebligis senprecedencan ekonomian disvolviĝon, kiu siavice ebligis relative efike la distribuon favore al la salajroj kaj la atingon de sociaj rajtoj de la laboristaro (sanec-servo, bonfaraj institucioj...), kaj oni atingis situacion de preskaŭ plen-laboreco, kaj la kapitalismo ŝajne akceptis la ŝtatan intervenon en la ekonomia planado. Do tiu interklasa pakto

(implicita aŭ eksplicita) generis riĉegan konsumsocion neniam antaŭe ekzistintan. Estas klare tio ke en Hispanio neniam ekzistis plena **Komfort-Socio** kiel ties de la riĉaj landoj de Okcidenta Eŭropo. Tamen, nedudeble plenregis en nia lando unu el la karakteraĵoj -kaj ne el la malpli gravaj- de la Komfort-Socio, t.e. la plenlaboreco, kaj dum la lastaj jardekoj oni atingis en nia lando ian kontentigan konsum-nivelon.

Sed ĉio-ĉi perdiĝas de nun iompostiom, tiel en Hispanio kiel en la ceteraj Eŭropaj landoj, dum la ekonomia situacio malboniĝas ankaŭ en Usono, Kanado, Japanio... kie ekzistis similtipa konsumsocio. La unuaj indicoj de la ruiniĝo de tiu mondo, estis la likvido de la socialista bloko, de la komunistaj reĝimoj de Orienta Eŭropo. Dum la stabila periodo de la komunista regado, ekzistis en tiuj socialistaj landoj labor-sekureco, kaj estis certigita ankaŭ la klerigado por ĉiu infan(in)o kaj la loĝejo, eĉ se modesta, por ĉiu familio, samkiel la sanecservo por ĉiu civitano. La homoj de tiu socio alkutimiĝis al tiuj rajtoj kaj pensis ke ili estis ne-perdeblaj, kaj sekve ili malaprezis tiujn bonaĵojn kaj emis la konsum-nivelon de la riĉa socio de Okcidenta Eŭropo, tute ne-ebla por ili. Ankaŭ la laboristoj de Okcidenta Eŭropo alkutimiĝis al la Komfort-Socio kaj ne pensis ke tio estis rekta rezulto de la ekzistado de la socialista bloko. Se ne estus ekzistinta la kom.reĝimoj, la kapitalismo de Okcidento ne estus rezigninta pri la redistribuado de la rentoj dum la **Welfare-state**-periodo. Nun jam ne plu ekzistas Sovetunio kaj la Socialista sistemo, do la okcidenta kapitalistaro reprenas sian ekonomian kaj politikan povon, finiĝas la teatraĵo de la Komfort-Socio, kaj la laboristaro -oriente kaj okcidente- restas en tre malfavora situacio. Nun ni troviĝas en la situacio kiam la laboristklaso kaj aliaj popolaj tavoloj de ĉiuj evoluintaj landoj devas rekonsideri tiun lastan historian periodon kaj reformuli siajn celojn. Fakte, ekde antaŭ proksimume duonjarcento, tiuj klasoj rifuzis plenumi kaj entrepreni la socian revolucion necesa por liberigi la tutan homaron el la ekspluatantaj klasoj. Ili rezignis pri ilia revolucia tasko preze de la komforto de la konsumsocio. Hodiaŭ ili, ni, perdas la komfort-socion, kaj la revolucio restas ne-farita. Eble tiuj klasoj lernos ne perfidi sian mision. La laboristaro de la alte industriigitaj landoj ne kondutis, dum la pasintaj jardekoj, sufiĉe solidarece kun la ekspluatataj homoj de la Tria Mondo. La egoismo kaj malsolidareco de nia ne-revolucia teniĝo, nun iamaniere falas sur ni







mem. Dum tiuj lastaj jardekoj, la sola zorgo de la laboristoj de Okcidento estis ke oni plialtigu al ili la salajron por kapabli aĉeti kaj konsumi pli kaj pli da superfluaj aĵoj. Ili (ni) ne zorgis pri la stato de la revoluciaj popoloj de Nikaragvio, Kubo kaj aliaj Amerikaj kaj Afrikaj landoj. Ili ne volis kompreni ke la intereso de la malsatantoj de la mondo -du trionoj el la tuta monda loĝantaro- postulis la senĉesan atakadon al la kapitalisma kaj imperiisma sistemo ĝis ĝia kompleta finruinigo. Kaj kiel dirite, hodiaŭ ni rikoltas la fruktojn de nia malsolidareco. Multaj miloj da afrikanoj kaj aliaj fremduloj el la malriĉa mondo alvenadas al nia landa teritorio fuĝante el la mizero kaj malsato ekzistantaj en iliaj devenlokoj. Ili pergajnas sian vivon laboregante por ricevi nur mizeran salajron. Tio domaĝas la hispanajn gelaboristojn, ĉar la labordungantoj preferas kontrakti tiujn malmultekostajn afrikanojn kiuj laboras kiel duonsklavoj. En kelkaj Eŭropaj landoj, ne nur en Hispanio, la agrokulturo estas ruinigata tial ke venas el tropikaj landoj multaj fruktaĵoj kaj legomoj kiuj estas tro malmultekostaj pro tio ke prilaboras ilin sklavaj gelaboristoj de tiuj terzonoj. Io simila okazas kun la karbo. La karbo-minejoj de Eŭropo, inter ili tiuj de nia Asturia regiono, devas esti fermataj ĉar nia Eŭropa karbo ne plu estas rentebla. Rezultas malpli kosta la karbo kiu venas el SudAmeriko kaj aliaj malriĉaj terzonoj tial ke en tiuj lokoj prilaboras la karbo-minejojn sklavoj al kiuj oni pagas tre malmulton aŭ neniom. Oni scias ke en la minejoj de Peruo oni igas labori naŭjarajn infanojn sklavigitajn.

Konsiderante ĉi ĉion, oni povas kompreni kiom sarkasme sonas en niajn orelojn la deklaraciojn de niaj maldecaj regantoj kiam ili diras ke ni, la hispanoj, devas esti kapablaj konkuri kontraŭ fremdaj produktantoj. La interna ideo de tiu aserto estas ke la hispanaj laboristoj devas konsenti la malboniĝon de niaj vivkondiĉoj por ke niaj produktaĵoj povu preze konkuri kontraŭ la produktaĵoj de la triamondaj sklavoj.

Resume, por nia eks-riĉa socio de nun la kontraŭdiroj fariĝos pli akraj. Ke ili alportu al ni la instruon, ke ni ne sukcesos liberiĝi sen nia kontribuo al la liberigo de la tuta homaro.

Gijon, la 1-a de decembro - 1993

Kara kamarado,

Eble la ĉi supre transskribita artikolo alportas al vi iun interesan informon pri la evoluado de la situacio en la kapitalistaj landoj de Okcidento. Tamen la ĉefa mesaĝo kiun mi volas komuniki al vi per ĝi estas tiu ke, dum la pasintaj jardekoj, la socia realaĵo de tiuj ĉi landoj de Okcidenta Eŭropo tre estis influita de la ekzistado de granda Socialista bloko en Orienta Eŭropo.

Ni prenu ekzemple, la kazon de Aŭstrio. Ĉi tiu lando tute ne apartenis al la Socialista bloko. Kvankam formale neŭtrala en kio koncernas al la t.n. "malvarma milito", Aŭstrio estis plene enkadrigita en la kapitalista mondo en kio rilatas al la ekonomia sistemo. Nu, mi volas tamen substreki la fakton ke en la ŝildo aŭ flago de tiu centreŭropa lando enestis, inter multaj aliaj signoj, la emblemo de la serpo kaj la martelo, kiu estas, kiel vi scias, simbolo komunista. Dum tiuj jardekoj, la sama emblemo enestis ankaŭ en la flago de la Socialista Partio de Italio, t.e. de la menĉevistoj de tiu lando; ne nur en la komunista P.C.I. Tio ne estus povinta okazi se tiu simbolo, kaj la komunistaj reĝimoj kiuj alprenis ĝin, ne estus ĝuintaj je granda prestiĝo inter ampleksaj amasoj de la kapitalistaj landoj.

Sed plej interese estis tio ke en la sociekonomia realaĵo de tiuj kapitalistaj landoj de Okcidenta Eŭropo estis enkondukitaj gravaj elementoj de socialista karaktero. En Svedio, GFR, Britio... k.a., kvankam en ties flagoj ne aperus tiaj eksteraj signoj de komunista elvokiĝo, fakte oni alprenis multajn kaj gravajn disponojn kies celo estis mildigi la situacion de la gelaboristoj kaj la malriĉaj tavoloj de la loĝantaro. Tio estis rekta influo de la forto kaj la prestiĝo de la socialista landaro subgvide de SovetUnio. La kapitalistoj de Okcidento ne povis permesi al si ke la ĉi-tiea laboristaro havu antaŭ siaj okuloj la ekzemplon de la landoj kun komunistaj reĝimoj, kies loĝantaro ĝuis je fiksa laborloko, sociaj servoj, senpaga instruado... Al niaj burĝuloj estis necese ke ankaŭ la okcidenta laboristaro havu tiujn sociajn bonaĵojn, kaj krome superi al la orientlandaj en kio koncernas al la konsumnivelo por malstabiligi la revoluciajn reĝimojn.

Al mi tre plaĉas kaj interesas legi la aŭtobiografiojn aŭ memoraĵojn verkitaj de famaj politikistoj. Ili permesas al mi rigardi la

historiajn okazaĵojn ekde diversaj anguloj kaj malsamaj vidpunktoj. Nu, legante la travivaĵojn de iu eksprezidento de la registaro de Britio, mi eksciis pri la kialoj kiuj pelis lin viziti Sovetunion dum kelkaj semajnoj en la jardeko de 1930 al 1940. Li vizitis la SovetUnion de Stalin, kaj rakontis ke li renkontiĝis tie kun aliaj politikistoj de Eŭropo kaj Usono kiuj estis alirintaj tien pro la samaj kialoj kiel li. Ĉiuj ili estis interesitaj pri la funkciado de la sociaj servoj de la Unua Socialista Sistemo de la mondo, por ties ebla aplikado en siaj respektivaj landoj. Klarigendas ke ili (tiuj politikistoj) ne estis revoluciaj, eĉ ne progresistaj, sed tute male; ili volis eviti revoluciojn kaj sociajn konvulsiojn en siaj kapitalistaj landoj, kies kapitalisman sistemon ili volis konservadi poreterne. Sed tamen ili estis konsciaj pri tio ke, dum ekzistus en la mondo io simila al Sovetunio estas necese entrepreni iujn reformojn en la kapitalisma socio de la alte industriigitaj landoj. Poste la progresoj de la Socialismo en Orienta Eŭropo, Ĉinio, Koreujo, Kubo, Vjetnamio, Nikaragvo... ankaŭ sub la glora prestiĝo de la Oktobra Revolucio de Rusio kaj la simbolo de la serpo kaj la martelo, plu igis ke la superregantaj klasoj de Okcidento konsentu kun tiu hibridaĵo inter socialismo kaj kapitalismo, nomata **Komfort-Socio**. La laboristoj de Eŭropo, tiel la okcidentaj -kiuj ĝuis la komsumsocion-, kiel la orientaj -kiuj emis al tiu konsumsocio- ne volis scii ke tiu vivnivelo de la alte industriigitaj landoj de la kapitalista mondo estis ebla nur dank' al la super-ekspluatado de la popoloj de la Tria Mondo kaj de la teraj riĉ-fontoj.

Sur tiu falsa kaj febla bazo disvolviĝis tiu procezo de la lasta jardeko dum kiu, samtempe ke malpliiĝis inter la okcidentaj laboristoj la prestiĝo de la komunistaj reĝimoj, pliiĝis en la loĝantaro de la socialista bloko la prestiĝo de la kapitalismo. La procezo kulminis per la ruiniĝo de la socialista bloko: unu el la plej grandaj frenezaĵoj de nia homa specio en sia longa historio. Vi komprenu la senesperon kiu premis min dum mi spektis kaj travivis tiun hontigan procezon, ne povante fari ion por ĝin eviti. Mia malgrava persono povas nur per la parolo kaj la skribo kontraŭbatali la fiagojn de la grandpotenca imperiisma superekspluatanta klaso kaj ties lakeoj kiel Fujimori, Leĉ Valesa, Vacklav Havel, Jelcin... kaj tion mi faras per ĉi skribaĵo.

Cele de ke vi enkondukiĝu en la senton kiu premis min dum tiu fia etapo, mi transskribas ĉi sube kelkajn fragmentojn (partoj, eroj) de skribaĵoj miaj de la monatoj majo kaj junio de 1992. Ili estas elprenitaj el malsamaj skribaĵoj miaj de tiu epoko: artikoloj, leteroj, taglibro... Per la komputoro mi povas fari la storadon, elektadon kaj kunigon de la deziritaj tekstoj.

(Majo-1992). Oni multe informas pri tio ke en la ĝis nun socialistaj landoj oni restarigas la privatan propraĵon de la tero, bienoj... kaj la tieaj popoloj feste celebras tion. Kiu diris al ili ke tiu agado estas bona por la popolo, por la socio? Kiu diris al ili ke tiele oni kontribuas al la progreso de la lando? Per la redono de la proprietaĵoj al la proprietuloj oni starigas la bazon por la reveno al la mezepoka feŭdismo, por la rekonstruado de la klasisma socio. Ili ne komprenis ke tiu malbeninda sistemo de privata propraĵo ne traktas ĉiujn homojn egalmaniere. Ĝi dividas la homan idaron en du malsamjan grupojn: tiuj kiuj posedas, kaj tiuj kiuj ne posedas; tiuj kiuj gajnadas kaj tiuj kiuj perdadas; tiuj kiuj havas multon, kaj povas luo-preni aliajn homojn, kaj ĉi-tiuj kiuj devas vendi sian laborforton, ĉar ili ne disponas de iu ajn propraĵo; ekspluatantoj kaj ekspluatatoj. La plej maljustaj sociordoj, kiel la feŭd-sistemo kaj la kapitalismo, baziĝas precize sur tiu realaĵo de la ekzistado de privataj propraĵoj kaj privataj proprietuloj. Ĉiuj ekspluatadoj, konkeroj, krimoj, rabado kaj subpremo de la longa homa historio havis sian originon en la privata proprieco. Kaj nun oni aplaŭdas kiam oni revenas al tiu sistemo!

Ene de la sama monda kapitalista sistemo estas riĉegaj zonoj kaj malriĉegaj zonoj, alte industriigitaj landoj kaj malevoluintaj landoj. Foje eĉ ene de la sama lando estas prosperaj zonoj kaj ruinigitaj regionoj. Mondskale kaj landskale estas multe-nombraj gradoj aŭ ŝtupoj de malsamaj sociaj situacioj, klasoj, subklasoj, grupoj, tavoloj... Samtempe, ĉiuj klasoj kaj tavoloj rilatas unu la alian. La prospero de iuj rilatas al la ruino de aliaj, ies riĉeco estas sekvo kaj kaŭzo de alies malriĉeco, la komercaj interrilatoj ne estas same profitaj por ĉiuj partoj kontraktantaj, la fortuloj povas trudi favorajn por ili komercado-kondiĉojn, la



*Nepra rezulto de la sistemo bazita sur la privata propraĵo estas la grandaj ekonomiaj malekvilibroj: troakumuliĝo de riĉaĵoj en iuj mondpartoj, kiel kaŭzo kaj sekvo de la ruino de aliaj zonoj.*

rilatoj inter la sociaj klasoj ne estas fratecaj sed egoismaj.

En Sovetunio atingis la tuta loĝantaro la plej altan vivnivelon kiun la tiea ekonomio povis permesi. Oni estus povinta atingi tie pli altan komforton se la loĝantaro pli laboreme estus apoginta sian socialisman sistemon. La malsaĝaj popoloj estis trompitaj de la propagando de la okcidenta burĝklaso. Ili volis kredi ke venos al ili granda riĉeco forrifuzante la komunismajn idealojn. Tiuj popoloj vane atendos la plenumon de la anoncoj de la kapitalistoj. Fakte ilia situacio daŭre kaj profunde malpliboniĝos. Venos riĉeco, estas venanta jam, nur por tre malmultaj uloj; la cetero el la popolo pagos per ilia laborado kaj ilia suferado la prosperon kaj pliriĉiĝon de la kontrolantoj de la monda monopolisma kapitalo, kaj de la kapitalistaj lakeoj de sia lando. Se la ekssocialistaj landoj ricevos financan helpon de la bankieroj de Okcidento, ili enŝuldiĝos kiel ĝis nun faris la malevoluintaj landoj de la Tria Mondo. Kaj se ili ne ricevos tiun helpon, neniel ili progresos ekonomie kaj sciencteknike.

Nuntempe agadas kontraŭ tiuj popoloj de la ekssocialistaj landoj ĉio kion ili faris kontraŭ siaj respektivaj komunistaj reĝimoj. Ĉio farita por ruinigi la sistemon socialistan hodiaŭ estas ruino por la popolo kiu tion faris. La mallaboremo, la senintereso de la popolo pri la planoj de solidareco de la kom.reĝimoj kun la revolucioj de ĉiuj mondpartoj... ĉio-ĉi nun falas sur la kulpantaj popoloj kiuj preferis aŭskulti la burĝan, kapitalistan propagandon de Okcidento. Por denove fariĝi tiuj popoloj mastroj de sia propra destino, ili devos malfari ĉiujn stultaĵojn faritajn dum la lastaj jaroj kaj komenci denove -socialiste- de nulo. Mi dubas ke la nuna generacio de tiuj popoloj kapablos entrepreni tiun vojon. Nun ili estas ankoraŭ halucinitaj pro la ĵus konkerita "libereco". Post kelkaj jaroj venos la perpleksiĝo konstatante ke la burĝa demokratio kaj la kapitalismo ne alportas la esperitan progreson. Nur poste, jam en alia

generacio, la popolo komprenos la enormecon de la frenezaĵoj laste efektivigitaj de la nuna generacio. Iliaj genepoj, ilin juĝos post 20 aŭ 25 jaroj. Tiam, en la jaro 2017 oni celebros la jarcentan jubileon de la Granda Rusa Revolucio de 1917; tiam estos la okazo rememori la esperojn vekitajn de tiu Revolucio, la atingaĵojn de la socialista sistemo, la liberigan rolon de la soveta komunista reĝimo en la mondo, la fiaskon de la Perestrojko kaj la perfidon de la perestrojkistoj. La homoj de tiu generacio demandos al si, kaj demandos al siaj gepatroj, kiel oni vendis tiun mesian kaj revolucian rolon por unu manĝaĵ-plado, kiu krome ne estis poste ricevita.

Oni festas la malaperon de la Varsovia Kontrakto, kaj oni insistas propagandocele pri tio ke tiu militista kontrakto estis minaco kontraŭ Eŭropo. Tiu armeo konstituis minacon nur por la kapitalistoj kaj ekspluatantoj de Eŭropo, neniam por la Eŭropaj popoloj. Sed ĉiukaze, kial oni kuraĝas diri tion kiam estas de ĉiuj konate ke la militista bloko NATO estis konstituita unue, antaŭ la "Varsovia Kontrakto", kaj ĉi tiu naskiĝis nur kiel memdefenda reago antaŭ la agreso-iniciato de la imperiismo? Ĉiuj scias ke ĉiam la NATO disponis je pli multenombraj kaj potencaj armiloj kaj armeoj. Ĉiu nova tipo je bombo, ĉiu nova tipo je bombardad-avialdilo, ĉiu nova tipo je tanko, aviadil-portanta ŝipo, estis enkondukita antaŭe en la NATO ol en la "Varsovia Kontrakto". Nur la NATO disponis je submarŝipoj armitaj je neŭtronaj armiloj. Kaj laste la NATO pliintensigis la vetarmadon per tiu infera programo de la spaco-milito. Eĉ kiam la soveta armeo detruis siajn tankojn kaj arsenalojn, la imperiisma bloko daŭre restis armita kaj eĉ entreprenis agresajn militojn en kelkaj mondpartoj (Panamio, Irakio) kaj nun, kiam jam ne ekzistas serioza kontraŭanto en la mondo, la imperiisma potenco daŭre sin armigas por esti preta interveni brutale en ĉiu ajn mondparto kie oni intencos rezisti kontraŭ la Nova Internacia Ordo de la ekspluatantoj de la mondo. La 27-a de januaro la presaro informis ke, laŭ ordono de Jelcin, la rusaj raketoj ĉesis celi al Usono. La sekvan tagon, la sama presaro informis ke, laŭ ordono de Prezidento Buŝ, la usonaj raketoj daŭre celas al Rusujo. En tiu kunteksto, la asertoj pri la danĝereco de la soveta armeo estas insulto al la Vero, al la Historio kaj la homaro subpremita de la imperiismo.

Estis celo de la soveta armeo garantii la pacon kaj sekurecon en Eŭropo. Hodiaŭ estas antaŭ ni la sekvoj de la malapero de tiu armeo kaj ties homarfavora celo. Hodiaŭ estas milito en Eŭropo! En Jugoslavio estas civilmilito subtenita de la Eŭropaj kapitalistaj landoj. Estas neniu sekreto ke Germanio apogas kaj armigas la kroatanojn, kaj ne mankas apogantoj kaj armigantoj al Servio. La Germana potenco kiu ekbruligis kaj perdis du mondmilitojn en la nuna jarcento, denove fortikiĝas kaj movigas siajn interesojn en Eŭropo.

(La sekva fragmento estis eltirita el la teksto de mia taglibro, de la 18-a de majo 1992)

Hieraŭ, dimanĉe, okazis en Romo, en la Vatikano, la ceremonio de proklamado de nova sanktulo de la Rom-Katolika Eklezio. Temas pri la hispana Monsinjoro Eskriva-Balager. Unuavide ŝajnas ke ĉi tiu afero neniel rilatas al socipolitika temaro. Sed la realo estas ke tiu hieraŭa religia akto akiras sian ĝustan signifon en la nuna monda kunteksto, en la ŝanĝoj okazintaj dum la lastaj jaroj en la ekssocialistaj landoj kaj ĝenerale en la tuta mondo.

Tiu Eskriva-Balager estis homo kies vivo kaj karaktero tute ne alĝustiĝas al la modelo de la sanktuloj de ĉiuj religioj. Ĝenerale la sanktaj homoj kiujn ĉiuj religioj metas antaŭ la homaro kiel imitindaj modeloj estas: viroj kaj virinoj humilaj, sindonemaj, solidaraj kun la malfeliĉuloj... Eble la plej tipa el tiaj sanktuloj estas la famkonata Francisko el Asizo. Kvankam li estas katolika sanktulo, li estas respektata kaj honorigata ankaŭ de la protestantoj, de la grek-ortodoksaj eklezioj, kaj eĉ de la komunistoj kaj la anarkistoj. Verdire, Francisko el Asizo estis mezepoka ekzemplo de bona kristano kaj de vera komunisto. Estante riĉulo, tiu sankta viro fordonis ĉiun sian havaĵon por helpi la malriĉulojn, kaj dediĉis sian vivon al la

servado al la malfeliĉuloj. Estante mi tre malproksime de la atingo de tiu modelo, mi konscias ke mia perfektiĝo postulas ke mi pli kaj pli intencu alĝustiĝi al la imitado de tiu modelo, en la linio de la imitado de la Plejalta Modelo de ĉiuj modeloj: JesuKristo.




*Ambicia, malmodesta, aŭtoritatema, memfiera kaj simpatianto de la faŝismaj reĝimoj: Jen J.M.Eskriva Balager, nova sanktulo de la RomKatolika Eklezio por la mondo de la Nova Internacia Ordo.*

Nu, en la hieraŭa tago la Eklezio gvidata de S-ro Wojtila metis sur la altarojn iun ulon kiu estas la plej kompleta neado de la modelo Francisko el Asizo, la plej kompleta neado de la spirito de Kristo. Tiu Eskriva-Balager, estante denaska malriĉulo, prosperis dum sia religia vivo ĝis atingi la gvidadon de tre grava kaj riĉa religia ordeno, la t. n. "Opus-Dei". Estante popolano li petinsistis ĝis oni asignis al li aristokratajn titolojn en la socio kaj en la Eklezio. Oni ne konas en la historio alian sanktulon kiu mendis por si titolon, kaj oni konas kazojn de aliaj kiuj posedantaj denaske tiajn titolojn, humile rifuzis ilin por sekvi Jesuon. Sed ĉi-kaze, tiu ulo serĉis por si dum sia tuta vivo honorigojn, titolojn kaj riĉaĵojn. Oni scias ke li estis por siaj subuloj aŭtoritatema, kolerema kaj aroganta. Li apogis de sia influa religia pozicio la faŝisman diktatoron F.Franko-n, kaj neniam li kaŝis sian simpation al Hitler kaj Mussolini. La ordeno "Opus-Dei" kreita de li estas elitisma, kapitalismo-favora, aristokratara... Multaj personoj ene kaj for de la Rom-Katolika Elezio abomenas pri tiu ulo, eĉ membroj de lia propra ordeno. La komuna karakteraĵo de la veraj sanktuloj estas tiu ke ili estas universale akceptataj, eĉ de la sekvantoj de aliaj religioj. Ĉi tiu fiulo estas rifuzata eĉ de multaj el liaj samreligianoj. En la religia meso (diservo) kiun mi ĉeestis hieraŭ, la pastro de mia parokejo tute ne menciis la aferon de la hieraŭa sankt-proklamado. Neniam tiel okazis rilate al antaŭaj saktigadoj. Ekzemple, kiam antaŭ malmultaj jaroj estis sanktigita la pola pastro Kolbe, ĉiuj kristanoj kaj ne-kristanoj koincidis pri la fakto ke tiu homo estis vera sanktulo, vere imitinda homo. Li, estante en nazia koncentrejo dum la Dua Mondmilito, akceptis esti kondukata en la mortigejon anstataŭante alian homon kiu estis patro de kelkaj gefiloj. Ĉiu homo, kiu ajn estu ilia religia sinteno, agnoskas la sanktecon de tiaj agoj. Sed nia Eskriva-Balager estas akceptata nur de siaj sekvantoj de la "Opus-Dei" alprenintaj la elitisman rolon de tiu ordeno, de la riĉuloj kaj personoj de la aristokrataraj tavoloj. Ili tre kontentas konsiderante ke tiu Eskriva-Balager sukcesis kontraŭdiri la aserton de Jesuo, pri la malfacilaĵoj por la enirado de la riĉuloj en la Dia Regno. Niaj riĉuloj vidas nun ke spite al Kristo, la mono malfermigas ĉiujn pordojn, eĉ tiujn de la Ĉielo; jen tiu estis la mesaĝo kiu plaĉas al tiuj klasoj.

Multaj ĵurnalistoj kaj bone informitaj homoj asertas ke la Rom-Katolika Eklezio neniam sanktigus tiun ulon, Eskriva-Balager, se ne estus okazinte lasttempe la disfalo de la komunistaj reĝimoj.

Jes, la disfalo de la komunistaj reĝimoj de Orienta Eŭropo, ebligita de la blindeco kaj nescio de la tieaj popoloj, estis la signalo por ke en la mondo la reakciaj fortoj entreprenu ĝeneralan ofensivon kontraŭ la progresismo, kontraŭ ĉiuj ideoj de justeco kaj egaleco inter la homoj. Post la Franca

Revolucio de 1789, post la sekvaj liberalaj revolucioj en ĉiuj industriaj landoj, post la proletaraj revolucioj en Rusujo en 1905 kaj 1917, post la sekva venko de la komunistoj en aliaj Eŭropaj landoj, en Ĉinio, en Koreujo, Vjetnamio, Kubo k.t.p. la kontraŭrevoluciaj fortoj ektimis ke pli kaj pli mallarĝiĝus la mondan parton de ili kontrolata. Sed precipe timigis ilin la fakto ke la intelektularo eĉ en la kapitalismaj landoj estis fokusoj de disradiado de progresistaj ideoj. Oni instruis marksismon en la plej prestiĝaj universitatoj de Parizo, Londono, Romo, Novjorko... Resume, la marksistaj-leninistaj ideoj ĝuis konsiderindan prestiĝon inter la intelektularo kaj la junularo de la kapitalistaj landoj. Disvastiĝadis la legado de la verkoj de Maŭ-Ze-Dong, de Trotskj, de Markuse... tiel en la demokratiaj reĝimoj kie estis preslibero, kiel en la landoj submetitaj al faŝistaj diktaturoj, kiel Hispanio kaj Portugalio, kie estis malpermesata tia literaturo. Menciinda estis la kazo de Portugalio, kie oni pasis de tia faŝistoida



*La vantomontrado de luksa vivmaniero fariĝis ekstera signo de la venkintoj de la "Malvarma Milito", la elitaj klasoj de la mondo.*

reĝimo al ekstrema-maldekstra registaro en mallonga daŭro. Poste estis ankaŭ en Hispanio simile rapida, kvankam ne simile profunda, ŝanĝo-procezo.
En tiu kunteksto de ideologia venko de la progresistaj, socialistaj, maldekstraj ideoj, eĉ la Rom-Katolika Eklezio -tiome ligita al la feŭdisma sistemo en antikvaj epokoj- sin sentis devigita alpreni iajn progresistajn sintenojn por ne resti eks-moda en mondo kiu tiom ŝanĝadis dum la du lastaj jarcentoj. Kelkaj papoj publikigis enciklikojn (religiaj dokumentoj destinitaj al ĉiuj katolikoj kaj ĝenerale al la mondo) per kiuj ili, eĉ se rifuzante la komunismon, alprenadis, akceptadis la ĉefajn postulojn de la marksisma movado. La kulmino de tiu evoluo okazis antaŭ 20 jaroj, post la finiĝo de la fama Koncilio de la Katolika Eklezio. Tiam, dum la regado de la papo Paulo la 6-a, la Eklezio eĉ akceptis la komunismon kiel iu pli inter la bonaj politikaj teniĝoj kiujn iu ajn kristano povas sincere celi, kaj fakte de tiam ne malmultaj katolikoj, kaj eĉ pastroj kaj teologiistoj, membras ĉe komunistaj partioj kune kun ateistoj kaj anoj de aliaj religioj.
Sed jen kadre de la ideologia reago de la malprogresemaj fortoj, la Katolika Eklezio, nun kontrolita de tiu maldeca pola papo, persona amiko de la maldeca pola reganto Leĉ Valesa, entreprenas ofensivon kontraŭ la progresista ideologio, fakte kontraŭ la malriĉuloj, subpremitoj kaj ekspluatatoj de la mondo. Tiu papo silentigis la progresistajn teologiistojn de la Ibero-Amerika katolika movado "Liberigo", kaj hieraŭ mem, tiu sanktigo de la malbeninda Eskriva-Balager estas kvazaŭ kraĉaĵo sur la malsatantoj de la mondo, sur ĉiuj veraj sanktuloj, sur Kristo krucumita... Ŝajnas ke la tuta reakciularo de la mondo, ene kaj for de la Vatikano, alvenis al la konvinkiĝo ke de nun, post la fiasko de la komunistaj reĝimoj, oni povas insulti senpune la sklavojn de la mondo.
Simila estis la kazo pri la rasaj kaj klasaj konfliktoj en Usono. Tiu maljusta verdikto absolvante la kvar policistojn kiuj iam brutale batis nigrulon, estas rezulto de simila konvinkiĝo, far de la usonaj privilegiitaj klasoj, ke de nun jam ne plu estas necesa trakti justece kaj homece la nigrulojn. Antaŭ kelkaj jardekoj la usona leĝaro perfektiĝis malpligrandigante la rasismajn disponojn kontraŭ la nigruloj, malpligrandigante konsiderinde la rasan diskriminacion kontraŭ nigruloj, hispanoj, indianoj kaj aliaj rasaj kaj etniaj minoritatoj. Tiam tre estis laŭmoda leĝadi favore al la humilaj rasuloj; tiam ekzistis kaj estis forta la soveta bloko kiu apogadis ĉiujn subpremitajn popolojn en la mondo. Sed nun, post la malapero de tiu komunista bloko oni povas kraĉi kaj feki sur ĉiujn subpremitojn kaj malfeliĉulojn de la mondo. La novaj partioj de la naziisma junularo de Germanio kaj aliaj Eŭropaj landoj scias ke nun ili povas senpune mortigi judojn kaj bati eksterlandajn laboristojn, kaj krome farante tion ili rezultas tre laŭmodaj. La imperiismo scias ke nun oni povas invadi Panamion kaj bombardi Libion kaj Irakion, kaj krome oni aplaŭdos ilin en Moskvo kaj en Prago. Iu usona teoriisto, Francis Fukujama, verkis libron titolitan "La fino de la historio", per kiu li krude deklaras -dum sin gratulas- ke nun, post tiom feliĉa por la riĉuloj rezulto de la t. n. malvarma milito, oni povas senĝene fieri pri la riĉaĵojn akiritajn, ĝui luksajn aŭtomobilojn kaj domegojn, kaj evidentigi aliajn eksterajn signojn de riĉeco, eĉ se per tiuj agoj oni insultas la grandamason da homoj kiuj posedas nenion. Laŭ li, oni devas per tiu publika elmontro de ekonomia sukceso, veki konkuremon el kiu rezultas venkintaj la plej lertaj kaj senskrupulaj dum fiaskas la malfortaj kaj la honestaj. Tiu nova moralo de tiu pagana riĉularo pretendas likvidi la moralon de karitato de dumil jaroj de Kristanismo, la etikon de solidareco kaj frateco de du jarcentoj de revolucia progresado... Ne mankas praktikaj sekvantoj de tiu filozofo. Nuntempe en Budapeŝto, en Varsovio, en Prago, oni povas vidi la luksajn aŭtomobilojn kaj aliajn videblajn signojn de riĉeco de novaj sukcesintoj kiuj kolose riĉiĝis dum la lastaj tri jaroj. La laboristaj amasoj de tiuj ekssocialistaj landoj perplekse konstatas ke tiuj estas la solaj efektivaj ŝanĝoj rezultintaj el procezo kiun ili entreprenis kaj pelis kun granda espero.

Ĉar la fakto estas ke ĉiuj malbonaĵoj de tiu epoko persistas kaj eĉ pliintensiĝis sub la novaj, burĝaj regantoj, dum malaperis la reale pozitivaj aspektoj de tiuj progresistaj reĝimoj. Kaj se tio estas la rezulto en tiuj ekssocialistaj landoj, la rezulto de tiuj ŝanĝoj sur la cetero de la mondo estas eĉ pli gravaj ĉar, kiel dirite, la rifuzo de la komunistaj reĝimoj fare de la amasoj al kiuj ili protektadis, utilis al la reakciularo por pretigi novan ideologion de kulto al la sukceso kaj al la senskrupula efiko. Kiel dirite, nun la mondo akceptas rezignacie la likvidon de la ideo de servado al la komunumo en la politika agado. Nun estas ĝenerala sento en la mondo la ideo ke ĉio kio ne estas rentebla estas seninteresa. Oni rifuzadas nun la virtan vivmanieron, celante nur la propran pliriĉiĝon, eĉ domaĝe al la ceteraj. Oni akceptas senkritike la egoismajn interesojn de la akcio-posedantoj de la grandaj grupoj de transnacia kapitalo. Sub la masko de la libereco kaj la demokratio, la rabemo de la monavidaj inteligentuloj senbare disvolvas sian ofensivon tra la tuta mondo. En la ĉiama kapitalista mondo multaj komunistoj forlasis sian sindonan aktivadon en la fronto de la batalo por pli justa sociordo, por dediĉiĝi al profitdonaj negocoj kontraŭ la interesoj de la grandaj amasoj. Ili faras tion, laŭ ilia aserto, sekvante la fluon de nia epoko. En la iamaj socialistaj landoj, multaj esperantistoj forlasas la E-Movadon por lerni la anglan kaj la germanan, kiuj pli helpos ilin en ilia ekonomia kariero. Ankaŭ ili sekvas la fluon de nia epoko. Se ili pensas ke iam favoros ilin en tiu mondo rezultanta el la ŝanĝoj kiujn ili antaŭenpuŝis, ili povas sperti tre amaran elreviĝon. Tiu nova monda ordo estos nur bonfara por tre malmultaj uloj kaj domaĝa por la plej granda parto el la homaro.

(el iu letero mia, de la 24-an de majo - 1992 al iu korespondamiko el eks-Sovetio)

La ferindustria entrepreno kie mi laboras, troviĝas nun en tre malbona situacio, kadre de la ega ekonomia krizo kiu frapas nian socion nuntempe. Oni pridiskutas planojn de restrukturado por malpligrandigi la produktad-kapablon kaj la produktado-kvanton de tiuj ĉi fabrikoj. Tio postulos ankaŭ la malpligrandigon de la nombro da laboristoj en tiuj fabrikoj... Oni kalkulas pri nombro proksimuma al 6300 laborpostenoj perdotaj... Mi ankoraŭ ne scias certe ĉu inter tiuj novaj senlaboruloj troviĝos mi; ŝajnas ke jes, sed ankoraŭ oni ne scias certe ion konkretan. Eble tiu afero restos sensanĝa ankoraŭ dum unu jaro. Okazas ke tiu ĉi entrepreno apartenas al la ŝtato, ĉar ankaŭ en la kapitalista mondo estas publikaj entreprenoj; ne ĉiuj entreprenoj apartenas al privataj akcio-posedantoj. Tiutipa publika industrio estas restaĵo de iu epoko kiam la socialistaj ideoj estis prestiĝaj eĉ en la kapitalisma mondo, kaj multaj ŝtatoj -eĉ se malaltgrade- iom socialigis la ekonomion kaj zorgis pri la plej malriĉuloj. Ankaŭ tio finiĝis rezulte de la disfalo de la reĝimoj de la socialista bloko. Nuntempe eĉ estas malprestiĝa paroli pri solidareco kaj pri helpo al la malriĉuloj; hodiaŭ estas laŭmoda fieri pri la mono kiun oni posedas kaj ŝajnigi posedi pli ol oni reale posedas, kaj zorgi nur pri si mem forgesante kaj ne atentante pri la ceteruloj. Al tio kondukis la kontraŭ-komunisma personalismo (individuismo) kiu furoris ĉe vi dum la lastaj jaroj.

Sed revenante al la afero de la ferindustria entrepreno ENSIDESA, kie mi laboras, mi diris, ke eble dum unu kroma jaro okazos neniu ŝanĝo, ĉar estante ĝi propraĵo de la ŝtato, respondecas pri ĝi la registaro. Kaj tial ke proksimume post unu jaro okazos en Hispanio ĝenerala balotado, al la registaro ne interesas prezentiĝi antaŭ la hispana voĉdonantaro kiel likvidinto de la landa ŝtata industrio. Sed post la balotado de la jaro 1993, la regantaro kiu rezultos el la balotoj, tre verŝajne entreprenos tuj la restrukturadon de la landa ferindustrio, kaj mi timas ke la entrepreno de ĉi tiu Asturia regiono suferos grandan fortranĉon.

Nun mi havas antaŭ mi la dokumentaron kiun la gvidantaro de la entrepreno prezentis al la socio por pravigi la malpligrandigon kiun ili pretendas. Inter la informoj kaj statistikoj kiujn ili prezentas estas antaŭvido pri la konsumo-kvanto de ŝtalo en la mondo ĝis la jaro 2000. Eble ĉi tiu tabelo povas esti interesa por vi; tial mi decidis enkonduki ĝin ĉi-tie:

Antaŭkalkulita konsum-kvanto de ŝtalo (milionoj da tunoj

| jaroj: | 1990 | 1995 | 2000 |
|---|---|---|---|
| Industriigitaj landoj: | 374 | 373 | 374 |
| Evoluantaj landoj: | 134 | 161 | 187 |
| | ---- | ---- | ---- |
| Okcidenta mondo entute: | 508 | 534 | 561 |
| Sovetunio kaj Orient-Eŭropaj landoj: | 187 | 155 | 135 |
| Ĉinio kaj ceteraj: | 80 | 89 | 94 |
| | ---- | ---- | ---- |
| Ĉiuj entute: | 775 | 778 | 790 |

Se tiu ĉi antaŭkalkulo estas trafa, oni antaŭvidas ian stagniĝon de la merkato de ŝtalo laŭloge de la nuna jardeko. Sur tiu fakto bazas nia regantaro siajn planojn por malaltigo de la produktado. Sed lasante nun aparte la aferon de taŭgeco aŭ ne-taŭgeco de la planoj de la aŭtoritatoj de Hispanio, mi vidas ion rimarkeblan por vi en tiu ĉi tabelo. Vi vidu ke laŭ tiu antaŭkalkulo ne kondutos same ĉiuj merkatoj. Mi intencos interpreti, laŭ mia kapablo kaj la disaj informoj kaj interpretoj kiujn mi povis pritaksi, la kialon de la evoluo de ĉiu aparta ŝtalo-merkato.
Unue, tute ne kreskos la konsumo de ŝtalo en la alte industriigitaj landoj; ĝis la jaro 1995 tiu konsumo eĉ malgrandiĝos iomete. Ŝajnas klare ke la kaŭzo de tiu konstanta konsumo en tiuj landoj estas la stabiliĝo de tiu produktaĵo, t.e. ne okazos grandaj novaj konstruadoj, la fervoja reto estas jam sufiĉe disvolvigita kaj oni ne konstruos novajn fervoj-liniojn. La konsumo en la industrio de la aŭtomobilo kaj ŝip-farado restos pli malpli konstanta... Alie, ne aperas novaj kampoj de aplikado de la ŝtalo, sed tute male, aperas novaj materialoj plastotipaj kiuj iompostiom anstataŭas la ŝtalon en kelkaj tradiciaj aplikadoj de tiu ĉi produktaĵo. Ĉio-ĉi kaŭzas la stabilecon de tiu merkato.
Ni vidu nun la duan linion de la tabelo. En la malevoluintaj landoj oni kalkulas konsiderindan kreskon de la ŝtalo-konsumado. De 134 milionoj da tunoj en la jaro 1990, oni esperas pasi al 161 en 1995, kaj 187 fine de la jarcento. Se la ŝtalo-konsumado iamaniere estas indico de industria potenco kaj de vivnivelo, estas altsignifa la fakto ke ĉi-tiu grupo, enkalkulante multege pli da loĝantoj ol la antaŭa, tamen tre restas malsupre en tiu ĉi koncepto. Tio konstituas klaran respegulon de la malekvilibroj de la Okcidenta socio. Sed ne pri tio mi volas temi nun. Al la celo de mia raporto nun interesas nur substreki ke la ŝtalo-konsumo de tiu ĉi grupo sufiĉe kreskiĝos dum la sekvaj 8 jaroj. Tiu kreskiĝo havas facilan eksplikon. Estante tiom malevoluitaj tiuj landoj, en ili mankas multaj instalaĵoj, fervojoj, k.a. Do, estos multe konstruenda, estos multe konstruebla, ili bezonos multe da fero, ilia fero-konsumo kreskos...
Simila estas la kazo de la lasta grupo de la tabelo, tiu grupo konstituita de Ĉinio kaj aliaj Aziaj landoj. Ili pasos, laŭ tiu antaŭkalkulo, de 80 milionoj da tunoj en 1990, al 89 en 1995, kaj 94 milionoj da tunoj en la jaro 2000. La kaŭzoj de tiu konsumado-kreskiĝo estas, pli malpli, la samaj de la malevoluintaj landoj de Okcidento.
Kaj nun rigardu vi la linion kiu koncernas al la terzono kie vi loĝas: (eks)Sovetunio kaj ceteraj landoj de Orienta Eŭropo. Jen ĉi tie estas merkato kiu ne kreskiĝos, kaj ankaŭ ne restos sensanĝa; ĝi konstante malpliiĝos, se tiu informo ne estas erara. De 187 milionoj da tunoj en la jaro 1990, oni antaŭkalkulas ke ĝi pasos al 155 en 1995, kaj 135 kiam la jarmilo finiĝos. Ŝajnas ne-logika tiu malpliiĝo en la konsumado de ŝtalo. En la landoj de tiu bloko oni devus plu zorgi pri la ŝipo-konstruado. Vi mem iam rakontis al mi ke en Sovetunio tre estas necesaj pli da fervojo-linioj; do oni devus ilin konstrui. Krome mi scias ke en Sovetunio kaj en aliaj landoj de tiu bloko ĉiam estis deficito de loĝejoj; do oni devus konstrui dum la sekvaj jaroj amason da domoj. Kaj se oni konsideras ke la popoloj de tiuj landoj

tre sopiris/as al la konsumsocio, oni devus pripensi pri la farado de grandan kvanton da aŭtomobiloj. Ĉiuj ĉi necesoj, kaj aliaj de la nuntempaj socioj, tre postulas ŝtalon; do la konsumado ege devus kreski dum la sekvaj jaroj. Do, kiel interpreti tiun falon en la estonta ŝtalo-konsumado de la eks-socialista bloko? Mi vidas nur du eblajn kaŭzojn de tiu malprogreso, ambaŭ malbonaj, kaj cetere, ĉiu el ambaŭ kaŭzoj ne ekskludas la alian. Do, la kaŭzo estas:

1) aŭ tiuj landoj de Orienta Eŭropo estas destinitaj al procezo de kolosa malprogreso, okupante en la monda ekonomio la lokon kiun ĝis nun "ĝuis" la t. n. Tria Mondo (la inversiĝo de la kvantoj estas totala, en la menciita tabelo, inter ambaŭ lando-grupoj),

2) aŭ oni antaŭvidas por la sekvaj jaroj la okazadon de gravaj konvulsioj, procezo de malpaco, malordo, ĥaoso, politika malstabileco... (en kelkaj lokoj de tiu bloko ekzistas jam faktaj militoj, kaj en multaj aliaj evidente estas iu aŭ alia elemento de tia krizo).

Estus tre bedaŭrinde ke tia estos la rezulto de la Perestrojko kiu tiom da esperoj vekis. Se la kaŭzo de la malprogreso de tiu zono estas la unue menciita, t. e. la desupraj disponoj de la nunaj mastroj de la tuta mondo, vere, vi ne multe povos kontraŭ tiuj disponoj. La socialista bloko malprudente senarmiĝis dum ne okazis paralela senarmiĝo en Okcidento. De nun vi ne povos rearmiĝi kvankam vi tiom volus fari. Sed sendepende de tio ke povas esti tiu kaŭzo, mi opinias ke ne mankas ankaŭ la alia, t. e. ĝenerala konfliktado en la zono. Post la masakrado de la komunistaj organizaĵoj, la solaj fortoj kiuj povus garantii en tiu socio la pacon, la ordon kaj la progreson, estas tre komprenebla ke regu tie la milito, la malordo kaj la malprogreso.

(el alia letero mia, de la 27-an de majo - 1992)

...mi volas pritemi iujn -bedaŭrinde aktualajn- problemojn de la hispana socio: la eksterleĝa enmigrado kaj la sekva rasismo. Oni diras ke multaj rusoj devas forlasi sian landon kaj serĉi laborlokon en Okcidenta Eŭropo, eble ankaŭ en Hispanio. Nu, rusojn mi ankoraŭ ne vidis ĉi-tie, sed antaŭ malmultaj tagoj mi renkontiĝis, en la strato Magnus Blikstad kie mi loĝas, kun iu juna almozulo kiu, malbone parolante kelkajn hispanajn vortojn, sciigis al mi ke li estas rumano.

Sed la ĉefa deveno de la multaj miloj da enmigrantoj en mia lando estas du zonoj: Norda Afriko (Maroko, Algerio, Maŭritanio, ankaŭ sufiĉe da nigruloj el Centra Afriko) kaj la landoj de Suda kaj Centra Ameriko, kiuj bone parolas la hispanan lingvon ĉar ili rase estas miksaĵo (mestizoj) de antikvaj hispanaj elmigrintoj kaj la amerikaj indianaj triboj.

Pli malpli, fremduloj ĉiam estis en Hispanio, sed ĝis la lastaj jaroj tio ne fariĝis akra problemo ĉar ne estis granda ilia nombro. La vera problemo komencis post la enkondukiĝo de mia lando kaj la najbara lando Portugalio en la Eŭropa Komuna Merkato. Estas granda malekvilibro, grandaj diferencoj inter la eŭropa ekonomio kaj ties de la menciitaj zonoj de la Tria Mondo. Iamaniere la propra Eŭropa Ekonomia Komunumo generas kaj stimulas la enmigradon de fremdaj laboristoj. Kaj tio pro tri kialoj:

Unue, en la grandaj industriaj centroj de la alte industriigitaj eŭropaj landoj generiĝas multaj laborlokoj kiuj povus esti akceptataj nur de senesperaj homoj: danĝeraj laborlokoj, kiel minejoj kaj alte venenig-danĝeraj industrioj, malpuraj, malagrablaj kaj tre humilaj laborlokoj, kiel strato-purigistoj, kloako-laborejoj..., penaj kaj pezaj laboroj kiel la intensa kaj rapidega rikoltado de vinberoj, oranĝoj, olivoj, persikoj, pomoj kaj aliaj fruktaĵoj dum la rikolto-sezonoj. Pezaj laboraĵoj kiuj ne povas esti faritaj per maŝinoj..., malhonoraj kaj malnoblaj okupoj, kiel prostituado kaj aliaj humiligaj servoj.

Due: estas necesa iomkvanta enmigrado ĉar la loĝantaro de la alte industriigitaj landoj iompostiom malgrandiĝas tial ke multaj familioj ne volas naski geinfanojn; multaj aliaj naskas nur unu aŭ kiel maksimume du.

Trie: al la monopolista kapitalista klaso interesas ke estu tro abunda la nombro da laboristoj kaj de tiuj homoj kiuj -ne havante laborlokon- bezonas kaj volus labori. Tiamaniere tiu klaso batalas kontraŭ la

salajraj postuloj de la gelaboristoj. Ju pli da homoj bezonas labori, des pli povos la kapitalistoj pagi malaltajn salajrojn kaj trudpostuli altan rendimenton de la laboristoj. Jen kapitalista maniero batali kontraŭ la mallaboremo; maniero kiun la komunistaj fortoj ne povas kaj ne volas apliki.

La novenmigrintoj rezultas devigitaj labori multe kaj gajni malmulte. Krome ili ne povas striki ĉar perdus ilian rajton de loĝado en la gasta lando, kaj krome, ili, kiel fremduloj, ne havas politikajn rajtojn; ili ne povas voĉdoni en la lando kie ili laboras kaj kie oni ekspluatas ilin. Tio klarigas la strangan fakton ke en tiuj kapitalistaj landoj kie ekzistas kolosa kapitalista ekspluatado de la laboristoj, tamen la politikaj fortoj de maldekstraro ne atingas grandajn balotajn sukcesojn; ĉiam venkas la burĝfavoraj partioj.

Se, kiel oni diris, multaj laboristoj el la ekssocialismaj landoj serĉos laborlokon en la landoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, ili sciu ke, se ili havos la grandan sorton (bonŝancon) trovi laborlokon (kio ne okazos al ĉiuj) ili estos kuracitaj je ilia mallaboremo. Iu bulgarino kiu vizitis mian landon tuj post la disfalo de la bulgara komunista reĝimo, rakontis al mi ke mobiliziĝis granda popolamaso kontraŭ la komunistaj regantoj. Estis granda strikado, kaj en la manifestacioj la homoj kriadis: "ni ne volas labori por la ruĝuloj". Tiu ino tre havis esperon pri ekonomia prospero de ŝia lando post mamultaj jaroj da kapitalisma funkciado. Lasttempe mi eksciis ke ŝi perdis ŝian laborpostenon, samkiel multaj samlandanoj ŝiaj. Multaj gebulgaroj restos senlaboraj dumlonge, iuj eble por sia tuta vivo. Kaj tiuj kiuj havos laborlokon, ĉu en Bulgario mem, ĉu en la riĉaj eŭropaj landoj, ne plu devos labori por la "ruĝuloj"; ili laboros por la kapitalistoj, kiuj postulos de ili pli grandan, penan kaj intensan laboron, kaj pagos malpli da salajro.

Sed mi revenu al la problemaro de la enmigrantoj, kaj pli konkrete, al tiuj de mia lando. Mi eksplikis ke la regantaj klasoj stimulas la fremdan enmigradon. Mi eksplikis ankaŭ ke la situacio de la enmigrintoj en la gastaj landoj estas simila al ties de la sklavoj de la antikva epoko. Se la laboristaro de la industriigitaj landoj okupas en tiu socio la lokon de la antikvaj plebanoj aŭ proletoj de Romo, la loko okupata de la enmigrintoj estas tiu de la romiaj sklavoj: sen politikaj rajtoj, sen civitanaj rajtoj, sen homaj rajtoj.

Oni konsentas troan enmigradon por ke la enmigrintoj konkuru inter si celante la malabundajn laborlokojn, kaj ĉiuj ili iomgrade konkuras kontraŭ la proletaro de la propra gasta lando. Tiamaniere malpliboniĝas la situacio de ĉiuj laboristoj, kaj fremdaj kaj indiĝenaj, kaj tiele naskiĝas la malamo inter la diversaj gentoj, la rasismo, kiel distraĵo de la klasbatalo kiu devus celi la plibonigon de la vivkondiĉoj de ĉiuj laboristoj.

Mi hontas priskribi la multajn kazojn je rasismo laste okazintaj en mia lando kontraŭ la maŭroj, la sudamerikanoj kaj la ciganoj (ĉi-lastaj ne estas novenmigrintoj; ili apartenas al ia gento aŭ etnio, ŝajne Hindio-devena, kiu alvenis al Eŭropo en la 12-a aŭ 13-a jarcento). Mi devas aldoni ke en aliaj eŭropaj landoj abundas la kazoj de rasismo, agresoj al kaj murdoj de fremduloj. Ekzemple en Germanio reaperas faŝistaj rondoj similaj al la iama naziismo de A.Hitler. En Francio estas tre fama la kazo de la politikisto Le-Pen, kiu predikas la malamon kontraŭ la fremdaj laboristoj en tiu lando.

Do, kiam la nombro da enmigrintoj preterpasas la kalkulojn de la aŭtoritatoj, oni stimulas la malamon kaj la agresadon fare de la popolo kontraŭ la fremduloj. Kaj oni dekretas kuriozajn leĝojn kontraŭ la novalvenintoj. Ekzemple, en Hispanio oni disponis laŭleĝe ke oni ne donos permesilojn de loĝado al tiuj fremduloj kiuj ne posedus atestilon de laborloko. Sed samtempe alia leĝo malpermesas doni laboron al la fremduloj kiuj ne havas permeson por loĝado. La demarŝado de tiuj dokumentoj, permesiloj kaj atestiloj generis iun koruptan burokrataran merkaton de trompa disvendado de tiuj kartoj. Iuj aŭtoritatuloj, iukaze eĉ oficistoj de la ambasadejo de Maroko, postuladis grandajn sumojn da mono al la enmigrintoj por la

atingo de tiuj dokumentoj, kaj tial ke tiuj malfeliĉuloj estas tre malriĉaj, por kolekti tiun sumon ili devas dediĉiĝi al multaj deliktoj: rabado, ŝtelado, vendado de drogo... La hispanaj malliberejoj estas plenaj da maŭroj, peruanoj, ĉilianoj, argentinanoj (brazilanoj en la malliberejoj de Portugalio) enkarcerigitaj pro tiuj kaŭzoj.

Alia aspekto de la problemo estas ke por la envenintoj el Afriko kaj el SudAmeriko, Hispanio kaj Portugalio estas enirejo por ĉiuj kiuj volas iri al ĉiu ajn alia lando de la Eŭropa Komunumo. Tio signifas ke al mia lando kaj al la najbara lando Portugalio asignis la Eŭropa Komunumo la taskojn de pordistoj de la Komunumo. La pordisto en ĉiu granda domo estas kiel gardisto de la pordo; ĝenerale li estas malriĉa homo al kiu oni asignas modestan loĝejon en la malsupra etaĝo de la domo. Tie li loĝas kun sia familio, sed lia devo estas eviti ke en la domo eniru almozuloj aŭ ciganoj kiuj povus ĝeni la riĉajn domo-loĝantojn. Ĝenerale la edzino de la pordisto devas okupiĝi pri la purigado de la doma ŝtuparo, t. e. la plej humilaj loĝantoj de la domo estas devigitaj eviti la eniron de aliaj pli malriĉaj ol ili. Tia estas la tasko asignita al Hispanio kaj Portugalio en la Eŭropa Komuna Merkato. Tiuj du landoj estas la plej malriĉaj el la Komunumo, kaj ili devas fariĝi gardistoj de la Afriko-flanka kaj Ameriko-flanka pordoj de Eŭropo. La polico de mia lando devas zorgi evitante la eniron en la landon de fremduloj sen loĝ-permeso-karto. Tre ofte la presaro informas pri la malkovro de ekster-leĝaj ŝip-ekspedicioj de enmigrantoj elvenintaj el NordAfriko. Kelkfoje la ŝipetoj per kiuj la maŭroj pretendas alveni al Hispanio dronas kaj pereas dudeko da personoj. Antaŭ malmultaj tagoj la presaro informis ke oni trovis en la strandoj de la sudo de Hispanio kelkajn kadavrojn de junaj marokanoj kaj algerianoj kiuj intencis kaŝe eniri en mian landon. Se multaj fiaskas en tiuj danĝeraj ekspedicioj, multaj aliaj, kies nombro ne estas konata, sukcesas eniri en la landon, kaj iu eĉ povas poste pasi al Francio aŭ al alia Centro-Eŭropa lando. Sed ĉu ili restos en Hispanio aŭ ne, ili devos vivi kaŝite dum ne disponus je oficialaj permesiloj por loĝado kaj laborado. Jam mi eksplikis ke en tiuj kondiĉoj ili devos gajni iom da mono eksterleĝe por plu vivi; ili devos rabi, ŝteli, vendi drogojn... aliaj povas labori, sed tial ke ilia situacio estas eksterleĝa, la laboro-donantoj profitas tiun cirkonstancon por ekspluati ilin senmizerikorde. Aliaj sin dediĉas al okupoj tute for de ĉiu leĝo kaj ĉiu kontrolo. Antaŭ pluraj semajnoj la polico malkovris negocon de ekspluatado de junaj sudamerikaj virinoj. Ili estis devigitaj de maldecaj mastroj prostituiĝi por nur atingi la manĝadon kaj loĝadon en loĝejo el kiu ili ne povis eskapi. Kaj nur antaŭ malmultaj tagoj estis malkovrita alia malnobla negoco: organizaĵo dediĉita al la prostituigo de fremdaj geinfanoj; inter la organizintoj kaj profitantoj de tiu "industrio" estis iu urbestro.

La fakto ke multaj novalvenintoj por pluvivi devas delikti, okazigas malestimon kaj rasisman malamon de la hispanaj popolanoj. Antaŭ kelkaj monatoj tre fariĝis fama la kazo de iu maŭro kiu seks-perfortigis hispanan junulinon. Aferoj kiel tiu ĉi multe kontribuas pliakrigi la malamon de miaj samlandanoj al la enmigrintoj. Sed tamen, proksimume je sama epoko estis konata ankaŭ la kazo de iu hispana policisto kiu seks-perfortigis maŭran knabinon. Tiu ĉi kazo, ja, ne vekis ian ajn reagon en la socio. La monavido kaj la egoismo estas tre granda en la socio kaj ĉiu celas sian apartan profiton kaj ĝuon senkonsidere al la domaĝoj okazigitaj al aliuloj, ĉefe se la aliuloj krome estas fremdaj kaj malriĉaj. Ŝajnas ne-kredeble ke oni tiel kondutas la homaro ankoraŭ post preskaŭ du mil jaroj, kiam estis dirite: **Amu la aliulojn kiel vin mem.**

Sed mi pro justeco devas agnoski ke, feliĉe, ne ĉiuj kondutas fie. La fakto estas ke estis kreitaj en mia lando kelkaj organizaĵoj por helpi la malriĉajn enmigrintojn. Estas ankaŭ aliaj organizaĵoj kies celo estas alkolekti monon kaj organizi volontulojn por helpado al la indianaj triboj de Centra-Ameriko. Mi iome kunlaboras kiun tiuj solidarecaj kaj homfavoraj asocioj. En diversaj lokoj en Hispanio, aktivuloj de la katolikaj preĝejoj, samkiel maldekstraj organizaĵoj kaj aliaj movadoj organizas diversajn formojn de

helpo kaj apogo al la enmigrintoj, la senlaboruloj kaj aliaj diskriminaciitaj kolektivoj. La merito de tiuj volontuloj estas des pli granda ĉar en la nuna tempo la solidareca kaj frateca agado estas malbone konsiderata de la socio. Ŝajnas frenezaĵo, sed la fakto estas ke tre multaj personoj opinias ke la faligintoj de la Berlina murego rajtigis ilin konduti memŝate, orgojle, fierege, malhoneste kaj egoisme. Kaj kiam oni plendas pri maljustaĵo aŭ oni mendas helpon kaj solidarecon por iu ajn domaĝita homo aŭ kolektivo, multaj personoj tre pretas deklari ke tiuj sentoj pri karitato kaj homa frateco estas ridindaj, eksmodaj sentoj kiel pruvis kaj atestis la laboristoj de Hungario kaj Polio, kiuj preferas personan profiton, la individuismon, la personismon, nome la egoismo aŭ mi-ismo. Mi sentas grandan hororon antaŭ tiu pensmaniero kiu ne nur estas la neado de ĉiuj marksismaj streboj, sed ankaŭ estas rekta kontraŭeco de la Spirito de la instruo de Kristo. Tiu sento kaj tiu penso, ja, estas la AntiKristo (Kontraŭ-Kristo) anoncita de la Apokalipso. Kiamaniere oni povus katenigi denove tiun Bestegon?

(verkita la 28-an de majo - 1992)
Hodiaŭ estas speciala tago en Hispanio. Por la nuna tago estis kunvokita, fare de la ĉefaj sindikatoj, kaj aliaj organizaĵoj de Maldekstro, ĝenerala striko. La kaŭzo de tiu laborista batalo estas iu registara dekreto -ĉi tie oni nomas ĝin: "la dekretego"- per kiu oni konsiderinde malpligrandigas la kvanton de la subvencioj kiujn la ŝtato devas pagi al la senlaboruloj.
La nombro da senlaboruloj en mia lando tre kreskis dum la lastaj jaroj, kaj inter ili estas multaj kiuj ricevas neniun subvencion. Fakte, nur 37 procento el la senlaboruloj ricevas tiujn subvenciojn. Kelkaj ricevis difinitan monkompenson, nur unufoje, en la momento kiam ili estis elpelitaj el la laborloko. Monkompensoj kaj subvencioj ĝenerale estas malaltaj sed iome helpas la senlaborulon dum li serĉas novan laboron. La trovo de nova laborposteno estas malfacila ĉar senĉese novaj entreprenoj fiaskas kaj eksigas siajn laborantojn. Tio ĉi estas plago de nia socio. Iuj ekonomiistoj opinias ke ioma grado je senlaboreco kaj eventuala (ne-fiksa) kontratado de laboristoj estas bonaj meĥanismoj por konservi malmulte altaj la salajrojn de la laboristoj kaj la postulojn de la sindikatoj. Ne estas necese diri ke tiom da kontraŭsociaj disponoj apartenas al tiu novliberala ideologio nun reganta en la kapitalisma mondo, ĉefe post la fiasko de la komunismo. La aplikado de tiu novliberala ideologio igas ke senĉese la riĉuloj pli riĉiĝos dum la malriĉuloj pli malriĉiĝos.
La registaro kunlaboras en la plifirmigo de tiu kontraŭhoma politiko. Komence ili konsentis pri la eventualeco de la kontratado de laboristoj. Baldaŭ la ekzistado de laboristoj kun fiksa laborloko fariĝos memoraĵo de la antikva historio. La regantaro konsentis ankaŭ pri la malbonigo de la sociaj servoj (sekuroj, sanecservo, poŝtservo) por pravigi ilian privatigon.
En tiu kunteksto nun venas en mia lando nova dispono kontraŭ la rajtoj de la proletaro. De nun mi cias ke la danĝero perdi la laborpostenon estas pli granda ol ĉiam antaŭe (kaj mi troviĝas en tiu situacio unuafoje en mia vivo), la subvencioj al la senlaboruloj draste estos malgrandigitaj, kaj malaperos en multe pli multenombraj kazoj ol antaŭe.
Kiel plendo kontraŭ tiu ofensivo de la burĝa kapitalistaro kaj ties lakeoj de la "socialista" registaro de Hispanio, la sindikatoj alvokis al striko-tago por hodiaŭ. Jam en similaj okazoj estis en Hispanio tiutipaj ĝeneralaj strikoj, kaj ili estis sufiĉe sukcesaj. Tamen ekzistas la timo ke hodiaŭ la afero ne tiom disvolviĝos bone.
En la nunaj malfeliĉaj tempoj la popolo estas malpli preta ol antaŭe batali por siaj rajtoj. Krome ĉi-kaze la afero estas ke la ankoraŭ laborantaj laboristoj montru sian solidarecon kun tiuj kiuj perdis sian laboron, kaj ĉiuj scias ke la solidareco ne estas valoro bone kotizita hodiaŭe. Krome estas la fakto ke multaj laboristoj, pro tio ke ili estas eventualaj kaj povas esti elpelitaj laŭvole de la entreprenistoj, aŭ pro tio ke multaj el ili estas fremdaj kaj povas perdi siajn rajtojn pri laborado kaj loĝado, ne povos esti tre pretaj striki kvankam tia estus ilia volo. Pro ĉio-ĉi la sindikatoj

evidentigis signojn de malforteco: en iuj regionoj la kunvokita striko ne estas por la tuta tago, sed nur por duono aŭ triono el la tago (en Asturio, tamen, estas striko dum la tuta tago). Konsciante pri la malfavora malfluŝo de la proletara rezisto, la registaro entreprenis alian paŝon en la kontraŭpopola ofensivo: estis anoncite ke la policaj fortoj intervenos dum la striko-tago por malhelpi la laboristan mobiliziĝon. En iuj regionoj estis leĝe malpermesitaj la anoncitaj manifestacioj. Tiajn disponojn oni ne entreprenas en ĉi-tiu lando ekde la jaro 1975 kiam mortis la faŝisma diktatoro F.Franko. Tial la hodiaŭa striko prezentiĝas kiel rekta lukto inter la registaro kaj la sindikatoj, kaj tiurilate ĝi vekis la intereson de la informmedioj ene kaj for de nia lando. Ni vidos kiel disvolviĝos tiu ĉi grava tago de la klasbatalo en Hispanio. Mi timas ke okazos perfortaj incidentoj en kelkaj lokoj en la lando. En la momento kiam mi skribas ĉi tion oni ne disponas ankoraŭ je informado pri la situacio, sed estas io kio maltrankviligas min pri la sukceso de la striko: la televido normale funkcias, male ol en aliokazaj ĝeneralaj strikoj.

(La 29-an de majo - 1992)
Dank' al Dio, ne estis multaj incidentoj en la hieraŭa striko. Estis kelkaj vunditoj kaj arestitoj, sed malmultaj ĉiukaze. La rezulto de la striko, kiel timite, ne tiel estis sukcesa kiel en antaŭaj similaj okazoj. La striko ankaŭ ne estis malsukcesa por la kunvokintaj sindikatoj; milionoj da gelaboristoj strikis en la tuta lando, kaj en 100 hispanaj urboj okazis dum la vespero grandaj manifestacioj kontraŭ la politiko de la registaro.
Sed, kiel dirite, la striko ne estis totala, kaj tio estas jam konsiderata de la regantaro kaj de la politikaj fortoj de dekstraro, kiel malfortiĝo de la sindikatoj kaj de la reagokapablo de la laborista klaso. Mi timas ke tio estos profitata de la reakciularo por pliintensigi sian kontraŭ-laboristan ofensivon. La batalado, dum la sekvaj monatoj, kontraŭ la kreskanta povo de la kapitalistaj fortoj, fariĝos multe pli malfacila kaj komplika ol ĝis nun. Ke Dion kelpu nin!.

Gijon, la 2-a de decembro - 1993

Kara kamarado Igorj,
La hieraŭ transskribita materialo estis verkita de mi laŭlonge de la monato majo 1992. Tiam mi estis subinflue de la rapidaj kaj drastaj ŝanĝoj okazintaj en Sovetio kaj en la ceteraj socialistaj landoj. Mia tiama verkado estis frukto de miaj pripensoj kaj miaj zorgoj pri la situacio, kaj mia konstato de la sekvoj de tiuj eventoj sur la kapitalista mondo. Por ĉi-raporto mi elektis la materialon kiu povus esti interesa hodiaŭ.
Sekve mi transskribas plian materialon, de la sekvinta monato, t.e. junio-1992
Jen, mi transskribas tri letero-fragmentoj, verkitaj en la unuaj tagoj de la menciita monato:

Kara amikino,
Hodiaŭ mi volas pritrakti konkretan paragrafon de via letero. Estas tiu kiu diras: *Evidentiĝis, ke propraĵo kiu teorie apartenas al tuta popolo, fakte apartenas al neniu kaj ne havas mastron, kiu zorgus pri ĝi. Tamen propra posedaĵo ĉiam estas kaj estos pli grava por ĉiu homo. Oni ĉiam volas vidi kaj uzi la rezulton de sia laboro...* Tiu ekspliko via pri la homa posed-emo, la homa volo vidi kaj uzi la rezulton de la propra laboro, la homa emo sin senti mastro kaj posedanto de io..., tiun eksplikon, mi ripetas, vi estus povinta ŝpari; ĝi tute ne estas necesa. Mi bone konas tiun homan emon. Mi apartenas al la sama homa specio kiel vi, kaj krome ankaŭ mi estas posedanto. Al mi tre plaĉas posedi kaj uzi mian bienon, mian tiean pomarbaron kaj legomĝardenon. Mia bieno estas preskaŭ kvinoble pli granda ol viaj 2700 kvadrataj metroj apud via domo. Mi tre ŝatas labori en la tiea ĝardeno kaj loĝi en la domo kiun mi igis konstrui meze de la bieno.
Mi bone konscias ke en komunista sistemo ne eblas tiaspeca propraĵo kiu tiel ŝatas al mi. Mi volus ke ĉiu familio disponu je simila terposedaĵo kaj ĝin ĝui kiel mi ĝuas la mian. Mi volus kredi ke tiaspeca posedado estas la plej justa kaj honesta maniero posedi la teron. Sed mi devas esti realisma kaj konscii ke tio ne eblas. Via argumento: *propra posedaĵo ĉiam estas pli grava* ***por ĉiu homo*** ne estas tute ĝusta; ĝi enhavas iun mankon: En la sistemo de privata propraĵo ne estas, nek povas esti, posedaĵo **por ĉiu homo**. En tiu ĉi sistemo




**Nun estas epoko por feliĉe festi, homo. Ni venkis! Ĉu vi ne eksciis? Triumf-venkis la kapitalismo. La Komunismo tut-ruiniĝis. Nia sistemo pludaŭras. Plene venkis ni! Ĝoj-festu, homo.**

iuj homoj posedas multege, aliaj multe, aliaj ion, aliaj malmulte, kaj la ceteraj multaj aliaj posedas nenion. Kaj krome estas ne-eviteble ke la havaĵo de tiuj kiuj posedas multege pli kreskiĝu, kaj la havaĵo de tiuj kiuj posedas malmulte, malkreskiĝu kaj malaperu. Tiu dinamiko estas intime ligita al la naturo mem de la sistemo. Krome ne ekzistas en la mondo sufiĉe da tero por ĝin disdoni po-pece al ĉiu homo; por pruvi tion sufiĉas dividi la surfacon de la loĝebla parto de nia planedo inter la nombro da homoj en la mondo. Kaj estas ankaŭ la fakto ke, lando tiele disdividita, ne tre utilas por la industria kaj ekonomia disvolviĝo. Ne nur la socialismo estus neebla en tiu supozita kazo, ankaŭ la kapitalismo ne povas funkcii en tia socio. Do, se ne estas perfekta, nek ebla, la po-persona posedado de la limigita kvanto da loĝebla tero en la mondo, devas esti alia maniero (socia, publika, kolektiva maniero) je posedado kaj uzado de la tero kaj de ĉiu produktad-rimedo.

Jes, vi pravas dirante ke la socia, kolektiva propraĵo estas malbone mastrumita kaj malbone zorgita de la kolektivo, de la publiko. Tiu problemo nuntempe ne havas ankoraŭ bonan solvon. Ĝi tre estas ligita kun la problemo de la popola mallaboremo. La publikaj, sociaj aferoj ne vekas la intereson, la zorgon kaj la laboremon de la popolaj amasoj. Eble la solvo al tiuj problemoj estos daŭra kaj senĉesa edukado de la amasoj, de la popoloj, por la socia vivo kaj publika posedaĵo, por la Socialismo kaj la Komunismo. Sed iun aŭ alian solvon oni devos serĉi kaj apliki, ĉar tiu socia propraĵo estas necesa. En mia urbo, Gijón, estas belega strando. Ĝi tre restadas malpura kaj malbone zorgita de la amasoj post ties publika uzado. Kiam la uzantoj foriras el la strando, ĉi tiu restas plena da paperaĵoj, restaĵoj de manĝaĵoj, miloj da konsumitaj cigaredoj, kaj aliaj malpuraĵoj. Multaj personoj ne uzas la tie lokitajn rubujojn por enmeti la rubaĵojn. Mi estas certa ke se tiu strando estus ne publika, sed privata propraĵo, kaj ĝi estus

dividita al ok aŭ dek familioj, la koncernaj strando-pecoj troviĝus tre puraj kaj bone zorgitaj, samkiel estas pura kaj bele aranĝita mia bieno. Sed la rezulto de tia sistemo estus ke nur 8 aŭ 10 familioj povus uzi kaj ĝui tiun belaĵon de la naturo, kaj la cetero de la loĝantaro restus senheredigita. Ĝuste tia situacio de senheredigiteco de plejparto el la popolo - apud granda komforto de malmultuloj- estas trafa simbolo de la kapitalista sistemo. La publika uzado de la strando, kun amasa ĝuado kaj amasa malpurigado fare de la uzantoj, estas simbolo de la ĝisnuna socialismo. Mi pensas ke eĉ vi koincidas kun mia opinio ke la plej justa sistemo estas tiu de publika uzado... sed kun publika zorgado pri la pureco. Ĝuste tia estas ankaŭ la solvo por la politika sistemo: Justa komunisma sistemo... sed kun la apogo, la laboro kaj la intereso de la amasoj pri ilia publika, komuna afero. Sed estas evidenta ke tiu solvo ne taŭgas por la privat-posedantoj de la strando-pecoj, t.e. la plejĝuantoj de la kapitalista sistemo. Ili ne volas publikan strandon, nek pura nek malpura; ili ne volas komunistan sistemon, ĉu ĝi funkcius bone aŭ malbone. Ĉu estis pro tio ke Jesuo diris ke pli estas facila ke kamelo eniru tra mallarĝa pordeto ol ke riĉulo enkondukiĝu en la Ĉielan Regnon?

... estas en via letero, iu interesa paragrafo kiun mi iome volas pritrakti. Vi pritemis la iaman politikon de la komunista reĝimo, kiu jam dekomence -jaro 1917- persekutis la inteligentecon, t. e. la klerajn sociajn tavolojn kaj kolektivojn. Kaj vi aldonis ankaŭ la persekutadon okazintan dum la epoko de Stalin, ankaŭ ene de la propra soveta kompartio, k. c.
Jes; mi vere konscias pri la graveco de tiuj okazaĵoj. Kaj mi ne intencas prezenti kiel bonaĵo tion kio estas fuŝaĵo. Mi, kiu estas krom komunisto, ankaŭ kristano, trovas en la historio de la komunistaj fortoj tiom da krimoj, eraroj, fiagoj kaj fuŝaĵoj kiom en la historio de la kristanaj eklezioj. Koincidante kun la celo de tiuj organizaĵoj, ofte mi devas malkonsenti kun iliaj metodoj kaj konkreta agado. Alie mi ne posedas la ŝlosilon por solvi bone ĉiujn problemojn kiujn tiuj religiaj kaj politikaj fortoj solvis malbone aŭ tute ne solvis. Mi intencas diri ke mi timas, kaj estas tre eble, ke mi eraru en multaj el la malfacilaj cirkonstancoj en kiuj eraris la menciitaj organizaĵoj kaj fortoj. Konkrete, tre konfuzigas min tiu afero de la inteligenteco aŭ inteligentularo, de la kleraj sociaj kolektivoj.
Iam diris Lenin ke la fakto ke la laborist-klaso revolucie konkeru la povon, ne signifas ke fariĝas sanktaj la laboristoj. Al tio oni povas aldoni ke la fakto ke iu kolektivo estas inteligenta aŭ klera, ne igas tiun kolektivon sankta. En mia lando estas iuj tre kleraj kaj eminentaj personoj kiuj, tamen, ne aplikadas iliajn sciojn kaj kapablojn serve de la homaro, sed serve de egoismaj interesoj de superreganta socia klaso. Malfeliĉe tiu fenomeno estas tre ofta; la homaj kvalitoj kaj kapabloj kiuj devus roli favore al la revolucio kaj al la progreso de la homaro, tre ofte enviciĝas kun la reakcio kaj la subpremigaj fortoj. La ĝuantoj de tiuj homaj kapabloj iam devos respondeci antaŭ Dio pri la uzo kiun ili faris el tiuj kapabloj. Sed ni troviĝas antaŭ la fakto ke ties uzado ofte (feliĉe ne ĉiam) rolas kontraŭ la progresistaj planoj de la transformigaj fortoj de la socio. En tiu situacio, kion fari? Se iu diras ke li/ŝi konas la plej konvenan solvon por tiu problemo, sendube li/ŝi mensogas. Ne estas konvena solvo por tiu problemo. Kion ajn vi farus en tiu kazo, estus eraro kaj krimo. Se vi permesas la saĝulojn agadi kontraŭ la justeco kaj la revolucio, tio estas eraro kaj krimo. Se vi punas ilin, aŭ ekstermas ilin, aŭ malhelpas iamaniere ilian laboradon, malprofitante ilian kapablon, tio estos eraro kaj krimo. Kaj plej grave estas ke ne eblas determini en kiu kazo estus pli grava la krimo kaj la eraro. Vi prezentis al mi interesan, sed sin-solvan, problemon.
En via letero la prezentado de tiu problemo havas formon de kritiko farita kontraŭ la komunistoj (ne povas esti alie en teksto via). Eble tiu kritiko estas justa, la kondamno prava... tamen mi suspektas ke en la Fina Tago de la Dia Juĝo, la malbonsolvantoj de tiu sensolva problemo atingos pli da kompaton ol la inteligentuloj kiuj malbone kaj maljuste uzadis ilian kapablon.

Ŝajnas ke ne nur al mi, vi prezentas sensolvajn problemojn. Ankaŭ al vi mem vi ŝarĝas per problemoj kiuj poste vi ne povas solvi. Tia estas la problemo de la teroprivatigado en via lando. Vi diris:
*Vi demandas al mi kiel rilatas ĉe ni kolĥozanoj al privatigado de tero, mi povas respondi ke tre pozitive. Ĉiuj volas reakiri siajn iamajn teritoriojn. Kampojn volas multaj novaj kamparanoj kaj eĉ ne eblas kontentigi ĉiujn dezirantojn...*
Ĝuste!. Jen la problemo de la sistemo de privata posedaĵo: ne eblas kontentigi ĉiujn dezirantojn; ne ekzistas en la mondo sufiĉe da tero por ke ĉiu homo estu terposedanto. Al mi ŝatus koni la solvon kiun vi aplikus al tiu problemo. Dum la studentaj tumultoj en la Pekina Placo de Tian-an-Men, iu ĵurnalisto el Okcidento demandis al iu ĉina studento pri la kialo de ilia ribelo. La junulo respondis: *mi ne volas sistemon de kolektiva, publika, uzado de la tero; mi volas esti proprietulo, mi volas posedi bienon kiel tiu de la fama televid-programo "Falcon Crest"*. Falcon-Crest (prononcendas Falkon-Krest) estas usona televid-serio kiu temas pri la vivo de riĉega familio loĝanta en kastelosimila palaceto meze de granda farmobieno, nomata Falkon-Krest, plena da vinber-kampoj. Tiu serio estis prezentita ankaŭ en la televido de mia lando, kaj ĝi konsistas el kelkcento da ĉapitroj daŭrantaj unu horon ĉiu el ili. Mi ne sciis ke ankaŭ en la Socialista Ĉinio oni konis tiun televid-programon. Tiu ĉina inteligentulo ne volis scii ke nek en Usono, nek en Ĉinio, nek en iu ajn lando de nia planedo estas sufiĉe da tero por ke ĉiu familio posedu farmo-bienon kiel Falkon-Krest. Po ĉiu familio posedanta tiaspecan bienon, ekzistas kelkaj aliaj kun malpligranda posedaĵo, pli-granda kvanto da familioj kun eta propraĵo (domo, etaĝa loĝejo), kaj amason da homoj posedantaj nenion. Tia estas la strukturo de la sistemo de privata proprieto.

Vidante la universalecon de la homa posedemo (kiu ekzistas ankaŭ miakaze), mi pretas pensi ke estas "homa rajto" la rajto je persona, privata posedado; kaj ke tial estas normala la sistemo (nomiĝus ĝi "kapitalismo" aŭ ne) kiu garantius tiun privatan propraĵon. Sed la fakto estas ke en la realo, en tia sistemo de ne-publika proprieto, estas enorma la nombro da homoj kiuj ne povas ĝui tiun "homan rajton" por ke malgranda aro da homoj ĝuu tiun "homan rajton". Do, mi pensas ke io ne funkcias bone en tiu sistemo. La grandamaso da senheredigitoj de la kapitalisma mondo, krom ne ĝui la privatan propraĵon, ankaŭ ne ĝuas publikan uzadon de la kolektiva propraĵo, ĉar ne ekzistas tie kolektiva propraĵo, krom tiu de publikaj parkoj, strandoj k.s. La produktrimedoj, el kiuj dependas la laboro, la komforto kaj la vivo de tuta popolo, ne estas publikaj, ne estas kontrolataj de la ŝtato, kiu estas ĉies afero. Tiu propraĵo apartenas -plejparte en iuj lokoj, tute en aliaj lokoj- al malgranda kvanto da privataj posedantoj, kiuj tiamaniere konstituiĝas en mastroj kaj patronoj de la cetero el la popolo. Kiel dirite, io funkcias malbone en tiu sistemo. Por ke malmultaj personoj vivu pli komforte ol la civitanoj de la socialisma sistemo, la grandaj amasoj devas vivi malpli komforte ol tiu civitanaro.

En via priskribo de la nuna situacio de via latva lando, tiu granda amaso da senheredigitoj estas konvene kaŝita; la senposedaj homoj estas preskaŭ ne-videblaj en via raportado. Vi pentras rozkolore la ĝojon de viaj samfamilianoj kaj konatuloj kiuj ricevadas siajn iam eksproprieigitajn posedaĵojn, sed vi tute forgesis temi pri la homoj sen havaĵo, kiuj, krom ricevi neniun privatan posedaĵon, ili perdis la uzadon kaj ĝuadon de la publika. Tiaj homoj ne aperas en viaj skribaĵoj; aŭ ili aperas nur sub la malagrabla aspekto de la rusaj kaj kaŭkaziaj enmigrintoj, kiuj "ne emas labori", kaj "faras maĥinacioj en la bazaroj" laŭ viaj esprimoj en iu el viaj leteroj.

Jes, la rezulto de viaj ŝanĝoj konkretiĝas, kromfoje en la longa historio de la homaro, en la venko de la egoismo super la solidareco kaj la frateco. Vi festu, se vi volas, tiun venkon; mi ploras solidarece kun la venkitoj.

Gijón, la 3-a de decembro - 1993

Kara kamarado kaj amiko,

Pardonu la trolongecon de ĉi-skribaĵo. Mi pensas ke post la legado de la antaŭaj tekstoj vi pli bone konas kaj komprenas mian penson kaj

mian senton pri la eks-sovetia reĝimo, kaj la valorigon kiun mi faras el ĝi laŭ ĝia rolo en la monda realaĵo.

Tion sciante, eble vi komprenos tion ke, okaze de la sovet-favora puĉo de aŭgusto-1991, mi tutkore deziris la sukceson de la puĉintoj, kaj sentimente bedaŭris ties fiaskon kaj la venkon de la fiulo Jelcin kaj lia kliko de gansteroj. Same, je la okazaĵoj de Moskvo, antaŭ unu monato kaj duono, mia koro kaj mia menso estis apud la defendantoj de la Parlamento, kontraŭ la tiam puĉinta Jelcin.

Temante pri tiuj okazintaĵoj vi skribis ke *Ambaŭ flankoj rompis leĝon kaj donis al ĉia popolo tre danĝeran lecionon de perforto kaj timo*. Mi volus ke vi klarigu al mi kiele perfortis la leĝon la defendantoj de la Parlamento. Ĉu ili ne rajtis -kaj devis- rezisti (eĉ se perforte) la kontraŭ-konstitucian agon de la puĉinta diktatoro? Kiun leĝon ili rompis? Ŝajnas al mi ke ni, la loĝantoj de Okcidento, eĉ informitaj pere de la ĉi-tieaj burĝaj informiloj, konas la eventojn de Moskvo pli bone ol la rusoj. Krome mi konas ankaŭ la raportadon de iu esperantisto kiu troviĝis inter la defendantoj de la Domo de la Sovjetoj, kaj mi devas diri al vi ke la versio de la ĉi-tiea ĵurnalaro kaj televido pli koincidas kun la raporto de mia kamarado ol kun la informo provizita de la rusa inform-aparato kontrolata de Jelcin.

Cetere la poste informado pri la disponoj kaj dekretoj de Jelcin pli kaj pli desegnas lian bildon de despota diktatoro kiu volas aranĝi novajn balotojn kaj novan konstitucion laŭmezure de liaj ambicioj kaj de la politikaj fortoj kiujn apogas liajn planojn. Jelcin kaj ties klikoj de rabistoj kaj gansteroj estas la justa puno kiun meritas la rusa popolo kiu ne sciis kaj ne volis ĝuste taksi la valoron de la komunista reĝimo kiun iam ĝi ĝuis. De nun vi eklernos ke ekzistas en la mondo aferoj eĉ pli malbonaj ol la stalinismo.

Per via letero vi diris al mi: *Se vi scias nian historion, provu kompari la reĝimon de Stalin kaj la tempon de caro Ivano la Terurulo (XVI jarcento). ĉi tiu monarkio estis vere terura en la tempo de Stalin...* Nu, mi iom konas la historion de via lando, kaj mi bone scias ke estas prava via komparo inter la regado de Jozef Stalin kaj ties de iuj antikvaj caroj speciale despotaj, tamen mi vidas ĉi-tiun aferon malsimile ol vi, kaj eltiras el ĝi konkludojn malsamajn al la viaj. Jen mia interpretado:

La despotismaj manieroj je regado konstituas tradicio kaj natura formo en Rusujo. En aliaj lokoj ekzistas alitipaj formoj kaj manieroj je regado, kiel la demokratio. Per si mem, la despotismo kaj la demokratio estas nek bonaj nek malbonaj; ĉio dependas de la uzo kaj la celo al kiu oni dediĉus ambaŭ regad-formoj. Mi ne perdos mian tempon pridiskutante ĉu la demokratio estas prefera al la despotismo, aŭ male. Mi diras nur ke inter du reĝimoj, ambaŭ kapitalistaj, sed unu diktatoreca kaj la alia demokratia, mi elektas la lastan (tial mi aktivadis por la forigo de la faŝisma reĝimo de mia lando cele de restarigi la demokration). Kaj inter du reĝimoj, ambaŭ despotismaj, sed unu stalinisma kaj la alia faŝista, mi elektas al Stalin. Kompreneble, plej bone estus: kaj Komunismo kaj Demokratio. Sed tiu alternativo ne estas disponebla en la nuna mondo, nek por la rusoj, nek por iu ajn alia popolo. En via intenco demokratiigi Rusion vi sukcesos aŭ ne, sed ĉiukaze la procezo estos longa. Tamen se por tion atingi vi malsaĝe fororeferas la socialistajn atingaĵojn, tiu ĉi rezulto estos tuja kaj certa: iliaj sekvoj prezentiĝas jam. La pruvo estas la nuna situacio de via lando: la konkeraĵoj de la Socialismo estas efektive kaj rapide perditaj, dum la afero de la demokratio restas en malproksima kaj



ne-certa estonteco. Vi ŝanĝis ion konkretan, ekzistintan, pro io ne-certa kej ne-vidita. Se vi daŭre defendas tiun negocon, mi sincere kompatas al vi. Kaj mi kompatas ankaŭ al mi mem, ĉar la sekvoj de via "negoco" falas ankaŭ sur mian kapon. Vi tre estis sub la impreso ke vi -la rusoj- havis neniun povon por preni gravajn politikajn decidojn. Tamen la fakto estis ke via popolo prenis dum la jaroj 1989 al 1991 iujn disponojn kiuj ŝanĝis, domaĝe kaj nereversigeble- la kurson de la homa historio. Kaj tiun decidon vi faris

nome de kaj domaĝe al la tuta monda loĝantaro nuntempa kaj estonta. Ni, la homoj de aliaj terzonoj sentas ke falas sur nin la pecoj de la tegmento de konstruaĵo kies kolonojn vi -la rusoj- faligis. Se la stalinismo estis la obstaklo kiu malpermesis al vi fari antaŭe tian frenezaĵon, ke Dio benu la stalinismon!

La libereco kaj la demokratio signifas nenion kiam mankas la plej necesaj nutraĵoj. Emfazu vi pri la demokratio antaŭ la 54 milionoj da rusaj laboristoj kiuj perdos sian laborlokon laŭlonge de ĉi-lasta jardeko de la 20-a jarcento. Emfazu vi pri la politika libereco antaŭ la multaj milionoj da viaj gesamcivitanoj kiuj restos sub la limo de la malriĉeco. La demokratio kaj la libereco estus trista afero en la mizera Rusujo kiun vi estas konstruantaj, se tiu demokratio kaj libereco reale ekzistus. Sed la plej sarkasma fakto estas tio ke vi ne povos prezenti al viaj gesamcivitanoj iun ajn demokration page de la socialismo kiun ili reale perdis.

Gijon, la 4-a de decembro - 1993

Kara kamarado,

Tralegante tion kion mi skribis hieraŭ, ŝajnas al mi ke mi iom troigis asignante al la nuntempa rusa loĝantaro la egan respondecon pri la ŝanĝoj de la jaroj 1989 al 1991, kiuj tiom domaĝis la homaron, nuntempan kaj venontan. Tia respondeco, ja, estus neeltenebla kulpo se nur la rusoj devus respondeci pro ĝi. Sed, se mi volas esti objektiva mi devas agnoski ke ankaŭ la laboristaro de la kapitalistaj landoj sufiĉe kulpas pri la fiasko de la iamaj kom.reĝimoj.

Dum la prosperaj jardekoj de la Komfort-Socio, la egoismaj popoloj de Usono kaj Okcidenta Eŭropo kondutis malsolidarece kun la Socialista Bloko kaj kun la Tria Mondo. Plejparto el la loĝantaro de tiuj landoj apogis, unu baloto post alia, la burĝajn kaj la socialdemokratiajn partiojn kiuj celis konservi la kapitalistan socion. Apogante la kontraŭsovetian militistan kontrakton NATO, la ĉi-tiea loĝantaro forĝis la ĉenon kiu nun katenas nin. Ankaŭ ni ricevas la justan punon pro nia egoismo, malsolidareco kaj malrevolucia konduto. Ankoraŭ nuntempe la ĉi-tiea loĝantaro nur iomete reagas kontraŭ la burĝa povo; devos pasi multe da tempo por ke ni denove estos harditaj por entrepreni revoluciajn taskojn. Antaŭ kelkaj tagoj estis ĝenerala striko en Nederlando, kaj post kelkaj semajnoj okazos ĝenerala striko ankaŭ en mia lando. Kaŭze de kio? La sama en ambaŭ kazoj: la kreskiĝo de la senlaboreco, la plialtiĝo de la prezoj kaj la impostoj, la perdo de pliaj sociaj rajtoj: subvencioj de senlaboreco, de emeriteco, de malsano, de vivdineco... resume: la plulikvidado de la komfort-socio.

La grandaj posedantoj de la kapitalo de la mondo faras tiun ĉantaĝon al la monda laboristaro: se ni volas ke ili investu kapitalon por ke estu industrioj kaj laborlokoj, ni devas konsenti pri la malboniĝo de niaj vivkondiĉoj por ke estu pli alta renteco por las kapitalo-investintoj. Ili jam ne plu volas konsenti la ŝtatan kontrolon de la produktado kun ties sekva limigo de la rentoj de la kapitalo. Ili volas reestigi la situacion ekzistintan antaŭ la Granda Rusa Revolucio de la jaro 1917. Ili venkis en la malvarma milito kaj nun volas ricevi la fruktojn de ilia venko. La spektaklo de la Komfort-Socio plenumis sian rolon trompi kaj allogi la loĝantaron de la Socialista bloko, kaj de nun estas jam neniu kialo por ĝin konservi.

(Transskribo el mia taglibro, de la 1-a de aŭgusto - 1992:)

Estas konate ke nia socio travivas, de antaŭ kelkaj jaroj, ekonomian krizon kiu manifestiĝas, interalie, per la senĉesa kreskado de la senlaboreco kun ties sekvoj de socia malstabileco, malriĉeco de ampleksaj amasoj, sociaj konfliktoj kaj konvulsioj, mizero, perforto...

Tiun realaĵon ĝis nun mi vidis iome de ekstere, kiel simpla spektanto. Mi povas diri ke ĝis la nuna jaro mi troviĝis en relative sekura pozicio en mia laborejo de unu fabriko de la ŝtalo-industria entrepreno ENSIDESA. En tiu ĉi entrepreno laboris multaj miloj da laboristoj dum en la lando, kaj ĝenerale en la mondo bankrotis multaj centoj da mezaj kaj malgrandaj entreprenoj, kaj la nombro da senlaboruloj plialtiĝis en mia lando ĝis preskaŭ la tri milionoj nun ekzistantaj. Kompreneble, ankaŭ en nia ŝtalo-farejo perceptiĝis la efiko de la krizo. Jam du aŭ trifoje estis malpligrandigita la nombro da laboristoj. Tio okazis ene de procezo de restrukturado de la landa ferindustrio. Sed ĝis nun tiu procezo tute ne estis kriza; ĝi tute ne estis ŝokiga por la laboristoj kiuj ĉesis labori. Oni aplikis al ili antaŭenigitan emeritigon kaj aliajn similajn

solvojn, per kiuj ili retiriĝis el la labora vivo kun bona ekonomia subvencio.
Sed ĉio ŝanĝiĝis lasttempe. Ĉi-jare komencas por nia entrepreno la konflikta parto de la produktad-procezo. Oni entreprenas nun novan malpliigon de la nombro da laboristoj, kaj krome en ne bonaj kondiĉoj. Estis multaj tagoj da strikado kaj aliaj batalagoj fare de la laboristoj de mia fabriko.
Sed nun komenciĝas la plej intensa etapo de nia batalado. Tiurilate estas menciinda la manifestacio de la laboristoj de ENSIDESA kaj de aliaj ferindustriaj entreprenoj de Hispanio, hieraŭ, en Madrido, antaŭ la Ministrejo pri Industrio por plendi pro la formo de restrukturado de la ferindustrio kiun volas apliki la aŭtoritatoj de mia lando sub la premo de la postuloj de la koncernaj instancoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo.
Mi partoprenis en tiu manifestacio. Ĝuste je la 24-a horo de la merkredo, 29-a de julio, eliris el Gijon la aŭtobusoj destine al la hispana ĉefurbo por partopreni en la planita manifestacio. Kiam komenciĝis la nova tago, la 30-a de julio, mi veturis per iu el la multaj 50- aŭ 60-sidlokaj aŭtobusoj portantaj laboristojn al Madrido. La komunista sindikato, al kiu mi apartenas, kontraktis en mia urbo 13 aŭtobusojn por tiu vojaĝo. Sed en tute eliris tiam el Gijon 40 aŭtobusoj ĉar ankaŭ la du ceteraj grandaj sindikatoj pretigis veturilojn por siaj membroj. En ĉi tiu batalo por la defendo de la ferindustrio de Hispanio agadas unuece ĉiuj sindikatoj, kaj eĉ la U.G.T. la sindikato de la socialistoj, partoprenas en tiu batalo kontraŭ ilia propra registaro de la Socialista Partio, ĉar tiu registaro pli kaj pli agadas kontraŭ la interesoj de la laboristaro kaj vekis la abomenon de sia propra socia bazo. Nu, krom la sindikatoj de la laboristklaso, apogas ĉi tiun strikon kaj bataladon eĉ la korporacioj de la teknikistoj kaj aliaj konservativaj organizaĵoj de ne-batalemaj sektoroj de la socio ĉar la likvido de la ferindustrio, kiun la registaro entreprenis, estas domaĝa por ĉiuj sociaj tavoloj.
En tiuj aŭtobusoj iris ne nur laboristoj de la ferindustria fabriko sed ankaŭ la edzinoj de multaj laboristoj, kaj ankaŭ aktivaj sindikatistoj kaj membroj de organizaĵoj de Maldestraro, ĉefe komunistoj.
Pluvadis kiam la aŭtobusoj alvenis al Oviedo, la ĉefurbo de la Asturia regiono. Tie la ekspedicio haltis dum duonhoro; tie reunuiĝis kun ni la aŭtobusoj venintaj de aliaj zonoj de Asturio: Aviles, Langreo... En tute, pli ol sesdek aŭtobusoj plenaj da laboristoj eliris el nia regiono por sin adresi al Madrido. Estis impona tiu longega vico da aŭtobusoj dum vojaĝis tra la alta montĉeno kiu apartigas nian regionon de la alte ebenaĵo kiu konstituas la centron de Hispanio. Dum pluraj horoj la granda peraŭtobusa ekspedicio veturis senhalte. Ni forlasis la Asturian regionon; restis malantaŭ ni la granda Kantabra monĉeno kaj ni trairis la zonon de Leono-regiono kaj eniris en Kastilio, la centra regiono de la lando.
Por ke la vojaĝantoj iomete ripozu kaj drinku biereton, nia aŭtobuso haltis en granda drinkejo-restoracio apud la ŝoseo. Estis tie ankaŭ provizejo de bencino kaj aliaj servoj kaj instalaĵoj por la kamionistoj kaj ĉiuspecaj veturantoj. Multaj aliaj aŭtobusoj de nia ekspedicio haltis tie same ol ni. Dum la duonhoro kiam ni restis tie estis senĉese reelirante la aŭtobusoj kiuj alvenis antaŭ ol ni, kaj alvenante tiuj kiuj venadis post ni.
Kiam mi eliris el la aŭtobuso frapis min la ega klimato-diferenco inter mia Asturia regiono kaj tiu regiono, Kastilio, kie ni troviĝis tiam. En Asturio restis pluvanta vetero; ĉi tie estas la ĉielo tute sennuba; oni povis klare vidi ĉiujn stelojn kaj konstelaciojn, kio ne eblas en mia regiono pro la troa nubado dum plejparto el la jaro. Krome ĉi-tie, en Kastilio, estis varma vetero eĉ dum la nokto. Kaj frapis ankaŭ la odoro de la aero; en Kastilio estas tre penetranta la odoro je timiano. Dum la tempo kiam mi estis en tiu ripoz-loko, mi estis observante la partoprenantojn en tiu ekspedicio al Madrido. Inter ili estis multaj konataj personoj kiun mi bone konis pro tio ke mi partoprenis kune kun ili en multaj antaŭaj manifestacioj kaj ĉiutipaj bataloj kontraŭ la kapitalista sistemo. Sed mi rimarkis ke estis ankaŭ multege da personoj kiuj neniam distigiĝis pro sia batelemo, sed tute male, ili interkonsentis kun la spirito kaj la realaĵo de ĉi tiu maljusta ordo, sed nun ili




*La amplekso kaj profundeco de la ekonomia krizo en Hispanio, pelas al la sindikata batalado multajn laboristojn, kiuj en normalaj kondiĉoj estas malbatalemaj kaj ne-solidaraj kun la klasaj celoj de la laboristaro.*

konstatas kiamaniere tiu malbeninda sistemo pagas al la homoj kiuj estis fidelaj al ĝi, kiamaniere tiu ĉi putra socio pagas al ĉiuj laboristoj -ĉu progresistaj aŭ ne- per senlaboreco kaj estonto de mizera vivo.

Tiam mi eksciis pri incidento okazinta en tiu loko antaŭ la alveno de la aŭtobuso per kiu mi vojaĝis. Okazis ke estis tie iu polica veturilo en kiu enestis kelkaj policistoj. Iuj laboristoj rimarkis ke iu policisto estis parolanta per radio-telefono, verŝajne informante siajn superulojn. La laboristoj kiuj sufiĉe alproksimiĝis al la polica veturilo aŭdis ke la parolanto estis diranta: *Ili estas multegaj, multe pli ol antaŭkalkulite; senĉese alvenas aŭtobusoj, dekoj da aŭtobusoj plenaj da laboristoj...* Komprenante ke la policistoj apartenis al organiza aparato kiu preparadis strategion kontraŭ la manifestacio, tiuj laboristoj volis linĉi ilin. Baldaŭ diskoniĝis tiu malkovro inter la gelaboristoj tie amasigitaj kaj multaj el ili alkuris minace kaj ĉagrene. La policistoj komprenis ke ili troviĝis en danĝera situacio. Ili afable kaj humile diris: *Ne perfortu kontraŭ ni, homoj; ni estas laboristoj –same kiel vi– kiuj plenumas sian taskon.* Kelkaj laboristoj kaj sindikataj responsuloj evitis ke tie okazu masakro; ili trankviligis la plej kolerajn laboristojn kaj petis al la policistoj ke ili iru for el tiu loko per ilia veturilo. Ili foriris kaj malproksimiĝis el tie, sed restis observante ĉion el ioma distanco. Kiam mi estis en tiu loko mi povis vidi ilian veturilon, malfacile pro la nokta mallumo, iome apartigita. Estis evidente ke la koncernaj policaj aŭtoritatoj estis planante la disponojn kiujn ili devus preni okaze de nia manifestacio. Antaŭ ĉio, al ili tre estis necesa kalkauli la grandon de niaj fortoj, ĉar ili havis vere grandan problemon je disponebleco de polica forto. Ĉi-tagoj, dum okazas en Barcelono la Olimpiaj Sportludoj grandparto el la policaj fortoj de la lando estis destinitaj al la necesaj policaj servoj en tiu urbo. Krome estis necesa granda polica forto ankaŭ en la urbo Seviljo, kie okazas ĉi-monatoj la Internacia Fojro. Do, al la ŝtataj responsuloj pri sekureco estis necesa koni kiel eble plej ĝuste kiom da policistoj povas esti necesaj por alfronti la problemojn kiuj povus okazigi nia manifestacio, por demeti el tiuj urboj nur la ĝustan nombron da policistoj kaj ne pli.

Post nia forlaso el tiu drinkejo-ripozejo, la veturado ĝis Madrido daŭris ankoraŭ kelkajn horojn, noktaj horoj kiam la homa korpo postulas liton por ripozi. Sed ĉi-nokte ne eblas tia kutima ripozado; ni devas alkuri al Madrido por troviĝi tie je la unuaj horoj de la mateno. Tamen kelkaj veturantoj sukcesis dormiĝi, eĉ se malkomforte, en siaj aŭtobusaj sidlokoj. Al mi tre rezultas malfacila dormiĝi en tia pozicio. Mi estis sidanta en la aŭtobuso apud fenestro; tra la fenestro mi estis rigardanta la stelojn, ne kutime klaraj por ni, la homoj de la nubaj regionoj de Hispanio. Subite mi rimarkis ke inter la stelaroj estis alia eksterordinara lumo; ĝi estis ruĝeca, aŭ pli ĝuste oranĝkolora, kaj krome ĝi moviĝadis: *sendube estas iu aviadilo...* -pensis mi-. Sed plurigardante tiun lumon, io rezultis al mi stranga, *Sed kia aviadilo aŭ konata flugilo povas flugi tiamaniere?* -daŭre pensis mi-. Ja, pli ol flugi ŝajnis ke tiu aparato, aŭ kio ajn ĝi estus, anstataŭ flugi, ĝi antaŭenmarŝadis per saltoj... Ĝia rapideco konstate ŝanĝiĝadis, foje eĉ sajnis ke tute haltis... kaj krome ĝi iradis zigzage, senĉese ŝanĝante la direkton laŭ tre malverŝajnaj anguloj. Rimarkinde estas ke je la anguloturniĝo, dum tre mallonga tempo la lumo estingiĝadis; poste ĝi relumadis dum alkuris, laŭ la sama aŭ malsama rapideco, kaj ĉiam laŭ malsama direkto, ol antaŭe. Dum preskaŭ tuta minuto mi observadis tiun strangan spektaklon. Fine tiu salt-moviĝanta, ruĝeca kaj palpebr-lumanta aĵo malaperis el la parto de la ĉielo kiun mi povis vidi de mia fenestro, kaj mi restis demandante al mi kio povas esti tiu stranga flugilo. *Iam mi legis ion pri Ne-Identigitaj-Flugantaj-Objektoj, kaj ŝajnas al mi ke oni priskribis ilian flugadon ĝuste kiel tio kion mi ĵus vidis. Ĉu eblas ke mi ĵus vidis iun el tiuj misteraj aĵoj?...*

Fine eĉ mi iomete dormis antaŭ nia alveno al la hispana ĉefurbo, je la sepa horo matene. Antaŭ nia eliro el la veturilo, ĉiu manifestacianto ricevis fajfilon. Oni disdonis al ni ankaŭ blankajn kamizolojn kiel uniformo de la manifestaciantoj; sur tiu vestaĵo estis skribitaj per ruĝaj literoj la

sloganoj de la manifestacio: "Savi ENSIDESA, savi Asturion!". Mi akceptis la fajfilon, sed rifuzis surmeti tiun vestaĵon sur mian violkoloran ĵerzon. La aŭtobusoj de la ekspedicio haltis kaj restis parkitaj en la ĉirkaŭaĵoj de la futbal-stadiono "Bernabeu". Tie proksime troviĝas la granda avenuo "Kastilia", kie troviĝas kelkaj ministrejoj kaj aliaj ŝtataj oficejoj. Tiu estis la scenejo de nia manifestacio kiu devos komenciĝi post du horoj. Dum tiu tempo daŭre estis alvenantaj pliaj aŭtobusoj plenaj da asturaj manifestaciantoj, kaj ĉi tiuj komencis svarmadi tra tiu centra zono de Madrido. Mi telefonalvokis al la tiuurba hejmo de mia bofratino; tie troviĝis, somerumante dum kelkaj tagoj, mia edzino kaj miaj gefiloj. Kun mia edzino mi interakordis por renkontiĝi poste en la loko de la manifestacio.

Proksimume je la naŭa horo la gemanifestaciantoj komencis preni poziciojn antaŭ iu grandega kaj luksa konstruaĵo dediĉita al oficejoj. En tiu domo troviĝas la sidejo de la direktoraro de la nacia ŝtalo-industrio. Tiu agentejo estas oficiala, duon-ŝtata, ĉar en Hispanio la ĉefa akcio-posendanta de la ferindustrio estas la Ŝtato. La nuna estraro de tiu agentejo, do, estas personoj elektitaj de la registaro por gvidi la likvidadon de la landa ŝtalo-industrio laŭ la postuloj kaj la interesoj de la ekonomiaj fortoj kiuj nuntempe superregas en la super-kapitalista Eŭropa Ekonomia Komunumo. La tie koncentrita -jam manifestacianta-homamaso, konstituis spektaklon de bilda kaj sona vidpunkto. La bildo estis frapanta: kelkmilo da homoj (inter ses kaj ok mil personoj laŭ la hodiaŭaj ĵurnaloj), plejparto vestitaj per blankaj kamizoloj, multegaj, disverskoloraj flagoj kun la emblemoj de la kunvokintaj sindikatoj, krome blankaj kaj ruĝaj tolafiŝoj kun la sloganoj de la manifestacio. La sono estis eĉ pli frapanta: kelkmilo da bruantaj fajfiloj, ankaŭ la muziko de kelkaj tamburoj kaj trumpetoj, kaj la tradiciaj muzikiloj de la Asturia regiono: sakŝalmoj... kaj voĉlaŭtigilo per kiu oni kriadis sloganojn kaj insultojn kontraŭ la responsuloj de la landa ferindustrio. Sed ĉefe, estis la eksplodado de dinamitaj raketoj. La manifestaciantoj portis ekde Asturio grandan stokon da tiuj eksplodiloj. Dum la kelkhora daŭro de la manifestacio la eksplodado estis konstanta. Lasttempe tio estas tre ofta en la manifestacioj en Asturio, sed en Madrido tio konstituis novaĵon. La geoficistoj kiuj en tiu horo aliris al la ministrejoj, agentejoj kaj ĉiutipaj ŝtataj oficejoj ektime aŭdis la terurajn eksplodojn.

Dekomence estis policistoj ĉirkaŭ la manifestacianta amaso. Kelkaj policaj veturiloj LAND-ROVER-tipaj alportis la homojn kaj ties kontra-disturban materialon. La trupanoj staris proksime de la gemanifestaciantoj armitaj per bastonoj kaj kovrintaj per kaskoj sian kapon; iuj el ili portis ankaŭ plastajn ŝirmilojn. Ili tute ne intencis dissolvigi la manifestacion; evidente, estis tro malmulte da gvardistoj por tiu tasko. Ili nur celis ke la manifestacio ne preterpasu je difinita limo. Multaj el la manifestaciantoj timige rigardis tiun trupon pretan interveni kontraŭ ni. Multaj el ni spertis iu- aŭ ali-foje la brutalan batadon far' de tiaj uloj. Ili aspektis al ni brutale kaj severe, deciditaj interveni. Kaj ni pritaksis la malfacilaĵojn alfronti per nudaj manoj la atakon de tiel armitaj trupoj konstituitaj el junaj homoj bone trejnitaj en la kontraŭhoma batalado, kaj harditaj en kontraŭ-tumulta sufokado. Iu psikologiisto komprenus ke tiuj policistoj, sub ilia masko de brutaleco kaj decidemo, timis nin almenaŭ tiom kiom ni timis ilin. Mi kutimas mense situiĝi en la loko kaj cirkonstancoj de aliaj personoj por priesplori kiamaniere ili povas taksi la situacion. Do, situiĝante mi en la cirkonstancoj kaj situacio de la policistoj, mi komprenis ke antaŭ iliaj okuloj ni aspektas timige kaj danĝero-minace. Ili bone komprenas ke estas tro malgranda nombro da policistoj por alfronti nian antaŭenmarŝadon. Kaj krome estas io kio tre konsternas ilin: ni ne estas tute senarmitaj; ni havas grandan kvanton da dinamito, kiun ni senĉese eksplodigas en diversaj anguloj de la manifestacia zono. En Hispanio iamaniere estas asociitaj la konceptoj "asturiano" kaj "dinamito". Tio okazas ekde la Revolucio de Oktobro de la jaro 1934. En tiu okazo la asturiaj ministoj detruis per dinamito ĉiujn policajn kazernojn




*En Hispanio ofte okazas manifestacioj -kiuj multfoje evoluas al malpacaj tumultoj- de la diversaj loĝantartavoloj sur kiuj efikas domaĝe la granda ekonomia krizo nun frapanta nian socion. Tial ekzistas ĉi-tie specialaj policistaraj taĉmentoj bone preparitaj por alfronti tiajn amasajn koncentriĝojn.*

kaj armeajn instalaĵojn de la regiono, kaj post konkeri la regionan ĉefurbon, Oviedo, ili faris tie grandan detruadon per dinamito-eksplodigado. Io simila okazis du jaroj poste, dum la civilmilito kiu komenciĝis en la jaron 1936. La famo de tiuj historiaj okazaĵoj fine fariĝis mito. Nun ĉi tiuj policistoj de Madrido malagrable konstatas ke ĉi-foje la realaĵo iamaniere alĝustiĝas al la mito. Verdire, kaj laŭ ni sciis poste, la aŭtoritatoj pri sekureco, vidante la evoluon de nia manifestacio decidis la rapidan alvenon, per aviadilo, de pliaj policaj taĉmentoj el la urbo Seviljo, kie ili deĵoris gardante la ordon de la Internacia Fojro. Ili alvenis al Madrido post unu horo. Ni vidis la subitan alvenon de pliaj policaj veturiloj LAND-ROVER-tipaj.

La novalvenintoj portis fusilojn por pafado de kaŭĉukaj kugloj. Tiuj armiloj ne estas mortigaj, tamen la rezulto de ties pafado estas tre doloriga; foje estis kazoj de vizaĝo-ostoj rompitaj per tiuj kugloj, kaj en mia urbo, dum la disturboj okazintaj antaŭ kelkaj jaroj rezulte de la bankroto de la ŝipkonstruaj entreprenoj, iu laboristo (aŭ pli ĝuste, ĵus-senlaborulo) perdis okulon trafitan de iu el tiaj kugloj.

En tiu momento nia manifestacio forlasis la faŝadon de tiu oficejara konstruaĵo kaj adresiĝis al la Ministrejo pri Industrio. Por alveni al tiu ĉi loko ni devis trairi la menciitan avenuon "Kastilia". La policistoj ne volis, tiel ke ili ne povis, interrompi nian marŝadon, ĉar estus okazinta plian malordon kaj plian domaĝon ol la manifestacio mem. Tamen ili ne estis pretaj konsenti ke ni interrompu la intensegan trafiko-fluadon de la ĉefa strato de la ĉefa urbo de Hispanio. Do, ili postulis ke ni marŝadu tra flanka mallarĝa strio de tiu larĝega avenuo. Komence la gemanifestaciantoj alĝustiĝis al tiu plano, sed inter ni estis iuj opiniantaj ke nia manifestacio devus bari la trafikon marŝante laŭlarĝe (t. e., laŭlonge, sed okupante la tutan larĝon) de tiu granda avenuo. Ni ne faris dumnoktan kvincent-kilometran veturadon por nun konduti orde kaj milde. La celo de nia manifestacio, de ĉiu manifestacio, estas atentigi la civitanaron pri la graveco de socia problemo. Tiu atentigo perdas efikon, kaj la manifestaciantoj eĉ povas resti ne-rimarkitaj se ili kondutas orde kaj alĝustiĝas al la limigoj truditaj de la aŭtoritatoj. Ĉiu manifestacio atingas famon -kaj tiele plenumas sian celon- ĝuste kiam ĝi perfortas kaj disrompas tiujn limigojn. En tiu konvinkiĝo, aro da manifestaciantoj rompis la polican kordonon kaj pasis al la avenuo-centro celante ke la manifestacianta amaso imitu tiun agon. Mi troviĝis inter la dudeko da aktivuloj kiuj entreprenis tiun agon. Tiele ni enmetiĝis en iome danĝeran situacion ĉar ni restis izolite de la manifestacia amaso kaj ĉirkaŭitaj de policistoj, kaj krome ni troviĝis meze de strato trairita de centoj da veturiloj. Formiĝis tie granda ĥaoso dum ni kuradis meze de la trafika fluo sekvitaj de kolerigitaj policistoj svingante siajn klabojn. La policanoj volis abortigi nian intencon antaŭ ol la grandamaso da manifestaciantoj imitu nian agon. Ĉi-foje mi ne estis batita per tiuj policaj bastonoj (kio, ja, iam estis okazinta), sed aliaj kunuloj ne tiom bonŝancis. Mi vidis kiel iu kamarado estis trafita de la malmola klabo de policisto kiu brutale batis lin. La malfeliĉulo falis surstraten kaj tie li ricevis pliajn baston-batojn. Li estis malalta, iom dika homo, pli aĝa ol mi. Kelkaj ni alkuris por helpi lin leviĝi, kaj pliaj policistoj alkuris tien por apogi ilian kolegon kontraŭ ni. Formiĝis tie du grupoj pretaj sin ĵeti unu kontraŭ la alia, kaj dummomento ŝajnis ke tiu batalo estos ne-evitebla. Tamen la policistoj sin tenis vidante ke pliaj manifestaciantoj, forlasante la antaŭfiksitan strato-strion, alkuris al la zono kie ni troviĝis. Do ni povis levigi nian falintan kunulon, kaj li, tre ege ĉagrenita, per fermita pugno minacis la policiston kiu ĵus batis lin dirante: *Se iam ci iros al Asturio, ci klopodu ke mi ne renkontiĝu kun ci, ĉar se tio okazus, ci estu certa ke tiu tago estos la lasta de cia porka vivo.*


En tiu momento haltis la trafika fluo de la avenuo tial ke la semaforoj ruĝis fronte al la veturiloj. La cirkonstanco estis profitata de granda amaso da manifestaciantoj por pasi al la centro de la avenuo. Iu kamarado apud mi diris: *Rigardu! denove okazis tio; estas nur membroj de nia sindikato la okupantoj*

*de la centro de la ŝoseo; kie estas la flagoj kaj la tol-afiŝoj de la socialista sindikato kaj de la ceteraj sindikatoj?* Mi rigardis malantaŭen kaj vidis ke, efektive, inter la plurmilo da marŝantoj tra la centro de la avenuo estis nur la ruĝaj flagoj de nia komunista sindikato. Sed tia situacio malmulte daŭris: baldaŭ la cetero el la gemanifestaciantoj amase okupadis la avenuon "Kastilian" laŭ ties tuta larĝo. La policistoj ne povis kontraŭstari tiun egan amason marŝante kune. Ili pretiĝis por uzi pli efikajn armilojn ol la bastonoj kontraŭ tiutipaj amasoj. Ni vidis kiel ili prenis fusilojn por pafi kaŭĉuko-kuglojn kaj fum-bombojn. Sed ili troviĝis en malfavora pozicio eĉ por tion fari. La grupo da gvardistoj kiuj unue ĉirkaŭis nin, nun estis ili ĉirkaŭitaj de la granda amaso da manifestaciantoj, kiuj insultadis ilin per la vortoj: *Krimuloj!, banditoj!, putinidoj!*. Kelkaj policaj veturiloj furioze alkuris inter la gemanifestaciantoj por defendi kaj rehavi siajn kolegojn ĉirkaŭtaj meze de la manifestacio. Fine sendube la responsulo de tiu polica forto venis al la konkludo ke estis prefere lasi nin marŝi laŭ nia deziro tra la tuta larĝo de la avenuo, ĉar male okazus tie masakro kun multaj vunditoj inter la manifestaciantoj kaj inter la policanoj. Verŝajne li havis severajn ordonojn de la registaro eviti tian masakron, ĉar nun la registaro estas tre senkreditigita en la lando pro la multaj skandaloj pri ŝtata koruptado kaj pro la ĵusa kaj enorma plialtigo de la impostoj por alfronti la egajn elspezojn de la Internacia Fojro kaj de la Olimpiaj Sport-Ludoj. Tia masakro de laboristoj fare de policistoj meze de la landa ĉefurbo, tute finruinigus la malmulton da prestiĝo kiu ankoraŭ restas al tiu "socialista" regantaro.

Do ni povis, sen pliaj policaj intervenoj, daŭrigi nian marŝadon al la Ministrejo pri Industrio. La policistoj sin dediĉis al la devojigo de la trafiko de tiu avenuo al aliaj flankaj stratoj. Dum ni marŝadis tra Kastilia-avenuo meze de fajfado, kriado de sloganoj kontraŭ la registaro, kaj -de tempo al tempo- iu dinamit-eksplodo, pluraj helikopteroj superflugis nin; mi ne scias ĉu temis pri policaj aparatoj, aŭ ili apartenis al la Televido. Dum nia irado al la Ministrejo pri Industrio ni pasis antaŭ la Ministrejo de Financoj; antaŭ ties pordego estis vico da policistoj pret-tenante mitralojn. Ankaŭ estis same defendita la Ministrejo pri Industrio, sed ĉi tie la gvardistoj ne troviĝis antaŭ la pordo sed en interna halo post la pordo. Dum duonhoro estis alvenante al tiu loko la manifestacianta amaso, kaj situiĝanta antaŭ la faŝado de la granda Ministrejo-konstruaĵo. Krome en tiu momento la nombro da manifestaciantoj konsiderinde plialtiĝis pro la alveno de kromaj 30 aŭtobusoj plenaj da ferindustriaj laboristoj kiuj venis el alia regiono de la nordo de Hispanio: Eŭzkadio. Asturio kaj Eŭzkadio estas la du ĉefaj regionoj gravaj de ŝtalo-industria vidpunkto. Ambaŭ regionoj estas same domaĝitaj pro la nuna krizo de la ferindustria labor-sektoro kaj pro la planoj de la registaro rilate al tiu krizo.

Antaŭ la ministrejo estis aranĝita podio, kaj de tiu loko paroladis al la amaso la lideroj de la sindikatoj kunvokintaj tiun manifestacion. Tiam, je la dekunua horo kaj duono, alvenis al tiu loko mia edzino kaj miaj plejaĝaj filoj. Fine mi povis vidi kaj kisi ilin post pli ol unu semajno, kiam ili venis al tiu ĉi urbego por pasigi kelkajn ferio-tagojn. Ili restis kune kun mi dum la cetero de la manifestacio kaj faris iujn fotaĵojn de la amaso antaŭ la ministrejo. Je tiu horo la varmo estis enorma; ĉi tie estas pli varma vetero ol en nia norda regiono. Tamen mia edzino diris al mi ke la antaŭaj tagoj estis eĉ pli varma ol nun: *La termometro* -diris ŝi- *registris dum la pasintaj tagoj temperaturojn de 45 kaj 46 gradoj C.*

Post la interveno de kelkaj sindikataj lideroj, ili eniris en la Ministrejon por intervidiĝi kun la Ministro, S-ro Aranzadi. Dum la monatoj junio kaj julio ili kelkfoje kunvenadis kun tiu ministro por interakordi pri solvoj por nia kriza ferindustrio. Ili alvenis al neniu inter-akordo, ĉar ministro kaj sindikatoj havis ne nur tute malsamajn planojn, sed eĉ tute malsamajn celojn. La sindikatistoj, la laboristoj, celas savi la hispanan ferindustrion; la ministro, la tuta registaro, celas likvidi tiun industrion. Inter ambaŭ pozicioj eblas neniu inter-akordo. Hodiaŭ, la 30-a de julio, estis la fiksita dato por la lasta kunsido de tiu negocado. Hodiaŭ la




*Mia familio kaj mi en la manifestacio de la 30-a de julio-1992 en Madrido*

Ministro havis intencon transdoni al la sindikatistoj definitivan planon de la registaro por tro-malpliigi la kvanton de nia ŝtalo-produktado, por la detruado de kelkaj ferindustriaj instalaĵoj, kaj por la forigo el siaj laborlokoj de dekmil gelaboristoj (sep-mil en Asturio kaj tri-mil en Eŭzkadio). Tial estis aranĝita de la sindikatoj ĉi-tiu manifestacio en ĉi-tiu tago kaj en ĉi-tiu loko. Nun la sindikataj lideroj povas prezentiĝi antaŭ la Ministro montrante al ĉi-tiu la forton kiun ili havas malantaŭ si.

Dum okazadis la kunsido inter la ministro kaj la sindikataj lideroj, en la strato tiu kelkmila homamaso brue manifestaciis. Per la voĉ-laŭtigilo de la podio oni kantadis ĵus inventitajn aŭ laste preparitajn por la okazo kanzonojn kiuj aludis nian problemaron kaj la ne-kapablon de la registaro por ilin solvi. Ankaŭ oni menciis la lasttempajn pri-koruptajn skandalojn, kaj oni insultadis la ministrojn kaj aliajn altrangulojn implikitajn en tiuj malhonestaj aferoj. Kaj la senĉesa fajfado, kaj la tondrado de

la intermita eksplodado de dinamitraketoj en la trotuaro mem de la Ministrejo kaj sub la fenestroj de la faŝado de tiu konstruaĵo kie okazadis la kunveno kun la Ministro.

Laŭ mia kutimo situiĝi mense en alies pozicion, mi intencis en tiu momento imagi al mi la pensojn kaj la sentojn de la Ministro Aranzadi. Ĉi-kaze la mensa operacio estas pli malfacila ol kutime ĉar li, la ministro, disponas je multe da informoj kiujn mi ne konas. Tamen, mi ion scias; mi konas la strategion kiun tiu ulo sekvis dum kelkaj monatoj por dividi kaj konfuzigi la sindikatojn kaj la laboristojn. Kaj hodiaŭ, ĉi tiu manifestacio estas la plej klara esprimo de la fiasko de tiu strategio.

Li, la ministro, ruze manovris por apartigi la negocadon de la ferindustria problemaro de ties de la karbo-minista problemaro. Ambaŭ krizoj efikas sur Asturio, sed la ministro sukcesis en tio ke ne tuta Asturio batalu samtempe kontraŭ la likvidista politiko de la regantaro. Unue li alfrontis la problemaron de la karbo-ministoj kaj prokrastigis ĝis nun la aferon de la ŝtalo-industrio. La asturaj ministoj batalis brave kaj ili atingis ke la likvidado de la karbo-entreprenoj ne estu tiom intensa kaj tiom rapida kiom la registaro celis. Krome ili atingis ke la ministoj kiuj fariĝos senlaboruloj ricevu decan monkompenson. Kiam komenciĝis, antaŭ kelkaj monatoj, la negocado pri la ferindustrio, la Ministro Aranzadi deklaris ke ni ne esperu atingi tiom bonajn kondiĉojn kiom atingis la karbo-ministoj. Li diris ke la kondiĉoj por ni estos la samaj ol la truditaj de li al la entreprenoj ACENOR kaj ENFERSA. Tie la ministro sukcesis trudi sian planon de drasta malpliigo de labor-lokoj kaj ridindan monkompenson por la laboristoj kiuj perdis sian labor-postenon. Li bone scias ke la ferindustriaj laboristoj estas malpli batalemaj ol la karbo-ministoj. Kaj jen nun, ĉi-tiu hodiaŭa batalo kaj ties de la antaŭaj strikaj tagoj en Asturio montras ke ni batalas pli organizite, pli discipline kaj malpli anarkie ol la karbministoj. Tiu ĉi estas la unua fiasko de la Ministro Aranzadi.

Li, la ministro, ruze manovris klopodante ke la kulmino de la negocado kun la sindikatoj okazu en ĉi-tiu periodo meze de la somero, kiam duono el la gelaboristoj de la fabrikoj ferias, kaj la alia duono pretiĝas por komenci sian feriadon post du tagoj. Li kalkulis ke en tiuj ĉi datoj al la sindikatistoj rezultus tre malfacile aranĝi ian ajn organizitan reziston kontraŭ la efektivigo de liaj planoj. La amaso ĉi-tie koncentrita montras kiom erara estis tiu antaŭ-kalkulo.

Li, la ministro, ruze kondutis dum la lastaj monatoj intencante starigi malakordon inter ambaŭ industriaj regionoj de la nordo de Hispanio: Asturio kaj Eŭzkadio. Dum tiu tempo-periodo ĉiu informo de la registaro pri tiu temo celis enkonduki en la menson de la loĝantaro de ambaŭ regionoj la ideon ke la detruado de la industrio de unu regiono des pli estos granda ju pli malgranda estos ties de la alia regiono, kaj inverse. Per tiu aranĝo tiuj fiuloj de nia landa regantaro deziris ke ambaŭ regionoj mobiliziĝu unu kontraŭ la alia. Ankaŭ en ĉi-tiu punkto malsukcesis la politiko de tiuj kanajloj. Tie ĉi fratece la laboristoj de ambaŭ regionoj manifestacias kontraŭ la registaro kaj ties kontraŭindustriaj planoj. Miksiĝas la flagoj de Asturio kun ties de Eŭzkadio; iuj laboristoj interŝanĝas tiujn flagojn. La asturianoj krias: Gora Eŭzkadi! (t.e. "Vivu Eŭzkadio", en la eŭskera lingvo), kaj la eŭzkadianoj respondas: Puŝja Asturies! (t. e. "Vivu Asturio", en la bable-lingvo).

Do mi povas imagi al mi kiel sin sentas la Ministro Aranzadi. Nun li troviĝas sieĝita de la laboristoj en sia propra ministrejo. Li ne povas cedi al la postuloj de la manifestaciantoj kaj de la sindikatoj ĉar li devas apogi la politikon de la registar-prezidento kiu elektis lin por sia ministra posteno. Sed dume li ankaŭ ne povas tute rifuzi tiujn postulojn ĉar la situacio ĉi-ekstere tro estas streĉa. Li ne ricevos pliajn policistojn ĉar tio ne eblas hodiaŭ. Kaj krome, kvankam li disponus je plia armita forto, li ne povus ĝin uzi ĝisfunde ĉar tiamaniere same, aŭ eĉ pli, restus domaĝita la bildo kaj la pozicio de la registaro. Resume, li verŝajne sin sentas tre sola, kiel ofte okazas al la homoj kun politika povo kaj respondeco, kiam ĉiuj alternativoj estas same danĝeraj kaj same ne-dezirindaj. Mi tre sentas intereson ekscii

kiamaniere li ruzos por eliri sendomaĝe el ĉi-tiu situacio.
Tion mi pensadis. Fine eliris la sindikataj lideroj post ilia kunveno kun la ministro. Ili informis la ĉeestantaron pri la rezulto de ilia kunsido. Ili sciigis al ni ke S-ro Aranzadi insistas en sia plano redukti la produktad-kapablon de la landa ŝtalo-industrio; li daŭre rifuzis la kontraŭplanon de la sindikatoj. Tamen ion atingis la nunaj manifestaciantoj: la negocado ne finiĝos hodiaŭ, la ministro promesis ke dum la tuta monato aŭgusto li ne prezentos la proponon por malpliigo de la nombro de laboristoj. Ni gajnis monaton, kaj ankaŭ li, la ministro, gajnis monaton de trankvileco. Aŭ eble pli ol unu monato, eble du aŭ tri monatoj ĉar estas ĝenerala opinio ke post la somera feriado la registar-prezidento anoncos la antaŭigon al ĉi-jara aŭtuno de la ĝenerala politika balotado kiu devus okazi venontan jaron. Ĉiuj koincidas pri tio ke en la nuna stato de senkreditiĝo de la registaro kaj de ekonomiaj problemoj kaj malfacilaĵoj kiujn la nuna registaro ne kapablas alfronti, la antaŭenigo de la voĉdonado fariĝos neevitebla. Povas esti tiel, kaj se estos tiel, ankaŭ ne dum la monatoj septembro kaj oktobro (dum la pri-balota kampanjo), la registaro povos entrepreni siajn planojn por la ferindustrio. Se tiel, la Ministro Aranzadi eble liberiĝis definitive el tiu ĉi problemo ĉar verŝajne li ne plu estos Ministro pri Industrio post la balotado. Mi pensas ke ne mankis al li lerteco por sin liberigi el la problemoj kiuj tiom premigis lin hodiaŭ.
Sed, kiuj ne povos liberiĝi definitive el tiu ĉi problemo estas ni, la ferindustriaj laboristoj. Ĉu post unu monato, ĉu post du aŭ tri monatoj, ĉi-tiu ministro aŭ alia nova ministro, de la sama Partio Socialista, aŭ de alia burĝa forto aŭ koalicio rezultonta el la proksima balotado, entreprenos ĉi-tiun domaĝan planon, aŭ alian similan en la linio de la ordonoj kiuj venas el Bruselo, kaj ni devos denove alfronti batale tiun planon, kies sekvoj tiome estas por ni malfavoraj, kaj fine ĉi-tiu registaro aŭ alia en pli forta pozicio sukcesos dronigi en mizeron, senlaborecon kaj ruinon nian Asturian regionon. Ke Dio kompatu nin!

La 5-a de decembro - 1993

Kara kamarado,
El la ĉi-supra raporto, de la pasinta jaro, pri la manifestacio, en Madrido, de la ferindustriaj laboristoj de la nordo de Hispanio, eble venas al vi kelkaj duboj.
Unue, povas rezulti stranga tiu ideo ke la laboristoj kaj siaj sindikatoj devas batali, por defendi la landan industrion, kontraŭ la propra landa registaro. Mi komprenas ke povas ŝajni ne-kredebla tio ke la socialista registaro de Hispanio ellaboras kaj entreprenas planojn kiuj havas kiel lasta celo la findetruadon de la hispana industrio. Sed tamen tia estas la realaĵo. Tiajn strangaĵojn generas la kapitalista ekonomio. Mi intencos ekspliki kiamaniere oni alvenas al tia situacio.
Unue mi devas klarigi ke nia "socialista" registaro estas socialista nur laŭnome, t. e. ĝi estas nur iu ajn inter la multenombraj burĝaj politikaj fortoj dediĉitaj al la konservado de la kapitalismo kaj la imperiismo tiaj kiaj ĉi-tiuj estas nuntempe. Tiu registaro, samkiel la antaŭaj burĝaj regantoj de Hispanio, kunkulpe kun la usona imperiismo kontribuis al la sieĝo kontraŭ la socialista bloko kiam ĉi-tiu ekzistis. La enkonduko de mia lando en la militista bloko NATO estis hontiga historio en kiu decide partoprenis la gvidantaro de tiu "Socialista" Partio nun reganta en Hispanio.
Nu, en ties enviciĝo kun la ekspluatantaj fortoj de la mondo, la politikaj aŭtoritatoj de Hispanio ĉiurimede klopodas ke en la lando okazu neniu ŝanĝo en la senco de la transformigo de la socio por antaŭeniri al la Socialismo kaj la Komunismo. Ili submetiĝis/as al la disponoj de la altaj sferoj de la kapitalisma sistemo. Kaj ĝuste tiu kapitalista sistemo havas tiun karakteron de la strukturiĝo. La socio, mondskale kaj landskale, tre estas strukturita laŭ klasisma vidpunkto. Estas riĉaj landoj kaj malriĉaj landoj en la mondo. Krome ene de ĉiu lando estas riĉaj kaj malriĉaj regionoj, kaj ĉefe estas riĉaj klasoj kaj malriĉaj sociaj klasoj. La klopodoj de la malriĉuloj por ŝanĝigi tiun situacion, kontraŭstarante la klopodojn de la riĉuloj por konservi la nunan staton de la sistemo, konstituas la tiel nomatan "klasbatalo". Sed ene de la riĉaj klasoj, samkiel ene de la malriĉaj, estas multaj tavoloj, ŝtupoj, gradoj... ofte la rilatoj inter la diversaj tavoloj, eĉ se proksimaj, estas konfliktaj, kontraŭdiraj. Ankaŭ tio ĉi estas klasbatalo. La formoj de

klasbatalo estas diversaj, kaj tre malsimilas en unuj kaj aliaj kazoj. La hispana civilmilito (jaroj 1936 al 1939), ja, estis klasbatalo; sed estas klasbatalo ankaŭ nura striko, la invado de Panamio fare de Usono antaŭ pluraj jaroj, la ŝtataj disponoj de iu lando malpermesante la enportadon de aŭtomobiloj produktitaj en alia lando, la diversaj pozicioj pri la formo alfronti la monŝuldojn de la landoj de la Tria Mondo, la imperiisma apogo al la Pinoĉet-puĉo kontraŭ la regado de S.Allende, la formiĝo de la bloko NATO kaj la memdefenda reago de la socialistaj landoj konstituante la "Varsovian Kontrakton", la Franca Revolucio, la Rusa Revolucio, ĉiuj revolucioj, la lasttempa kontraŭrevolucio gvidita de fiuloj kiel Leĉ Valesa, Vacklav Havel, k.s., ĉiuj kontraŭrevolucioj, la palestina "Intifado", ankaŭ iamaniere la nuna araba integrismo, la bombardado de Irakio fare de Usono nome de la UNO... ĉio-ĉi kaj multe alia estas klasbatalo, diversaj kaj malsamaj formoj de klasbatalo kiuj celas: aŭ konservi la situacion favore al la riĉuloj, aŭ ŝanĝigi ĝin favore al la malriĉuloj.

Tiorilate, ankaŭ la Maastriĉt-interakordo de la landoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, estas difinita formo de klasbatalo, kiu celas: Unue) la plifortigon de Eŭropo por plibonigi ĉi-ties situacion en la monda kapitalisma strukturo rilate al aliaj ekonomiaj potencoj kiel Usono kaj Japanio. Due) la subtenadon de konkreta ekvilibro ene de la Eŭropa Komunumo. Samkiel ĉiu kapitalista socio, la Eŭropa Komunumo estas strukturita laŭ klasoj kaj tavoloj ene de ĉiu lando, kaj ankaŭ riĉaj kaj ekonomie potencaj landoj kontraŭ malriĉaj, subevoluintaj landoj. Hispanio troviĝas inter ĉi-lastaj. Germanio, ekzemple, troviĝas inter la riĉegaj landoj de Eŭropo; ĝi estas sendube la plej potenca de industria kaj ekonomia vidpunkto. Sed ene de ĉiu lando estas ankaŭ riĉaj regionoj kontraŭ malriĉaj regionoj. Estas konate ke en Germanio, la orienta, laste enkondukita parto de la lando, estas pli malriĉa ol la okcidenta, kaj krome ĝi estas destinita resti tiel dumlonge. Ankaŭ en Hispanio estas diferenco inter la regionoj. Tia, do, estas la esenco de la kapitalismo. La esenco de la Socialismo estas, ĝuste, la malpliigo de ĉiu diferenco inter la landoj, la regionoj kaj la homoj, ĝis atingi la plenan egalecon, kiu estos la Komunismo.

Nu, la subtenado de la nunaj diferencoj en Eŭropo postulas ke la industrio koncentriĝu en konkretaj zonoj de Eŭropo, la agrokulturo potenciiĝu en aliaj konkretaj zonoj de nia kontinento. Al iuj eŭropaj landoj oni asignis la rolon esti industriaj landoj; al aliaj oni asignis la rolon de agrokulturaj. Al Hispanio estis asignita nek la rolon de "industria" nek tiun de "agrokultura" lando. Ĝi devas esti, laŭ disponoj de la supraj instancoj de la Eŭropa Ekonomia Merkato, lando de "servoj", t. e. turisma lando. Do oni postulas al ni rezignon pri nutraĵo-industrio: la lakto, butero, fromaĝo, biero kaj aliaj nutraĵoj venos el Francio, Nederlando... Ni devas detrui nian landan industrion: la industriaj produktaĵoj venos el Germanio, Britio... Ni devos fariĝi lando de turismaj servoj. Nia sola industrio estos hotela, kaj la hispana loĝantaro devos dediĉiĝi al roloj de turismo-servistoj: hotelistoj, kelneroj, taksiistoj, artist(in)oj, lavist(in)oj, purigist(in)oj, prostitut(in)oj, ciceronoj, ŝoforoj, ŝuo-purigistoj, tradukist(in)oj, telefonist(in)oj... t. e. la rolo asignita fare de usono al la Kubo antaŭ la revolucio de Fidel Kastro. Kaj nia nuna registaro, simile al la tiama Kuba regantaro de F.Batista, estas fidela al la disponoj de la mastroj de la kapitalista sistemo kiuj volas subteni tiun maljustan sociordon, per kiu grandparto el la monda loĝantaro estas ekspluatata favore al la interesoj de la malgranda klaso de la ekspluatantoj de la mondo.

La landaj regantaroj tre ofte estas la plenumantoj de ordonoj venitaj de supre. La procezo de la Perestrojko en via lando kaj ties fiaj sekvoj estis fidele plenumitaj de la lakeoj regantaj Sovetunion subgvide de Gorvaĉov. La malsukceso de la socialistaj strukturoj estis konvene planita kaj realigita de interne fare de fortoj kiuj havis la povon kaj la eblecon tion fari. Tiuj fortoj daŭras aŭdace domaĝante vian popolon, kaj ĝis nun oni ne vidis konvenan reagon fare de tiu trompita popolo, al kiu vi apartenas. En viaj skribaĵoj mi ne perceptas sufiĉe da abomeno kontraŭ la gansteroj nun subpremantaj kaj ekspluatantaj vian landon. Kio devas okazi en Rusujo por ke malfermiĝu viaj okuloj? Per viaj leteroj vi daŭre dediĉas pli da atento kaj peno por kondamni la iaman komunistan reĝimon ol por pritaksi la nunan realaĵon kaj prijuĝi la nunajn eksterleĝajn regantojn. Verdire, vi eraris en la elektado de malamiko. Vi devas serĉi viajn malamikojn inter la malamikoj de via popolo.

En mia raporto, antaŭe transskribita, pri la manifestacio de la ferindustriistoj antaŭ la

Ministrejo en Madrido estas alia fakto kiu povas esti konfuziga. Povas ŝajni ke la hispanaj laboristoj estas tre batalemaj kontraŭ niaj klasaj malamikoj. Verdire la realaĵo ne estas tia. Mi devas klarigi ke, bedaŭrinde, plejparto el la hispana laboristaro kaj la hispana loĝantaro ne estas sufiĉe organizitaj por dece roli en la klasbatalo kontraŭ tiom potencaj fortoj kiuj kontraŭstaras niajn interesojn. La batalo de la 30-a de julio-1992 en Madrido estis ebla nur pro tio ke la ferindustriistaj laboristoj de la nordo de Hispanio estas bone organizitaj; ni havas fortajn sindikatojn. Tio ne okazas, ĝenerale, al la cetero de la hispana laboristaro. Tre gravas la fakto ke ni laboras en grandaj fabrikoj kiuj posedas multajn milojn da gelaboristoj. La plaj granda parto el la hispanaj gelaboristoj laboras en malgrandaj entreprenoj, kun malgranda nombro da laborantoj. Tio ĉi malfaciligas ĉiun sindikatan organizan laboron.

Evidentiĝas ke nun pli kaj pli disvastiĝas iu specifa maniero je fabrikado po-partoj, kiu furoras en la kapitalisma merkato de antaŭ malmultaj jaroj. Ŝajnas ke de nun, la grandaj industriaj instalaĵoj, kiel la fabriko kie mi laboradas, ne longe pludaŭros. La novaj entreprenoj kreataj en la nuntempo estas malgrandaj uzinoj specialigitaj en nur unu simpla operacio de la produktadprocezo de ĉiu ajn kunmetita meĥanismo. Ekzemple, por konstrui televid-aparatojn, iu brita entrepreno fabrikadas en Britio nur unu, esencan, parton de la aparato. Poste, perŝipe oni portas amason da tiuj eroj al la uzinoj, kiujn tiu entrepreno havas en la Azia marbordo de la Pacifika Oceano: Hong-Kong, Taiwan, Indonezio... En ĉiu el tiuj uzinoj oni aldonas kroman eron al la televidaparato kiu tiel konstruiĝas. En ĉiu el tiuj uzinoj laboras malmultaj laboristoj, dediĉitaj al nur unu simpla operacio de la procezo de muntado de la televidaparato. Tiuj laboristoj gajnas tre malmulte da mono ĉar la salajroj estas malaltaj en tiuj landoj. La ŝipoj portadas de unu uzino al alia, tra la Pacifik-Oceano, la televid-aparatojn kiuj eliras el ĉiu uzino pli kompletigitaj ol ili eniris en ĝi. Fine, en la lasta uzino la televidaparatoj estas finmuntataj kaj pakataj, kaj la samaj ŝipoj portas ilin al Eŭropo por ties vendado en la tieaj konsum-merkatoj.

Multaj aliaj maŝinoj kaj aparatoj havas produktad-procezon similan el ĉi-tiu kiun mi priskribis de la televidaparatoj de la brita entrepreno AMSTRAD. Kaj ŝajnas ke de nun oni enkondukas en tiaspeca produktado ankaŭ aliajn terzonojn, kiuj ĝis nun havis neniun partoprenon en la industria disvolviĝo: Afriko kaj aliaj teritorioj de la Tria Mondo aŭ malevoluinta Sudo, sed preskaŭ ĉiam, prefere, marbordaj, t.e. apudmaraj zonoj. Eble tiu sistemo ŝajnas ne-racia. Nun mi intencos montri ke ĝi estas tute racia, sed racia de ekonomia vidpunkto, de vidpunkto de la egoisma intereso de la sociaj klas-tavoloj kiuj kontrolas la mondan kapitalon, ne de vidpunkto de la ĝeneralaj interesoj de la homaro.

Unue) Al la kapitalo-posedantaj klasoj interesas anstataŭigi la grandajn fabrikojn per malgrandaj uzinoj. La granda usona entrepreno de fabrikado de komputilegoj, IBM, havis multajn dekojn de miloj da gelaboristoj (multaj el ili perdis sian laborpostenon lasttempe), tamen tiu entrepreno ne kunigas multajn laboristojn en unu sama laborcentro. La personaro de tiu entrepreno estas disigita en centoj da malgrandaj uzinoj, magazenoj kaj oficejoj tre distance unuj de la aliaj. Sama politiko sekvas aliaj grandaj entreprenoj. La mastroj de la kapitalismo venis al la konkludo ke en la grandaj fabrikoj, en la dense loĝitaj industriaj centroj, formiĝas iuj kondiĉoj tre malfavoraj por la kapitalista sistemo (tia estis la kazo de Petrogrado en 1917). Tiuj lokoj estas la agadkampo de sindikatistoj kaj de aliaj malbenitaj uloj, kiel mi, kies ĉefa tasko kaj inklino estas batali kontraŭ la kapitalisma sistemo celante ĝian detruadon. La kapitalistoj volas krei produktigajn fortojn, ne transformigajn fortojn.

Ekzemple, en la ĝeneralaj strikoj okazintaj en Hispanio dum la lastaj jaroj, la strikado estis, fakte, totala en zonoj kiel Asturio, kun densa koncentriĝo de industriaj centroj kaj grandaj fabrikoj. En lokoj kie la produktado estas aranĝita alimaniere, la sindikatista aktivado pli estas malfacila kaj sterila.

Due) Estas interesa por la monopolista transnacia kapitalo malpliigi la operaciojn de la produktado-procezoen la alte industriigitaj landoj kaj transigi ilin al la malevoluintaj zonoj. Tiamaniere la monda kapitalo (kiu estas transnacia kaj ne havas patrujon) batalas kontraŭ la postulemo de salajro-plialtigo de la laboristoj de la industriaj landoj, kaj eltiras profiton de la malaltaj salajroj kaj vivnivelo de la malevoluintaj landoj. Alie, la registaroj de tiuj malriĉaj landoj

havigas al la grandaj transnaciaj entreprenoj senpagajn terenojn por la konstruado de la uzinoj, kaj aliaj avantaĝojn (pri impostoj k. a.) cele de atingi iomgradan industriiĝon kaj tiamaniere sin liberigi iome de la servuteco de la agrokultura produktado.
Trie) Al la entreprenistoj de la kapitalisma sistemo interesas la po-parta produktado ĉar tiamaniere oni simpligas la elspezojn por lernigo de la gelaboristoj. Ĉiu laborist(in)o devos lerni nur la efektivigadon de simpla operacio kiu ne postulas grandan tempon je instruado; tiuj laboristoj estus facile anstataŭeblaj. Krome, tiuj distance disigitaj uzinoj ne troviĝas sub risko de naciigado fare de la ŝtatoj kie ili troviĝas. Se okazus iu el tiaj alpropriiĝoj, la transnacia entrepreno facile povus rekonstrui la produktadon-ĉenon starigante similan uzinon en alia lando. Tamen al la lando kiu efektivigis la alpropriiĝon tute ne utilos la alpropriigitan materialon, ĉar ĝi estas nur ero de granda ĉeno, senvalora prenita izolite kaj senkonekse kun la ceteraj eroj de la entrepreno.
Per tiaj disponoj la kapitalistaj instancoj sukcesas movigi dumlonge la produktigajn fortojn. La homoj submetitaj al tiu produktad-aparato laboras multe kaj ricevas malmulte. La mastroj kaj ĝuantoj de tiu sistemo ricevadas multe kaj faras ĉion eblan por ke ne okazu en la mondo alia Petrogrado-1917. Ili, jes ja, lernis la historion kaj eltiris instruon el la historia sperto. Ĉu dume la popoloj restos blindaj kaj plu kondutos laŭ la interesoj de la ekspluatantoj?

la 6-a de decembro - 1993

Kara kamarado,
Per iu el miaj antaŭaj leteroj mi promesis al vi ke iam mi rakontos al vi pri la problemaro de la ferindustria fabriko kie mi laboras, kiu estas sub danĝero de bankroto kadre de la ega ekonomia krizo en kiu dronas nia socio. Cele de informi al vi pri la disvolviĝo de tiu krizo kaj kiel ĝi efikas sur la ferindustrio de mia lando, mi transkribos ĉi-sube kelkajn tekstojn miajn verkitaj en oktobro de la pasinta jaro 1992.

(la 1-a de oktobro)
Dum la pasinta somero mi feriis dum kelkaj semajnoj kaj tiam mi ripozis kun mia familio en nia bieno. Dum unu semajno mi estis en Madrido, la hispana ĉefurbo, partoprenante teorian kurseton de la Hispana Komunista Partio. Pluevoluis la situacio de la ferindustria fabriko kie mi laboras. Ne estis antaŭenigita la ĝenerala balotado en mia lando. La registaro pludaŭrigis siajn planojn por la detruado de la ŝtalo-industrio. Estis formale prezentita la dispono de la aŭtoritatoj por mapligrandigo de la produktad-kapablo de niaj fabrikoj, kaj dekmilo da gelaboristoj estos eksigitaj el siaj laborlokoj; el ili, sep-mil apartenas al la entrepreno ENSIDESA kie mi laboras. Ŝajnas ke mi ne estos inter la novaj senlaboruloj, ĉar laŭ la plano de la entreprenistaro estos eksigitaj la plej maljunaj, kaj mi, pro mia aĝo, ne troviĝas inter la sepmil pli maljunaj de la fabriko. Tio povas alporti al mi trankvilecon dum kromaj kvar aŭ kvin jaroj, sed pasinte tiu periodo senduble la problemo prezentiĝos denove kaj tiam mi nepre fariĝos senlaborulo. Kaj tiam sendube la kondiĉoj por la elpelitoj el la laborejo estos pli malmolaj ol nuntempe, t. e. la monkompenso por tiuj kiuj perdas sian laborlokon senĉese malpligrandiĝas en mia lando laŭ la tempo-pasado. Tiuj kiuj fariĝis senlaboruloj en mia fabriko antaŭ kelkaj jaroj ricevis pli altan monkompenson ol tiuj kiuj estas eksigataj nuntempe. Kaj kiam tiu malfeliĉo venos al mi, post kelkaj jaroj, eble estos por ni neniun monkompenson. Tio estas jam okazanta al multaj personoj en mia lando pro tio ke pli kaj pli kreskas la nombra da senlaboruloj kiuj devas ricevi tiujn subvenciojn dum malpligrandiĝas la nombro da laboristoj el kiuj oni povas elpreni, imposto-forme, la koncernan monon.
Sed revenante al la nuna restrukturado de ENSIDESA, ni nun plu devas batali kontraŭ la aplikado de la nuna plano. Do, plu estas kaj estos novaj strikoj, manifestacioj kaj mobilizado de la laboristoj de ĉi-tiuj fabrikoj. Ne estas necesa ke mi tro ekspliku la gravecon de tiuj disponoj por mia Asturia regiono. Krom la 7000 novaj senlaboruloj el ENSIDESA kaj ties entrepreno-filioj, estas la fakto ke la ŝtalo-produktado de ĉiuj ferindustriaj fabrikoj de Hispanio estos draste malpliigita. Tio okazigos en la industriaj regionoj (Eŭzkadio kaj Asturio) krizon en multaj aliaj entreprenoj kies labor-celo estas servi la grandan

ferindustrion, t.e. entreprenoj kaj uzinoj kiuj rekte/nerekte dependas de la funkciado de la grandaj ŝtalo-farejoj. Oni povas diri ke po ĉiu nova senlaborulo de ENSIDESA rezultos tri aŭ kvar novaj senlaboruloj en aliaj dependantaj uzinoj kaj vendejoj. Tio estas katastrofo por regiono kiel Asturio, kie alia grava labor-sektoro kiel la karbo-minejoj spertas similan krizon kaj estas nuntempe malpligrandigante la nombron de siaj laboristoj. Al tio oni devas aldoni ke rezulte de la enkondukiĝo de Hispanio en la Eŭropa Ekonomia Merkato, la agrokulturo kaj bestbredado de Asturio rezultis tre domaĝita. La asturaj kamparanoj devis/as disvendiu aŭ mortigi siajn bovinojn tial ke ili ne povas konkuri en la lakto-vendado kontraŭ la fortaj lakto-entreprenoj de Francio, Nederlando...

Tiel malfeliĉege prezentiĝas nun la situacio por mia regiono. Ni vidos kiel disvolviĝos ĉio-ĉi.

(la 5-a de oktobro - 1992)

Baldaŭ finiĝos en Hispanio la celebrado de la festoj de ĉi-tiu jubilea jaro 1992, t.e. la Kvina jarcento de la malkovro de la Amerika kontinento.

Dum tiu ĉi jaro mia lando tre malŝpare elspezis tro da mono por festi la 500-jaran jubileon de la fama vojaĝo de la fama Kristoforo Kolombo. Estas sciate ke inter la festeroj estis la Internacia Fojro de Seviljo kaj la Olimpiaj Sporto-Ludoj de Barcelono. Dum ĉi-lastaj monatoj Hispanio vivis tro preter sia reala ekonomia kapablo. La luksego de tiuj spektakloj prezentis pri mia lando bildon de riĉeco, kaj tamen tiu bildo ne alĝustiĝas al la realo. Hispanio estas malriĉa lando. Ekonomie ni troviĝas en la periferio de la sistemo, t.e. preskaŭ en la linio apud la malevoluintaj landoj de la Tria Mondo. Por subvencii la egajn elspezojn de la ĉi-jara celebrado oni anoncis, far de la registaro, enorman plialtiĝon de la impostoj, kio pli komplikigos nian malfacilan situacion.

La situacio en la fabriko kie mi laboras daŭre estas konflikta. Daŭre la registaro antaŭenpuŝas siajn planojn por la parta likvido de la ferindustrio. En la entrepreno kie mi laboras perdos sian laborpostenon 6.300 gelaboristoj kaj kromaj 700 en la malgrandaj filio-uzinoj de tiu entrepreno. Kaj daŭras la rezistado de la laboristoj kontraŭ tiuj planoj. Estas kaj estos pliaj striko-tagoj. Post malmultaj tagoj, la 9-a ĉi-monate, denove strikos ni, kaj tiutage eliros el mia regiono piedmarŝadon de kelkcento da laboristoj destine al Madrido. Tiu marŝado daŭros 18 tagojn; ili trairos proksimume 30 kilometrojn ĉiutage. La ferindustriaj laboristoj de la regiono Eŭzkadio entreprenos dume similan marŝadon ekde ilia regiono por kuniĝi survoje kun la asturianoj. Per tiu marŝado oni intencas altiri la atenton de la tuta regiono kaj de la tuta lando pri tiu procezo de likvidado de la landa ŝtalo-industrio far de la registaro. Kiam ili alvenos al Madrido, oni organizos similan peraŭtobusan ekspedicion, kiel tiu okazinta la 30-a de Julio. Denove iros al Madrido amason da gelaboristoj el ambaŭ industriaj regionoj por manifestacii tie, antaŭ la Ministrejo pri Industrio, kune kun la marŝantoj. Eble ĉio-ĉi utilos nenion kaj efektiviĝos la planoj de la burĝaj monopolismaj sferoj de Eŭropo.

(el mia taglibro, de la 10-an de oktobro - 1992)

Hodiaŭ mi troviĝas kune kun mia familio en nia bieno. Ni pasigos ĉi-tie la longan semajnfinon. Venonta lundo estos festo-tago en mia lando, la ĉefa festo de ĉi-tiu jubilea jaro. La 12-a de oktobro oni festas la alvenon de Kristoforo Kolombo al Ameriko. Estos solenaj oficialaj ceremonioj en Hispanio.

Tamen mi emas festi nenion; estas granda malĝojo en mia koro. Nun estas pluvante; ankaŭ hieraŭ pluvis dum la tuta tago.



Hieraŭ, vendrede, denove estis striko en la fabrikoj de la entrepreno ENSIDESA kie mi



laboras. Sed ĉefe, hieraŭ estis la dato de la ekiro de la marŝado de la ferindustriaj laboristoj al Madrido, t. e. la perpieda marŝado. Kelkcento da bravuloj entreprenis tiun 500-kilometran marŝadon, kiu daŭros 18 tagojn. La hodiaŭaj ĵurnaloj publikigas fotojn de la marŝo-ekiro. Per ili oni povas vidi ke la marŝantoj survestas kontraŭpluvajn mantelojn. Mi ploras kaj hontas pro tio ke mi ne partoprenas en tiu marŝado. Mia devo estas stari kaj marŝi apud tiuj kuraĝaj kamaradoj, tamen mi ne kuraĝis entrepreni tiun longan piediradon. Ĝenerale mi aktive partoprenas en ĉiuj agoj de la sindikataj aktivuloj kontraŭ la disponoj de niaj klasaj malamikoj. Sed nun mi ne sentas min sufiĉe forta por tiu ago. Mi estas jam preskaŭ 50-jaraĝa, kaj ne kapablas piedmarŝi dum tiom da sinsekvaj tagoj. Eblus al mi trairi tiujn 30 kilomentroj po-tage dum du tagoj, aŭ tri... sed ne pli.

Jen tiu estas la kaŭzo de mia malĝojo... tiu, kaj ĉefe la kaŭzo mem kiu originis ĉi-ĉion, t.e. la ekonomia krizo, kiu signas la finon de epoko relative feliĉa por la laboristaj klasoj de la industriigitaj landoj.

Tiu mondo favora por la laboristoj, komencis perdiĝi okaze de la likvido de la socialista bloko, de la komunistaj reĝimoj de Orienta Eŭropo. Kelkaj ekonomiistoj kaj specialistoj pri sociologio komencas montri la rilaton ekzistintan inter nia Komfort-socio kaj la estinta socialista bloko. La gvidantaj centroj de la kapitalismo de Okcidento uzadis strategie la modelon de la konsum-socio de kelkaj landoj de okcidenta kaj centra Eŭropo por allogi la loĝantaron de la orienteŭropaj landoj igante ĝin pensi ke tiela estas la vivmaniero en la kapitalisma mondo. Estas evidenta ke en tiu propaganda operacio plene venkis niaj klasaj malamikoj, kaj nun la sekvoj de tiu grava alpaŝo daŭros dum kelkaj jardekoj, eble dum pli ol jarcento. Post ties venko en la "malvarma milito" la imperiisma kapitalismo restas fortega, ŝajne ne-venkebla...

(la 11-a de oktobro - 1992)

Daŭre mi estas kun mia familio en nia bieno. Pli ĝuste, troviĝas ĉi-tie mia korpo, kiu ne estas sufiĉe forta por piedmaŝi al Madrido. Sed mia animo kaj mia koro iras kun la bravuloj kiuj entreprenis tiun longan marŝadon. Hodiaŭ ili devos trairi 39-kilomentran distancon, kaj krome ili devos transiri la altan montĉenon kiu staras inter nia Asturia regiono kaj Kastilio-regiono. La malbona vetero de ĉi-tagoj estas kroma peno en ilia irado. En

tiu Kantabra montaro ili devos suferi malvarman temperaturon kaj venton, eble ankaŭ neĝon kaj hajlon en iuj lokoj... Feliĉe ili estas atingante ilian celon en kio koncernas al la propagando, al la publika diskonigo de nia problemaro. La informiloj tre raportas pri ili; ankaŭ la televido iome dissendas bildojn de tiu marŝado... la ĵurnaloj nomis ĝin "la fera marŝo". Espereble tiu ago utilos por atentigi la landan loĝantaron pri la fakto ke nia perfida regantaro ne hezitas detrui la landan ŝtalo-industrion.

Tiu registaro, kvankam "socialista" laŭnome, fakte ĝi estas iu el la multaj politikaj subtenantoj de la kapitalista sistemo, de la povo ekonomia de la burĝa klaso, same ol la centraj kaj dekstraj partioj. La burĝa kapitalistaro estas bone servata de ĉiuj ĉi lakeoj de la sistemo. En Hispanio, samkiel en multaj aliaj landoj, la socialistoj aŭ socialdemokratoj plej ofte estas servantoj kaj lakeoj de la superreganta burĝaro. La politikaj fortoj ekstere de la sistemo, aŭ pli ĝuste kontraŭ la sistemo, komencas en la komunistaj fortoj. Tial estas tiom granda malamo kaj atakoj kontraŭ la komunistoj fare de ĉiuj ideologiaj instrumentoj de la sistemo. Oni malamas nin kaj oni persekutas nin tial ke ni volas detrui ĉi-tiun aĉan kaj malbenindan sistemon, kaj konstrui novan homan socion, sen ekspluatantoj nek ekspluatatoj. La ideologiaj instrumentoj de niaj klasaj malamikoj estas tre potencaj, kaj ili atingas grandan influon sur la menso de multaj milionoj da homoj. Ankaŭ multaj gelaboristoj, multaj gepopolanoj de la malriĉaj, ne-posedantaj klasoj de ĉi-tiu socio, estis mense influita de la propagando, de la ideologia superstrukturo de la ŝtata aparato de la burĝa sistemo. Tio eksplikas ke, fakte, ekde antaŭ proksimume duonjarcento, tiuj klasoj bone instaliĝis en la vivmaniero de ĉi tiu artefarita sistemo. Ĉar ĝi estis artefaritaĵo, ne-natura socio bazita sur realaj eblecoj, ĝi finiĝas kiam elĉerpiĝas la kondiĉoj kiuj generis ilin, la specialaj kondiĉoj de la "malvarma milito".

La kapitalistaj superregantaj klasoj, ĉiurimede klopodas eviti ke la revolucio venku en la potencaj industriaj landoj de Eŭropo aŭ en Usono, ĉar tia revolucia venko en la centroj de la alte industria mondo estus ne-renversigebla, definitiva, totala, absoluta. Sed la plenumendaj revoluciaj taskoj, nun devas esti alprenitaj en tre malfavora situacio, sen la ekzistado kaj la helpo de la iama Sovetio kaj la iama Socialista bloko. Do ni devos batali por nia liberiga celo kiam ĉiuj elementoj kontraŭstaras niajn interesojn.

(la 12-a de oktobro - 1992)

Hodiaŭ estas la ĉefa festotago de la celebrado en Hispanio de la malkovrado de Ameriko. La 12-a de oktobro de 1492, la hispanaj maristoj komanditaj de Kristoforo Kolombo, post kelksemajna navigado ŭesten tra la Atlantika oceano, alvenis al insularo en la Antilia maro. Tio estis la komenciĝo de la esplorado, konkerado kaj koloniigado de kontinento pri kiu antaŭe oni sciis nenion en Eŭropo. Sendube tiu vojaĝo kaj la sekvaj esploroj estus granda kaj laŭdinda heroaĵo se ĝi ne estus konstituinta grandan katastrofon por la enloĝantoj de tiu kontinento. Jam ekde tre frue post ties alveno al tiu tero, la hispanaj koloniigantoj komencis sklavigi, eksproprii kaj ekstermi la indianan loĝantaron. Multaj triboj estis komplete ekstermitaj. Al ĉiuj indianoj oni forrabis la teron, kaj oni detruis la tradiciajn kulturojn de multaj el ili. La sekvoj de tiom kolosa rabado kaj subpremado daŭras ankoraŭ en nia epoko. En Brazilo kaj en aliaj lokoj de Sud-Ameriko oni detruas, por fari ŝoseojn kaj por profiti la lignon, la arbarojn kiuj konstituas la vivrimedojn de multaj indianoj. La popolanoj -ĉu indianoj aŭ ne- de tiuj Iberi-Amerikaj landoj troviĝas en stato de malriĉeco kaj malklereco, inter la grandamaso da malsatantoj de la Tria Mondo.

Tiom da mizero en tiu kontinento kaj en aliaj mondpartoj, estas trafa respegulo de la esenco kaj realaĵo de la kapitalisma sistemo, de la naturo de la imperiismo. Malsato, ruino kaj mizero en iuj lokoj por ke ekzistu riĉeco, abundeco kaj komforto en aliaj lokoj. Ofte la presaro emfazas pri la fakto ke en la landoj de la iama Socialista bloko estis malalta vivnivelo por la popolo. Nu, hodiaŭ, post la likvido de la tieaj komunistaj reĝimoj, la afero ne pliboniĝis

tie, sed tute male, kaj krome daŭre malpliboniĝas la laborista vivnivelo en la landoj de Okcidento.

La problemoj de la hispana karbo-industrio kaj de la ferindustrio estas klara ekzemplo de tiu malboniĝo de la kondiĉoj de la laboristaro de ĉi-tiuj eŭropaj landoj. Hieraŭ la astura kolono de la fera marŝo alvenis al la mont-pinto "Pajares", limo inter la regionoj Asturio kaj Kastilio. Feliĉe iome pliboniĝis la vetero.

(El mia letero al mia israela korespondamikino, de la 14-a de oktobro - 1992)

Dum la antaŭaj du tagoj daŭris la fera marŝo de la eŭzkadiaj kaj asturaj ŝtalo-industriaj laboristoj, aŭ pli ĝuste, de kelkcento el ĉiu fabriko. La astura kolono de tiu marŝo alvenis hieraŭ al la grava urbo Leono. Dum ilia vojirado ili kolektis esprimojn de simpatio kaj pruvojn de solidareco de la urbetoj kaj vilaĝojn kiujn ili trairis. Ankaŭ en Leou-urbo oni ricevis ilin afable kaj solidarece. La Leona urbestro donacis al ili kvar milionoj da pesetojn (kvar dek mil Us-dolarojn) por kontribui al la elspezoj de la marŝo. Tiu malavara helpo ege surprizis ĉiujn, ĉar eĉ ne la asturaj urbestraroj faris tiomajn helpo-kontribuaĵojn.

Sur la fotajoj publikigitaj hodiaŭ de la ĵurnaloj, oni povas vidi la asturajn marŝantojn je ilia alveno al Leono-urbo. Malantaŭ ili estas granda konstruaĵo. Ĝi



estas la Monaĥejo de Sankta Marko, konstruita en la dek-kvina jarcento. Tiu granda domo ne ĉiam estis monaĥejo; en kelkaj epokoj ĝi estis uzita kiel malliberejo. En la dek-sepa jarcento estis enkarcerigita tie dum kelkaj jaroj la fama verkisto Francisko-Kevedo. Ankaŭ ĉi-jarcente ĝi dum kelkaj jaroj estis uzita kiel prizono. Dum la hispana civilmilito (jaroj 1936 al 1939) ĝi estis koncentrejo por la ruĝuloj kaptitaj de la faŝista armeo. Mia patro estis dum iom da tempo en tiu koncentrejo kune kun kelkcento da asturaj ruĝuloj militkaptitoj, inter ili estis unu frato lia, kiu grave malsaniĝis en tiu loko, kaj poste mortis. Nuntempe tiu konstruaĵo estas uzata kiel luksega turisma hotelo kaj kiel muzeo de antikvaĵoj de la romia epoko.

Revenante al la fera marŝo, mi diru ke pluraj marŝantoj devis interrompi sian iradon ĉar ili malsaniĝis je pulmonito aŭ aliaj doloroj. Tamen plejparto el ili plenanime daŭrigas sian penan iradon. La afero estas bone kaj amplekse diskonigata en la lando fare de la presaro kaj aliaj informiloj. Tiusence ilia peno ne estas senutila, sed en alia senco ĝi, ja, estos tute senutila ĉar la ministro pri Industrio anoncis ke li ne ricevos la marŝantojn je ilia alveno al Madrido; li eĉ ne troviĝos en la hispana ĉefurbo la 26-a ĉi-monate kiam la fera marŝo alvenos tien.

Tiu ministro, fakte la tuta registaro, defendas siajn poziciojn, sian planon por la iompostioma likvidado de la hispana industrio. Ili estas fidelaj servantoj, ne de ilia popolo, sed al la veraj mastroj de Eŭropo: la germana monopolisma kapitalist-aro. Hodiaŭ oni povas interpreti la disvolviĝon de la situacio en la mondo, post la bankroto de la Socialista sistemo, kiel la definitiva venko, ne de la kapitalismo ĝenerale, sed la venkitoj de la Dua Mond-Milito: Germanio kaj Japanio. La tiel nomata "Malvarma Milito", estis kvazaŭ Tria Mond-Milito. Tiu malvarma milito ne okazigis milionojn da mortintoj, kiel la antaŭaj mond-militoj, sed ĝi, jes ja, okazigis grandajn mon-elspezojn al la du grandaj batalantoj: Usono kaj Sovetio. Sovetunio ne kapablis elteni la enorman elspezadon necesan por subteni tiun konkuradon. Tiu potenco ruiniĝis intencante konkuri kun la riĉa potenco de la imperiisma Usono kiu elsuĉadis ĉiujn popolojn el la mondo. Tamen ankaŭ la usona potenco rezultis domaĝita de la ega elspezado postulita de

la vet-armado de la Malvarma Milito. La ekonomiaj malfacilaĵoj estas enormaj ankaŭ en Usono; ege kreskas la senlaboreco kaj la mizero en tiu granda lando, kaj kvankam tiu potenco daŭre estas la ĉefa kaj plej potenca de militista vidpunkto, kiel estis atestita dum la lasta milito kontraŭ Irakio, de ekonomia vidpunkto Usono restas en tre malfavora situacio rilate al Japanio kaj al Germanio.

La re-elstariĝo de Germanio perceptiĝas ankaŭ en aliaj terenoj. Tiu potenco fariĝas la ĉefrolanta ene de la ensemblo de la Eŭropaj landoj kiuj celas ilian unuiĝon. La Eŭropa unuiĝo estas bona kaj dezirinda afero, sed la unuiĝo laŭ germanaj planoj, kiel estis konkretigitaj en Mastricht, estas bona kaj favora nur por Germanio. Tiu ĉi potenco ankaŭ aktive partoprenas en la politika tereno de nia kontinento. La situacio de civilmilito en Jugoslavio tre estas rezulto de la intrigoj de la germana diplomatio. Germanio dekomence stimulis kaj helpis la disiĝon de la kroatoj kaj aliaj etnioj de la multnacia jugoslava ŝtato. Ankaŭ multaj el la konvulsioj kaj alfrontiĝoj inter la respublikoj de eks-Sovetio estas rezulto de germana enmiksiĝo. Alie, la germana agado en la financa tereno okazigis lasttempe konvulsioj en la mono-merkatoj de Eŭropo. La hispana valuto (peseto) estis senvalorigita. Ankaŭ la liroj de Italio kaj Britio suferis domaĝon, en la Eŭropa Mon-Fonduso, rilate al la germana marko. Ni eniras en jarcenton en kiu tiu potenco, kaj ankaŭ Japanio, ludos gravan kaj danĝeran rolon. Jen tiu estas alia nedezirinda rezulto de la malapero de la Socialisma sistemo.

Nu, tiu germana potenco trudas al la hispanaj regantoj la detruadon de granda parto de nia landa industrio kaj agrokulturo. Hispanio devos ludi duarangan aŭ triarangan rolon ene de la nova Eŭropo desegnita kaj planita de la germanoj. Hispanio devos resti, laŭ tiuj planoj, kiel lando koloniigita.

(El mia letero al bulgara korespondantino, de la 15-a de oktobro - 1992

La hodiaŭaj ĵurnaloj publikigas du gravajn informojn, kiuj tre surprizis min, kaj ĝenerale ĉiujn laboristojn, kaj alportis al ni pliajn kialojn por zorgiĝo kaj maltrankvilo.

La unua el tiuj informoj estas tio ke la brita registaro decidis la fermon de 31 karbo-minejoj de ties lando. Multaj miloj da britaj karbo-ministoj perdos sian laborlokon. Mi jam sciis ke la karbo-industrio troviĝis en malbona situacio en tuta Eŭropo, sed mi ne pensis ke la afero tiom estis grava. Tiu temo sufiĉe koncernas ankaŭ al ni, al la asturianoj, ĉar mia Asturia regiono iomgrade dependas ankaŭ de la karbo-minejoj. Ankaŭ ĉe ni estas krizo en tiu laborsektoro. Ĉi-jare oni decidis la fermon de kelkaj karbo-minejoj en mia regiono, kaj rezulte de tio fariĝas senlaboruloj 6.000 asturaj karbo-ministoj. Nun mi timas ke la restrukturado de la karbo-industrio ne finiĝos tiele, kaj venos pliaj malfacilaĵoj, ĉefe se malpliiĝos la produktado (kaj sekve la karbo-konsumado) de la ferindustriaj fabrikoj.

Precize la dua informo de la hodiaŭaj ĵurnaloj temas pri tiu ferindustrio. Tio koncernas al mi pli rekte. Rezultas ke nun la Eŭropa korporacio de la ferindustrio postulas al la hispanaj aŭtoritatoj ke oni pliampleksigu la likvidadon de la ferindustriaj fabrikoj de ĉi-tiu lando. Mi ne scias ĉu vi bone komprenas tion: kiam ni, la laboristoj de tiuj fabrikoj, estas batalantaj kaj organizis la feran marŝon por defendi nian landan ŝtalo-industrion kontraŭ la plano de la registaro, la eŭropa ŝtalo-korporacio deklaras ke tiu plano de la hispana regantaro estas ne-sufiĉa por iliaj pretendoj, ke oni devas pliintensigi ties efikon, ke oni devas ankoraŭ malpliigi nian fero-produktadon, kaj ke oni devas forpeli el la fabrikoj pli da laboristoj ol la kalkulitaj en tiu plano. Laŭ la novaj disponoj de la Eŭropaj aŭtoritatoj, oni devas eksigi el la ŝtalo-fabrikoj de tuta Eŭropo kromajn 50.000 laboristojn dum la sekvaj tri jaroj. Grandparto el tiuj novaj senlaboruloj estos hispanaj, kaj, kompreneble, multaj el ili estos el Asturio. Do, neeviteble, rezulte de tiu nova hakil-frapo, falos mia laborposteno. Ni pensis ke la fabriko kie mi laboras ne daŭros plu post ok aŭ dek jaroj (kaj tia estis la opinio de gravaj ekonomiistoj de ĉi-tiu lando), sed la novaj postuloj de la koncernaj

instancoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, igas nin pensi ke la vivo de tiu ferindustria entrepreno estos eĉ pli mallonga. Rapide la Asturia socio ek-konscias pri la mort-puno kiu pendas sur nia regiono. Cele de pli konsciigi la popolon de ĉi-tiu regiono, la sindikataj organizaĵoj planas novajn mobilizojn. Morgaŭ mem estos striko en mia fabriko, ne dum la tuta tago sed nur dum kelkaj horoj, sed ni faros ankaŭ manifestacion aŭ ion similan.

Intencante interpreti la naturon kaj eblan evoluon de la nuna ekonomia krizo, mi venas al la konkludo ke, spite al la potenca pozicio de Germanio ene de la nuna Eŭropa kunteksto, la ekonomia krizo kiu nun frapas la tutan kapitalistan mondon (do fakte la tutan mondon) estas sendependa de kiu ajn potenco mastras la mondan ekonomion. Tiu-ĉi krizo same frapas ĉiujn kapitalistajn landojn -ankaŭ Usonon kaj Germanion- sed ene de la sistemo, la plej potencaj landoj, de ekonomia vidpunkto, troviĝas en pli favora pozicio por igi ke la kosto de la krizo estu pagita pli altgrade de la malfortaj landoj. Ĝuste tio okazas en nia kontinento. La grandaj transnaciaj monopolistaj korporacioj povas dikti siajn disponojn al la landaj registaroj, kaj tiuj disponoj zorgas ĉiam la interesojn de la superregantaj klasoj, ne la interesojn de la popoloj. De nun estos en la mondo malpli granda konsumado de ŝtalo kaj aliaj produktaĵoj. Do la transnaciaj korporacioj decidas, laŭ la forto-rilatoj ene de ili, kiu(j) entrepreno(j) rezultos favorigita(j), kaj kiu(j) lando(j) konservos sian industrion. Nuntempe, laŭ la nunaj ekonomiaj kondiĉoj, tiu gvida rolo apartenas en Eŭropo al la germanaj financaj sferoj. Tamen tio ne signifas ke tio nepre estas favora por la germana popolo kaj la germanaj laboristoj. Ĝenerale la kapitalo ne estas patriota. Se la intereso de la kapitalistoj postulas investi en fremda landaro, eĉ domaĝe de la laboristaro de la propra lando, la kapitalistoj ne hezitas tion fari. Fakte, grandparto el la produktado, de ŝtalo kaj de aliaj aĵoj, de nun fariĝos en malproksimaj landoj, en Azio kaj aliaj anguloj de la Tria Mondo. Tio generos grandan senlaborecon en la industriaj landoj kaj igos malaltiĝi la sociaj kaj salajraj postuloj de la laboristaro kaj de la sindikatoj. Dume en la malriĉaj landoj la venanta industrio ne alportos riĉecon ĉar tie la salajroj -kiam ili ekzistas- estas tre malaltaj. Do, daŭre estos domaĝitaj la gelaboristoj, tiel en Oriento kiel en Okcidento. Sed la kapitalistoj, la posedantaj klasoj de la mondo, pli riĉiĝos, kaj senĉese fariĝos pli grandaj la diferencoj inter la riĉularo kaj la malriĉularo de la mondo. Jen tia estas la nova internacia ordo alportita de tiuj, kiuj antaŭenpuŝis la grandajn ŝanĝojn de la lastaj jaroj en via lando kaj en la najbaraj landoj de Orienta Eŭropo.

(la 17-a de oktobro - 1992)

Dum niaj kamaradoj de la fera marŝo trairas la Kastilian altebenaĵon destine al Madrido, ni, la laboristoj kiuj restis ĉi-tie, ne estas senmovaj. Per nia mobilizado ni apogas la agon de la marŝantoj. Hieraŭ, vendredo, ĝuste unu semajno post la komenciĝo de la marŝo, ni strikis de la dektria ĝis la dekkvina horo. La strikantaj laboristoj de la gijona fabriko kunvenis en asembleo en la placo antaŭ la oficejoj de la fabriko. Tiam la direktoroj kaj cetera estraro de la fabriko estis forlasinte siajn oficejojn kaj elirinte el la fabriko por ne alfronti la laboristan mobilizadon. En la asembleo oni raportis pri la disvolviĝo de la marŝo al Madrido, kaj sekve oni pridiskutis eblajn agojn niaflanke por atentigi la Asturian socion pri la danĝero kiu pli kaj pli konkretiĝas por nia regiono.

Oni decidis ke la tie amasigitaj laboristoj eliru el la fabriko por blokigi, bari, la grandan ŝoseon inter Oviedo kaj Gijon. Tiu grava vojo pasas, precize, tra la proksimaĵoj de nia fabriko. Do, plurmilo da laboristoj adresiĝis al tiu granda ŝoseo. Je nia alveno al tiu loko komencis pafi fumo-bombojn kontraŭ ni de tie la policistoj starantaj en tiu loko. Ĉi-apude mi surgluas kopiaĵojn de kelkaj fotografaĵoj de tiuj incidentoj, publikigitaj de la hodiaŭa numero de la urba ĵurnalo.

La fakto ke troviĝis jam policistoj atendante nian alvenon en la ŝoseo, kaj ke estis tie ĵurnalistoj pretaj foti nian agadon, estas pruvo ke ĉiuj ili antaŭkalkulis ke la decido de nia asembleo verŝajne estus tia. Verdire,







ĝi ne povus esti alie. Ŝajnas ke la sola formo de mobilizado, formo al kiu, krome, evoluas multaj manifestacioj, estas la barado de la publikaj vojoj kaj ŝoseoj. Tiuj formoj de interrompo de la trafika fluado estas efika ago por komuniki al la civitanoj ke io nenormala okazas en la socio, ke estas konflikto, kontraŭdiro... La intereso de la aŭtoritatoj estas montri ke ekzistas normaleco en la socio, ke ĉio diskuras glate kaj normale. Do, la viktimoj de la sociaj kontraŭdiroj penas montri ke tiu ideo ne estas ĝusta, ke estas konfliktoj, konvulsioj, problemoj... Tial, antaŭ kelkaj jaroj, kiam okazis en mia urbo la krizo de la restrukturado de la ŝipfarejoj, kaj rezulte de tio perdis sian laborlokon multaj laboristoj, dum multaj monatoj ofte la ŝoseoj kaj la stratoj de Gijon estis kolapsitaj, obstrucitaj de manifestaciantaj laboristoj de la ŝip-konstruejoj kaj ties familioj. La barado de la vojoj kaj stratoj tre ofte okazis per bruligado de malnovaj veturilo-radoj. Verŝajne tiu estas iu procedo sufiĉe

universala ĉar iam mi vidis fotografaĵojn de similaj agoj de la palestinoj dum la disturboj de la intifado. Nu, ĉi-tiu konflikto-naska kapitalisma socio generas kvazaŭ-intifadojn ankaŭ en la urboj de la iam prospera industria socio. Kiam pliakriĝis la konflikto de la ŝip-farejoj, la laboristoj kiuj fariĝis senlaboruloj bruligis, ne jam malnovajn radojn sed novajn aŭtobusojn de la urba vetur-entrepreno post devigi la vojaĝantojn eliri el la veturiloj. Same, kiam antaŭ ne multaj monatoj okazis en mia regiono la konflikto de la karbo-ministoj, ĉi-tiuj baris perforte la ŝoseojn de la regiono. Ili uzis por tiu celo la trunkojn de grandaj arboj kiujn ili dehakis apud la ŝoseoj mem.


Nu, kiam tiuj agoj okazadis mi ne pensis ke tiom baldaŭe ankaŭ mi kaj miaj kunuloj de la ŝtalo-industrio troviĝos plenumante tiujn perfortajn agojn kiujn mi abomenas. Kaj jen mi, hieraŭ, devis partopreni en tiu batalo-formo al kiu fine aliras la viktimoj de la kontraŭdiroj de ĉi-tiu kapitalisma socio kiam ili perdas la esperon pri alitipaj, pli pacaj, rimedoj.

Kiel dirite, kiam nia amaso da laboristoj el la fabriko alvenis al la proksimaĵoj de la celita ŝoseo, la polico pafis fumo-bombojn sur nin. Ili troviĝis en sufiĉe favora pozicio por tiu ago ĉar en tiu loko la ŝoseo troviĝas iom pli alta ol la vojo per kiu ni venis el la fabriko. Konsiderante la malfacilon supergrimpi la ŝoseon sub tiu pafado, parto el la laboristoj decidis formi apartan grupon por ataki la ŝoseon tra alia punkto ne kontrolata de policistoj. Mi aldoniĝis al tiu grupo, kaj post trakuri plurkilometran distancon ni sukcesis bari la intensan trafik-fluon de la ŝoseo. Sed dume la ceteraj laboristoj de la unua grupo, antaŭenirante spite al la polica pafado sukcesis alveni, ankaŭ ili, al ŝoseo, kaj la polico devis sin retiri post iom da batalado ĉar ne estis sufiĉaj policistoj por alfronti tiom grandan amason da laboristoj. El tiu batalo rezultis kelkaj vunditoj tiel inter la policistoj kiel inter la laboristoj. La vundoj de la laboristoj okazis pro la gumaj kugloj pafitaj de la policistoj, kaj ĉi-ties vundoj estis rezulto de la feraj ŝraŭboj ĵetitaj de la laboristoj per ŝton-ĵetiloj.

Dum la tempo (preskaŭ unu horo) kiam la vojo estis barita, mi trairis rigardante la kelk-kilometran vicon da haltigitaj veturiloj. La ŝoforoj de tiuj aŭtomobiloj kaj kamionoj kiuj troviĝis malproksime de la punkto de barado, ne konis la kaŭzon de tiu trafiko-haltigo. Multaj el ili demandadis al mi ĉu estis okazinta iu ajn akcidento sur la ŝoŝeo. Mi klarigis al ili ke la interrompado de la trafika



La Asturia kolono de la Fera Marŝo



La Eŭzkadia kolono de la Fera Marŝo

fluo estis ago de la ferindustriaj laboristoj de ENSIDESA por atentigi la publikon pri la problemaro de tiu industrio. Ĝenerale ili montris komprenemon rilate al tiu problemo, kiu ne estas nur problemo de la laboristoj de la fabriko sed la tuta Asturia socio. Aliaj, eĉ komprenante la problemon, esprimis sian malkontenton pro tio ke, por plendi pri la problemaro de la ferindustrio, oni okazigu aliajn problemojn al la veturantoj.

Mi pripensis ĉiujn-ĉi aferojn. Mi demandis al mi ĉu por atingi nian celon estas konvenaj tiutipaj agoj. Mi venis al la konkludo ke kvankam ni baru ĉiujn vojojn de la regiono, kaj la regiona loĝantaro plene ekkonscius pri la graveco de la ekonomia situacio, la problemoj daŭre restus en la sensolva situacio en kiuj ili troviĝas. Mi pensis, kaj daŭre pensas, ke ni, la laboristoj, kaj ĝenerale la tuta popolo, kapablas fari malmulton por kontraŭstari la planojn de niaj veraj malamikoj, la transnaciaj korporacioj de la kapitalismaj financoj. La policistoj kiuj batalas kontraŭ ni estas nur lakeoj de la sistemo. Ankaŭ la entreprenistaro kiu ellaboras planoj de industrio-likvidado estas nur lakeoj kaj servantoj de la veraj mastroj de la socio. Mem la landa regantaro, ministroj kaj komisaroj, estas nur servantoj kiuj obeas la ordonojn de la kontrolantoj de la Tutmonda Mono-Fonduso. Kiel devas agi la laboristoj por kontraŭbatali la dekretojn de tiuj ĉiopovaj sinjoroj? Dum kelkaj jardekoj la sola serioza oponanto, en la mondo, kontraŭ tiu granda povo de la transnacia kapitalo, estis la Socialista bloko. Kun ĉiuj siaj mankoj kaj misaĵoj, la iama socialista bloko estis la sola espero kaj la sola helpo de la batalanta laboristaro, de la malriĉularo kaj la subpremitoj de la mondo. Kaj nun tiu progresista kaj homfavora forto jam ne plu ekzistas. Antaŭe neniam mi pensis ke tia katastrofo iam povus okazi kaj ke mi travivus tiun malfeliĉon.


(la 18-an de oktobro - 1992)

Normale disvolviĝas la fera marŝo de la ŝtalo-industriaj laboristoj de la nordo de Hispanio. Laŭlonge de ilia vojirado, la marŝantoj spertas la simpation kaj la homan solidarecon de la loĝantoj de diversaj urboj, grandaj kaj malgrandaj, kiujn ili trairas. Multaj personoj donace kontribuas al la subteno de tiu marŝ-kampanjo. Oni invitas ilin tagmanĝi kaj noktmanĝi en la haltiĝo-lokoj. Ankaŭ oni faciligas al ili la aferon de la dormado. Tia estas la ĝenerala teniĝo de la popolanoj kaj ties aŭtoritatoj:

urbestroj k.s. Ne mankis esceptoj. Antaŭ kelkaj tagoj la marŝantoj de la Eŭzkadia kolono trairis diocezon kies episkopo ordonis al la pastroj de li dependantaj ke oni ne permesu al la marŝantoj tranokti en la preĝejoj de sia jurisdikcio. La landaj ĵurnaloj disvastigis tiun informon, kaj la hispanoj tre skandiliĝis pro tiu ago. Tiam tiu episkopo haste deklaris ke liaj instrukcioj estis mise interpretitaj; ke li tutkore metas je la dispono de la marŝantoj la preĝejojn kaj ĉiujn ekleziajn domojn de sia diocezo. Kompreneble, al la piedirantoj de ambaŭ kolonoj de la fera marŝo, estas necese uzi, por ties nokta dormado, publikajn kaj ampleksajn lokojn kiel sportejoj, lernejoj, preĝejoj... Ankaŭ, akompanas ilin taĉmento da flegistoj por zorgi pri ilia sanstato, ĉefe en kio koncernas al la sano de la piedoj. Kelkaj el la partoprenantoj en la marŝado devis rezigni kaj forlasi la iradon ĉar ili ne povis elteni la troan penon de tiom-kilometra piedirado.
Dum okazas ĉio-ĉi kion mi priskribas per ĉi-tiu longa raportado de multaj tagoj, la fona bildo je internacia nivelo estas la balotkampanjo por elekti, post malmultaj semajnoj, la usonan prezidenton por la sekva kvarjaro. La inform-medioj amplekse raportas pri la incidentoj de la kampanjo kaj pri ties tri ĉefaj kandidatoj. Ne estas necesa ke mi aldonu ke tiu kampanjo kaj la estonta rezulto de la balotado tre vekas la intereson de miaj samlandanoj. Mi konstatas ke plejparto el miaj samcivitanoj, almenaŭ tiuj de la laboristaj kaj popolaj medioj kie mi vivas, preferas kaj deziras la venkon de la kandidato Klinton. La ĝisnuna prezidento G.Bush estas speciale malamata en tiuj medioj tial ke li estas la homo de la milito kontraŭ Irakio kaj de la pliintensigo de la komerca sieĝo al Kubo.
Ĝenerale, mi estas skeptika pri la afero de la usonaj balotoj. Mi komprenis jam de antaŭ multe da tempo ke la usona balot-sistemo ne estas vera demokratio (supozante ke ekzistas ie ajn veraj demokratioj). Tamen, spit' al tiu mia skeptikismo pri tiu temo, mi ne estus objektiva se mi ne rekonus ke en multaj aferoj estas konsiderinda diferenco inter la politiko de usona administracio gvidata de "respublikana" prezidento, kaj ties de "demokrata" prezidento. Estas ĉiam pli progresistaj la "demokrataj" administracioj. La usona imperiismo pli estas agresema sub "respublikanaj" administracioj. La homaj rajtoj estas pli respektataj en Usono, kaj en la mondo subinflue de Usono, sub "demokrata" administracio. Estis sub "demokrata" prezidento kiam oni aprobis leĝojn favore al la civitanaj rajtoj de la usonaj nigruloj. Kaj ĉiam sub "respublikana" administracio estis pli intensa kaj premiga la sieĝo al Kubo. Tiurilate, jes ja, ankaŭ mi preferas ke la kandidato Klinton estu la sekva Us-prezidento por la venontaj kvar jaroj.

(la 20-a de oktobro - 1992)
Por homo kiel mi, kiu priatentas ĉiun signon de laborista rezisto kontraŭ la maniero kiel la kapitalistoj de la mondo pretendas alfronti la nunan krizon de la sistemo, tre altsignifa estis la hieraŭa manifestacio en Londono kontraŭ la planoj de la brita registaro por likvidi 31 karbo-minejojn. La informiloj raportas pri 200.000 personoj plendante antaŭ la brita parlamentejo. Kompreneble, ne ĉiuj ili estis karbo-ministoj; multaj gelondonanoj aldoniĝis al tiu mobilizo.
Estas bone ke la planoj de la eg-burĝaro frakasiĝu kontraŭ la amasa rezisto de la loĝantaro. Mi diras ke tiu hieraŭa ago estas tre altsignifa, tial ke tio atestas pri la batal-preteco de la brita laboristaro. Okazis ke dum kelkaj jardekoj ŝajnis ke la laboristoj de tiu lando fariĝis etburĝuloj. En la tiutempa komfort-socio, kun relative alta vivnivelo kaj konsumnivelo, kaj sufiĉe da laboro por ĉiuj, la brita laboristaro volis scii nenion pri klasbatalo k.s. Britio estis la sola lando en Eŭropo, kie je la festo de la 1-a de Majo ne estis laboristaj manifestacioj. La teoriistoj de la burĝa sistemo interpretis tion kiel signo de la novaj tempoj en kiuj jam ne plu estos klasbatalo inter la laboristaro kaj la posedantoj de la produktad-rimedoj. Al tiuj intelektuloj de la kapitalisma sistemo tre plaĉis kredi tion en socio kie, spit' al la tuta komforto kaj alta vivnivelo de la loĝantaro, tamen la burĝaro konservadis la propraĵon kaj la kontrolon de la fabrikoj kaj ĉiuj

produktad-rimedoj. Sed kiam la nuna krizo venas ĝi montras la veran vizaĝon de la posedantaj klasoj kaj la veran esencon de la klasisma socio. Nun ĉiuj -tiel laboristoj kiel kapitalistoj- konstatas ke la klasbatalo, kiel K. Marks antaŭvidis, pluekzistas dum plu ekzistas malsamaj sociaj klasoj kun kontraŭantaj interesoj kaj malaj celoj. La laboristoj de Britio kaj de la tuta mondo devas lerni ke ilia liberiĝo tute ne alvenos dum ankoraŭ ekzistas la privata propraĵo de la produktadrimedoj. La intenco likvidi la publikan, ŝtatan, propraĵon de la karbo-industrio,




*La britaj laboristoj brave mobiliziĝis kontraŭ la likvido de la karbo-mineja industrio en ilia lando.*

fer-industrio, k.a. en Britio, en Hispanio, kaj en aliaj lokoj, evidentigas la deziron de la burĝaro repreni la privatan kontrolon de ĉiuj entreprenoj. Tiuj laboristoj kiuj estis pensintaj pri la paco inter la sociaj klasoj, nun abrupte konstatas ke la klasbatalo daŭras, kaj ke iliaj klasaj malamikoj ne perdas sian tempon. La burĝaro volas rehavi sian antikvan povon profitante la kolapson de la socialista bloko.

La brita ĉefministro S-ro Major devis rezigni pri siaj planoj por la karbo-industrio. Tio atestas pri la forto de la laboristoj. Li atendos pli bonan okazon por repreni sian intencon. Li ne povos fari alie. La eŭropaj ministoj devos kompreni ke la karbo kiu venas el SudAmeriko kaj aliaj mondpartoj estas malpli-kosta dum prilaboras la minejojn sklavigitaj homoj. Se daŭre ekzistas la sklaveco aŭ similaj situacioj en nia jarcento, pri tio iome kulpas ankaŭ la bone pagitaj laboristoj de la alte evoluintaj landoj. Ni devas kompreni ke ne eblos nia kompleta liberiĝo se ni ne partoprenas en la batalo por la liberigo de la tuta homaro.

Miaj kamaradoj de la fera marŝo trairis jam pli ol duono el ilia vojo al Madrido. Ili devos piediri ankoraŭ dum preskaŭ unu semajno. Kiam ili alvenos tien, venonta lundo la 26-a ĉi-monate, estos atendante ilin granda amaso da manifestaciantoj el Asturio, Eŭzkadio kaj Madrido. Nia manifestacio ne tiom estos granda kiom tiu de Londono hieraŭ, sed tamen ĝi estos sufiĉe amasa, mi esperas. La sindikatoj estas organizante peraŭtobusan ekspedicion kiel tiu de la 30-a de julio. Oni esperas ke ĉi-foje iros al Madrido eĉ pli da asturianoj ol en tiu okazo. Mia edzino kaj mi jam rezervis aŭtobusan sidlokon por tiu vojaĝo.

La Ministro pri Industrio akceptos en la ministrejon la marŝantojn kaj la sindikatajn liderojn por plu pridiskuti la interkontraŭantajn planojn por la restrukturado de la fer-industrio. Komence lia intenco estis ne troviĝi en Madrido kiam la marŝo alvenos tien. Sed poste li ŝanĝis aŭ oni devigis lin ŝanĝi tiun decidon. Evidente, post la granda sensacio kiun la fera marŝo estas provokante en la lando, estus granda domaĝo por la registaro, de propaganda vidpunkto, se la Ministro pri Industrio forkurus el sia ministrejo por ne akcepti la perantojn de la laboristoj.

(la 22-a de oktobro - 1992)

En mia urbo kaj en aliaj zonoj kie ekzistas ferindustriaj fabrikoj, daŭre la laboristoj mobiliziĝas kaj entreprenas agojn apoge al niaj kunuloj de la fera marŝo. Antaŭhieraŭ estis en la centro de la urbo konsiderinde granda manifestacio de la laboristoj kaj ties familioj. La incidentoj okazintaj je la finiĝo de tiu akto ne estis gravaj.

Sed hieraŭ okazis serioza alfrontiĝo de

laboristoj kontraŭ la polico en la granda ŝoseo aŭ aŭtovojo kiu pasas tra la proksimaĵoj de la fabriko kie mi laboras, t.e. en la sama loko kie antaŭ kelkaj tagoj amaso da laboristoj de ENSIDESA baris la trafikan fluadon. Hieraŭ intencis kelkaj laboristoj plenumi la saman agon kaj el tio rezultis batalo kontraŭ la polico. La presaro nomas tiujn interfrontiĝojn: "la bataloj de Somontes", ĉar nomiĝas Somontes la loko kie okazas tiuj luktoj.

Kiel dirite, la laboristoj intencis bari la vojon perforte, sed la polico intervenis perforte pafante fum-bombojn kaj gum-kuglojn. Kelkaj laboristoj rezultis kontuzitaj pro tiuj gumaj kugloj aŭ pilketoj. Ankaŭ kelkaj policistoj estis vunditaj ĉar iuj laboristoj ĵetadis al ili ferajn ŝraŭbojn kaj buletojn. Mi devas klarigi ke en tiu ago ne intervenis amase ĉiuj laboristoj de la fabriko. Aŭ pli ĝuste, tute ne intervenis ĉiu ajn laboristo de la fabriko de ENSIDESA. La laboristoj kiuj partoprenis en tiuj hieraŭaj disturboj ne estas ENSIDESA-laborantoj, kvankam tamen ili laboras en ENSIDESA. Mi supozas ke estas necesa ia eksplikO. Kiam oni diras ke 7.000 laboristoj perdos sian laborpostenon en ENSIDESA kaj ties filiaj entreprenoj, la aserto ne estas tute ĝusta.





Verdire, estos multe pli granda la nombro da gelaboristoj kiuj fariĝos senlaboruloj, eble por ĉiam, se la produktado de ŝtalo de tiu entrepreno estos malgrandigita je miliono kaj duono da tunoj jare, laŭ la planoj de la aŭtoritatoj. Krom tiuj 7.000 laboristoj de ENSIDESA, perdos sian laborlokon multaj aliaj kiuj ne apartenas al tiu entrepreno kvankam ili laboras en la samaj fabrikoj ol ni. Okazas ke, krom la propraj laboristoj, en la uzinoj kaj instalaĵoj de la fabrikoj, laboras multaj aliaj homoj apartenantaj al aliaj entreprenoj, kaj grandaj kaj malgrandaj, kiuj faras kontraktitajn laboraĵojn destine al la sama produktad-procezo. Tiu maniero je sub-kontraktitaj laboraĵoj estas iu ruzaĵo de la entreprenistaro celante jenajn rezultojn:


1-e. Dum la publika, ŝtata ferindustrio, perdas monon, enŝuldiĝas kaj fine bankrotas, kelkaj entrepren(et)oj, privataj, faras profitajn por ili negocojn, kaj kelkaj privataj kapitalistoj ekonomie prosperas dum ruiniĝas la publika propraĵo. Tiu estas iu meĥanismo de kondukado de publika mono al privataj poŝoj.

2-e. La laboristoj de tiuj sub-kontraktaj entrepren(et)oj ricevas salajron pli malalta ol la laboristoj de ENSIDESA. Tio estas maniero de la entreprenistaro por batali kontraŭ la salajraj postuloj de la fortaj sindikatoj de la grandaj entreprenoj ŝtataj.

3-e. La laboristoj de la sub-kontraktaj entrepren(et)oj estas nur eventualaj, t.e. ili ne havas fiksan laborlokon, male ol ni, la laboristoj de ENSIDESA. Tio signifas ke kiam ili fariĝos senlaboruloj, oni ne devos pagi al ili la monkompenson kiun ricevos la ENSIDESA-laboristoj.



Resume, tiu ĉi putra klasisma socio faras diversajn sociajn klasojn aŭ ŝtupojn ankaŭ interne de la laboristaro mem, cele de ke iuj laboristoj havu interesojn malsamajn kaj foje





eĉ kontraŭajn al ties de aliaj laboristoj, por ke ili ne agadu unuece kontraŭ la interesoj de la kapitalistaro. Tiu ruzaĵo iufoje funkcias, ekzemple hodiaŭ, kiam estis en la batalo solaj la laboristoj de la subkontraktaj entreprenoj. Sed en aliaj okazoj ĉiuj laboristoj agadas fratece, kiel okazis en aliaj mobilizoj, kaj en la fera marŝo mem.
Tial ke la labor-kondiĉoj kaj la salajro-kondiĉoj estas pli malfavoraj por tiuj eventualaj laboristoj de la subkontraktaj entreprenetoj, ili estas pli radikalaj en la mobilizoj. Ĝenerale estas ili kiuj atakas la policon en la manifestacioj, kaj provokas disturbojn en ĉiu publika plendo-akto. Ili estas la subproletaro, pri kiu iam diris K.Marks ke *ili povas perdi nenion, krom iliaj katenoj*. Ho!, nun mi memoras ke eĉ ĉi-laboristoj ne troviĝas en la plej malalta ŝtupo de la socia eskalo. Sub ili troviĝas ankoraŭ la fremdaj laboristoj, kun malpli alta salajro, sen socia sekur- kaj sanec-servo, sen politikaj kaj civitanaj rajtoj... ankaŭ la multenombraj senlaboruloj kiuj jam ne ricevas iun ajn mon-helpon... ankaŭ la ciganoj kaj la membroj de la etniaj malplimultoj marĝenitaj kaj diskriminaciitaj...
Alia kaŭzo de malakordo aŭ malunuiĝo estas tiu inter la diversaj regionoj de mia lando kun industriaj interesoj. La registaraj aŭtoritatuloj daŭre stimulas la malakordon inter Asturio kaj Eŭzkadio. Okazis ke lasttempe la aŭtoritatoj de la ŝtalo-industrio de la Eŭropa Komunumo postulis plian fortranĉon de la hispana ferindustrio. De antaŭ kelkaj tagoj, kiam tiu informo estis publikigita, ĉiutage ĉiutipaj aŭtoritatuloj, ĉu ŝtataj, ĉu regionaj, spekulacias pri la aplikado de la nova malpliigo de nia landa industrio pridiskutante ĉu la koncerna industrio-likvido konvenas esti farita en Asturio aŭ en Eŭzkadio. Per tiutipa bombardado de spekulaciaj prikonsideroj, oni intencas venenigi la rilatojn inter la loĝantaroj de ambaŭ regionoj, kaj tio en ĉi-tiu momento kiam la unueco de la asturaj kaj eŭzkadiaj laboristoj tre estas necesa por batali kune kontraŭ la monopolisma kapitalo kaj ties lakea registaro de Madrido.

(El mia letero al germana kamarado, de la 24-a de oktobro - 1992)

Hieraŭ okazis alia "batalo de Somontes", kaj mi troviĝis plenenmetita en ties plej akra parto. Same ol la pasinta vendredo, ĉi-tage estis du-hora strikado en la fabriko. Plenumiĝis tiam la dua semajno de la fera marŝo. En la fabrika asembleo la membroj de la sindikata komitato informis la laboristaron pri la disvolviĝo de la marŝado, kiu kulminos post tri tagoj en Madrido. Oni informis ankaŭ pri la stato de la organizado de la peraŭtobusa ekspedicio al tiu ĉefurbo por manifestacii tie je la alveno de la marŝantoj. Laŭ tiuj informoj, estis kontraktitaj 235 aŭtobusoj por tien veturigi proksimume 12.000 gemanifestaciantojn el Asturio. Tial ke en nia regiono ne ekzistas tiom da aŭtoĉaroj, oni devis ilin serĉi en aliaj regionoj. Oni kalkulas ke el la Eŭzkadia regiono iros, proksimume, kromaj 200 aŭtobusoj.

Same ol la pasinta semajno, oni akordis en la asembleo la baradon de la Oviedo-Gijon ŝoseo en Somontes-zono, apud nia fabriko. Kiel kutime, jam atendis nin en tiu loko la polico kaj ankaŭ kelkaj ĵurnalistoj. Dum ni adresiĝis al tiu loko, mi rimarkis ke kelkaj laboristoj, verŝajne tiuj de la sub-kontraktaj entreprenen(et)oj, iris preparitaj kaj armitaj kvazaŭ ili irus al milito. Multaj el ili kovris sian kapon per la plastaj aŭ metalaj kaskoj kiujn ili uzas en la uzinoj. Iuj eĉ portis metalajn ŝildojn kaj ferajn bastonojn. Krome ili kovris sian vizaĝon per tuko, eble por ne esti konataj de la policistoj. Pluraj uloj portis pulvorajn raketojn. Vidante tiujn armitajn ulojn, iu kamarado diris al mi: *Tiuj ĉi laboristoj de la subkontraktaj uzinoj estas tre radikalaj tial ke sur ili pezas la plej malmolaj rezultoj de la industria restrukturado. Sed ci ne pensu ke ili estas revoluciaj en la senco laŭ kiu ci konceptas la revolucion. Ili nun estas batalemaj pro la malfacila situacio en kiu ili troviĝas. Sed se tiu situacio multe pli malboniĝas, la sub-proletaro fariĝas lumpen-proletaro, kaj en tiu senespera situacio ili facile fariĝas materialo tiel por la revolucio kiel por la kontraŭ-revolucio: ili sekvos tiun kiu povos provizi al ili panon, ĉu li nomiĝus Lenin aŭ Hitler*. Mi pensas ke iom pravas tiu kamarado. Estas konate ke la ĉi-jarcentaj faŝismoj mobilizis popolajn amasojn kiuj, pro ilia situacio, devus esti pretaj por revoluciaj movadoj. Verdire, la amasoj mobilizitaj de revolucio diferenciĝas nenio de tiuj mobilizitaj de faŝismaj movadoj, kaj ambaŭ estas tute similaj al tiuj nuntempe mobilizitaj far de la fundamentalismo en kelkaj islamaj landoj, aŭ tiuj mobilizitaj pro naciismaj celoj en kelkaj Eŭropaj zonoj. Krome ĉiuj-ĉi amasoj estas tute interŝanĝeblaj; ĉiuj ili havas, kiel komuna eco, la fakton ke ili esperas, bezonas kaj serĉas ian mesion kiu savu ilin el ilia malfeliĉa situacio.

Alveninte al Somontes-zono, ni vidis ke la ŝoseo estis tre defendita de granda nombro da policistoj. Granda nombro da policaj veturiloj okupadis tiun lokon, kaj la trupo pretiĝis por pafi kontraŭ ni antaŭ ni komencu suprengrimpi la kaĵo-monteton. Per voĉ-laŭtigilo la komandanto ordonis al ni halti kaj ne plu antaŭenmarŝi direkte al la aŭtovojo. Tial ke ni ne obeis tiujn ordonojn, la policistoj komencis pafi sur nin. Sur la amaso da laboristoj komenciĝis fali granda nombro da fumo-bomboj kaj gumo-kugloj. Baldaŭ estis por ni evidenta ke ĉi-tage la polico estas plendecidita ne permesi ke ni interrompu la trafikan fluon, kiel ni faris pasintan semajnon. Ĉi-foje estas enorma la nombro da policistoj, kaj ankaŭ konsiderinde granda la kvanto da municio superŝutata sur nin. La laborista kolono haltis sed ne retiriĝis. Ni dispersiĝis sur la tereno por ne prezenti kompaktan kaj facilan celon por la pafantoj. Mia kamarado kaj mi trovis ŝirmitan lokon malantaŭ iu kabanaĉo. Ni aŭdis la multajn frapojn de la gum-pilkoj kontraŭ la muro kaj la tegmento de tiu kabanaĉo. Dume dekoj da fumantaj ladskatoloj falis en niaj ĉirkaŭaĵoj. Kelkaj laboristoj prenadis la fumantajn ujojn kaj permane reĵetis ilin sur la policistoj. Iuj estis trafitaj de la pafitaj gum-kugloj. Mi vidis kiel, proksime de mi, iu laboristo estis trafita de iu el tiuj malmolaj pilkoj sur lia kapo. La malfeliĉulo, duon-senkonsciigita, retiriĝis kriante kaj kovrante la kapon per siaj manoj. Aliaj estis retiriĝantaj tiam pro simila kaŭzo aŭ pro tio ke ili ne povis elteni la fetoron de la bombo-fumo. Sed plejparto el la laboristoj rezistadis tie kvankam ni ankaŭ ne povis antaŭeniri. Multaj el la laboristoj insultadis la policistojn nomante ilin: "putinidoj", "samseksemuloj", "kokrituloj" kaj aliaj titoloj kiuj, pro prudeco, ne decas registri sur la papero. Dumlonge daŭris la polica pafado kaj baldaŭ la fumo estis tre densa en la aero de la zono kie ni troviĝis. Iom-post-iom la aero fariĝis ne-enspirebla. Unu el la ĉi-apudaj fotografaĵoj, farita ekde la malantaŭo de la kolono, montras kiel la antaŭa parto de la kolono malaperas ene de nubo da fumo de la bomboj pafitaj el la alta aŭtovojo. En tiu momento mi troviĝis en la unua vico de tiu kolono, meze de tiu fumo-nubo. Apud mi, ŝirmataj malantaŭ tiu kabanaĉo, estis kelkaj laboristoj. Iuj el ili, per ŝtonĵetilo, estis ĵetante ferajn ŝraŭbojn kontraŭ la policistoj. Dum la aero pli kaj pli fariĝis ne-enspirebla, mi estis demandante al mi kion mi estas faranta en tiu loko kaj en tiu momento. Eble saman demandon faris al si




miaj kunuloj ĉar iompostiom ili retiriĝis el tiu loko. Dum retiriĝis li, mia kamarado alvokis min de kelkaj metroj malantaŭ mi; li petis ke mi retiriĝu. Mi rimarkis ke, kvankam lia voĉo estis ankoraŭ proksima, li rezultis por mi preskaŭ ne-videbla pro la denseco de la fumo. Sed cetere al mi baldaŭ ne eblis eĉ malfermi la okulojn ĉar tiu fumo efikas ne nur sur la spir-aparaton sed ankaŭ sur la okulojn. Ĝi rezultas fetora kaj naŭziga por la nazo, sufokiga por la gorĝo, kaj jukiga kaj larmo-fara por la okuloj. Baldaŭ mi venis al la konkludo ke mi ne povas plu resti tie sed samtempe mi ankaŭ ne povas eliri el tie. Por eskapi el tiu loko, mi devus malfermi la okulojn, kaj tio ne eblis al mi ĉar la fumo rezultadis ne-eltenebla por la okuloj. Sed samtempe ne eblis al mi plu enspiri aeron en tiu loko. Por pli komplikigi la situacion, en tiu momento mi aŭdis fortan frapon kontraŭ la tegmento de la kabanaĉo kiu ŝirmis min. Mi komprenis ke tiu bato estis multe pli forta ol tiuj de la gum-kugloj. Tio nur povis signifi ke unu fumanta skatolo falis kaj restis situita distance nur duonmetro apud mia vizaĝo. La aero fariĝis absolute ne-enspirebla en tiu loko. Do mi, preskaŭ blinda, stumblante, eskapis el la proksimaĵo de tiu kabaneto kaj retiriĝis direkte al miaj kunuloj. Dum mi trairis cento da metroj la tereno estis fumanta pro la multaj lad-skatoloj super-ŝutitaj sur nin. Dume mi aŭdis fajfi ĉirkaŭ mi kaj super mia kapo la pafitajn gum-kuglojn. Feliĉe neniu el ili trafis min. Poste mi sciis ke inter la kelkaj kontuzitoj de ĉi-tiu tago, iu laboristo rezultis kun iu osto el la nazo rompita. En mia retiriĝo baldaŭ mi renkontiĝis kun la senorda retiriĝo de centoj da laboristoj same stumblantaj kaj duon-blindigitaj kiel mi. Fine ni alvenis al iu zono libera el tiu infera fumo. De tie multaj aliaj laboristoj estis ĵetante ŝtonojn kaj ferajn bulojn kontraŭ la policaj vicoj. Pluraj laboristoj estis ĵetante pulvorajn raketojn, sed tial ke ili ne disponis je instrumentoj por fiks-celumado, la eksplodoj akazis malproksime de la loko kie staris la pafantaj policistoj; nur tre malmultaj el tiuj eksplodantaj raketoj falis proksime de la

polica trupo. Sed fine, kaj hazarde, iu raketo plene celtrafis iun polican veturilon kaj iome damaĝis ĝin. Tiam granda ĝojkrio eliris el la laborista amaso. Tio kolerigis la policistojn, kaj ilia komandanto ordonis al ili ataki nin. Tion ili faris armitaj per bastonoj kaj plastaj ŝirmiloj, kaj bone ordigitaj en vicoj. Nia senorda amaso pli dispersiĝis. Sed poste regrupiĝis la laboristoj dum la polica kolono dronis en la fumo-nubo kiun ili mem provokis kontraŭ ni. Baldaŭ ili konstatis ke tiu fumo ne nur utilis por bari nian antaŭenmarŝadon sed ankaŭ por ĝeni ilian atakadon. Ili devis, do, retiriĝi al siaj pozicioj sur la aŭtovojo, dum falis sur ili la ordinara municio de la laboristoj.

Finiĝante tiam la du-hora strikado, la sindikataj lideroj petis al la laboristoj retiriĝi kaj reiri al la fabrikaj uzinoj. Do, ni ne atingis la celon bari la ŝosean trafikon, tamen ni rimarkis ke dum ni troviĝis en tiu batalo, ekde difinita momento, tute interrompiĝis tiu trafiko, kaj pasis neniu veturilo tra tiu aŭtovojo. Poste ni eksciis ke dum la horo kaj duono kiam ni estis altirante tien la atenton de la policistaro, du kolonoj da laboristoj ŝtopis la vojon plurkilometre distance ambaŭflanke de la Somontes-batalejo.

Nokte, kiam mi estis reveninta al mia hejmo mi troviĝis tre malĝoja dum mi spektis la pertelevidan informadon. Kelkaj estis la kaŭzoj de mia malĝojo. Unue, mi estis malagrable impresiita pro la perforto de la tiutaga batalo, pro la fakto ke mi estis gasumita, sed ĉefe pro la fakto ke en la jaro 1992 p. K. oni devas ankoraŭ fari tiujn batalojn, kiuj ŝajnas afero de la 18-a aŭ la 19-a jarcento, pro la fakto ke la radika kaŭzo de ĉio ĉi estas tiu krizo de la fero-industrio, tiu ekonomia krizo de la socio, al kiu oni ne vidas solvon...

Sed estis aliaj kaŭzoj de malĝojo. La televido estis informante tiam pri la enŝipiĝo de hispanaj soldatoj destine al Jugoslavio. Ili iras destinataj al iu el tiuj nomataj "pacaj" intervenoj de la U.N.O. okaze de la tiea civilmilito. Paca interveno, sed tamen ili estas armitaj kaj oni pensas ke ili devos batali. Do la bildo kiu la televido prezentas estas tiu de soldatoj kiu iras al milito, t.e. alia bildo de pasintaj epokoj kiujn



Hispanaj soldatoj enŝipiĝas destine al Jugoslavio






ni konsideris por ĉiam pasintaj. Kiu diris ke la okazintaĵoj de antaŭ pluraj jaroj, disfalo de la komunistaj reĝimoj, malapero de Sovetio, k.s. signifis la fino de la historio? Mi malĝoje konstatas ke tiuj okazintaĵoj, fonto kaj origino de la tieaj civilmilitoj, kion reale faris estis reporti nin, denove kaj ankoraŭfoje, al la naŭziga mondo de la ĉiama historio, la mondo de la militoj inter la popoloj, la mondo de la ekonomiaj krizoj kaj de la ekspluatado de iuj homoj far de aliaj homoj, de iuj klasoj far de aliaj klasoj, de iuj popoloj far de aliaj popoloj. La vera fino de la historio estus plu antaŭenmarŝi al la Socialismo kaj la Komunismo. Sed, malfeliĉe, estis interrompita tiu irado, kaj la sekvoj de tiu frenezaĵo estas la krizoj kiujn ni spertas nun.

Kaj estas kroma kaŭzo de malĝojo. La televido raportas ankaŭ pri la mistera morto, okazinta antaŭ pluraj tagoj, de la fama germana liderino de la maldesktra ekologiismo, Petra Keli, kaj ties kunulo. Tragika kaj ne-sufiĉe klarigita morto. Ankaŭ tio reportas min al antaŭaj, malfeliĉaj epokoj. Mi ne povas ne pensi pri la morto, en la sama lando, ankaŭ en misteraj cirkonstancoj, de alia grava revolucia liderino, Rosa Luxemburg, murdita, samkiel Karl Liebknecht, la jaron 1919. Jen la Nova Internacia Ordo, tiel simila al la ĉiama, kontraŭhoma ordo.

(la 27-a de oktobro - 1992)

Mi daŭrigas ĉi-longan raportadon pri tiu ĉi kriza procezo de la granda ferindustria fabriko, kie mi laboras.

La kriz-procezo, tre simila al ties de aliaj industrioj kiuj bankrotis en mia lando, alvenis al tiu punkto kiam la perforto komencas aperi. Tion vi povas konstati per la raportado kiun mi faris de la lastaj mobilizoj. Mi devas klarigi, tamen, ke ĝis nun, en tiuj perfortaj agoj intervenis nur malgranda nombro da laboristoj de mia entrepreno.

En la mobilizoj, jes ja, amase partoprenis plejparto el tiu laboristaro, ankaŭ kiam oni temas pri la barado de la vetur-trafiko de la aŭtovojoj. Sed kiam la afero evoluas al fizika interfrontiĝo kun la polico, nur dek procento, proksimume, el la manifestaci-

antoj, agadas perforte. Tiel, en la okazintaĵoj de la pasinta 23-a ĉi-monate, nur tiu procento da laboristoj uzadis ŝtonĵetilojn kaj aliajn armilojn kontraŭ la polica trupo. La cetero de la laboristoj, kiel mi mem, partoprenas en la mobilizoj nur tiomgrade kiom ne estas necesa ia ajn perforto. Se la polico retiriĝas, kio ofte okazas kiam ne estas sufiĉe da forto por kontroli la situacion, ni antaŭenmarŝas al nia mobiliza celo; kaj se estas sufiĉa forto por polica atako, ni rezistas dum tio ne postulas perforto niaflanke, aŭ ni retroiras se male. Tamen, kiel dirite, estas iom radikalaj aktivuloj kiuj ne hezitas batali iome perforte. El tio rezultis ĝis nun kelkaj vunditoj inter la laboristoj kaj ankaŭ inter la policistoj.
Io simila okazis en la hieraŭa manifestacio en Madrido, kien fine alvenis la Fera Marŝo. Jam mi informis ke la sindikatoj organizis grandan peraŭtobusan ekspedicion el Asturio kaj el Eŭzkadio al Madrido por ĉeesti tie la alvenon de la marŝantoj. El mia regiono iris, prosimume, 230 aŭtoĉaroj plenaj da gelaboristoj de la ferindustrio kaj ties familioj. Mia edzino akompanis min al tiu manifestacio en Madrido. La aŭtobusoj eliris el Gijon je la sesa horo matene. Iuj el la veturantoj sukcesis akiri la unuajn ĵurnalojn de la tago. La ĉefa landa informo de tiuj ĵurnaloj estis la mitingo, la antaŭa tago, de la lideroj de la Socialista Partio, nun reganta en Hispanio. Okazas ke nun ili celebras la dekjariĝon de ilia regado sur ni. Ili festis tiun jubileon per tiu mitingo antaŭ iliaj sekvantoj, kaj per aliaj aktoj. Ilia propagando estas tre konfuziga por granda parto el miaj samcivitanoj, ĉefe por tiuj -kiel ni- de la krizaj labor-sektoroj kiuj bankrotas. Tiu propagando temas pri grandaj sukcesoj de la socialistaj regantoj, pri prospero, granda espero, justico... al ni ŝajnas ke ili temas pri alia lando de alia mondo, ĉar la realaĵo kiun ni konas tute ne alĝustiĝas al la bildo kiun prezentas tiuj sinjoroj. Ni vidas ke la mizero kaj senlaboreco senĉese kreskiĝas en nia lando. Dume tre abundas la skandaloj pro korupta konduto de multaj aŭtoritatuloj kaj altranguloj de tiu reganta partio mem.
Nia peraŭtobusa ekspedicio alvenis al Madrido posttagmeze. Ni haltis en la norda enirejo de tiu ĉefurbo, tra kiu estis eníronta, post kelkaj horoj, la duonmilo da marŝantoj de ambaŭ kolonoj, la astura kaj la eŭzkadia. Ambaŭ kolonoj kuniĝis la antaŭan nokton en la urbo Pozuelo, post deksep-taga marŝado. Kaj nun ni sciis ke ili entreprenis la lastan parton de ilia marŝado kaj troviĝis jam nur kelkajn kilometrojn distance de ilia destino. La maso tie atendanta estis enorme granda. Pli ol dek mil personoj venis el Asturio, kaj proksimume samkvanta amaso venis el Eŭzkadio. Krome estis multege da gemadridanoj ĉar la sindikatoj mobilizis en la ĉefurbo ties membrojn kaj simpatiantojn. La ĵurnaloj de la hodiaŭ, la 27-a, informas ke estis tie proksimume 50.000 personoj. Ĉiukaze estas amaso malpli granda ol tiu kiu manifestaciis pasintan semajnon en Londono, sed tamen ĝi rezultas konsiderinda koncentriĝo-manifestacio por urbo kiel Madrido. La alveno de la piedmarŝantoj estis apoteoza. En la placo de la Triumfo-Arko, norde de la ĉefurbo, formiĝis kolosa manifestacio, kiu sekve marŝis de tie ĝis la Ministrejo pri Industrio, en la urbo-centro. En la antaŭo de la manifestacio iris la sindikataj lideroj kaj la kelkcento da marŝantoj kiuj venis perpiede, dum dek-ok tagoj, el Asturio kaj Eŭzkadio. Sekve iris la kelkdekmilo da gemanifestaciantoj, kriante sloganojn kontraŭ la registaro, fajfante... estis ankaŭ fanfaroj, sakŝalmoj kaj aliaj folklor-regionaj muzikiloj. Ankaŭ la kutimaj eksplodoj (pulvoraj aŭ dinamitaj) de la nuntempaj manifestacioj. Ni trairis kelkkilometran distancon, ekde la norda enirejo de Madrido ĝis la urbo-centro. Dum tiu trairado multaj Madrido-loĝantoj, ekde la trotuaroj kaj la fenestroj de la domoj, aplaŭdis la marŝantojn kaj montris sian simpation al la manifestacio. Estis evidenta ke per tiu ago ili volis montri, ĉefe, malsimpation kaj malaprobon al la regantaro. Sendube la celebrado de la reganta partio, kaj aliaj festoj de ĉi-tiu jubilea jaro, vekis la malestimon de multaj civitanoj kiuj komprenas ke ne estas konvena tiu trimfalisma celebrado kiam tiom kriza estas la situacio de la lando. Tiu sinteno de nia socialdemokratia regantaro, festi memkompleze kaj triumfe dum ĉio disfalas kaj bankrotas en la lando, estas komparita, fare

de iu ĵurnalo, kun la teniĝo de la Romia imperiestro Nerono, kiu kantadis kaj muzikludadis liron dum bruliĝadis Rom-urbo.
Dum okazis tiu manifestacia marŝado tra la stratoj de la granda urbo, mi estis kontenta tial ke, krom la evidenta sukceso de la mobilizo, estis ankaŭ la fakto ke ĝi disvolviĝis pace kaj trankvile, sen tiuj perfortaj agoj, kiujn mi abomenas. Verdire, eĉ ne estis policistoj en tiuj stratoj. Sed la afero draste ŝanĝiĝis kiam la manifestacio-marŝo alvenis al la granda avenuo "Kastilia", loko de nia antaùa koncentriĝo, la 30-a de julio ĉi-jare. Por alveni al la Ministrejo pri Industrio, ni devis trairi proksimume kilometron kaj duonon tra tiu larĝega avenuo. Nu, ŝajnas al mi ke ĉiuj policistoj de la lando, kaj ties veturiloj, estis situitaj en tiu loko. Tiu avenuo "Kastilia" estas traveturebla amabaŭsence, t.e. duono el ties larĝo estas destinata por trafiko kontraŭsenca aŭ kontraŭdirekta al ties de la alia duono. Por la marŝado de nia manifestacio oni destinis unu el ambaŭ larĝo-duonoj laŭlonge de la avenuo ekde la punkto de nia eniro en ĝi ĝis la fasado de la Ministrejo al kiu ni adresiĝis. Komence la manifestaciantoj bone alĝustiĝis al tiu limo. Barante la paŝadon al la alia larĝo-duono estis vico da policistoj, tiel longa kiel la distanco kiun la manifestacio devus trairi. La vico aŭ linio estis sufiĉe densa, kaj multaj policistoj, ne ĉiuj, portis plastan ŝildon; ĉiuj ili portis bastonon. Malantaŭ ili estis iliaj veturiloj, kaj malantaŭ ĉi-tiuj, fluis iom da trafiko, sed ne granda ĉar ŝajnis kvazaŭ la madridaj aŭtomobilistoj klopodus eviti pasi tra tiu strato je tiu horo antaŭkalkulinte eblajn problemojn, aŭ ŝtopiĝon. Laŭ pli kaj pli alproksimiĝadis ni al la Ministrejo, mi vidis ke estis pli multenombraj la policistoj kun ŝirmiloj, kaj krome en tiu zono ili troviĝis malantaŭ feraj bariloj, interligitaj en iuj lokoj.
Vidante tiujn Rambo-similajn ulojn mi timis ke ilia defia teniĝo konstituus provokon por multaj manifestaciantoj. Mi sciis ke inter nia manifestacia amaso estas multaj uloj kiuj facile sin sentus provokitaj pro tiu elmontro de forto, kaj siavice ili estus tre pretaj fari sian propran provokadon. Dum ni marŝadis, de tempo al tempo oni aŭdiĝis la eksplodoj de la pulvoraj raketoj de iuj manifestaciantoj. Kelkaj eksplodoj estis eksterordinare potencaj; eble ili havis konsiderinde grandan kvanton da pulvoro, aŭ estis ne pulvoraj sed dinamitaj...









Kiam la zono antaŭ la Ministrejo pri Industrio estis plenplena pro multaj miloj da gemanifestaciantoj, komenciĝis la mitinga interveno de sindikataj lideroj. Oni informis ke sindikata delegacio estis ricevata en tiu momento de la ministro S-ro Aranzadi, kaj transdonos al ĉi tiu postulon pri nuligo de la restrukturado-plano kiu tiom domaĝas niajn interesojn. Sed tiam ankoraŭ ne estis alveninte la tuta amaso da manifestaciantoj. La amaso daŭre estis alvenante kaj baldaŭ










Claudio Aranzadi



estis evidenta ke tiu spaco, barita por ni, estos ne-sufiĉa por enteni ĉiujn. Subite komenciĝis la ĝenerala batala inter-frontiĝo inter parto el la manifestaciantoj kaj la polico. Mia edzino kaj mi perceptis tion kiam, kun granda bruo, la kelkcentmetra fera barilo estis disbatita kaj ĵetita sur la ŝoseo-plankon. Sed la komenciĝon mi ne spektis. Por ĝin priskribi mi devas fidi je la atesto de mia frato, kaj de aliaj gekonatuloj, kiuj troviĝis en la loko kie okazis la unuaj incidentoj.
Ŝajnas ke la afero komenciĝis kiam el la manifestacia amaso eliris iu virino kaj ties eta filino, kaj intencis pasi al la zono ŝirmita de la polico. Ili deziris iri al iu kafodrinkejo ĉar la infanino bezonis iri al la necesejo. Iu policisto baris ilian vojon kaj diris al ili ke estas ne-permesite trairi de tie la straton. Tion dirante li faris man-svingon kaj ne-volonte lia mano trafis la vizaĝon de la etulino, kiu komencis plori pensante ke oni intence vango-frapis ŝin. Tio ĉagrenigis la tie proksimajn manifestaciantojn, kiuj komencis puŝi minace la polican linion kaj insultadi la gvardistojn. Baldaŭ formiĝis tie ioma tumulto, do, kelkaj policistoj alkuris al tiu loko forlasante siajn poziciojn en aliaj lokoj de la apudmanifestacia linio. Iompostiom la partoprenantoj en la tumulto kalmiĝis kaj plejparto el ili revenis al sia antaŭa orda sinteno. Tamen kelkaj uloj daŭre estis puŝante tie kaj tie ĉi la polican vicon celante provoki perfortan reagon de iu aŭ alia parto de la antaŭfrontantaj flankoj. Kaj estis ankaŭ insultado al la gvardistoj. Vidante ke iu policisto tenis sian vizaĝon kovrita per tuko, iu manifestaciano diris laŭtvoĉe al alia: *Tiu policano verŝajne venis el Asturio, kaj li kovras sian vizaĝon por ke ni ne konu lin*. Kaj la alia ulo respondis: *Ne!, li kaŝas sian vizaĝon por ke ne konu lin lia patrino*. Alia manifestacianto kriis: *Tiuj ĉi mallaboremuloj laboras nur la tagojn, kiel hodiaŭ, kiam ni strikas.* Alia laboristo kriis: *Kion faros ĉi-tiuj policiuloj kiam ni kaj multaj aliaj laboristoj perdos nian laborlokon? Ja, estas ni, per nia laboro, kiuj subtenas ankaŭ ilin kaj ĉiujn aŭtoritatulojn*. Mi pensas ke ĉi-lasta parolanto esprimis tre pravan kaj ĝustan ideon.
Dume senĉese alvenadis pli kaj pli da homoj el la antaŭmarŝanta manifestacio, kaj tiu spaco al ili destinita fariĝis tute ne-sufiĉa por tiom granda amaso. Tial fariĝis pli kaj pli ofta la puŝado de la amaso sur la polica linio. La polica reago estis alvenigi al la plej minacitaj punktoj de la polica vico pli da veturiloj kaj gvardistoj retiritaj de aliaj punktoj. Mi pensas ke tiam la polica komandanto faris plurajn taktikajn erarojn. La plej grava eraro sendube estis ne bone antaŭkalkuli la necesan spacon por enteni la manifestacian amason. Alia eraro estis intenci kovri pli grandan spacon ol estus kapabla per la nombro da gvardistoj je kiuj li disponis. Tiuj du eraroj generis trian misdisponon: alvenigi al iuj punktoj trupojn retiritaj el aliaj lokoj same minacitaj.
Tio ebligis ke en la zono malpli gvardita, la amaso fine forbalais la polican reziston kaj sekve multmila amaso plenigis la tutan larĝon de la avenuo. De tiu rompiĝo-punkto la amasa ondo transigis sian movon laŭ la tuta longo de la manifestacio, antaŭenpuŝante la polican linion, kies komponantoj intencis retiriĝi kiel eble plej ordigite kaj alproksimiĝante al la cetero de siaj kolegoj. Kiam la antaŭenpuŝanta ondo alvenis al la zono kie la polica vico ŝirmiĝis malantaŭ la feraj bariloj, la tieaj manifestaciantoj rompis la ligilojn inter la bariloj kaj surterigis la barilo-pecojn okazigante grandan bruon pro klakado de la metalo sur la ŝosea ŝton-planko.
Estis en tiu momento kiam mi eksciis pri la tumulto. Mi vidis tiam ke la polica trupo venanta el la flanko de kie antaŭmarŝadis la manifestacio, retiriĝis tra tiu duonlarĝo de la avenuo ankoraŭ kontrolita de iliaj kolegoj, dum la tereno forlasita de ili estis tuj okupita de la manifestacia amaso. Dume la policistoj apud la ĵus faligitaj fer-bariloj retiriĝis ankaŭ ili, lasante plian terenon en tiu flanko por la antaŭenirado de la faligintoj de la barilaro. Tiel la tuta polica trupo de tiu flanko de la manifestacio restis amasigita en tiu loko fronte al la Ministrejo (en ties kontraŭa flanko de la avenuo) kaj tiam komenciĝis la batalado inter ili kaj la manifestacianoj. La kriego kaj bruo estis ne-priskribebla. Ankaŭ la moviĝo de la amaso estis konfuziga. Multaj manifestacianoj alkuris al la loko de la

interfrontiĝo por partopreni en la batalo. Sed multaj aliaj forkuris el tiu loko por ne troviĝi meze de la perforta agitado. Mi rapide metis mian edzinon for de tiu danĝera zono. Ni alproksimiĝis al la fasado de la Ministrejo pri Industrio. De la tiea podio iu sindikata lidero estis alvokante, per voĉlaŭtigilo, la manifestaciantojn por ke ili sin tenu pace kaj ne-perforte, kaj trakviliĝu la amaso. Post ilia regrupiĝo la policistoj intencis preni siajn pafilojn el la tie apudaj veturiloj kaj reagi kontraŭ la atako de la amaso. Sed -ĉio okazis tre rapide- la batalantaj manifestaciantoj prenis la ferajn barilojn kaj komencis ilin ĵeti kontraŭ la polica amaso, dum multegaj gemanifestaciantoj kriegis kontraŭ la polico: *Foren!, foren!*. Meze de la konfuzo kaj ĥaoso la polica trupo sukcesis konduti orde kaj discipline. Dum la pluvo da feraj bariloj faladis sur ilin, tiuj kiuj portadis plastikajn ŝildojn, kunigis ilin formante kvazaŭ testudan karapacon aŭ kirason, kovrante ankaŭ tiujn kunulojn kiuj ne posedis ŝirmilon. Tiamaniere ili retiriĝis tra la vico de iliaj veturiloj kaj el tie al la stratoj perpendikularaj al la "Kastilia" Avenuo.
Poste la manifestacia amaso okupadis la tutan larĝon de tiu avenuo, nun liberigita el policistoj. Sed la plej ekstremistaj inter la aktivuloj ne ĉesis en ilia skurĝado kontraŭ la polica forto. Ĉar tio okazis for de mia vidkampo, mi devas denove baziĝi sur la atesto de miaj konatuloj, kiuj spektis tion de proksime. Pere de ŝtonĵetilo iu ulo ĵetis kontraŭ la polica forto iun ekflamigitan raketon el la plej potencaj. En tiu perpendikulara strato estis tiam retiriĝante la policaj veturiloj. La fumanta raketo superflugis du vicojn da veturiloj kaj falis sur iu LAND-ROVER-tipa polica aŭtomobilo. La eksplodo okazigis al tiu veturilo teruran detruadon. Estas rimarkinda la malprudento de la uzantoj de tiuj eksplodiloj; se tiu raketo kiu trafis la veturilon, estus eksplodinte meze de la polica amaso, ĝi estus mortiginta tiujn kiujn ĝi estus trafinta. Feliĉe en tiu momento la membroj de la ordo-servo de la manifestacio, organizitaj de la propraj sindikatoj, konfiskis la raketojn kaj iujn ferajn ĵetilojn de tiuj eksplodiloj, kaj sukcesis kontroli la plej ekscititajn aktivulojn inter la manifestaciantoj. De tiam ne plu estis malordo kaj tumulto, kaj la oratoroj povis daŭrigi sian mitingon kaj siajn informajn intervenojn ekde la podio.
Iome ektimigis min la perforto kiun mi spektis. Konstituis ioma surprizo por mi konstati kiom facile povas rezulti katastrofaj tumultoj meze de homamaso, kiom facile iu ajn eta incidento povas generi senkontrolan konvulsion en kiu superregu la perforto, ĉefe kiam la animoj estas tro ekscititaj pro problemoj aŭ maljusteco.
Mi pensis ankaŭ ke la perforta tumulto povus esti finiĝinte alimaniere malplibone. Eble se la nuna registaro de ĉi tiu lando estus dekstrara, anstataŭ socialista, la polico estus permesita pafi mortigajn kuglojn kontraŭ la manifestacio, kaj tiam estus okazinte ĉi-tie vera masakro. Tiel disvolviĝis en Petersburgo en la jaro 1905 la manifestacio, gvidata de pastro Gapon, antaŭ la palaco de la Caro, kaj aliaj okazaĵoj historiaj. Tio estas pripensinda se ni konsideras ke en tiu ĉi lando en la balotoj okazontaj post kelkaj monatoj povas atingi venkon la politikaj fortoj de la burĝa dekstraro.
Tiam, jam noktiĝe, nia koncentriĝo antaŭ la Ministrejo pri Industrio alvenis al ĝia finiĝo. Eliris el tiu domo, post intervidiĝi kun la ministro S-ro Aranzadi, la delegacio de la Fera Marŝo kaj la ĉefaj lideroj de la hispanaj sindikatoj. Ili raportis pri la konversacioj kun tiu ministro. La rezulto estas malesperiga por la ferindustriaj zonoj de Hispanio. S-ro Aranzadi promesis ke plu estos negocado pri la kondiĉoj kaj monkompenso de la laboristoj kiuj devos forlasi la fabrikojn baldaŭ estonte, kaj estas espero ke tiuj kondiĉoj estos iome plibonigitaj por tiuj nov-senlaboruloj. Sed la ĉefa problemo restas ne-tuŝata, kaj ne-tuŝebla. La restrukturado-plano daŭre estas subtenata de la hispana registaro, kiu prezentos ĝin en Bruselo, al la aŭtoritatoj de la Eŭropa Komunumo, la 24-an de la venonta monato novembro.
Do daŭre staras la ĉefaj kialoj de la nuna konflikto. Daŭros la krizo kaj la malkontento. Kiel ĉio-ĉi finiĝos? Pli kaj pli mi restas maltrankvila pri la fina rezulto de ĉi-tiu afero, de la ĝenerala krizo de la lando,

de la socio... Tiu ĉi socio pruvis ke ĝi posedas konsiderindan kapablon asimili la krizon kaj ties konfliktajn sekvojn. Dum nia amaso manifestaciis ĉi-tie, la cetero de la madrida urbego kaj de la hispana lando faris sian normalan, ĉiutagan vivon. Sed dume, laŭ informis min mia bofratino loĝanta en ĉi-tiu urbo, en Madrido preskaŭ ĉiutage estas iu aŭ alia manifestacio de diversaj homaj kolektivoj, aŭ labor-sektoroj, aŭ landaj anguloj, kiuj plendas kontraŭ la registaro pro iu aŭ alia kaŭzo. La sistemo kapablas asimili kaj digesti tiujn konfliktojn kaj ioman gradon da malordo, kaj situigi ilin ene de normala kaj paca ĝenerala kunteksto. Sed, ĝis kioma grado da malordo kaj ne-normaleco kapablos elteni la sistemo ĝis la punkto de degradiĝo de la socia kunvivado? Kaj, kiom distance ni troviĝas de tiu punkto dum senĉese pli kaj pli da personoj estas forigitaj el la normala vivo de laborado? Mi timas ke de nun plu kaj plu tiu konflikta vivo de malordo kaj batalado fariĝos la ĉiutaga vivoformo por pli kaj pli da personoj en ĉi tiu lando kaj en la tuta mondo. Al kiuj formoj de frenezaĵo kaj senracio evoluas ĉi-tiu socio post la ŝanĝegoj kiuj laste skuigis nian mondon? Ŝajnas al mi ke ne estas hazardo ke hodiaŭ, en Oriento kaj en Okcidento, malpli da voĉoj ol antaŭ kelkaj jaroj prikantas la faligon de la Berlina murego kaj aliajn tiamajn okazintaĵojn. Malpli da voĉoj, ol tiam, promesas al ni feliĉan kaj prosperan estontecon.



La 7-a de decembro - 1993)

Kara kamarado,

Vi povas konstati ke, kiam mi verkis -antaŭ pli ol unu jaro- la laste transskribitan tekston, mi finfine iom havis esperon pri la reboniĝo de la komunistaj pozicioj en Eŭropo kaj en la mondo kaŭze de tio ke la popoloj de Orienta Eŭropo ekkonsciiĝos pri la ega trompo en kiu ili falis dum la pasintaj jaroj. Estis kvazaŭ mi, post la longdaŭra pesimismo kiun mi spertis dum la fina etapo de la Perestrojko kaj ties katastrofaj sekvoj (pesimismo aŭ senespero kiu bone respeguliĝis en miaj antaŭaj skribaĵoj ĉi-transskribitaj), komencis havi esperon pri la reiĝo de la forto kaj la prestiĝo de la komunistaj fortoj.

Nu, de tiam iom-post-iom tiu pliboniĝo konkretiĝadis en diversaj lokoj. En la lasta balotado en Litovio, antaŭ kelkaj monatoj, atingis venkon la partio de la antikvaj komunistoj. La samo okazis antaŭ du monatoj en Polio. La specialistoj pri politikaj aferoj anoncas similan evoluon en Hungario, Bulgario kaj eble ankaŭ en Rumanio. Multaj el tiuj spertuloj opinias ke la puĉo de Jelcin celis preni poziciojn por alfronti avantaĝe eblan popolan reagon tiusence en Rusujo. Kaj fine, antaŭhieraŭ, en balotoj okazintaj en du malsamaj landoj, la t.n. "antikvaj komunistoj" atingis sufiĉe bonajn rezultojn: en Orienta Germanio pliboniĝis la pozicioj de la komunistoj dum malsukcesis la Kristano-demokratia partio de S-ro Khol, iam gvidinta la reunuiĝprocezon. En Italio, kie okazis balotado por elekti urbajn konsilantarojn, la burĝaj partioj, tre implikitaj lasttempe en aferoj de koruptado, suferis kolosan malsukceson, dum venkis en la ĉefaj kaj grandaj urboj, eĉ en Romo, la kandidatoj de la partio iam nomita P.C.I.

Mi taksas tiujn rezultojn laŭ ilia ĝusta valoro. La fakto ke okazis tiuj pribalotaj venkoj de la iamaj komunistoj montras ke oni ne povas trompadi poreterne ĉiujn popolojn. Ankaŭ evidentiĝas kiom multe eraris tiu kiuj komparis, antaŭ malmultaj jaroj, la disfalon de la komunistaj reĝimoj kun ties de la faŝismo fine de la Dua MondMilito. Estas tute ne-imagebla iu reboniĝo, en la balota tereno, de la faŝistaj pozicioj en la jaro 1950 kiel tiu de la komunistaj okazantaj nuntempe. Eĉ hodiaŭ, post 50 jarojn de la faŝisma malvenko, kaj kvankam iom plifortiĝis la faŝismo lasttempe, ĝi daŭre ne estas afero amase akceptita de la loĝantaro. Vi vidu kiom malsimila estas la situacio de la komunistaj fortoj. La dekstraro devas iri al defendaj pozicioj kaj puĉi kaj agadi kontraŭdemokratie por eviti

nian progreson: ĝuste la malo ol tio kion proklamis la kontraŭkomunista propagando.
Asertinte tion, mi volas ankaŭ deklari ke, tamen, mi ne estas tro optimisma pri la ebleco de la komunistaj fortoj rehavi sian antikvan povon en Eŭropo kaj en la mondo. La rekonstruado de la iama socialista bloko ne estus ebla nuntempe kvankam okazus komunista pribalota venko en ĉiuj Eŭropaj landoj. La hodiaŭaj ĵurnaloj publikigas la informon ke la usonaj nukleaj raketoj daŭre celas la rusan teritorion. Ne estas hazardo tio ke faris tiun deklaron la usona prezidento B. Klinton ĝuste hieraŭ, la 6-a de decembro, tuj post la ekkono de la rezultoj de la menciitaj balotoj. La kaŝita mesaĝo de tiaj deklaracioj estas tio ke Usono estas la ununura vera militista potenco en la mondo, kaj ke ĝi estas preta uzi sian forton por eviti la renaskiĝon de komunista potenco. La iam trompitaj popoloj pagos ankoraŭ dumlonge siajn erarojn de la lastaj jaroj.
Krome estas alia fakto pri kiu mi deziras ne trompi min mem. Mi bone konscias pri tio ke la hodiaŭ t. n. partioj "eks-komunistaj", "antikve komunistaj" aŭ simple "komunistaj", ne estas veraj marksistaj-leninistaj organizaĵoj. Tiel en Orienta Eŭropo kiel en la ĉiama kapitalista mondo, multaj kompartioj estis refonditaj, kaj multaj el ili eĉ ŝanĝis sian nomon, kiel tiuj de Bulgario, Italio, Polio k.a. Cetere eĉ tiuj kiuj konservas sian antikvan nomon kaj statutaron, en la realo sufiĉe ŝanĝis en sia origina, leninisma esenco. Ankaŭ tiurilate estos tre malfacile en la estonto reigi la situacion tia kia ĝi estis antaŭe, kaj estis skribite en neniu loko ke oni sukcesos tion fari. Fakte, kelkaj el tiuj partioj -inter kiuj eble oni devas enkalkuli la Ĉinan kompartion-senhalte evoluos al oportunismaj, social-demokratiaj pozicioj. Mi tre deziras erari en tiu antaŭkalkulo, sed mi timas ke tiurilate mia profetaĵo tiom estos trafa kiom multaj aliaj kiujn mi faris en aliaj okazoj.
Cele de kompletigi la informon pri la situacio de la ferindustria fabriko kie mi laboras, mi daŭrigas la transskribadon de miaj verkaĵoj de la pasinta jaro. Jen mi enkondukas sekve la kolekton de novembro de la pasinta jaro.

(la 1-a de novembro - 1992)

Komenciĝas novembro-1992, la monato kiam, fine, oni decidos pri la restrukturado-plano por la hispana ferindustrio. La 24-a ĉi-monate, en Bruselo, la ministroj de la Eŭropa Komunumo decidos ĉu aprobi aŭ ne la planon de la hispana regantaro. La ferindustriaj laboristoj de ĉi-tiu lando akre batalis, kaj daŭre batalas, kontraŭ tiu plano. Nia nuna timo estas ke la Eŭropaj aŭtoritatoj ĝin aprobu, aŭ malaprobu ĝin postulante ŝanĝojn eĉ pli malfavoraj por ni. Tia estas la situacio.
Tial ke la laboristaj mobilizoj pludaŭros, samkiel la obstino de la aŭtoritatoj, mi antaŭvidas ke ĉi tiu monato estos plena da malagrablaj eventoj kaj danĝeraj situacioj. Komence, ekde antaŭhieraŭ, la ferindustriaj fabrikoj de Hispanio jam ne plu apartenas al la hispana ŝtato. Ili estis transdonitaj al iu abstrakta kaj fantoma ento nomata "Fer-industria Korporacio". Tio konstituas gravan paŝon en la procezo de likvidado de tiu industrio en mia lando. Inter la akcio-posedantoj de tiu "Ferindustria Korporacio", la hispana ŝtato nun posedas nur 50 procento el la propraĵo. La cetera duono el la akcioj apartenas al kelkaj bankoj kaj aliaj similaj interesoj -landaj kaj fremdaj- kies ĉefa celo estas, precize, la malaperigo de la ferindustrio. Jam de nun la ekonomiaj specialistoj konsideras ke tiu ento, "Fer-industria Korporacio" havas preskaŭ nulan kapablon je memfinancado, kaj oni spekula-cias pri la ebleco ke post malmultaj monatoj ne eblos pagi la salajrojn al la gelaboristoj.
En tiu ĉi kunteksto, la laboristoj de mia fabriko profitas ĉiun okazon por plendi celante atentigi la socion pri la danĝero kiu venas sur nin. Inter tiuj plendo-agoj, tre oftaj lasttempe, eble la plej spektakla estis tiu kiun oni entreprenis hieraŭ: aro da laboristoj de ENSIDESA, ĉefe sindikatanoj, okazigis tumulton, agitigan manifestacion en la loko kaj momento de la oficiala akto por disdonado de la premioj "Princo de Asturio". Eble mi devas klarigi kio estas la premioj "Princo de Asturio", kaj kio estas la Princo de Asturio mem.
Asturio, la regiono kie mi naskiĝis kaj vivas, estas nomata "Princ-lando", t. e. princa lando. Ĝi estis regno dum iom da tempo, en Mezepoko. Ĝi estis kristana regno naskiĝ-inta en la kunteksto de militado kontraŭ la araba gento kiu invadis Hispanion en la 7-a jarcento p.K. Kiam la kristana (re)konkerado

de la teritorio okupita de la araboj progresis suden, la kristanaj reĝoj forlasis Asturion kaj establiĝis komence en Leon-regiono kaj poste en Kastilio. Do Asturio ĉesis esti regno kaj fariĝis "princlando". La flago de ĉi-tiu princlando aŭ regiono estas blua kun flava kruco, kiu aperas en kelkaj fotografaĵoj de la Fera Marŝo. Iamaniere la "princa lando", Asturio, restis ligita al la hispana Kron-princo, tio estas, la filo de la Reĝo de Hispanio, la heredonto de la hispana trono kaj krono. Do, la titolo "Princo de Asturio" signifas "estonta Reĝo de Hispanio", samkiel la heredonto de la brita trono kaj krono titoliĝas "Princo de Gales". Klariginte tion, restas nur aldoni ke la nuna Princo de Asturio estas Felipe de Borbono, dudekjara junulo, filo de la nuna Reĝo Johano-Karolo la 1-a. Nun mi klarigu ke la "premioj Princo de Asturio" estas iu afero kiu funkcias tute simile al la famkonataj "Nobel-premioj", t. e.: ekzistas iu fondaĵo kiu provizas la premiajn monsumojn; iu konsilantaro agante laŭ propra leĝaro pristudas la proponojn por premiado, kaj decidas la asignadon de la premioj laŭ la meritoj de la proponitaj homoj aŭ institucioj. Oni premias la laboron kaj la atingaĵojn en la terenoj de la kulturo, la scienco, literaturo... tute simile al la Nobel-premioj. Eĉ ekzistas iu premio, nomata "al la konkordo", kiu tute ekvivalentas al la Nobel-premio pri "Paco". La geesperantistoj de ĉi-tiu regiono proponis, de antaŭ kelkaj jaroj, ke la premio "Princo de Asturio" al la Konkordo estu asignata al la Internacia Lingvo "Esperanto", sed ĝis nun ni ne sukcesis en tiu strebo.

Inter la ĉi-jaraj premiitoj troviĝas la fama kino-aktorino Liz Tajlor pro ties gvidado de institucio kiu batalas kontraŭ la AIDS-malsano; ankaŭ la Sud-Afrika nigra lidero Nelson Mandela pro ties dediĉiĝo al la batalado kontraŭ la rasisma apartigo; kaj la hispana verkisto Kamilo J. Cela, kiu atingis pasintjare la Nobel-premion pri Literaturo; kaj aliaj gravaj fakuloj. Por transdoni la aljuĝitajn premiojn venis al Asturio, same ol la antaŭaj jaroj, La Reĝino Sofia kaj ties filo la Princo Felipe. La transdono de la premioj estas ege solena ceremonio okazanta en luksa teatrejo. Ĉeestas tiun akton multaj gravaj uloj kaj altranguloj je regiona kaj landa nivelo, samkiel eksterlandaj invititoj. Multaj ĵurnalistoj el la tuta lando venas al Oviedo, la Asturia ĉefurbo, por foti kaj raporti pri tiu solenaĵo; same la radio-



*Oviedo, ĉefurbo de Asturio. En la supra fotaĵo, la Palaco-teatrejo kie okazadas la oficiala disdonado de la premioj Princo de Asturio", kaj en ties ĉirkaŭaĵoj (malsupra fotaĵo), la palaco de la Parlamentejo de la regiono.*



raportistoj kaj la fakuloj de la televidaj kanaloj penas plenumi sian informan taskon pri tiu solena evento. Ĝenerale, multe da publiko el la ordinara popolo klopodas spekti, ekde la stratoj ĉirkaŭ la teatrejo, la gefamulojn alvenintaj por ĉeesti la akton. Ĉi-jare la plej famaj el la ĉeestantoj sendube estis la menciitaj Nelson Mandela kaj Elizabet Tajlor.

Nu, precize tiun akton volis interrompi perforte miaj kunuloj de la ferindustria entrepreno. Oni povas supozi ke la ĉiutipaj altranguloj ĉeestantaj la ceremonion estas protektitaj, garditaj, de sufiĉe granda




Famkonataj ĉi-jaraj ricevintoj de la premioj "Princo de Asturio".

nombro da policistoj. Verdire la manifestaciantoj de ENSIDESA uzis neniun perforton, kaj ili volis interrompi nenion, kaj krome ili sciis ke forta polica garnizono gardos la ordon en la teatrejo kaj ties ĉirkaŭaĵoj. Sed ili volis, jes ja, okazigi egan tumulton, provoki iom rimarkindan kaj spektaklan okazaĵon, cele de ke tiom da ĵurnalistoj de la informmedioj raportu pri ĝi, por diskonigi nian problemaron, por ke oni pritemu la aferon de la hispana ferindustrio, por ke ĉiuj sciu ke la socia situacio ne estas normala kvankam per aktoj kiel tiu de la premioj Princo de Asturio oni pretendas ŝajnigi ke ĉio iras glate kaj normale en ĉi-tiu socio.

Tiun celon ili iamaniere atingis. La ĵurnaloj kaj ceteraj informiloj, krom raporti pri la solena akto de la premio-disdonado kaj pri la diskursoj de la premiitoj, kaj pri anekdotoj, kiel tiu de Liz Tajlor, kiu tro ema saluti la Princon, ne respektis sian ordon en la vico; krom raporti pri ĉio-ĉi, la informiloj devis temi ankaŭ pri la tumulto de la ferindustrio-laboristoj, pri la problemoj de tiu industrio... kaj pri la sekvoj de la tumulta manifestacio. La sekvoj estis ke okazis akra batalo en la stratoj de Oviedo, inter la laboristoj de ENSIDESA kaj la polico. Kaj estis



sufiĉe granda nombro da vunditoj kaj kontuzitoj, kaj tri laboristoj, de la komunista sindikato, kaj membroj de la sindikata komitato de la entrepreno, estis arestitaj. Hodiaŭ ili estis liberigitaj sed oni faros al ili juĝ-proceson. La ĵurnaloj publikigas fotografaĵojn de tiuj disturboj.









Tiel finiĝis la monato oktobro-1992. Dum tiu monato ni havis multajn konfliktojn kaj batalojn. Kaj, kiel dirite, la monato kiu komenciĝas hodiaŭ ne estos trankvila precize.

(la 11-a de novembro -1992)

Dum la antaŭaj tagoj okazis en la mondo kelkaj menciindaj eventoj. Unue, en la balotado en Usono, la 3-a ĉi-monate, estis elektita, kiel nova Prezidento, la kandidato de la demokrat-partio, Klinton. Mi ne scias ĉu tiu venko de Klinton kontentigas min. Tamen ĉi-tio estas vera: tre ĝojigas min la malvenko de Bush. Kaj estas vero ankaŭ tio ke nun mi atendas kun granda intereso spekti la manieron kiel la nova Us-prezidento alfrontas la ekonomian krizon kiu tiom domaĝas lian landon. Oni diras ke li venas akompanata de grava stabo da eminentaj ekonomiistoj studintaj en la plej prestiĝaj universitatoj. Mi ripetas: scivoleme mi atendas vidi kiel tiu taĉmento da ekonomio-eminentuloj faras por trovi

solvon, ene de ĉi-tiu kapitalisma sistemo, por problemoj ne-solveblaj ene de la sistemo.
Alia grava okazintaĵo, je internacia nivelo, estis, laŭ mia opinio, la grandaj manifestacioj okazintaj en Berlino kaj aliaj germanaj urboj, antaŭ pluraj tagoj, kontraŭ la rasismo kaj la ksenofobio. Por tiu mobilizo kontraŭ la faŝisma sento de la rasa malamo oni elektis la daton kiam plenumiĝas ĝuste 54 jarojn de la komenciĝo de la naziisma persekutado kontraŭ la gejudoj en Germanio. Lasttempe, kaj okaze de la nuna situacio en tiu lando, oni tre spekulacias -la presaro k.a.- ĉu estas komparebla la nuna situacio al ties de Germanio antaŭ 50 jaroj, aŭ alimaniere demandite: ĉu eblus hodiaŭ simila rasisma persekutado kaj rasmortigo kiel tiu plenumita de la hitlera reĝimo. Same abundas tiuj opiniantaj ke reaperas tiu danĝero, kiel la opiniantoj ke ne eblas hodiaŭ tiutipa faŝisma masakrado. La afero vekas mian intereson, sed ne estas facila por mi formuli klaran opinion pri ĝi.
Unue mi devas diri ke la historiaj situacioj neniam estas tute egalaj. Povas unu situacio simili pli- malpli-grade al alia antaŭa situacio, sed la cirkonstancoj ne ripetiĝas entute. Nuntempe, la fakto mem ke ekzistas socia antaŭzorgo kontraŭ la rasismo -kiel atestas la menciita mobilizo en Germanio kaj en aliaj lokoj- konstituas gravan elementon de diferenciĝo al la situacio de 1936.
Sed ni ne tro pritaksu la progresistajn elementojn de nia mondo. La fakto mem ke tiu kontraŭrasisma mobilizo fariĝis necesa, pro la abundo da faŝismaj agresoj lasttempe, montras al ni ke la danĝero ne malaperis definitive. Estas evidenta ke la faŝisma sento renaskiĝas kun nova impeto. Kaj tio prezentas antaŭ ni surprizigan fakton. Ŝajnas ke en la nuna epoko devas esti tute ne-atendita tiu evoluo de la socio. Por kompreni tion ni devas prikonsideri en kiuj cirkonstancoj naskiĝas kaj plifortiĝas la faŝismaj reĝimoj. Ni pristudu, ekzemple, la historiajn cirkonstancojn de la apero de la faŝismo de Mussolini en Italio, la hitlerismo en Germanio, poste la hispana frankismo... kaj aliaj.
La komuna karakteraĵo de ĉiuj-ĉi socioj estis ke la faŝisma movado prezentiĝis kiel reago kontraŭ maturiĝintaj revoluciaj procezoj. Kiam la ekonomia krizo en tiuj socioj igis ke la popolamasoj perdis sian fidon al la demokratiaj institucioj de la ŝtato, la tieaj burĝaroj, antaŭ la danĝero perdi la ekonomian kontrolon favore al revoluciaj reĝimoj, reagis generante kaj apogante politikajn fortojn, kontraŭdemokratiaj kompreneble, ekzaltantaj konceptojn kiel patrujo, propraĵo, raso, k.s. Ju pli la burĝaro de iu lando perdis aŭ danĝeris perdi la kontrolon de la ŝtato per demokratiaj metodoj, des pli la faŝismaj movadoj prosperis kaj ĝuis la apogon de tiuj posedantaj sociaj klasoj. En Britio, Usono, k.a. kie la burĝaro bone kontrolis la situacion per la leĝoj kaj la demokratiaj iloj de la sistemo, la faŝismaj movadoj restis kiel ne-grava afero. Klare parolante: la naziismo kaj similtipaj reĝimoj venkas kiam antaŭe estis danĝero de revolucia venko. Same okazis ankaŭ en Ĉilio, Argentinio kaj aliaj lokoj. La puĉo de Pinoĉet okazis kaj sukcesis kiam la burĝaro de Ĉilio konstatis ke per la demokratiaj metodoj prosperis en tiu lando la revoluciaj kaj transformigaj fortoj kiel tiu koalicio estrita de S. Allende. Ni povas konkludi asertante ke la burĝaj kaj posedantaj klasoj uzas la faŝismon kiel kuracilo kontraŭ la revolucio kaj la liberigaj movadoj de la socio.
Formulinte tiun aserton, ŝajnas ne-logika ke refortiĝu tiutipaj faŝismaj organizaĵoj en ĉi-tiu epoko, kiam la maniero kiel finiĝis la Malvarma Milito signifas la kompletan venkon de la kapitalismo super la Komunismo, de la burĝaro super la laboristklaso, de la privata propraĵo de la produktadrimedoj super la socialismo kaj la planita ekonomio. Krome, kaj laŭ la burĝa propagando, la fiasko kaj disfalo de la komunistaj reĝimoj kaj de la gerilaj movadoj de nacia liberigo en multaj landoj de la Tria Mondo, alportis grandan malprestiĝon por ĉiuj revoluciaj movadoj en la mondo kaj por ĉiuj revoluciaj filozofioj, ĉu marksismaj, ĉu anarkismaj k.a.
Se tia estas la situacio, se la kapitalismo atingis kompletan kaj definitivan venkon, se tiu sistemo restis pli forta ol ĉiam antaŭe, kaj krome ĝi rezultas ne-venkebla, se ne

eblas alternativa sistemo al ĝi, laŭ pretendas la burĝa propagando, se la komunisma ekonomio, laŭ la aserto de tiuj sinjoroj, iras kontraŭ la homa naturo kaj tial ne eblas ĝia venko... Kial, do, la faŝisma reago de la reakciaj klasoj? Kontraŭ kio ili reagas? Kontraŭ kia malsano oni pretigas tiun kuracilon?

Ni devas veni al la konkludo ke la situacio de la kapitalisma sistemo ne tiom estas fortika, kiam tiele oni pretas defendi ĝin. La krizo de tiu sistemo estas la plej granda ol ĉiuj spertitaj ĝis nun. Neniam antaŭe estis tiom klare percepteblaj la kondiĉoj por monda revolucio. Sendepende de la ruiniĝo de la ekzistinta Socialista bloko, sendepende de tio kio povos okazi en la ankoraŭ komunistaj reĝimoj de Ĉinio kaj Kubo (tiuj reĝimoj povas bankroti ankaŭ ili pro la premo de siaj kontraŭdiroj internaj kaj eksteraj - pli gravaj la eksteraj ol la internaj en la kazo de Kubo-), sendepende de kiom forta povus resti la NATO kaj la imperiismo post ilia venko super la Komunismo, sendepende de ĉio-ĉi, la realo estas ke en la mondo ankoraŭfoje interbatalas la fortoj kiuj volas ke ĉio restu senŝanĝa, kaj tiuj revoluciaj fortoj kiuj ne povas kaj ne volas elteni la nunan mondan situacion. Tial la burĝaro ankoraŭ ne maldungas la faŝismajn movadojn. Tial la progresistaj fortoj de la mondo devas plu atenti pri tiu danĝero. Tial ni devas esti pretaj por alfronti eĉ ne-antaŭviditajn situaciojn, ĉar en krizo kiel ĉi-tiu kiu frapas nin kaj plu skurĝos nin estonte, povos okazi ĉio eble, eĉ la ne-konata kaj ne-antaŭvidita.

Kaj nun, de la ĝenerala krizo de la sistemo mi pasu al la partikulara, specifa, krizo de la entrepreno kie mi laboras. Ankaŭ ĉi-tie okazas ne-atenditaj eventoj.

Kiam, je la komenciĝo de ĉi-tiu monato, mi anoncis ke ankaŭ en novembro abundos la mobilizoj de la ferindustriaj laboristoj, mi tute ne imagis al mi ke tiuj mobilizoj alprenus la formon kiun ili fakte alprenis. Mi pensis pri pliaj striko-tagoj, ankaŭ pri kromaj manifestacioj, eble ankaŭ alia "Batalo de Somontes"... sed neniel mi povus koncepti la agojn kiujn oni entreprenis de antaŭ pli ol unu semajno, kaj la situacion nun kreata en la fabriko kie mi laboras. Okazis nek pliaj striko-tagoj, nek manifestacio, nek "Somontes-batalo". La 3-a ĉi-monate, la laboristoj de la subkontraktaj entreprenoj iniciatis alitipan batalagon. Jam mi eksplikis ke tiuj laboristoj estas la plej batalemaj en la nuna krizo-procezo de la ferindustrio. Pro ilia situacio -ili estas eventualaj laborantoj kaj kiam perdos sian laborlokon ne rajtos ricevi kompensojn kiel la fiksaj laboristoj- ili perdos ĉion se malpliiĝos la ŝtalo-produktado de ĉi-fabrikoj. Tiuj cirkonstancoj metas ilin en la unua vico de la batalo kontraŭ la ferindustria restrukturado. Sed ilia batalo ne ĉiam koincidas kun la intereso de la ceteraj laboristoj; tia povas esti la nuna kazo. Jam mi diris ke tiuj laboristoj de la subkontraktaj entrepren(et)oj partoprenas en la produktad-procezo en niaj ŝtalo-faraj fabrikoj, kvankam ili ne apartenas al la entrepreno ENSIDESA sed al aliaj firmoj kiuj subkontraktas tiujn laboraĵojn kaj pagas al ili malpli da salajro ol ricevas la ENSIDESA-laboristoj.

Ilia batalago, do, estis ĉesigi sian intervenon en la fabrika produktado. Ili strikas, ili ne laboras, sed dume ili okupas la fabrikajn instalaĵojn kaj ne permesas ke laboru la ceteraj laboristoj de la fabriko. Do la tuta produktad-procezo estas interrompita, haltigita. La stranga elemento de tiu situacio estas ke, ĉar la ENSIDESA-laboristoj ne strikas -ili ne laboras tial ke oni ne povas garantii al ili la normalan funkciadon de la instalaĵoj- ili (ni) devas ricevi siajn salajrojn normale. La entreprenistaro anoncis ke ili ne povas toleri tiun situacion, kaj minacis fermi la fabrikon laŭleĝe, kaj sendi ĉiujn ge-laboristojn al siaj hejmoj ĝis tute oni finklarigos kaj solvos la situacion. Sed la fakto ke estas ke oni ne prenis ankoraŭ iun ajn decidon, aŭ pli ĝuste, la solan decidon ĝis nun, fare de la ENSIDESA-entreprenistaro estis la nuligo de la kontraktoj kun la sub-kontraktaj entreprenoj, kaj ĉi-tiuj, sekve, nuligis siajn kontraktojn kun la propraj laboristoj. Do tiuj gelaboristoj estas nun for de ĉiu laborrilato, sed dume ili daŭre okupadas la instalaĵojn de nia ferindustria fabriko. Pasis jam 8 tagoj de la komenciĝo de tiu batalago kaj ankoraŭ la situacio restas senŝanĝa: tiuj laboristoj sin alternas laŭ 12-horaj periodoj

deĵorante en la okupitaj instalaĵoj por ne permesi ties normalan funkciadon. Dume la ENSIDESA-laboristoj venas al siaj labor-lokoj ĉiutage kaj restas senlabore tial ke ne eblas reigi la produktadon pro la okupado de la instalaĵoj.

Tio okazas, kiel dirite, ekde la 3-a ĉi-monate, sed nur en la fabriko de Gijon. Mi devas klarigi ke ENSIDESA posedas en Avilés, distance 15 kilometrojn el Gijon, alia ferindustria fabriko, pli granda ol ĉi-tiu de Gijón. En tiu fabriko de Avilés ne ekzistis la situacio kiun mi priskribis. Sed hieraŭ la tieaj laboristoj de la sub-kontraktaj entreprenoj venis amase al la fabriko de Gijon kaj faris asembleon kune kun siaj ĉi-tieaj kolegoj. En tiu asembleo oni decidis ke se iliaj postuloj ne estos atendataj de la entreprenistaro, ili plenumos saman agon en la alia fabriko.

Iliaj postuloj, cetere tute justaj, estas ke iliaj labor-kondiĉoj, salajro-kondiĉoj kaj ceteraj rajtoj, estu la samaj ol ties de la fiksa laboristaro de ENSIDESA. Ni memoru ke la sola koncesio atingita dank' al la Fera Marŝo kaj al la manifestacio en Madrido, en kiuj parto-prenis ankaŭ ĉi-tiuj sub-kontraktaj laboristoj, estis la plibonigo de la kondiĉoj de la frua emeritiĝo kaj monkompenso de la ferindustriaj laboristoj kiuj perdos sian labor-postenon. Nu, tiu koncesio tute ne koncernas al tiuj sub-kontraktaj laboristoj ĉar ili eĉ ne havas fiksan labor-lokon; ili estas nur eventualaj laborantoj; ili nur rajtas ricevi la etan monkompenson kiun ricevas, dum malmulte da tempo, la novaj senlaboruloj de ĉi-tiu lando. Kompreneble, la gvidantoj de la Ferindustria Korporacio respondis nee al la postuloj de tiuj laboristoj. Mi diras ke estas kompreneble tiu teniĝo ĉar se oni dungis laboraĵojn al tiuj subkontraktaj entreprenoj estis, precize, por ke la produktado rezultu malpli kosta kontraktante malplikostajn laboristojn, laboristoj kun malpli da rajtoj kaj pli malaltaj salajroj. Tia estas la logiko de la kapitalisma sistemo.


Do, la afero restis senŝanĝa, kaj hodiaŭ ankaŭ la fabriko de Avilés estis okupita de tiuj subkontraktaj laboristoj kaj estis interrompita la produktado-procezo. La fiksaj laboristoj de ENSIDESA partoprenas neniel en tiu ago. Eble plejparto el ili rigardas tiun batalon de la aliaj laboristoj nek simpatie nek malsimpatie. Sed multaj el ili timas ke rezulte de tiu ago okazos por ili malagrablaĵoj, kiel la laŭleĝa fermo de la fabrikoj fare de la entreprenistaro. Kaj ĉefe, ĉiuj timas ke rezulte de tiom da tagoj sen produktado, pli malboniĝos la ekonomia situacio de la entrepreno antaŭenigante ties definitivan bankroton kiun, ĉiukaze kaj sen ĉi-tiuj pliaj problemoj, oni antaŭvidas kaj anoncis por post malmultjara periodo.

Tia estas la situacio hodiaŭ, kaj neniu kuraĝas antaŭdiri kia ĝi estos post malmultaj tagoj.

(la 15-a de novembro - 1992)

Tre hontigas kaj konsternigas min iu informo publikigita en la hodiaŭaj ĵurnaloj. Antaŭ du noktoj okazis en Mia lando, konkrete en la ĉirkaŭaĵoj de Madrido, iu rasisma krimo. Iu 33-jara virino, enmigrintino el iu Sud-Amerika lando, estis murdita, kaj kelkaj el siaj gesamfamilianoj rezultis vunditaj. Pafis kontraŭ ili kelkaj uloj, membroj de iu el la multaj rasismaj, ksenofobiaj faŝistaj bandoj, kiuj nuntempe tiom abundas en mia lando kaj en aliaj lokoj en Eŭropo.

Tiu murdita virino kaj siaj gesamfamilianoj estas iuj el la multaj fremdaj enmigrintoj el Sud-Ameriko kaj el Norda kaj Centra Afriko, kiuj en ĉi-tiu malfeliĉa epoko serĉas vivrimedojn for de iliaj patrujoj, kaj vivas ĉi-tie en tre malbonaj kondiĉoj, ne indaj je homaj estaĵoj. Tiu virino laboris, ĝis antaŭ malmultaj tagoj, kiel domservistino, sed ŝia mastrino forpelis ŝin el tiu laboro kiam ŝi malsaniĝis. Ŝi kaj ŝia familio loĝas en la restaĵoj de iu konstruaĵo kiu iam estis iu luksa nokt-dancejo sed hodiaŭ fariĝis ruiniĝanta konstruaĵo. Mi konas tiun lokon (kiu aperas en la ĉi-algluita fotografaĵo) ĉar ĝi troviĝas ĝuste apud la ŝoseo de la norda enirejo al Madrido. Apud tiu loko pasis, antaŭ pluraj semajnoj, la alvenanta al Madrido Fera Marŝo de la ferindustriaj laboristoj de la nordo de Hispanio. Apud tiu loko pasis la aŭtobusoj per kiuj mi iris plurfoje al Madrido ĉi-jare. Mi vidis tiun ruinan konstruaĵon kaj neniel mi supozis ke ĝi estus loĝejo de homoj...








Kaj tamen mi devus supozi kaj scii ke multaj personoj vivas tiamaniere en mia lando kaj ĉefe en la ĉirkaŭaĵoj de Madrido, ĉar en tiu urbego mi vidis ĉi-jare infanojn kun sen-ŝuaj piedoj almozpetante en la stratoj. Mi vidis kiom multe kreskiĝis lasttempe la prostituado, kiu ĉiam estis granda en tiu urbo. Estas en Madrido ampleksaj kvartaloj en kies stratoj abundas la inoj ofertante sian prostituo-servon. Ĉi-jare mi konstatis ke nun estas ankaŭ multaj viroj dediĉitaj al tiu malnobla komerco destinata al tiuj proletar(in)oj al kiuj ne eblas alia labor-formo. Multaj junuloj, ĉefe nigr-rasuloj, ofertis dungi sian korpon al tiu, viro aŭ virino, kiu volus helpi ilin pagi sian tiutagan noktmanĝaĵon. Alie, la nombro da gealmozuloj estas enorma, kaj mi rimarkis ke la gemadridanoj preskaŭ ne atentis pri ili.

Nu, ĉi-tiu socio, kiu ne kapablas konstrui home dignan viv-medion por la malfeliĉuloj, tamen ĝi kapablas generi faŝistajn bandojn de perfortuloj kiuj sin dediĉas al la masakrado de la almozuloj. Ke Dio pardonu nin!. Tia estas la mondo de la Nova Internacia Ordo de la venkintoj de la Malvarma Milito.

Feliĉe ne ĉiuj miaj samcivitanoj tiom estas egoismaj. Tiu murdo okazinta antaŭ-nokte vekis grandan malaprobon kaj konsternon en mia lando. Nun oni estas organizante, far de la partioj kaj rondoj de Maldekstraro, manifestacion kontraŭ la rasismo kaj la ksenofobio, kaj petante la serĉadon kaj punon de la agresintoj. Laŭ la informiloj daŭre okazos similaj publikaj kondamnoj de la faŝismo en Germanio, konkrete en Bonn. Estas tre konvenaj kaj necesaj ĉiuj ĉi agoj por fortiri ĉiun moralan apogon de la socio al la refortiĝanta faŝismo. Kaj estas aliaj laŭdindaj agoj de multaj el miaj hispanaj gesamcivitanoj. Multaj hispanaj familioj akceptis ricevi por zorgi dum iom da tempo pri geinfanoj el Jugoslavio, por ilin savi el la hororoj de la tiea civila milito. Dum daŭre ekzistas en la mondo tiutipaj homamaj personoj, ne estas ĉio perdita por nia homa specio. Daŭre estas espero ke en tiu eterna batalado inter egoismo kaj homamo, inter reakcio kaj revolucio, fine kaj por ĉiam venku la fortoj de la homa progreso.

Nun mi devas priskribi kiel evoluis la situacio en la fabriko kie mi laboras, kie estiĝis iu konflikta situacio por la okupado kaj produktad-interrompigo far de la subkrontraktaj laboristoj. Inter la eblaj okazaĵoj, kiujn mi estis timinta, troviĝis io kio fakte konkretiĝis en la realo. Temis pri la ebleco de malakordo kaj malamo inter laboristoj kaj laboristoj. En la ĝisnunaj bataloj pro la restrukturado de la ferindustrio, ĝenerale estis sufiĉe kontitiga unueco inter ĉiuj laboristoj: la fiksaj ENSIDESA-laboristoj, kaj la eventualaj subkrontraktaj laboristoj. Ĉiuj kune, ni partoprenis en la ĝisnunaj strikoj, en la manifestacioj, en la Fera Marŝo, en la "Somontes-bataloj"... sed tiu ago entreprenita lasttempe de nur la laboristoj de la subkontraktaj entreprenoj estigis ian fendon en nia laborista bloko. Nun mi disponas je sindikata informo kiu klare montras ke al la organizintoj de tiu ago eskapis la afero el iliaj manoj en difinita momento. Tiaj eraroj povas fari nur tiuj kiuj agadas, kaj tiel okazis al la sindikataj gvidantoj de tiu laborista kolektivo. La entreprenistaro ruze profitis tiun okazaĵon por ektimigi la malpli batalemajn sektorojn de la ENSIDESA-laboristaro, minacante pri fermo de la fabrikoj kaj aliaj malgrablaĵoj. Tio povis okazigi gravan interfrontiĝon inter la laboristoj. Antaŭhieraŭ ni, la membroj de la progresistaj sindikatoj de la fabriko devis energie interveni por eviti ke tiuj malsolidaraj fortoj de la t.n. "aristokrata laboristaro" sukcesu arigi ĉirkaŭ sin amason da laboristoj de ENSIDESA en agresa agado kontraŭ la aliaj laboristoj. Feliĉe ni sukcesis en nia strebo kaj provizore evitis tian misagon, sed la danĝero persistis kaj eĉ pliintensiĝis ĉar sekve la entreprenistaro anoncis ke ekde matene de la venonta lundo (do, morgaŭ) la fabriko estos leĝe fermita, t.e. la ENSIDESA-laboristoj devos ne iri al la la fabrikoj, kaj ni ne ricevos niajn salajrojn kvankam ni iru tien. Tio alportis pli da timon al la plej timemaj inter la laboristoj de tiuj fabrikoj, kaj pli kaj pli endanĝerigis la agado-unueco de la laborist-kolektivo, kaj pli kaj pli malfaciligis nian taskon je konservado de la interakordo kun la kolektivo de la subkontraktaj laboristoj.

Mi supozas ke oni bone komprenas la naturon de tiu problemo. La konfliktoj inter



*La subproletaro en la suburboj.*
*La plej malaltaj niveloj de la laboristaro, ĉefe fremdaj enmigrintoj, vivas en materiaj kaj spiritaj kondiĉoj sub la homa digno. Tiu ĉi socio ne kapablas konstrui pli dignan hom-medion por tiuj senheredigitoj.*
*Krome la diferencoj pri viv-nivelo inter la diversaj tavoloj el la proletaro, utilas al la superreganta klaso por pliakrigi la kontraŭdirojn inter la ekspluatitoj, kaj tiamaniere konservadi la nunan maljustan ordon.*

laboristoj kaj burĝaro, tio estas, la t. n. "klasbatalo" estas, kiel trafe montris K.Marks, sekvo de la ekzistado de malsamaj klasoj, kun kontraŭantaj interesoj. Sed la klasa skemo de la socio estas multe pli komplika ol tiu duo: laboristaro kontraŭ burĝaro. Fakte estas multaj klasaj gradoj, ŝtupoj aŭ niveloj ene de la burĝaro. Estas grandegaj diferencoj -ekonomiaj, kulturaj, politikaj...- ekzemple, inter la milionuloj kiel la bankiero Mario Konde, la fratinoj Klopoviĉ, k.a. kaj la varo-vendisto de la strat-angulo apud mia hejmo. Ĉiuj ili apartenas al la burĝaro, sed la diferencoj kaj la kontraŭantaj interesoj inter ili povas esti pli grandaj ol ties ekzistantaj inter la proletaro kaj la malaltaj tavoloj de la burĝaro. Precize ni, la revoluciuloj, en nia klasbatalo por fine atingi pli justan sociordon, sen interhoma ekspluatado, devas prikalkuli kaj profiti la internajn kontraŭdiroj de la superreganta burĝklaso.
Sed ankaŭ la ekspluatantoj scias profiti, por ties celo de konservado de la nuna maljusta sociordo, la internajn kontraŭdirojn de la laboristoj, ĉar ankaŭ la laboristaro aŭ proletaro ne estas homogena klaso. Ekzistas multaj gradoj aŭ tavoloj ene de la laboristklaso. Kaj foje tiuj diferencoj konkretiĝas ankaŭ en kontraŭantaj interesoj. Oni nomas "aristrokrata-laboristaro" tiun sektoro de la laborantaro kiu ĝuas altajn salajrojn kaj

konsiderindajn privilegiojn. Inter tiuj laboristoj estas malalta grado da solidareco kun la ceteraj laboristoj. Mi bone konas, ĉar mi apartenas al ĝi, tiun laboristar-tavolon, kaj mi bone scias kiom estas malsolidaraj plejparto el ties anoj kaj kiom malforta estas inter ili la sindikata influo. Kiam la agreso fare de la entreprenistaro skurĝas ĉiujn laboristojn, eĉ multaj el tiuj nesolidaraj homoj partoprenas en la mobilizado, sed sufiĉas ĉiu ajn kontraŭdiro aŭ malfacilaĵo por ke ili forlasu la unuecon kun la ceteraj laboristoj kaj revenu al siaj egoismaj kaj korporaciaj interesoj. Resume, ili ofte konstituas problemon por la sindikatoj.
Sed foje alportas problemojn por la sindikata agado ankaŭ tiuj laboristoj kiuj, estante tro batalemaj pro la speciale malfeliĉaj cirkonstancoj de ilia situacio, povas preterpasi ĉiun kalkulitan planon kaj estigi nekontroleblajn cirkonstancojn kiuj pli malfavoras ol favoras la komunan celon. Iu ekzemplo de tiutipaj problemaj situacioj estis tiu de la senkontrola perforto en la manifestacio en Madrido, la 26-an de la pasinta monato, kaj alia tipa ekzemplo estas la nun komentata ago de la okupado, dum tiom da sinsekvaj tagoj, de la fabrikaj instalaĵoj. Feliĉe ankaŭ oni povis meti solvon al tiu ĉi problemo. Tiu situacio finiĝis hodiaŭ kaj normaliĝis la situacio en la fabriko. Mi scias ke en nia longa batalado pro la restrukturad-procezo de la ferindustrio, tiu paco estos nur mallonga parentezo. En la informaj komunikadoj pri la normaliĝo de la situacio, oni parolas pri "milit-paŭzo". Tamen mi esperas ke ĉiel ajn estu la estontaj batalo-formoj, oni sukcesu savi, kiel eble plej, la karakteron de amasa partopreno de la plej granda parto el la laboristaro, kaj la apogon de plejparto el la popolo.

(la 25-a de novembro - 1992)
Sufiĉe amplekse dum la lastaj semajnoj, mi priskribis la staton kaj la evoluon de la kriza situacio de la hispana ferindustrio. Tiel granda interesiĝo pri tiu temo ne estas stranga, konsiderante ke de ties disvolviĝo kaj fina rezulto dependas, ne nur mia vivoformo dum la sekvaj jaroj, sed ankaŭ la konservado de la ekonomia prospero aŭ la ruiniĝo de tuta regiono kiel Asturio kaj aliaj zonoj de Hispanio, samkiel la konservado aŭ perdiĝo de la landa ferindustrio.
Nu, grava dato en tiu kriza procezo estis hieraŭ, la 24-a de novembro-1992. Kiel anoncite en ĉi skribaĵ-kolekto, en tiu dato kunsidis en Bruselo la Ministroj pri Industrio de ĉiuj landoj de la Eŭropa Ekonomia Merkato por pristudi kaj pridebati la planon de la hispana registaro rilate al nia landa ŝtalo-industrio. Mi tre detale informis pri la rifuzo de la laboristoj, ties sindikatoj kaj la politikaj fortoj de Maldekstraro rilate al tiu plano, tial ke ĝi klare konstituas etapon de likvidado-procezo de la hispana ferindustrio.
Por esprimi tiun rifuzon manifestacie, iris hieraŭ al Bruselo kelkaj aŭtobusoj plenaj da sindikataj aktivuloj de la ŝtalo-industriaj fabrikoj de mia lando: proksimume kvincent personoj. Tiun agon ni apogis ekde ĉi-tie, ekde niaj urboj: hieraŭ strikis la gelaboristoj de ĉiuj ferindustriaj fabrikoj en Asturio kaj Eŭzkadio, kaj estis grandaj manifestacioj en la koncernaj ĉefurboj. En ties de Oviedo, la Asturia ĉefurbo, partoprenis kamarado Julio Angita, Ĝenerala Sekretario de la Komunista Partio de Hispanio. Poste li, en Gijon, intervenis en mitingo. La hodiaŭaj ĵurnaloj de ĉi tiu regiono amplekse raportas pri la enhavo de la mitinga diskurso de J.Angita kaj pri intervjuo farita al li de la ĵurnalistoj.
Tiu komunista lidero, en akto kiu povas esti konsiderita kadre de periodo antaŭ proksima balot-kampanjo, kritike analizis la misagadon de la socialista registaro en tiu ĉi etapo de la ekonomia krizo, en kiu pli kaj pli klare evidentiĝas la erarecon de la socialista politiko ekonomia disvolvigita dum la lastaj jaroj. Lasttempe, preskaŭ ĉiutage okazas io atestanta kontraŭ tiu politiko. Antaŭ malmultaj tagoj la hispana valuto (peseto) estis senvalorigita je 6 procento. Tiu senvalorigo estas la dua dum la lastaj monatoj, kaj ŝajnas ke ĝi ne estos definitiva ĉar tiu valuto pli kaj pli troviĝas en malfavora pozicio en la Eŭropa mon-merkato. J.Angita asertis ke la malforteco de nia nacia valuto respegulas la malfortecon de nia landa komerco, industrio...
Li atentigis pri tio ke, ene de la Eŭropa Komunumo, la hispana registaro estas la malplej bona defendanto de la interesoj de

la propra lando. Ili, la hispanaj regantoj, ŝajnas defendantoj de alies interesoj. Al tiuj fremdaj interesoj niaj socialdemokratiaj regantoj foroferas nian industrion kaj la sekurecon de niaj gelaboristoj. Li speciale prikomentis la fakton ke en Hispanio oni rapide antaŭenmarŝas al la starigo de "libera ekslaborigo". La jam malfortigita leĝaro, kiu ankoraŭ iomgrade defendas la sekurecon de la fiksaj laborlokoj, tute malaperos laŭ novaj disponoj nun pretigataj de niaj "socialistaj" regantoj. En tiu kunteksto akiras sian plej altan signifon tio okazinta hieraŭ en Bruselo, en la kunsido de la priindustriaj Ministroj de la E.E.K.
Sed, kio, vere, decidis hieraŭ tiu ministraro? Verdire, la fina dispono estis prokrastigita por sekvonta ministrar-kunsido kiu devos okazi komence de januaro de la venonta jaro. Eksplikendas ke tiu prokrastigo estis rezulto de la malakordo ekzistinta en la hieraŭa kunsido. La hispana ministro, S-ro Aranzadi, prezentis sian planon, tiun likvidisman planon kiun ni rifuzas. Nur la itala ministro apogis ĝin, kaj la franca ne forrifuzis ĝin. La ceteraj Ministroj pri Industrio de la Eŭropa Komunumo rifuzis tiun planon. Ili plu pridiskutos kaj pristudos ĝin, kaj findecidos pri ĝi, kiel dirite, venonta monato januaro-1993. Sed mi devas klarigi ke la rifuzo de la plano de Aranzadi, fare de tiuj sinjoroj, tute ne konstituas apogon al niaj sindikataj pozicioj, sed tute male. Ili volas ke la fortranĉo aŭ forhako al la hispana ferindustrio estu multe pli granda ol tiu planita de la hispana registaro. Ili volas ke nia jara ŝtalo-produktado estu malpli granda ol planite de S-ro Aranzadi. Resume, se la plano de Aranzadi disponas ke en Hispanio perdos sian laborolokon 10.000 ferindustriaj gelaboristoj dum la daŭro de 5 jaroj, la brita, germana, nederlanda, dana k.a. ministroj volas ke la nombro da hispanaj ferindustriaj laboristoj eksigotaj el siaj laborpostenoj estu, ne 10.000 sed 17.000, ne dum la daŭro de 5 jaroj, sed dum 3-jara periodo, kaj krome sen la mon-kompensoj antaŭviditaj en la hispana plano. Ili volas -kaj la hispana regantaro estas preta kontentigi ilin en tiu punkto- "liberan ekslaborigon".
Se la kvinjara plano de la hispana registaro ne atingis min (mi ne estis enkalkulita ene de la 10.000 laborpostenoj perdotaj laŭ tiu plano), la trijara plano de la E.E.K. tute trafas mian laborlokon (pro mia aĝo mi troviĝas inter la 17.000 pliaĝuloj de la hispanaj ŝtalo-farejoj), kaj kiel dirite, la ekonomiaj kondiĉoj por la eksigotaj laboristoj estos tre malfavoraj por ni. Ke Dio kompatu al ni! Tia estas la situacio kiam finiĝas ĉi-tiu jaro 1992, dum kiu pompe kaj lukse oni festis en mia lando jubileon kaj gravajn eventojn (kiel la Olimpiaj Sport-Ludoj) kies per-televidaj bildoj diskonigis, tra la tuta mondo, pri Hispanio ideon de riĉeco, komforto kaj ekonomia prospero, kiu tute ne alĝustiĝas al la realo.
Ho! mi forgesis iun aferon. Krom la ankoraŭ iom malproksimaj danĝeroj de la industria restrukturado, estas ankaŭ pli tujaj problemoj. De hodiaŭ strikas denove la laboristoj de la sub-kontraktaj entreprenoj. Denove estas tute paralizita la produktad-procezo en la ENSIDESA-fabrikoj. Denove estas malfermata la sako de ĉiuj ne-antaŭvideblaj konfliktoj kaj konvulsioj...

(la 30-a de novembro - 1992)
Finiĝas la monato novembro-1992. Nun mi povas kompari la nunan situacion -en kio koncernas al la ferindustria krizo- kun ties de ĝuste antaŭ unu monato. Nun mi povas konstati kiom fuŝiĝis la situacio.
De antaŭ preskaŭ unu semajno estas tute haltigita la produktad-procezo de la ŝtalo-farejoj de Asturio pro la striko de la laboristoj de la sub-kontraktaj entreprenoj kaj ties okupado de la ferindustriaj instalaĵoj.
Ĝuste informante, mi devas diri ke tiuj laboristoj, apartenantaj al subkontraktaj entreprenoj, ne malpermesas al la ENSIDESA-laboristoj fari sian laboron; ili nur postulas ke oni ne okupu iliajn laborlokojn en la produktad-procezo, kaj por tion prizorgi, ili ne forlasas la fabrikon, ili deĵoras en la instalaĵoj. La laboristoj de la fabriko povas sin dediĉi al siaj specifaj taskoj, sed ne okupiĝi pri la labor-taskoj asignitaj al la sub-kontraktaj laboristoj. Sed tio estas pura teorio; en la realo la afero estas multe pli komplika: la ENSIDESA-laboristoj ne povas fari siajn taskojn en la produktad-procezo ĉar la funkciado de tiu procezo postulas

ankaŭ la intervenon de la sub-kontraktitoj. Dum la lastaj jaroj la ENSIDESA-entreprenistaro kontraktis tiom da eventualaj laboristoj, aŭ pli ĝuste: sub-kontraktis tiom da paŝoj de la produktad-procezo, ke ĉi-tiu ne eblas nun sen la interveno en ĝi de tiuj miloj da eventualaj, sub-kontraktaj laboristoj.

Do, oni estigis ĉi-tiun paradoksan situacion: la ENSIDESA-laboristoj devas enspezi sian salajron, ĉar ili ne strikas, sed dume ili ne povas plenumi sian laboran taskon ĉar tio ne eblas sen la kunlaboro de la strikantaj laboristoj de la sub-kontraktaj entreprenoj.

La ĵurnaloj de la lastaj tagoj publikigas deklarojn de la ENSIDESA-entreprenistaro. Ĉi-tiu informas ke oni ne plu povos toleri tiun situacion dumlonge, ke la entrepreno ENSIDESA perdas ĉiutage -en tiu situacio- 500 milionojn da pesetoj. Mi ne scias ĉu tiu kalkulo estas ĝusta; eble ne tiom estas altaj la ĉiutagaj perdoj de la entrepreno, sed, ĉiukaze la elspezoj sendube estas grandaj ĉar, krom la pago de la salajroj de la ne-strikantaj - kvankam ankaŭ ne-laborantaj-laboristoj, kaj la pago de la koncernaj impostoj, estas ankaŭ la elspezoj propraj de la konservado de la instalaĵoj, t.e. elspezoj por konsumado de elektra energio kaj materialoj por la subtenado de la funkciado -eĉ se ne produktiga- de la fornoj, altaj fornegoj kaj aliaj instalaĵoj. Sed estas evideta ke la ĉefa celo de tiu presara informado de la entreprenistaro estas mal-trankviligi, timigi, la laboristojn de la entrepreno, ĉu fiksaj ĉu eventualaj.

Kaj oni celas maltrankviligi ankaŭ la Asturian socion kaj meti ĝin kontraŭ la strikantaj laboristoj sub-kontraktaj, kiuj deĵoras en la fabrikoj por ke aliaj laboristoj ne plenumu la taskojn kiujn ili rifuzas plenumi. Do en la ENSIDESA-fabrikoj kreskas la streĉeco inter ambaŭ tipoj je laboristoj: fiksaj kaj eventualaj. Ĉi-tagoj devas deĵori en la fabrikoj ankaŭ la membroj de la sindikataj komitatoj por eviti perfortajn interfrontiĝojn inter la laboristoj.

La teniĝo de la diversaj sindikatoj ne estas unueca en ilia poziiĝo pri ĉi-tiu problemo. La plej maldekstraj sindikatoj (la komunista CC.OO. kaj la ekstreme-maldekstra CSI) plene apogas la agadon de la subkontraktaj laboristoj. Dume la socialista UGT kaj la centra USO deklaras ke ili apogas la postulojn de tiuj laboristoj sed ne la konkretan agadon de la paralizigo de la produktad-procezo. Menciinde estas ke ĉi-lastaj sindikatoj estas interne dividitaj pri tiu temo ĉar ties anoj en la sub-kontraktaj entreprenoj ne konsentas kun la menciita opinio.

Same dividitaj estas la laboristoj de ENSIDESA. Iuj opinias ke oni devus forpeli el la fabrikoj, eĉ se perforte, la sub-kontraktajn laboristojn, kaj plenumi la produktigajn taskojn al ili asignitaj. Por pravigi ĉi-proponon, ili deklaras ke per ilia agado, la eventualaj laboristoj domaĝas ankaŭ la situacion de la ENSIDESA-laboristoj kaj endanĝerigas la vivkapablon de ĉi tiu entrepreno en kriza procezo de re-strukturado. Almenaŭ ĉi-argumentoj estas pravaj. Aliaj deklaras ke por defendi siajn interesojn, ĉiu laboristo rajtas striki en la loko kie li plenumas sian laboron, kaj la sub-kontraktaj laboristoj ne kulpas se por tion fari ili kontraŭdiras la interesojn de aliaj laboristoj. Same ni, la ENSIDESA-laboristoj, malpermesis al ili labori kiam ni strikis favore al niaj interesoj, ekzemple por la kolektiva salajr-negocado kiu ne koncernis al ili. Ankaŭ ĉi-tio estas vero. La entreprenestraro eble estas ĝoje konstatanta ke la vero kaj la pravo de iuj laboristoj kontraŭstaras kaj kontraŭdiras la veron kaj la pravon de aliaj laboristoj. Sendube tia estis la celo de la sub-kontraktado de ŝtalo-produktigaj taskoj: la formado de malsamaj laboristo-kolektivoj kun malsamaj interesoj kaj vidpunktoj.

Kaj en tiu linio de pliintensigi la dividon kaj la malamon inter la diverstipaj laboristaj kolektivoj, aŭ eble pro tio ke ververe la ekonomia situacio de ENSIDESA estas tiome subdanĝera, nun venas aliaj iniciatoj kaj disponoj de la entreprenistaro. Iuj el tiuj disponoj efikas ankaŭ sur ni, la laboristoj de la entrepreno, ne implikitaj en ĉi-konkreta konflikto de la personaro de la sub-kontraktaj kompanioj. La unua el la disponoj de la ENSIDESA-estraro estis ĉesigi ĉiujn pagojn al la entreprenoj, uzinoj, magazenoj kaj vendejoj, kiuj provizis/as materialojn, varojn kaj servojn al niaj ŝtalo-farejoj. Per tiu ago oni intencas veki la malamon kaj la

ĉagrenon de la astura socio kontraŭ la strikantaj subkontraktitoj de ENSIDESA. Kaj por pli-venenigi la animojn de la ENSIDESA-laboristoj kaj ruinigi nian solidarecon al la strikantoj oni sendis al ĉiu el ni cirkulleteron kiu tekstas jene:

**Estimata sinjor(in)o,**
**La grava situacio de la finanz-servo de nia kompanio malebligas al ni la kompletan plenumadon de niaj financaj devoj, inter ili la salajr-pagado de la nuna monato, kiu, tiukaze, atingos nur 75 procento de la pagenda kvanto...**
**La entreprenistaro daŭre klopodos normaligi la situacion kiel eble plej rapide.**

Krome, hodiaŭ tiu entreprenistaro ekkomencas la oficialajn demarŝojn por ĉesigi dum unu monato la rilaton kun ĉiuj gelaboristoj de la entrepreno, t. e. se tiuj demarŝoj prosperos, ĉiuj ni estos senlaboruloj dum tuta monato.
Ĝis nun ne okazis en la fabrikoj interfrontiĝoj inter la gelaboristoj kun malsamaj interesoj kaj vidpunktoj, sed la danĝero je tio sendube kreskas.
Dume la presaro informas pri la bankroto de aliaj entreprenoj, ĥemiaj ĉi-kaze, en Hispanio, kun uzinoj ankaŭ en nia Asturia regiono. Estas evidenta ke la regantoj de nia lando troviĝas antaŭ problemoj kiujn ili ne kapablas solvi. Kia estos la situacio post kroma monato, fine de la jaro 1992?
Antaŭ kelkaj semajnoj mi informis per ĉi-tiu raporto pri la dumnokta atako al mizera ejo kie tranoktis kelkaj sudamerikanaj geenmigrintoj. Kiel sciate, rezulte de tiu atako estis murdita iu ino kaj rezultis aliaj vunditoj. Post kelkaj tagoj okazis alia rasisma atako en mia lando: iu maroka junulo estis murdita fare de kelkaj uloj kiuj poste estis arestitaj. La murdistoj estis membroj de iuj faŝismaj rondoj kies anoj estas nomataj "skin-heads", t. e. "tutrazitaj kapoj". Lasttempe estis malkovritaj kaj arestitaj ankaŭ la murdistoj de la sudamerikana virino. Ankaŭ tiuj ĉi estas tiutipaj junaj faŝistoj, kaj krome ties gvidinto, kaj pafinto, estas iu policisto. Dum tiu ĉi lasta tempo daŭre venis al ni informoj pri similaj rasismaj atakoj en aliaj lokoj, ĉefe en Germanio. Estas vere serioza la kreskiĝo de la faŝistaj organizaĵoj en tiu lando lasttempe.

la, 8-a de decembro - 1993

Kara kamarado,
Kelkfoje en la laste transkribita materialo estis aludoj al faŝismaj agado, al renaskiĝo kaj plifortiĝo de faŝistaj organizaĵoj, al perfortaĵoj de faŝistuloj...
Tia faŝisma aktivado okazas ne nur en mia lando sed ankaŭ en aliaj landoj, ĉefe en Germanio. Ŝajnas ke ankaŭ en Rusujo estas signoj de funkciado de faŝismaj organizaĵoj, sed ĉi-kaze la koncernaj informoj iom estas konfuzigaj.
En la informmedioj de mia lando, presaro, televido, k.a., oni ofte raportis pri komuna agado de komunistoj, faŝistoj kaj caristoj. Se jam estas sufiĉe stranga la kamaradeco inter caristoj kaj faŝistoj, multe pli stranga estas la kamaradeco kaj kunlaboro de komunistoj kun ambaŭ homtipoj. Okaze de la gravaj eventoj de Moskvo de Oktobro ĉi-jare, la informmedioj tre temis pri la kunlaboro, defendante la Parlamentejon, de komunistaj aktivuloj kun membroj de organizaĵoj carism-favoraj kaj eĉ faŝistaj, sed tiuj informiloj nek klare nek amplekse eksplikis la naturon de la kunlaboro de tiom malsimilaj organizaĵoj. Vi komprenu la perpleksiĝon de la fremdaj komunistoj, kiaj mi, kiam ni ekscias ke la rusaj komunistoj estas masakritaj de la ruĝa armeo sub la ordonoj de homoj kiuj antaŭ ne multe da tempo estis famaj kompartio-gvidantoj, kiaj Jelcin, kaj tamen fratece mortas kune kun ili faŝistoj kaj caristoj!
Ĉu vi povas klarigi al mi la naturon kaj la amplekson de la koincidoj inter la komunistoj kaj aliaj malsamaj organizaĵoj? Ĉu la membroj de tiuj organizaĵoj, normale asignitaj al la dekstraro, vere kaj reale volis defendi parton aŭ la tuton el la heredaĵo de Lenin? Ĉu la ebla alianco de la komunistoj kun tiuj fortoj estas nur konjunktura (eventuala) aŭ estiĝis ia formo de natura alianco? kaj se jes, sur kiu bazo?

Nun mi volas respondi al vi pri iu afero kiun vi pretemis per via letero. Vi skribis:
*Laŭ mia opinio, la klasa teorio de Marks estas unuflanka, li dividas ĉiujn homojn nur laŭ ilia rilato al privatpropreco je rimedoj de produktado: kiu posedas ili - estas burĝulo, kiu vendas sian laboron kaj vivas je perlaborita salajro - estas proleto. Laŭ tia divido, proleto estas*



*ankaŭ altgrada meneĝero, ĝuanta per tre granda salajro, sed malriĉa farmisto, laboranta pli ol laboristo en fabriko, estas etburĝo. Sed kiu estas laboristo, posedanta akciojn de sia aŭ alia fabriko? Kiu estas homo, kiu posedas nenion, sed ne serĉas laboron, preferante bagabondi kaj almozpeti? Ĉu vi traktas sin kiel proleto, laŭ Marks? Mi multe legis kaj pensis pri tiaj problemoj kaj min tre interesas via opinio.*

Tiurilate mia opinio koincidas kun la marksisma teorio, t. e.: estas proleto tiu kiu havas kiel sola aŭ ĉefa viv-rimedo sian laborforton kaj dependas de alies labor-rimedoj: kapitalo, fabrikoj, farmoj... Tiu, kiu posedas tiujn rimedojn, ĉu li laboras aŭ ne, ne estas proleto. Se iu laboras en sia farmo, uzino, k.s. tiu, ja, estas laboristo krom proprietulo, sed li certe ne estas proleto. Alie, kiu ne havas laboron tial ke li aŭ ŝi, ekzemple, estis maldungita, se li aŭ ŝi ne havas aliajn viv-rimedojn, tiu estas proleto, kvankam li aŭ ŝi jam ne plu estas laborist(in)o.

Do la difino de "proleto" estas teknikaĵo kiu rilatas nur al la ne-proprieco de viv-rimedoj. La termino de "proleto" originiĝis en la antikva Romo, kaj estis asignita al tiuj homoj kiuj havis nur "prolo"-n, t.e. gefiloj. Ŝajnas ke en tiu socio de la antikva Romo la ĝuo de iuj sociaj kaj civitanaj rajtoj dependis de la kondiĉo de patro, ĉar la ŝtato bezonis la filojn por la armeo k.s. Rilate al tio kion vi diras pri unuflankeco de la teorio de Marks, vi ne forgesu ke la hodiaŭa klasstrukturo estas multe pli komplika ol en la epoko de K. Marks. Cetere, la penso de Marks pri tiu temo, ne tiom estis simpla kiel formulas la ĝenerala alternativo: proletoj kontraŭ posedantoj. Li bone sciis ke la socia realaĵo estis, jam en lia epoko, multe pli komplika. En iuj liaj verkoj oni povas konstati ke li tre estis konscia pri tiu temo. Kaj rilate al mia propra opinio pri tiu temo, se vi legis ĉiujn miajn tekstojn de ĉi-libreto, vi povis vidi ke mi temis ne nur pri diversaj klas-diferencoj kaj kontraŭdiroj interne de la burĝaro, sed ankaŭ pri diversaj gradoj kaj konstraŭstaroj ankaŭ interne de la proletaro.

Se al vi inetersas la temo, per miaj estontaj poŝtaĵoj mi pritraktos ĝin pli profunde. Sed nun mi povas diri al vi ke ne zorgigas min la afero prezicigi ĝis kioma grado unu homo aŭ unu homa kolektivo estas proleta aŭ proprieta. Ĉiukaze tiu prezicigo estas nur iu teknika afero. Al mi plej interesas determini ĉu tiu aŭ tiu homo, aŭ tiu homa kolektivo -sendepende de sia proleta aŭ posedanta karaktero- estas aŭ ne revolucia, progresista, t. e. ili poziciigas favore al socia transformiĝo. Por mi ne estas ke la fakto ke iu estas proleta tio situigas lin je la flanko de la revolucio, kaj sekve la posedantoj nepre estas kontraŭ la socia transformigo. Mi ne vidas klare ke la proletaro estas/os la liberiganto de la tuta homaro, kiel asertas la marksisma teorio. Laŭ mia opinio, Marks, Engels, k.a. ne ĝuste pritaksis la eblecojn kaj la kapablon de la proletaro kaj de la laboristklaso ĝenerale. Mi ne scias ĉu la kialo de ilia miskalkulo rezultas el la fakto ke ili mem ne estis laboristoj, sed intelektuloj. Sed vere estas ke, ekzemple, K.Marks supervaloris la klaskonscion kaj la revolucian rolon de la proletaro. Mi pensas ke tiu granda teoriulo estis altgrade influita de la mesiismo de la juda popolo, al kiu li apartenis kiel sciate. Li asignis al la proletklaso ian mesian rolon, samkiel faris -antaŭ tri mil jaroj- Moseo rilate al la israela popolo (aŭ kiel vi faras nun rilate al la kapablo kiun vi atribuas al la mez-klaso). Ambaŭ majstroj serĉis "elektitan popolon" por plenumi iujn historiajn -necesajn- taskojn. La historio de la hebrea popolo estas la historio de la perfido de tiu popolo al la alta misio kiun Moseo (aŭ Dio, laŭ lia aserto) asignis al ĝi. Same, la historio de la monda proletaro de la lasta jarcento estas la historio de la perfido de tiu klaso al la alta tasko kiun Marks (aŭ la Historio, laŭ lia pretendo) asignis al ĝi. En la realo ne ekzistas elektitaj popoloj, kaj la farendaj taskoj estas plenumataj, krome tre fuŝe, ofte de alia ĉefrolulo kiu ne estis konvene preparita por ĝin entrepreni. La homa historio estas plena da ekzemploj de ĉio-ĉi.

Kiu povis esti la kaŭzo ke Marks tiome entuziasmiĝis pri la kapablo kaj progresista rolo de la laboristklaso? Mi pensas ke tiu ideo venis al li kiam, ankoraŭ dum lia junaĝo, li vivis dum iu epoko en Francio. En Parizo li konis ian proletaron kiu formiĝis en tre specialaj kondiĉoj, kaj kiu ne respegulis la esencon de la tutmonda laboristaro. Ja, la franca, kaj konkrete la pariza proletaro de tiu epoko formiĝis dum la epoko de la Granda Revolucio (1789-1794) kaj estis influita de la ideoj, esperoj kaj ideologio progresista de tiu specifa periodo. Krome en tiu tempo ankoraŭ ne estis inventita la televido, nek la futbalo; do ne ekzistis pertelevidaj dissendoj de futbalkonkuradoj. Tio povas ekspliki la fakton ke la kultura nivelo estis relative alta, eĉ inter la laboristaro. Marks vidis ke la laboristoj tre aktive kaj intense partoprenadis en la kultura kaj politika vivo de la "kluboj" (institucioj similaj kaj antaŭantaj de la nunaj "partioj"), kaj tiam li konceptis ke tiu klaso kapablos liberigi la tutan homaron liberigante sin mem. Hodiaŭ la sekvantoj de Marks uzadas aliajn konceptojn kiam ili (ni) temas pri la protagonistoj aŭ ĉefroluloj de la socia plibonigo. Eble vi scias ke en la teoriaj verkoj de Gramsci oni ne tiom temas pri la laboristklaso, kaj oni pristudas aliajn -pli komplikajn- entojn. Gramsci temis pri "historia revolucia bloko", "organizita intelektularo", "ideologia hegemonio"... Tiuj kompleksaj kolektivoj kaj faktoroj (kies formiĝo estas pena kaj longdaŭra tasko) rolendas kiel kapo de korpo konstituita de la proletaro kaj aliaj subpremitaj tavoloj. Sen tiu kapo la korpo povas fari nenion, samkiel la sola kapo, sen preta korpo, povas nenion fari.

Marks mem devis agnoski ke ne estis tia (kia la pariza revolucia laboristaro) la proletaro de Germanio, el kie li venis, kaj ankaŭ ne estis tia la laboristklaso de Britio, kie li vivis poste. Tiam li difinis la koncepton de "alieniĝo". Alienita homo estas tiu kiu ne agadas laŭ la konscio de sia propra klaso, sed estas ravita kaj mensigita de la valoroj, la ideoj kaj la vidpunktoj de la superregantaj klasoj. La Mezepokaj kamparanoj dum multaj jarcentoj estis submetitaj (alienitaj) al la ideologio de la superregantaj klasoj de la feŭdisma sistemo. Kiam tiu idearo krizis en ilia menso, eksplodis de tempo al tempo la kamparanaj ribeloj.

Same la nuntempa laboristaro estas alienita, t.e. influita de la prestiĝo de la burĝaj institucioj kaj ties valoroj, la kapitalist-sistemo, konsumsocio, k. a. Al tiuj institucioj oni asignis prestiĝan nomojn kiel "demokratio" k. s. En mia lando ĉiujare estas dissenditaj per televido pli ol cent horoj da futbal-konkurado. Ankaŭ tio estas rimedo por pluteni la amasojn en stato de nescio kaj idiotceco, por (mis)eduki homojn ne-kapablajn pridiskuti la ideologian bazon de la sistemo. Sed fojfoje en iu aŭ alia parto krizas tiu ideologia superregado kaj tiam la subpremitaj klasoj, ofte

ankaŭ la proletaro, revolucias kontraŭ la sistemo. Sed dum tiuj feliĉaj momentoj atendas, la historio estas plena da grandaj fiaskoj ankaŭ far de proletaj sociaj tavoloj. Sekve mi transskribas tekston kiun mi verkis ĝuste antaŭ unu jaro, plu pritraktante la problemaron de la fabriko kie mi laboras. En tiu teksto vi povos vidi ekzemplon de tiaj malfeliĉaj situacioj, tre oftaj en la historio, kiam la proleta klaso ne scias roli revolucie.

(la 4-a de decembro - 1992)

En mia raportado pri la ferindustria krizo, mi lasis la ENSIDESA-fabrikojn en tre kompromita situacio: la produktad-procezo paralizita de antaŭ multaj tagoj, la gelaboristoj dividitaj pro malakordo kaj miskompreno... Dum la lastaj tagoj estis okazintaĵoj kiuj meritas esti registritaj.

La 2-a ĉi-monate, merkredo, estante mi laborante en mia oficejo de la Komputora Servo de la fabriko, iu laborkunulo komunikis al mi ke sendube okazos asembleo apud la fabrika komitatejo, ĉar multaj laboristoj estis adresiĝantaj al tiu loko. Tio tute ne surprizis min; mi bone scias kiel spiras la laborantaro de ĉi-fabriko: ne vane mi estis dum multaj jaroj sindikata aktivulo kaj membro de la sindikata komitato de la fabriko. Mi partoprenis, kaj intervenis, en multaj asembleoj de laboristoj, kaj mi scias kiel disvolviĝos ĉi-tiu okazonta hodiaŭ; estas por mi neniu dubo pri kion oni pridiskutos, kiuj intervenos en la debatoj kaj kiaj estos iliaj intervenoj. Mi scias ke ĉi tiu asembleo ne estis kunvokita de la sindikataj komitatanoj: ĝi estas pli malpli spontana mobiliziĝo de la plej timemaj inter la laboristoj, kiuj volas plendi antaŭ la komitato pro la situacio en la fabriko. Antaŭ kelkaj semajnoj okazis io simila; mi ĉeestis tiam iujn tre tumultajn asembleojn.

Sed hodiaŭ mi ne partoprenos ĉi asembleon; mi havas farendan laboron. Jam mi diris ke en tiuj laborejoj kie ne estas necesa la partopreno de la subkontraktaj laboristoj, la laboro povas disvolviĝi normale; tia estas la kazo de la Komputora Oficejo, kie mi laboras. Krome venas tre bone al mia nervosistemo liberiĝi el la streĉa etoso de asembleoj kiel tiu hodiaŭa; tial mi forlasis la sindikatan aktivadon antaŭ kelkaj jaroj.

Mi estis poste informita pri la disvolviĝo de tiu asembleo: ĝi okazis ĝuste kiel mi supozis. La plej reakciaj inter la fabriko-laboristoj insultis la sindikatajn komitatanojn, ĉefe tiujn de CC.OO. kaj CSI, la sindikatoj kiuj apogas la agadon de la subkontraktaj laboristoj. Tial ke ankaŭ ne mankis en la asembleo laboristoj apogantaj tiun agadon, okazis ega kverelo inter ambaŭ grupoj da laboristoj, kaj eĉ okazis perforta interfrontiĝo inter iuj el ili. De antaŭ kelkaj tagoj mi estis timinta ke oni alvenos al tiu ĉi malfeliĉa situacio. En la alia ENSIDESA-fabriko, tiu de Avilés-urbo, okazis io simila, aŭ eĉ pli grava: tie la asembleo estis tre amasa, kaj sub la premo de multenombraj malsolidaraj laboristoj, la tiea komitato aprobis dokumenton petante al la subkontraktaj laboristoj ke ili ĉesu en ilia strikado kaj efektivigu alitipan mobilizadon for de la fabriko. Tamen, en la sama dokumento oni deklaras ke dum tiuj laboristoj strikos, la ENSIDESA-personaro ne anstataŭos ilin en iliaj laborlokoj.

Tiuj-ĉi okazaĵoj, publikigitaj de la presaro de la sekva tago, la 3-a ĉi-monate, stimulis tiujn laboristojn de mia fabriko, kiuj volus similan malaprobon de la agado de la subkontraktaj laboristoj. Matene en la fabriko formiĝis apud la komitatejo simila svarmado kiel la antaŭa tago. La personaro de la fabriko amase adresiĝis al la eksteraĵo de la konstruaĵo en kiu troviĝas la sidejo de la fabrika komitato kaj la sindikataj ejoj de la fabriko. Ĉi-foje mi decidis ĉeesti tiun asembleon. Tiam estis proksimume la deka horo matene. La vetero estis pluva ĉi-tagoj, tamen je tiu horo ĉesis la pluvado kaj eĉ iomete brilis la suno. Mi konstatis ke la ĉeestantaro estis pli multenombra ol ties de la antaŭa tago, kiu, laŭ oni informis al mi, konsistis el nur kelkcento da personoj. Hodiaŭ estas ĉi tie preskaŭ du mil personoj, do, preskaŭ la tuta laboristaro apartenanta al la nuna labor-deĵora periodo. Tio signifas ke troviĝas ĉi tie ne nur la reakciuloj kiuj volas rompigi la strikon de la subkontraktaj laboristoj, sed ankaŭ granda parto el nia laboristaro kiu neniam konsentos pri tiu fiago. Mi timas ke se ambaŭ kolektivoj da gelaboristoj akre pridiskutos kaj ekestos perforto inter ili, la afero povos esti tre

grava. Miaopinie estos necesa ke la Sankta Spirito inspiru ĉiujn nin kaj prezidu nian asemblean debatadon.
Tiu amaso devis atendi dum iom da tempo, ĉar neniu sindikata komitatano eliris por gvidi la asembleon. Oni sciigis al la ĉeestantaro ke la komitato estis tiam kunsidanta kaj ellaborante dokumenton por ĝin proponi poste al la asembleo. Poste oni sciis ke la dokumento aprobita en tiu komitata kunsido estis simila al ties aprobita hieraŭ en la fabriko de Avilés-urbo, t.e.: deklari apogon de la ENSIDESA-laboristoj al la subkontraktaj laboristoj en ĉi-ties rajto-postuloj, sed ne en la agado-formo elektita de ili, kaj peti ke ilia mobiliziĝo okazu for de la fabriko kaj sen interrompado de la produktad-procezo. La filozofio de tiu dokumento tute alĝustiĝas al la vidpunktoj de la konservativaj sindikatoj UGT kaj USO. Jam mi eksplikis ke la komunista sindikato CC.OO. kaj la ekstrem-maldekstra CSI apogas ankaŭ la agadon de la strikantoj. Se en la komitataj kunsidoj de ambaŭ ENSIDESA-fabrikoj oni adoptis la mal-aproban dokumenton, estis pro tio ke en tiuj sindikataj organojn, kaj laŭ la rezulto de la lastaj sindikataj balotoj, estas majoritato (plimulto) la membroj de tiuj "flavaj" sindikatoj. Do, antaŭ la komenciĝo de la asembleo CC.OO. disdonis flugfoliojn inter la ĉeestantaro klarigante la sintenon de tiu sindikato, de kompleta apogo al la agado de la subkontraktaj laboristoj. Dume oni disdonis inter tiu amaso alitipajn flugfoliojn, ellaboritaj de mi-ne-scias-kiu-ajn kolektivo, kiuj postulas ke oni forpelu la subkontraktitojn kaj oni okupu iliajn laborlokojn por funkciigi la produktad-procezon en la fabrikoj. Mi konstatis ke ĉiu el ambaŭ dokumentoj altiris la simpation de sia parto el asembleanoj. Plejparto el la ĉeestantoj poziciiĝis favore al iu dokumento kaj kontraŭ la alia, sed tio ankoraŭ en paca teniĝo.
Dum ankoraŭ ni estis atendantaj la komencîĝon de la asembleo, alvokis min iu oficistino. Oni estis informinte al mi ke en la hieraŭa asembleo, tiu ino histerie atakis miajn kamaradojn de CC.OO. pro ĉi-ties teniĝo de apogo al la strikantoj. Ŝi diris al mi:

- *Mi volas ke ci informu al iu cia kamarado pri kia estis mia voĉdonado en la pasinta balotado... ĉu ci memoras ke, voĉdonante mi, en balotejo kie ci troviĝis kiel balot-kontrolisto, mi petis al ci voĉdonilon de cia komunista kandidataro de Unuigita Maldekstro por voĉdoni favore al ĝi?*
- *Kompreneble.* -respondis mi- *Mi tion memoras.*
- *Do, ci devus tion diri al tiu ulo kiu hieraŭ nomis min "faŝistulino".* -aldonis ŝi-.
Mi kondutis laŭ la teniĝo kiun mi taksis kiel la plej konvena en la nunaj cirkonstancoj. Serene kaj afable mi petis al ŝi ke ŝi trankviliĝu kaj per ŝia kvietiĝo ŝi kontribuu al la asemblea paco, ĉar la animoj de ĉiuj ĉeestantoj estas tro ekscititaj kaj facile povus okazi ofendoj kaj agresoj. Mi devas diri ke ŝia konduto poste, dum la asembleo, estis tute paca kaj respekta meze de la tumulta disvolviĝo de tiu renkontiĝo, kiun mi priskribos. Mi povis konstati kiom ega nun estas la dividiĝo inter la gelaboristoj de ĉi-fabriko. Antaŭ pluraj monatoj, en kompleta unueco partoprenis en la mobilizoj kune preskaŭ tuta laboristaro, ekde la sub-kontraktitoj ĝis oficistoj kiuj antaŭe tute ne distingiĝis precize pro sia batalemo. Hodiaŭ ni perdas eĉ ulojn, kiel tiu ino, kiuj apogas nin en aliaj okazoj.
Fine eliris la komitatanoj por komenci la asembleon. En la podio, antaŭ la ĉeestantaro, prezentiĝis iu ulo, kiun bone konas ĉiuj gelaboristoj de ĉi-fabriko. Li estas Santianes, la ĉeflidero de CC.OO.-sindikato en ĉi-tiu fabriko. Tiam salutis lin granda kriado de la asembleanoj. Granda parto el tiuj ĉi fajfis kaj insultis lin; eble pli granda parto lin aplaŭdis esprimante sian aprobon kaj simpation. Miakaze, la simpatio al k-do Santjanes estas plencerta; mi apartenas al la sama sindikato kiel li, kaj mi estas ano de la Komunista Partio same kiel li; ni ambaŭ estas membroj de la gvid-komitato de la urba organizaĵo de tiu kom.partio.
Sed, eĉ sen tia kamaradeco, estas la fakto ke mi simpatias kun ĉiu ajn homo, kiu ajn estu sia politika teniĝo, kiu devus publike alparoli al amasa asembleo kiel tiu ĉi. Kiel dirite, mi estis dum kelkaj jaroj membro de la sindikat-komitato de ĉi-fabriko, kaj en tiu

rolo mi oftege devis alparoli al tiutipaj amasoj. Do, mi bone scias kiel sin sentas la homoj kiuj devas alfronti tiajn situaciojn. Jam delonge mi scias ke oni ne povas kaj oni ne devas alparoli al la amasoj samkiel oni alparolas al la izolitaj uloj aŭ al la malgrandaj grupoj. Al individua homo kaj al malmult-persona aro oni povas argumenti laŭ rezonado eĉ se per iom komplikaj ideoj; ĉiukaze ĉiam eblas adaptiĝi al la kompren-kapablo de la interparolantoj. Sed estas tute alia afero kiam temas pri multenombra amaso. La amaso havas la inteligentecon de la plej brutaj el ties komponantoj; dume la furiozeco de la amaso estas la sumo de la instinkta pasio kaj fanatikeco de ĉiuj ties komponantoj. La traktado kun unu aŭ mal-multaj personoj povas esti rezonado kaj interesa debato, en kiu tre gravas la profundeco de la argumentoj; la alparolo al amaso nur povas esti mitingo, en kiu pli gravas la gestoj ol la vortoj, pli gravas la efekto-impreso ol la argumentoj. Por alparoli al unuopuloj sufiĉas koni la traktendan temon; por alparoli al amasoj oni devas esti oratoro, aŭ pli bone demagogo. Tion sci-ante, ne rezultis malbonaj miaj publikaj intervenoj dum mia epoko de sindikat-komitatano. Plurfoje okazis ke mi devis adresiĝi al asembleo kies plej granda parto estis komence antaŭinklinita kontraŭ la pozicioj kiujn mi defendis. Tamen mi sukcesis per miaj intervenoj renversigi la situacion kaj altiri la apogon de plej granda parto el la ĉeestantaro. Sendube tre komplezis min tiu rezulto, sed la antaŭ-preparado de tiuj intervenoj okazigis al mi pli grandan streĉiĝon ol kapablas elteni mia nervo-sistemo. Tial mi receptis al mi mem trankvilecon, kaj mi forlasis la sindikatan aktivadon, almenaŭ je tiu publika nivelo de sindikata peranto aŭ komitatano.

Ankaŭ k-do Santianes scias kiel konduti antaŭ asemblea amaso. Li trankvile atendas ke iom-post-iom ĉesu la kriado vekita de lia apero. Mi rigardas lin kaj surpriziĝas konstatante kiom multe malboniĝis lia aspekto lasttempe. Eble tiom malbone aspektus mi se mi estus daŭriginta mian sindikatan aktivadon. Sendube li sufiĉe malsanas. Antaŭ preskaŭ du monatoj, li devis interrompi lian iradon en la Fera Marŝo tial ke li suferis kor-atakon, la duan en mallonga tempo-periodo. Malantaŭ li, en la podio, inter la ceteraj komitatanoj, trov-iĝas k-do Guillermo, la sekretario de la komitato, ankaŭ membro de CC.OO. kaj de la Kom.Partio. Li ne povis partopreni en la Fera Marŝo tial ke la antaŭtago de la marŝo-eliro li estis urĝe hospitaligita por tuja operacio je stomaka ulcero. Dum la somero li estis partopreninta kaj gvidinta ĉiujn mobilizojn kontraŭ la ferindustria restrukturad-plano. Interalie, li estis juĝprocesita tial ke li estris grupon da aktivuloj kiuj perforte interrompis solenan akton de inaŭgurado de Kino-Festivalo okazinta kadre de la urbaj festoj de la monato aŭgusto. Apud li troviĝas Misael, alia sam-sindikatano. Ankaŭ sur ĉi-tiu pezas baldaŭa juĝ-proceso pro lia partopreno en la perforta interrompo de la solena akto de la disdonado de la premioj "Princo de Asturio", en Oviedo, fine de la monato oktobro. Sur ili kaj la ceteraj komitatanoj pezas nun la streĉiĝo pro la disvolviĝo kaj rezultoj de la konflikto de la subkontraktaj laboristoj. Krome sur Santianes pezas ankaŭ la respondeco pri la poziciiĝo de nia sindikato en tiu temo. Ĝuste el tia streĉiĝo kaj el tiaj problemoj, mi liberiĝis demisiante -antaŭ kelkaj jaroj- el mia sindikat-komitata posteno. Mi ne scias ĉu tiu ago estis pruvo de saĝeco... aŭ de egoismo. Vere estas ke en la malbona sanstato de Santianes kaj Guillermo eble influas ankaŭ la fakto ke ili tro fumadas. Mi pensas ke la fakto ke mi neniam fumis, jes ja, estas pruvo de saĝeco.

Fine ĉesis la kriado de la geasembleanoj, kaj Santianes povis komeci sian intervenon. Lia alparolo komencis tiele:

*Sekve la prezidanto de la komitato prezentos al vi la dokumenton kiu estis aprobita de la plimulto de la komitatanoj. Sed je la komenciĝo de la asembleo mi volas diri ion. Hieraŭ telefonalvokis al mia hejmo iu nekonata virino; preninte la telefonaparaton mia filo, tiu ino diris al la knabo ke li baldaŭ restos orfa, ĉar ŝi faros sur min du pafojn. Nu, se troviĝas ĉi-tie tiu ino, mi volas diri ke ŝi povas pafi nun tiujn du kuglojn destinitajn al mi.*

Rekomenciĝis la fajfado, kriado kaj

aplaŭdado. Plejparto el la ĉeestantoj aplaŭdis la parolinton kaj esprimis al li sian apogon kaj solidarecon. Sed ne mankis ankaŭ tiuj kiuj insultis lin. Inter ĉi-lastaj distingiĝis iu virino kiu multfoje interrompis poste ĉiujn parolantojn pre tre akraj kaj insultaj vortoj. Verŝajne estis ŝi, aŭ alia simila histeriulino -troviĝis kelkaj en ĉi asembleo-, kiu telefonis al la hejmo de Santianes. La kaŭzo de tioma histerio de multaj gelaboristoj de la ENSIDESA-fabrikoj, estas la timo al la eblaj rezultoj de la nuna konflikto. Ĉi-tagoj la presaro bombardas nin per minacoj de la entreprenistaro pri ebla baldaŭa fermo de la fabrikoj. En tia situacio, multaj personoj ne estas vere respondecaj pri siaj agoj.
Sekve la komitat-prezidanto, iu membro de la socialista sindikato UGT, legis la dokumenton ĵus aprobitan de la komitato. Per ĝi, kiel dirite, oni esprimas la apogon de la ENSIDESA-laboristoj al la subkontraktaj laboristoj, sed oni petas al ĉi-tiuj ke ili bonvolu fari siajn mobilizojn for de la fabrikoj. Dum mi aŭskultas tiun legadon, mi multe dubas ke la strikantaj gelaboristoj konsentus reveni al siaj "bataloj de Somontes". Oni ne aŭskutis ilin ĝis kiam ili ne entreprenis la radikalan agadon de la paralizigo de la fabrikaj instalaĵoj.
Sekve la perantoj de la diversaj sindikatoj esprimis sian poziciiĝon rilate al tiu dokumento aŭ eksplikis sian voĉdonon rilate al ĝi. En sia dua interveno Santianes klarigis ke la CC.OO.-sindikato apogas ankaŭ la agadon de la sub-kontraktaj laboristoj ĉar ĉiu laboristo rajtas striki en la loko kie li laboras, sen alies premoj. Post li parolis la peranto de la ekstreme maldekstra sindikato CSI. Tiu ulo, Jakobo, altiris sur sin la plej grandan insultadon kaj malaproban kriadon de la konservativaj laboristoj. Tiuj kolektivoj da malbatalemaj ENSIDESA-gelaboristoj kulpigas tiun ulon pri organizado kaj animado de la ekzistanta konflikto. Li pacience eltenis la atakojn kaj siavice respondis sufiĉe lerte.
Tiu ulo estas tre brila kaj elokventa. Oni povus verki interesan romanon rakontante lian biografion. Antaŭ dek-kvin jaroj, kiam komenciĝis en nia lando la politika procezo je demokratiigado, post la morto de la diktatoro F.Franko, baldaŭ la sindikato CC.OO. fariĝis la kuniĝcentro de la maldesktrularo. Tamen dum la sekvintaj jaroj okazis en diversaj punktoj de la lando splitiĝoj de radikalaj grupoj kiuj formis apartajn sindikat(et)ojn kun pli ekstremisma ideаro kaj programo. En nia urbo, Gijon, multaj CC.OO.-sindikatanoj konstituiĝis en interna frakcio nomata "Sindikata Maldekstra Frakcio" (en la hispana lingvo la komencaj literoj de tiu nomo estas CSI). Poste tiu interna frakcio forlasis la CC.OO.-sindikaton konstituante apartan sindikaton. Tio okazis kadre de polemika procezo kies antaŭaĵoj kaj disvolviĝo ne indas pritrakti en ĉi-raporto. Mi nur diru ke inter la lideroj kiuj gvidis tiun splitiĝon, troviĝis la menciita Jakobo, nun intervenante en nia asembleo. Sed kiam fine plenumiĝis tiu sindikata rompiĝo en Gijon, proksimume je la jaro 1980, nia Jakobo ne povis travivi tiun eventon. Tiam li estis en malliberejo. Jes, li restis dum kelkaj jaroj en malliberejo pro afero kiu tute ne rilatis al sindikata batalado. Okazis grava rabado en iu banko de Oviedo. La alsaltantoj sekvestraciis, la antaŭan nokton, la kasiston de tiu banko, kaj je la mateno ili akompanis tiun banko-laboriston al sia labor-loko kaj devigis lin malfermi la mon-kason de la banko. Sekve ili forkuris portante ilian rabaĵon : 262 milionoj da pesetoj (proksimume 2 milionoj kaj duono da Us-dolaroj). La polico priesplorinte tiun rabadon alvenis al la konkludo ke tiu eksterordinare lerte planita rabad-alsalto estis plenumita de teroristoj de la eŭzkadia organizaĵo ETA. Tiu terorista organizaĵo ofte agadas en sia regiono, Eŭzkadio, kies sendependigon ili celas. Ilia agado ĉiam estas krima: murdado de policistoj, sekvestraciado de personoj, metado de bomboj en publikajn establejojn... Foje ili agadas ankaŭ for de ilia regiono. Ĉi-foje ili faris tiun rabadalsaltadon en banko de nia Asturia regiono. Poste la polico sukcesis kapti iujn el la alsaltintoj kaj rehavis parton el la rabita mono, kvankam ne ĉion. Sed krome ili malkovris ke por la plenumado de tiu rabado estis necesa ia kunlaboro ene de ĉi-tiu regiono; ekzemple, la teroristoj bezonis dum pluraj tagoj uzi etaĝan loĝejon. Tiel la polico fine malkovris kaj arestis kelkajn asturiajn gehelpintojn de

la rabistoj, inter ili nia Jakobo; la loĝejo uzita de la ETA- teroristoj dum tiuj tagoj apartenis al li. Do, ĉesis lia sindikata aktivado en nia fabriko dum kelkaj jaroj plus unu tago, kiujn li pasigis instalita en ŝtata "restadejo". Kiam li estis liberigita, li revenis al nia fabriko kaj daŭrigis sian sindikatan aktivadon en la CSI-sindikato. Multaj gelaboristoj de tiu ĉi fabriko malamas lin pro lia ekstremisma teniĝo kaj pro tiu historio de kunlaboro kun la teroristoj. Sed tiu malamo akiras nuntempe aspekton de histerio kaj de insultaj atakoj kiam okazas en la fabriko ĉi-tiu danĝera konflikto.
Fakte, dum la cetero de la asembleo la akra diskutado kaj interinsultado estis preskaŭ senĉesa, ĉar estis tie ankaŭ multaj laboristoj kun tute malsamaj opinioj. Iompostiom fariĝis evidenta ke pli estis multenombraj tiuj apogantoj de la ago de la subkontraktaj laboristoj. La perantoj de la sindikatoj UGT kaj USO, t.e., tiuj kiuj trudis la tekston de la prezentata dokumento, en siaj respektivaj intervenoj antaŭ la asemblea amaso, konstatinte la karakteron de plejparto el la ĉeestantoj, pli akcentis ke ambaŭ sindikatoj ankaŭ apogas la postulojn de la strikantoj, kaj preskaŭ ne menciis la fakton ke ili ne apogas la agadon de tiuj laboristoj. Se estus pli multenombraj en la assembleo la nesolidaraj ENSIDESA-laboristoj, ili estus povintaj pli akcentigi la duan fakton kaj ne mencii la unuan. Tiaspeca agado de tiuj flavaj sindikatoj celas kontentigi ĉiujn eĉ se falante en kontraŭdirojn, kaj oni povas diri ke tiu sindikata politiko funkciis ĝis nun, sed oni alvenis al iu punkto kiam ĉiu laboristo mem devas klarigi sian propran pozicion pri tiu temo. Kaj kiel dirite, la kunfrontiĝo inter la ENSIDESA-laboristoj estis sufiĉe akra kaj malpaca.
En la podio intervenas nun alitipa ulo. Li nomiĝas Francjo. Ankaŭ li estas sindikatano, sed lia sindikata organizaĵo estas tre malforta en la komitato ĉar li reprezentas tiujn privilegiajn sektorojn de la administroficistoj kaj teknikistoj, kiuj, pro ilia propra naturo, estas malmultenombraj en fabriko kie laboras kelkmilo da gelaboristoj. Tiu ulo fariĝis, ĉi-okaze, parol-portanto de la plej reakciaj kaj malsolidaraj inter la personaro de nia fabriko. Estas klare ke li intencas pligrandigi la bazon de ties apogantoj profitante ĉi-grandan kontraŭdiron inter la laboristoj. Eĉ se alfrontante la malestimon de plejparto el la asembleanoj, sendube estas por li ĉi-tie pli da apogantoj ol tiuj kiuj voĉdonis favore al lia korporativeca sindikateto en la lasta sindikat-balotado. Tiukaze ne mankas al li lerteco -eĉ se, jes ja, mankas al li honesteco- por eltiri profiton en tiu ĉi situacio.
Sed ĉiukaze ŝajnas ke la streĉiĝo inter la malsamopiniantoj estas enorma. Feliĉe sekvis poste iu interveno, la unua tiutipa en la hodiaŭa asembleo, celante meti pacon inter laboristoj kaj laboristoj. La intervenanto estas Laso-Castaño (li ne estas parenculo mia spit' al lia familia nomo "Castaño"; ĉi-tiu nomo estas relative ofta en Asturio). Li estas la ĉefa lidero de CC.OO.-sindikato por ambaŭ ENSIDESA-fabrikoj. Per serena parolado li sukcesis iom kvietigi la animojn. La kerna ideo de lia parolado estis: *Ĉi-tagoj, hodiaŭ vespere mem, mi devos kunsidi kun la perantoj de la entreprenistaro por plu negocadi pri nia problemaro. Kia estos mia forto en tiu negocado se estas kverelo inter la laboristoj, kiujn mi reprezentas? Mi apelacias al ĉies prudento por eviti perfortajn interfrontiĝojn kiuj damaĝos nian bildon kaj nian pozicion.*
Fakte estis la lia la ĉefa grava interveno en la asembleo, kaj ĝi konsiderinde kontribuis repacigi la ĉeestantaron. Kvankam sekve la menciita Francjo demagogie intervenis pluinsistante en siaj vidpunktoj celante pliprofundigi la malakordon, li jam ne altiris gravan atenton de la ĉeestantaro, kaj la asembleo finiĝis per la iompostioma forirado de la gelaboristoj.
Tamen tre estis perceptebla la nervoziĝo inter la personaro. Dum la asemblea amaso disiĝis, tie kaj tie ĉi formiĝis kelkaj grupoj kiuj interdiskutadis. Foje la diskutado fariĝis vere akra. Mi intervenis dufoje, kune kun aliaj kunuloj, por eviti la interbataladon de kelkaj laboristoj. La streĉiĝo estis ĝenerala kaj intensa. Eĉ okazis ke iu el tiuj, kiuj sin dediĉis al la repacigado de la kverelantoj, siavice li falis en akran diskutadon kun aliulo, kaj estis necese interveni por eviti ke ankaŭ li ekestigu alian pugno-batalon. Nu,

mi ĉiam taksis min kiel maltrankvila homo, sed jen nun ŝajnas ke oni alvenis al freneza situacio en kiu plejparto el la ceteruloj kondutas pli malserene ol mi.

la 9-a de decembro - 1993

Kara kamarado,

La ĉi-tagaj ĵurnaloj informas ke morgaŭ la rusa diktatoro (ili diras "Prezidento") B. Jelcin renkontiĝos kaj interparolos en Bruselo kun la germana kanceliero S-ro Khol kaj aliaj prezidentoj de la Eŭropa E. Komunumo. Oni pensas ke tiuj politikistoj de la landoj de Okcidenta Eŭropo esprimos sian apogon al la rusa ŝtatestro kaj promesos al li ekonomian helpon por Rusujo.

Tio okazas malmultaj tagoj antaŭ la balotado de via lando. Estas klare ke la apogo de la kapitalistaj regantoj celas beni la puĉon de tiu fiulo kaj asigni al ĝi karakteron de "demokratia ago" tial ke tiu ago plifortigas la kontraŭ-komunistajn poziciojn en Rusio. Se vi havus ankoraŭ ian dubon pri tio, vi devus pripensi la signifon de la politiko de tiuj sinjoroj. Ili celas ankaŭ plifortigi la bildon de Jelcin por favorigi liajn kandidatarojn en la proksima balotado.

Sed krom tiu morala apogo, Jelcin atingos neniun ekonomian avantaĝon en la morgaŭa kunsido. Same okazis en la multaj kunsidoj kaj konferencoj kiujn havis dum la lastaj jaroj Gorvaĉov kaj Jelcin mem kun la okcidentaj regantoj. Ili, la kapitalistaj regantoj, malavare regalis al ambaŭ rusaj politikistoj per deklaracioj de morala apogo al iliaj disponoj pri la malmuntado de la socialistaj strukturoj, unue en Sovetunio kaj nuntempe en Ruslando, sed neniam eblis eltiri pli efektivan ekonomian helpon eĉ por konstrui funkciantan kapitalismon.

La kialoj estas klaraj. Unue, tiuj okcidentaj regantoj ne disponas je granda kapablo por helpi ekonomie grandan landon kiel Rusujo; ili ja havas grandajn malfacilaĵojn por alfronti la krizon en siaj propraj landoj. La plej potenca el tiuj eŭropaj landoj, sendube estas Germanio, kaj tamen ĉi-tiu ekonomia potenco ne sukcesis plibonigi la situacion en sia propra zono de Orienta Germanio (eks-GDR). La malkontento de la tiea loĝantaro reliefiĝis lasttempe en la rezultoj de la lasta balotado, pri kiuj jam mi temis en ĉi-raporto. Kaj due, en la altaj centroj kaj instancoj de la gvidado kaj kontrolado de la monda ekonomio jam estis decidite kiun lokon okupos Rusio -kaj ceteraj landoj orientaj kaj okcidentaj- en la monda ekonomia skalo. La monda ekonomia sistemo estas iu perfekte strukturita piramido en kiu ĉiu terzono okupas la lokon asignita al si fare de la mastroj de la sistemo. Ŝanĝoj okazas tre malfacile ene de la strukturoj de tiu sistemo. La politikaj ŝanĝoj en Rusio kaj en la tuta (eks)-Socialista bloko okazis en la linio de la deziroj kaj la planoj de la regantoj de la monda ekonomia sistemo. Se tiuj mastroj decidis ke Rusio estos kvazaŭ TriaMonda lando, estos senutilaj ĉiuj vojaĝoj de Jelcin al Okcidenta Eŭropo, kaj same senutilaj estos viaj penoj pri la potenciigo de iu rusa mezklaso. Ankaŭ ne efikos profunde kaj rapide sur tiu monda ekonomia sistemo la fakto ke en eks-GDR kaj en aliaj eks-socialistaj landoj venku nuntempe la (eks)-komunistaj partioj, aŭ ke venonta dimanĉo la rusoj rifuzu balote la Jelcinan konstitucion, se tio okazos. La gvidantoj de la monda ekonomia sistemo atingis lasttempe grandan venkon sur ĉiuj mondaj popoloj, kaj por renversigi tiun situacion estos necesa longega tempo kaj grandaj penoj, samkiel multaj perfortaj revolucioj en la tuta mondo.

Revolucioj el tiuj, kiujn vi volas eviti (kvazaŭ eblus tio!), kaj kiujn abomenas kiel danĝeraj aventuroj. Ĉiu revolucio, ja, estas vere danĝera aventuro. Sed vi forgesis prikonsideri ke same estas aventura ĉiu kontraŭrevolucio; kaj, jen kurioza kontraŭdiro!, vi, via popolo, entreprenis tre danĝeran kontraŭrevolucion. Spite al ĉiuj malbonaĵoj, kiujn oni povas rakonti pri la iama kom.reĝimo de Sovetio kaj ceteraj socialistaj landoj, estas evidenta ke ekzistis tie kaj tiam granda sekureco en ĉiuj sferoj de la homa vivo. La stulta fi-aventuro entreprenita ekde 1989-jaro ruinigis por ĉiam tiun sekurecan medion.

Ĉar iomgrade rilatas al tiu ĉi temo, mi enkondukas ĉi-sube tekston kiun mi verkis ĝuste antaŭ unu jaro, kadre de mia tiama raportado pri la ekonomia krizo efikanta sur mia lando.

(la 6-a de decembro - 1992)

Mi pensas ke povas rezulti tro peza la tralegado de la antaŭa parto de ĉi-raporto, per kiu mi priskribis la fabrikan asembleon de la ENSIDESA-laboristoj. Same peza, kaj krome pena, estis por mi la koncerna verkado, ĉar temas pri malgajaj kaj problemaj aferoj. Sed speciale pena kaj malgaja estas travivi tiajn okazintaĵojn. Komenciĝas esti danĝera la kreskanta histerio inter la multaj

personoj travivantaj ĉi-situacion, aŭ tiuj, kies vivo, iu- aŭ ali-maniere, dependas de la bonfunkciado de la ENSIDESA-fabrikoj. Mia edzino ofte ploradas lasttempe konstatante kiel iompostiom degradiĝas la socia ekvilibro de nia viv-medio.

Ĉiuj-ĉi travivaĵoj kaj ties sekva peno estus por mi tute senutilaj se el ili mi ne eltirus ian instruon. Feliĉe, ĉio-ĉi kion mi travivis dum la lastaj monatoj iom lernigis min pri iu afero, kiun mi taksas tre grava kaj utila instruo. Jen ĝi: Mi venis al la konkludo ke la ĉefa emo de la homa estaĵo estas la sekureco. Ne la libereco, nek la egaleco, nek la frateco, sed nur kaj ĉefe la sekureco estas la precipa celo de la personoj. Kiam okazas revolucioj, poste venas la teoriuloj asignante devizojn kaj idealojn al la revoluciuloj. Tiele estis ellaborita la devizo: Libereco, egaleco, frateco!, kiu famiĝis de post la granda Franca Revolucio. Aliaj, postaj revolucioj alprenis tiun idealon, akcentigante tiun aŭ tiun el ties partoj. Ekzemple la socialistaj revolucioj akcentis, emfazis, la koncepton "egaleco". Male, la kontraŭkomunismaj movadoj speciale emfazas la koncepton "libereco" kaj similsignifajn vortojn kiel "demokratio". Tamen mi venas al la konkludo, kaj la historia sperto pruvas tion, ke la popoloj povas vivi ĝoje kaj trankvile kvankam mankus libereco kaj demokratio. La amasoj povas esti feliĉaj eĉ en situacioj de granda malegaleco. kaj la socio povas funkcii sufiĉe normale ankaŭ sen frateco. Tamen ĉio senordiĝas, kaj la situacio fariĝas freneza kaj ne-eltenebla, kiam mankas sekureco.

Dum la frankisma diktaturo en Hispanio, evidente, tute mankis la libereco, kaj ne nur en la politika tereno, sed ankaŭ en la sindikata, en la kultura, en la ekonomia kaj en ĉiuj ceteraj sferoj de la socia vivo. Ankaŭ ne estis egaleco, sed tute male: grandaj sociaj kaj ekonomiaj diferencoj staris inter la diversaj klasoj. Kaj ankaŭ ne regis la frateco en tiu socio: la frankisma reĝimo, kiel sciate, estis rezulto de trijare longa kaj ege sanga civilmilito, kaj dum la daŭro de la longa regado de la venkinta generalego plenumiĝis ĉi-tie neniu ajn nacia repaciĝo kaj interfratiĝo inter venkintoj kaj venkitoj. Tamen, spite al tio ke mankis en tiu socio la libereco, la egaleco kaj la frateco, eĉ tiel regis paco kaj trankvilo en la lando. Ni, la komunistoj, bone scias kiom malfacile rezultis dum tiuj jardekoj organizadi mobilizojn kontraŭ la diktatura reĝimo. La hispanaj revoluciaj aktivuloj ne estis malpli heroaj kaj malpli sindonemaj ol tiuj de aliaj landoj kie la revolucio venkis; kaj la hispanaj policistoj estis nek pli lertaj nek pli kruelaj ol la carisma aŭ iu ajn reakcia policaro. Se, tamen, en nia lando ne progresis la revoluciaj agantoj estis pro tio ke la popolo ne emis tiujn aventurojn ĉar ĝi ĝuis sekurecon. Jes, meze de modesta kaj humila situacio de malriĉeco, preskaŭ de subevoluo dum la komenca etapo de tiu reĝimo, sed tamen en situacio de sekureco kaj certeco pri la estonteco. Estis tre malaltaj salajroj, kaj multegaj familioj supervivadis nur dank' al la kromlaborado dum eksterordinaraj horoj post la ok-hora laŭleĝa laborado. Sed ne mankis la laboro, kaj estis certeco kaj sekureco pri la labor-loko. Nur tion postulas la popolo.

Kaj ĝuste tio komencas manki de nun. Ni vivas en mondo kie ekzistas neniu ajn certeco pri la estonteco. Komenciĝas epoko en kiu estos neniu ajn sekureco pri la kontrolo de la elementoj kiuj konstituas la bazon de nia materia ekzistado.

Ĉu eble mi tro estas pesimisma, subjektive, subinflue de la konkretaj situacioj kiujn mi travivas? Eble. Sed verdire la nunaj okazaĵoj kontribuas nenion al mia trankviliĝo. Mi ĵus spektis la ĉi-noktan pertelevidan informadon. Jen mi faras recenzon de la temoj kiuj konstituis la enhavon de tiu informado:

1) Nia landa televido okupiĝis pri la problemaro de ENSIDESA. La situacio en nia entrepreno fariĝis sufiĉe grava por altiri la publikan atenton landskale. La informado pri tiu temo estas ke: se oni ne atingas ian interakordon en la negocado okazanta dum ĉi-tiu semajnfino inter la ENSIDESA-entreprenistaro kaj la sindikataj perantoj pri la konflikto de la subkontraktaj laboristoj, en la semajno tuj komenciĝonta estos fermitaj la fabrikoj por intenci la normaliĝon de la situacio, kiu eble postulos la perfortan alsalton al la fabrikoj fare de la polico por eksigi la okupantojn de la instalaĵoj.


POLICIA
POLICIA


AEGEAN SEA

2) La televido informas ankaŭ pri aliaj konfliktoj en aliaj lokoj en nia lando. Ĝi montris bildojn pri la disvolviĝo de manifestacio de kamparanoj de la Valencia regiono antaŭ la delegitejo de la registaro en Valencio-urbo. Tiuj kamparanoj plendas pro la damaĝoj kiuj okazigas al ili la formo kaj kondiĉoj laŭ kiuj nia stulta, kontraŭpatriota kaj lakea regantaro interakordis kun la Eŭropaj aŭtoritatoj la enkondukon de nia lando en la Eŭropa Ekonomia Merkato. En difinita momento tiu manifestacio fariĝis perforta kaj tumulta. Post mia partopreno en la manifestacioj de la ferindustriistoj en Madrido mi jam bone scias kiom facile povas okazi tiu evoluo en la disvolviĝo de la homamasaj manifestacioj. La televido montris bildojn tre similaj al tiuj kiujn mi konas de miaj propraj travivaĵoj: la polico pafas fumbombojn kaj gum-kuglojn sur la manifestacianta amaso... okazas tumulta diskuro de la gemanifestaciantoj, kaj en la sekva malordo multaj personoj rezultas kontuzitaj... kelkcento da pli aktivaj manifestaciantoj, pli malpli spontane organiziĝas kaj faras agresan alfronton al la polica trupo... la policistoj, ŝirmitaj per kaskoĉapoj kaj plastaj kirasoj perbatas la popolanojn... fine konkretiĝas la amasa reago de plejparto el la manifestaciantoj, kiuj ĵetas sur la policitoj ŝtonojn, lignobranĉojn kaj oranĝojn. La lastaj pertelevidaj bildoj de tiu manifestacio montras la policistojn retiriĝante al la internon de la registara delegitejo ŝirmante sin per la kirasoj dum falkas sur ilin pluvego da ŝtonoj kaj aliaj diverstipaj objektoj. Mi restis sub la impreso ke mi ĵus vidis filmon kiun mi tre ofte spektas lasttempe...

3) La televido informis sekve pri alia afero. Nun temas pri bankroto de la hispanaj entreprenoj de KIO. La "Kuwait Investment Office" (Kuvajtia Agentejo pri Investado) posedas en mia lando multajn entreprenojn, akiritaj dum la pasinta jardeko. Kiel sciate, Kuvajtio investis en multaj industriaj landoj la profitojn atingitajn de sia produktado de nafto. La internacia apogo al tiu malgranda araba lando, kiam ĝi estis invadita de Irakio, ne estis malavara kaj justecoama iniciato de la potencaj industriaj landoj, sed intereso konservi la profitdonajn ekonomiajn rilatojn kun la feŭdisma reĝimo de la kuvajtiaj emiroj. Ankaŭ la regantaro de mia lando konsentis pri tiu malnobla politiko. Nun venas al Hispanio la justa pago pro tiu hontiga interrilato. La KIO-agentejo sin deklaras "nepag-pova" en nia lando; ĝi perdis 4.500 milionojn da dolarojn pro la fuŝa kaj korupta administrado de ties entreprenoj fare de la hispanaj kaj arabaj responsuloj de la KIO-interesoj en Hispanio. Rezulte de tiu bankroto, kaj laŭ la pertelevida informado, perdos sian laborlokon en ĉi-tiu lando 30.000 gelaboristoj de tiuj entreprenoj plus kromaj 70.000 de aliaj entreprenoj sur kiuj ne-rekte efikas la KIO-krizo. Jen dolĉega donaco por Hispanio okaze de la jam proksima Kristnasko-festo.

4) Por tiu festado, kaj kiel kulmino de la celebrado de ĉi-jubilea kaj Olimpi-luda jaro en Hispanio mankis nur konvena piroteknika sesio de artaj fajraĵoj. Kaj jen la fajro alvenis. La televido montris poste bildojn de la nafto-portanta ŝipego "Egea Maro", kiu koliziis, disfendiĝis kaj nun bruliĝas en la Galicia marbordo, en la nord-oriento de Hispanio, proksime al la urbego "Korunja". La televido montras impresegajn bildojn pri la bruliĝo de tiu ŝipego. Oni vidas la tieproksiman "Heraklean Turon", fama lumturo de la romia epoko -ankoraŭ funkciantakonsiderita kiel la plej antikva konstruaĵo nun ekzistanta en Eŭropo. En la fono vidiĝas la altegaj flamoj de la bruliĝanta "Egea Maro"-petrolŝipo. Alia bildo montras la rezultantan nigran kaj densan fum-nubon super la dense loĝata "Korunja"-urbo. La geloĝantoj de la apudmaraj vilaĝoj rapide devis forkuri el la proksimaĵoj de la katastrofa zono fuĝante el la danĝeraj kaj venenigaj gasoj de la nafto-bruliĝo. Dume la petrolo elverŝigĝnta el la disrompita ŝipo etendiĝas sur la mara surfaco tra multaj kilometroj da marbordo. Tio konstituas kolosa katastrofo de ekologia vidpunkto. Ĉiuj marestaĵoj pereas en ampleksa zono, kaj tio ruinigas ankaŭ la industrion de la tiu-zona fiŝkaptado kaj de la bredado de la bongustaj marestaĵoj de tiu regiono. Multaj familioj kies vivrimedoj dependas de tiuj industrioj vidas nun sian estontecon tiel nigra kiel la nafto-oleo kiu elverŝiĝas el la ventro de la ŝipego.

5) Mi konsentas resti antaŭ la televid-aparato esperante ke la sekva informado ne plu temu pri domaĝoj, konfliktoj kaj katastrofoj. Sed estas vana mia espero. Nun temas pri stranga malsano kiu efikas sur la gelaboristoj de kelkaj uzinoj en Andalucia-regiono, en la sudo de Hispanio. Laŭ la informoj, laste mortis alia junulino kiu laboris en iu el tiuj entreprenetoj dediĉitaj al la prilaborado de koloraj teksaĵoj. Nun post esplorado oni malkovras ke la farbo uzita por la koloriĝado de la teksaĵoj estas alte danĝera ĉar ĝi enhavas substancon kiu kartonigas la pulmojn de ties manipulantoj. Pro tiu kaŭzo mortis jam kelkaj gelaboristoj kaj troviĝas hospitaligitaj kelkdeko da pliaj eks-laboristoj de tiuj uzinoj; nun ili scias ke sur ili pendas kondamnon je baldaŭa morto. La televido montras la ploradon de la geloĝantoj de urbeto en kiu estas iu el tiuj teksaĵo-fabrikoj. Iu vidvino rakontas kiel ŝia familio tre ĝojis kiam ŝia edzo sukcesis trovi tiun laborlokon, en tiu zono kie tre estas malfacile pergajni iom da mono per-labore. Sed baldaŭ ilia ĝojo finiĝis kiam tiu homo malsaniĝis kaj baldaŭ mortis. Alia ino ploradas dum rakontas ke pli kaj pli mal-boniĝas la stato de ŝia juna filo enhospital-igita pro la sama kaŭzo.

6) Mi pensas ke la hodiaŭa informado jam finruinigis mian ĉi-noktan dormadon. Sed la televido senkompate daŭrigas sian mal-trankviligan taskon. Laŭ ties informado, malkovriĝas pli kaj pli da kazoj de domoj submetitaj al tiu pocezo de degradiĝo de la betono uzita en ties konstruado. Okazas ke en la konstruado de multaj domoj dum la jaroj 1955 al 1970, oni uzis en mia lando malkvalitan betonon (cemento). Laŭ la pasado de la tempo detruiĝas la konsisto de tiu materialo, ĝi fariĝas malkompakta, kaj la konstruaĵoj falas. Kelkaj domoj dispeciĝis kaj falis en Hispanio ekde antaŭ proksim-ume unu jaro. La specialistoj kiuj esploris la kaŭzon de tiuj domo-renversiĝoj diagnozis ke la konstruo-materialoj estis submetitaj al procezo de degradiĝo kiun ili nomas "aluminozo". Tio konstituas grandan problemon, kiu tre fariĝos pli akra dum la sekvaj jaroj, ĉar oni kalkulas ke dum la menciita periodo kiam oni uzis tiun malkvalitan cementon oni konstruis en ĉi-tiu lando pli ol dek mil grandajn domojn, kaj nun oni ne scias kiom da ili, kaj kiuj el ili, kaj laŭ kioma proporcio, enhavas tia-specan betonon. Kaj tio estas por mi kroma zorgo-kialo, kiam mi pensas ke mia familio kaj mi loĝas en multetaĝa domo konstruita en tiu epoko.

7) La televido montras nun bildojn de Somalio. Mi povas vidi amason da mal-sategaj homoj, vivantaj skeletoj. La informanto diras ke pro sennutriĝo kaj pro la tiea civilmilito senĉese mortas en tiu lando multaj personoj. Oni parolas pri ebla baldaŭa interveno de la usona armeo en tiu lando. Ŝajnas al mi ke ĉi-foje tute ne ĉagrenas min la fakto ke la usona armeo intervenu ie. La aferoj tiom estas en malbonega stato tie, ke mi pensas ke eĉ ne la usonanoj kapablos pli malbonigi ilin.

8) Mi demandas al mi ĉu la televid-informanto kapablus aldoni pliajn katastrofojn al la hodiaŭa menuo. Nu, jes, li kapablis. Sekve li informis pri la civil-milito en (eks)Jugoslavio, pri la Sarajevo-sieĝo, pri la bombardadoj, masakroj, kaj seks-perfortigoj en tiu malfeliĉa terzono. Verdire, tiu ĉi Jugoslavia ĉapitro de la informado estas neniu novaĵo; samkiel pri la afero de Somalio, lasttempe la informiloj senĉese ripetadas la saman bedaŭrindan historion. Tamen hodiaŭ estas iu novaĵo: la inform-anto hodiaŭ temas ankaŭ pri vunditoj inter la hispanaj knaboj destinitaj en Jugoslavio kiel UNO-trupoj.

Ĉagrenite mi leviĝis por ĉesigi la funkciadon de la informilo. Mi ne volis plu aŭskultadi la sekvan informon temantan pri la grandiĝo de la truo en la ozona atmosfer-kovrilo de nia planedo. En ĉi-tiu mondo kie tiom da aferoj ne estas certigitaj: nek la laboro, nek la laboristaj rajtoj iam konkeritaj, nek la manĝsato, nek la rezisto de niaj loĝejoj... rezultas ke ankaŭ ne la surtera vivo troviĝas sen sekureco. Malfacile mi povas digesti tiom da senkuraĝigaj sciigoj. Mi devus ĉesi spekti ĉiunokte la pertelevidan informadon...

la 10-a de decembro - 1993

Kara kamarado Igorj,

La hodiaŭa ĵurnalaro informas pri la hieraŭa pertelevida mesaĝo de Jelcin al la rusa popolo

petante balotan apogon por la nova konstitucio kiun li proponas. Ne estas necese ke mi ekspliku al vi la diktatorecan karakteron de tiu konstitucio. Vi bone konas tiun projekton de konstitucio, kaj mi supozas ke vi bone komprenas ke la politika reĝimo regata de tia konstitucio eĉ ne estas karikaturo de demokratio. Pli grave estas tio ke Jelcin ĉantaĝas kaj minacas per civilmilito la rusan popolon por ke ĉi tiu konsentu pri lia politika (kaj socia) projekto.
Nun vi rigardu perspektive la jarojn de la Perestrojko, kiam tiu sama Jelcin estis la ĉampiono de la demokratiig-procezo. Ĉiu nova dispono de Gorvaĉov celante demokratiigi la Sovetan reĝimon ŝajnis ne-sufiĉa al Jelcin, kaj li ĉiam postulis pli kaj pli drastajn kaj radikalajn decidojn en la linio de la malfortigo de la komunista reĝimo. Tiam li ne zorgis pri la danĝero de civilmilito en Sovetunio. Se la ekzistado de malsamaj politikaj kaj sociaj teniĝoj en Rusio estas fonto de ebla civilmilito, tio tiel estis vera tiam kiel hodiaŭ. Tamen tiu danĝero fariĝas politika argumento por tiu ulo nur nuntempe, kiam li kontrolas la politikan povon kaj ne volas ĝin perdi; kiam li volas konstrui sian propran socian sistemon de sovaĝa kapitalismo sur la ruinaĵoj de la socialista sistemo.
Kaj la kapitalistaj centroj de Okcidento same apogis tiun ulon antaŭe, kiam li celis la demokratiigon de la politika sistemo, ol nuntempe, kiam li volas limigi tiun demokration, ĉar ambaŭkaze la socia celo estas kontraŭ-komunisma, kapitalism-favora. Tio klare montras ke la veraj motivigiloj de tiuj instancoj, kiuj tiom emfaze propagandas pri la demokratio, ne estas tiu karakteraĵo de la politika sistemo, sed la realaĵo de la klasaj interesoj. La demokratio kaj ĉiuj ceteraj politikaj formoj estas nur superstrukturo de la socio -kiel prave instruis Marks-, sed la klasa kontrolo de la ekonomio estas baza elemento de ĉiu socio. La burĝaro konsentas la ŝanĝon de la superstrukturo (la politika reĝimo) kiel ŝanĝo de ĉapo sur la kapo. En Hispanio, Ĉilio kaj aliaj lokoj, la kapitalistoj bone konsentis ke oni metu finon al la faŝistaj reĝimoj por establi konstituciojn formale demokratiaj, sed tiu superreganta klaso neniam konsentos pri la ŝanĝo de la socia bazo, la ekonomia sistemo kapitalista. La proletaro kaj aliaj popolaj klasoj ne tiom estas saĝaj kiel la burĝaro tiurilate. La naivuloj falis en tiu trompo de la demokratio kaj pensis ke tio estas la vera afero de la ŝanĝoj.
Cetere mi volas montri al vi ke la formalaj demokratioj ene de la kapitalista sistemo ne estas veraj demokratioj, sed nur karikaturoj de la Demokratio. La teksto kiun mi transkribas sube montras la feblecon kaj la aĉan realaĵon de la hispana demokratio. Mi volas aldoni ke la demokratio en Italio, Portugalio, Turkujo, Greklando, k.a. estas tre similaj al la hispana. Kaj ties de Francio, Britio, Usono, Germanio, k. s. ne estas multe pli bonaj.

la 5-a de januaro - 1993)
Per ĉi longa raporto-kolekto, mi sufiĉe pritemis la krizon de la hispana ferindustrio, kiu verŝajne kulminos per la kompleta bankroto kaj finruiniĝo de la ŝtalo-fabrikoj de mia lando. Sed mi per ĉi-skribaĵoj pritemis ankaŭ aliajn aspektojn de la ekonomia kaj socia krizo de mia lando kaj de la tutmonda sistemo ĝenerale. Nu, la agonio de la hispana ferindustrio povos daŭri ankoraŭ multajn monatojn, eble plurajn jarojn, kaj la ĝenerala krizo de la sistemo estos ankoraŭ multe pli longa. Tamen mia kolekto devas havi iun finaĵon, eĉ se provizoran. Do, mi raportos pri la okazintaĵoj kaj la disvolviĝo de la situacio ekde mia lasta, antaŭa, raporto pri tiu temo.
Mi konstatas ke per tiu mia skribaĵo, kiun mi faris antaŭ unu monato, mi iamaniere plendis pro la abundeco da malfeliĉaĵoj, kiujn la tiutaga televid-informado superŝutis sur la spektantaro. Mi ne povas nun forgesi ke mia longa raportado havas la saman karakteron ol tiu pertelevida informad-sesio. Mia skribaĵo estas plena je konfliktoj, krizo, problemoj, klasaj interfrontiĝoj, strikoj, tumultoj, eĥoj de proksimaj disturboj kaj de malproksimaj militoj... Sed pri tio mi kulpas neniom, kiel ankaŭ ne kulpis la pertelevid-informanto de la 6-a de decembro. La informantoj ne kulpas pri tio ke la priskribata realaĵo estas tia kia ĝi estas.

Nu, ankaŭ la priskribado de la lastmonataj okazintaĵoj ne estas ĝoj-afera. Pasis la Kristnaska kaj la Novjara festoj, dum kiuj la familioj festas en gaja etoso. Estis festado, kaj ne mankis ĝojo, sed tamen ĉio okazis kadre de la kriza kaj problema situacio. La konflikto de la subkontraktaj laboristoj de ENSIDESA solviĝis en tiuj tagoj. La solvo,

almenaŭ provizora, utilis por meti finon al ilia strikado kaj okupado de la fabrikoj. Oni promesis al ili la kreadon de fonduso por subvencii ilian monkompenson kiam ili fariĝos senlaboruloj. Mi ne scias ĉu oni atingos tion (daŭras ankoraŭ ilia negocado kun la entreprenistaro), sed la fakto estas ke oni reigis la produktad-procezon en la ENSIDESA-fabrikoj, kaj tio sufiĉgrade malproksimigas la plej tujajn danĝerojn kiuj minacis nin. Tamen restis iuj sekvoj de tiu longa konflikto. Oni pagis al ni, la laboristoj de ENSIDESA, la 25 procenton de nia salajro de la monato novembro, kiun oni ŝuldis al ni ankoraŭ, sed el la eksterordinara pago de Kristnasko-festo ni ricevis nur la duonon. Kaj poste, el la salajro de la monato decembro ni ricevis nur ties 75 procento. Ĉi-momente ENSIDESA ŝuldas al mi 122.000 pesetojn (proksimume 1300 Us.dolarojn). Io simila okazas al ĉiuj ceteraj gelaboristoj de ĉi-tiu entrepreno. Tamen se normale daŭras la produktado, espereble, post malmultaj monatoj estos tute normaligita ĉi-situacio.
Aliflanke daŭras la negocado inter la sindikatoj kaj la Industrio-Ministro pri la monkompensoj kiujn oni devos asigni al la laboristoj kiuj perdos sian labor-postenon dum la sekvaj kvar jaroj. Menciinde estas ke dank' al nia batalado de la lastaj monatoj, tre estas plibonigitaj la ekonomiaj kondiĉoj komence ofertitaj de la Ministro. Mi pensas ke post malmultaj semajnoj oni alvenos al ia interakordo tiorilate. Tio ĉi estas tre klara ekzemplo de la laborista forto kiam ĝi koncentriĝas en grandaj fabrikoj kun kelkmilo da laboristoj. Nun mi povas konstati kiome troviĝas en multe pli malfacila situacio la laboristoj de la malgrandaj entreprenoj kaj uzinoj. Nuntempe okazas en la lando, kaj konkrete en la Asturia regiono mem, krizoj, bankrotoj, labor-eksigoj en multaj mezaj kaj malgrandaj uzinoj, ĉefe tiuj de la kemia industrio kiuj dependis de la financa Kuvajtia korporacio KIO, kaj mi povas vidi ke la eksigitaj laboristoj perdas sian laborpostenon kaj ili, spit' al ilia batalado (ĉi-tagoj la laboristoj de iuj kemiaj fabrikoj en Asturio okupadas la uzinojn kaj tie ili fastas plendante kontraŭ la disponoj pri ilia ekslaborigo) ne sukcesas atingi sentraŭmajn kondiĉojn de ekslaborigo.
Tiurilate, ja, la ENSIDESA-laboristoj kiuj perdos sian laborlokon povas esti kontentaj pri la kondiĉoj laŭ kiuj ili estos eksigitaj el la laborejo, ĉefe tiuj kiuj, pro sia aĝo, estas proksimaj al la tago de la laŭleĝa emeritiĝo, t.e. tiuj kiuj aĝas 55 jarojn aŭ pli. Tamen povas esti problemo por tiuj pli junaj kiuj, perdonte sian laborlokon en ENSIDESA, ili certe ne trovos laboron en alia loko, kaj mankas al ili pli ol 8 jaroj por emeritiĝo. Jam mi klarigis ke la ministraro de la Eŭropa Komuna Merkato povos trudi al la hispana registaro pli drastan fortranĉon de la hispana ferindustrio ol tiu planita en mia lando. Se tiuj sinjoroj sukcesos -en ties kunveno tiucele okazonta venonta monato februaro aŭ marto- trudi al mia lando siajn planojn, povos fariĝi senlaboruloj en ENSIDESA kvindekjaraj homoj kiaj mi. Ĉiukaze por mi same estas problemo tiel se mi troviĝus inter la eks-laborigitoj de la nuna plano kiel se mia situacio nun restos sensanĝa, ĉar estas neniu sekreto ke post kvar aŭ kvin jaroj la hispana ferindustrio suferos alian fortranĉon en sia produktadkapablo. Oni kalkulas ke tiu industrio en mia lando ne supervivos ĝis la fino de la nuna jardeko. Kaj ĉiukaze mi troviĝos inter la tiamaj eks-laborigitoj, kaj certe ĉi-tiuj ne atingos tiom favoraj kondiĉoj kiom la nunaj, samkiel la nunaj ankaŭ ne atingas tiom favoraj kondiĉoj kiom tiuj forpelitaj antaŭ kvin jaroj.
Sed ĉiukaze ŝajnas ke restas al mi kvar aŭ kvin jaroj da trankvileco en kio koncernas al la laborposteno, kaj tio eble estas sufiĉa sekureco en mondo kie, kiel jam ni vidis, estas nenio aŭ preskaŭ nenio certa kaj firma.
Estas aliaj menciindaj okazintaĵoj de la lasta monato. Dum ĉi lastaj semajnoj tre okupiĝis la informmedioj de mia lando pri la evidenco de la respondeco de la reganta Socialista Partio en plejparto el la kazoj de koruptado okazintaj en Hispanio dum la lastaj dek jaroj. Mi devas agnoski ke en ĉi tiu longa raporto, kie mi traktis multajn aferojn, enlandajn kaj eksterlandajn, mi ne sufiĉe okupiĝis pri tiu grava problemo de Hispanio. Mi nur plurfoje faris iujn aludojn al tiuj kazoj de koruptiĝo de gravaj hispanaj politikistoj.

Nun venas la momento okupiĝi iom pli profunde pri tiu temo, ĉar lasttempe oni alvenas ĉi-tie al situacioj de tre grava politika skandalo.
Kiel sciate, la regado de la Socialista Partio en Hispanio komenciĝis en aŭtuno de la jaro 1982. De tiam, tre baldaŭ la nomo de tiu partio aperis ligita al kazoj de malregulaj kaj ekster-leĝaj mon-aferoj.
La unuaj el tiuj kazoj estis tiu nomata "FLIK-makleroj". Estis indicoj ke la reganta Socpartio ricevis sekretajn kaj eksterleĝajn maklerojn el la germana entrepreno FLIK. La presaro tre spekulaciis pri la rilatoj inter la hispana Socialista Partio kaj FLIK-firmao. La ceteraj politikaj fortoj postulis esploron kaj klarigon pri tiu temo, kaj tiurilate estis akraj debatoj en la Parlamentejo. La politikaj partioj, samkiel ĉiu ajn privata ento, povas ricevi donacojn kaj maklerojn. Sed kiam tiu financado ne estas farita publike kaj laŭ la koncernaj leĝoj, eblas suspekti ke per tia-maniera mondonacado oni celas pagi politikajn kaj/aŭ ekonomiajn servojn kontraŭ la publikaj interesoj. La reganta Socpartio havis en la Parlamento sufiĉe ampleksan plimulton (majoritaton) por sukcese malhelpi ĉiun ajn esploron kiun oni volus entrepreni de tiu publika institucio. Ĉi-tiam kaj en multaj aliaj okazoj ili senbare kaj senhonte uzis tiun parlamentan forton por sufokigi ĉiun ajn denoncan voĉon kontraŭ ili. Sed estis necese ankaŭ konvinki la landon pri la nekulpeco de la regantoj. Tiucele en parlamenta sesio temante pri tiu afero, la Registar-Prezidento kaj Sekretario de la Socialista Partio, Filipo Gonzalez, en interveno pertelevide dissendita al la tuta lando, plene kaj dramece deklaris ke lia partio ricevis neniun eksterleĝan monhelpon. Li uzis esprimon kiu tre fariĝis fama tiam; laŭlitere li diris: *...mi ricevis monon nek de FLIK nek de FLOK*. Lia deklaro sonis sincere, kaj la popolo ĝenerale kredis lin. Dum la postaj dek jaroj tiom mensogis tiu ulo, ke la popolo lernis malkonfidi pri li. Nun ĉiuj hispanoj scias ke des pli oni devas malfidi pri li ju pli li ŝajnas sincera. La ĝusta interpretado de liaj vortoj, do, devas esti ke li ricevis monon de FLIK kaj krome ankaŭ de FLOK.
Baldaŭ post tio famiĝis alia skandalo; tiu de la vestaĵoj de Sinjorino Miró. La kino-direktorino Pilar Miró estis tiam prezidantino de la ŝtata televido. Oni malkovris ke ŝi ne klare registris en la kontoj de la institucio iujn elspezojn kiujn ŝi faris ŝiaprofite, konkrete por ŝia vestaro. La defraŭdita monsumo ne estis grava, proksimume du milionoj da pesetoj (200 mil Us-dolaroj). Tio ŝajnas ridindaĵo kompare al la grandaj monkvantoj de posttiamaj aferoj. Sed kio vere ĝenis la gehispanojn pri tiu afero estis la sinteno de tiu sinjorino. Kiam ŝi devis deklari antaŭ la parlamentanoj pri la destino kiun ŝi asignis al tiu publika mono, ŝi kondutis arogantece, fiere, malrespekte, impertinente... rilate al la parlamentanaro kiu reprezentas la suverenecon de la hispana civitanaro. Estas strange ke inteligenta intelektulino tiom fuŝe kondutis. Eble ŝi pensis ke apogus ŝin ŝia parlamenta plimulto de la Soc.Partio. Sed la fakto estis ke ĉi-foje ne eblis kontentigi la hispanan socion sen iaj disponoj. Tiu ino devis demisii kiel prezidantino de la hispana televido kaj krome ŝi estis juĝita kaj devis redoni la defraŭditan monsumon.
Sed poste pli kaj pli abundis kazoj de koruptado. Multaj urbestroj kaj urbskabenoj en multaj lokoj en la lando, rezultis implikitaj en aferoj de eksterleĝaj makleroj kaj similaj malhonestaj negocoj. Ne ĉiuj el tiuj malregulaĵoj estis faro de la socpartiaj aŭtoritatoj. Ankaŭ aliaj politikaj fortoj, ĉefe la plej grava partio de la Dekstraro, devis respondi pri tiu-tipaj ne-leĝaj agoj. Sed, verdire, pri la plej granda parto el la koruptado-deliktoj de la lasta jardeko respondecas tiuj socialdemokratiaj gesinjoroj.
Sed la plej grava inter tiaj aferoj sendube estis la t.n. "afero Guerra". En la hispana socialista administracio kaj en la aparato de la Socpartio la duaranga persono, post la menciita Filipo Gonzalez, estis la Vicprezidento Alfonso Guerra. Tiu ulo estas tre malamata en la lando, ene kaj for de sia partio, pro du kaŭzoj: unue, pro ties alta rango kaj politika povo; tio sendube estas neevitebla. Sed estas ankaŭ la fakto ke li estas tre maldelikata ulo. Tie ĉi oni nomas lin "la insulta aŭ la vipura lango de la Socialista Partio". En la balotkampanjoj li

asignis al si la rolon insulti la liderojn kaj kandidatojn de la politikaj fortoj kiuj konkuras kun la Socialista Partio. Tiel same en la parlamentaj debatoj lia orator-sistemo estas ne argumenti, sed insulti la kontraŭ-oponantojn. Ne gravas ĉu ĉi-tiuj kondutas edukite kaj perrezonade: li ĉiam respondas insulte kaj ofende. La estro de la Parlamento kiu kontrolas la debatadon konsentas al li tiun konduton ĉar ambaŭ apartenas al la parlamenta majoritato de la Socpartio. Tamen al la oratoroj de la ceteraj politikaj fortoj oni aplikas strikte la reglamenton kaj oni silentigas ilin se ilia tono aŭ stilo estas iomete ofenda por la Registaro. Tiele funkcias la demokratio kiam ĉi-tiu sistemo estas nur formalaĵo en socio kies tradicio ne estas demokratia.

Nu, en tiu etoso estas facile imagi ke kiam la nomo "Guerra" aperis ligita al iu skandalo pri koruptado, la presaro kaj la politikaj partioj de la opozicio sin ĵetis sur tiun aferon por elpreni el ĝi kiel eble plej da politika profito. Okazis ke la entrepreno ENSIDESA vendis al Johano Guerra, frato de la Registar-Vicprezidento, bienegon po 50 milionoj da pesetoj. Tiu bieno estis taksita po duobla valoro, t. e. cent milionoj (proksimume 10 milionoj da Us.doləroj). Do eblas supozi ke oni faris al la frato de Alfonso Guerra favoran vendon por ke li gajnu multe da mono. ENSIDESA posedas kelkajn bienojn, rezulte de konfiskado al ŝuldantoj kiuj ne povas pagi la produkt-aĵojn akiritajn al tiu ferindustria entrepreno. Poste ĉi-tiu vendas tiujn bienojn por rehavi iamaniere la monon ŝulditan al si. Tio ĉi estas tute laŭleĝa. Eĉ la vendo al Johano Guerra povas esti konsiderita kiel sufiĉe laŭleĝa, ĉar la vera prezo de ĉiu ajn aĵo ne estas tiu laŭ kiu ĝi estas taksita sed tiu laŭ kiu ĝi estas efektive vendita. Do tiu afero ne estus irinta tre malproksimen se la ĉef-rolanto ne estus samfamiliano de la Viz-prezidento. Sed la ĵurnalistoj kaj la politik-istoj de la lando sin dediĉis al la esplorado de la aferoj de tiu Johano Guerra, kaj tiam ili tute ne imagis al si kiom da surprizoj ili malkovros rezulte de tiu priesplorado.

La unua surprizo estis konstati ke tiu ulo, kiu en la jaro 1982, kiam komenciĝis la socialista regado, estis tre malriĉa homo, senlaborulo kiel multaj miloj da hispanoj, post kvin jaroj li posedas havaĵon je 5.000 milionoj da pesetoj (proksimume 500 milionoj da Us.dolaroj). Li posedas kelkajn vilaojn kaj farmojn, kaj gvidas entreprenojn, agentejojn... De tiam ĉiutage la presaro informadis pri nova kontraŭleĝa afero de Johano Guerra. Dum multaj monatoj tiu historio estis la ĉefa temo de la inform-medioj. Ne eblas al mi priskribi komplete ĉiujn aspektojn de la korupta aktivado de tiu ulo kaj ties kunkulpuloj ĉar tio postulus la verkadon de libro, kaj efektive oni verkis en mia lando librojn temente pri la aferoj "Guerra". Mi menciu nur la plej gravan el la malregulaĵoj, kiu, krome, havas tre altan politikan implikon. Rezultas ke dum tiuj jaroj de regado de la Socialista Partio, kies Vicprezidento estis lia frato Alfonso, Johano Guerra, havante neniun ajn politikan titolon nek taskon, senĉese okupadis iun oficejon en la delegitejo de la Registaro en lia urbo, Seviljo, kaj tie li demarŝadis kun la personoj irintaj al tiuj oficejoj por trakti oficialajn aferojn. Li promesadis al la demarŝantoj ke li solvos, bonfavore por ili, iliajn aferojn dank' al la influo-povo de lia altranga frato, sed ŝanĝe de tiu favoro oni devus pagi al li tioman sumon da mono.

La skandalo en la lando estis enorma kiam oni eksciis tion, kaj baldaŭ la tribunaloj malfermis kelkajn procesojn por juĝesplori tiujn aferojn. Kaj tiam komenciĝis la plej hontinda ĉapitro de ĉi-tiu prikorupta historio. Ekde la ŝtataj instancoj oni intencis sufokigi tiun esploradon: okazis premoj kaj minacoj sur la juĝistoj, kaj insultoj al la presaro fare de la bonedukita Registar-Vicprezidento. Al la juĝistoj kiuj okupiĝis pri tiu afero rezultis tre malfacile atingi la registro-libron de la vizitantoj de la Registar-delegitejo de Seviljo por priesplori kiom da kaj kiuj personoj faris tiujn kontraŭ-leĝajn negocojn kun la frato de ties "fratego". Tamen la presaro kaj la aliaj politikaj fortoj daŭre pli esploris ĉiujn dis-branĉiĝojn de la afero Guerra kaj malkovris aliajn implikojn. Tiel oni eksciis ke preskaŭ kvarcet personoj pagis al Johano Guerra altajn maklerojn por solvi iliafavore la negocadon kun la ŝtataj institucioj. Eĉ ene de la Socpartio mem kelkaj voĉoj petis

klarigon de tiu hontinda afero.
Do la Registaro alprenis alian strategion; Johano Guerra estis eksigita el la Socialista Partio, kaj la plejaltaj lideroj de ĉi tiu politika forto deklaris ke ĉio farita de tiu ulo estis nur sub lia propra iniciato kaj respondeco, kaj ke la partio havas neniun rilaton kun tiu agado. Konkrete la Vicprezidento Alfonso



*Alfonso Guerra, Vicprezidento kaj vipura lango de la Socpartio.*

deklaris ke li sciis absolute nenion pri la farado de Johano *...ĉu mi estas la gardisto de mia frato?* Kaj fidela al lia stilo li perinsulte atakis la ĵurnalistojn (al kiuj li kutime nomas "kanajlaro") kaj la politikistojn de la opozicio. Kaj krome li minacis dirante ke se daŭre oni priesploros lian fraton, li malkovros similajn koruptaĵojn far de personoj de aliaj partioj *...pri kiuj mi havas multe da informoj* li aldonis. Tiu interveno de Alfonso Guerra estis tre malbone ricevita de la publiko. Unue estas tute ne prezentinda la deklaro ke oni konas informojn pri koruptado kaj oni ne denoncu publike tiunn koruptadon, sed tute male oni uzas tiun konon por postuli ke oni ne pliprofundigu en la esplorado de aliaj kazoj de koruptado. Due, estas malfacile kredi ke tiom bone informita homo, kiu krome estas Vicprezidanto de la Registaro, scius "absolute nenion" pri la dum-kelkjara agado de lia frato en la oficejo de la Delegitejo de la Registaro en Seviljo. En la lando estis malagrabla sento ke nia demokratio, pene konkerita post kelkaj jardekoj da faŝista diktaturo, estas febla afero kiam friponuloj ekde la politika povo de la ŝtato agadas maletike kaj demisias neniu politika respondeculo post tiom ega skandalo. Tiam oni iome parolis pri la PRI-iĝo de la politiko de nia lando, aludante al la falsa demokratio



*...kaj ties fratego Johano.*

de Meksiko kie la socialdemokratia partio PRI ege korupte regas la landon de antaŭ multaj jardekoj sen politikaj garantioj por la ceteraj politikaj fortoj.
Krome aperis pli kaj pli da evidencoj pri la kunkulpeco de la reganta partio kun la agado de Johano Guerra. Verdire, ŝajnis klare ke tiu ulo "laboris" en la Registar-delegitejo de Seviljo favore al la financado de la Socialista Partio. La monsumoj enspezitaj de li, kaj kiuj tiom pligrandigis sian privatan havaĵon, estis nur eta parto el la monkvanto ricevita kiel makleroj de la negocodemarŝantoj kiuj pasis tra lia eksterleĝa oficejo. Baldaŭ fariĝis evidenta ke la Vicprezidento Alfonso bone konis la demarŝadon de lia frato, kaj krome oni malkovris ke du pliaj fratoj Guerra plenumis malregulajn negocojn dum tiuj jaroj kvankam ne tiomkvante kiom ilia frato Johano. En tiuj cirkonstancoj fariĝis neeltenebla la pozicio de la Vicprezidento Alfonso Guerra kiam alproksimiĝis la dato

de la balotado de la jaro 1989. Kelkajn monatojn (mi pensas ke tio okazis la 5-a de januaro de tiu jaro, do ĝuste kvar jaroj antaŭ la hodiaŭa tago) antaŭ tiu balotado, la "insulta lango" de la Socialista Partio anoncis sian demision kiel Vicprezidento de la regantaro kaj kiel ministro. Tamen tiu ulo restis kiel la duarangulo en la strukturo de la partia aparato, kaj fakte li daŭre estis ĝis nun la insulta lango de la Soc.Partio.
En la menciitaj balotoj konkuris, kiel kutime, la multaj politikaj fortoj de mia lando. Tamen, nekredeble, la Socialista Partio refoje atingis sufiĉan popolan apogon por havi dum pluaj kvar jaroj absolutan plimulton en la Parlamento. Por ekspliki kial tio okazas estus necesa iu kurso pri "Psikologio de la amasoj". Ni diru nur ke tiaj eventoj okazas, kaj ke ĉiu popolo havas la regantojn kiujn ĝi meritas. En mia lando ne unuafoje okazis io simila. Mi devas mencii ĉi-tie ankaŭ la kazon de Jordi Pujol, la registar-prezidento de Katalunio, iu el la aŭtonomaj regionoj de Hispanio. Tiu ulo estas lidero de politika forto naciisma, t. e. profitanta de tiu primara homa instinkto de la naciismo. Nu, ĝis tia grado Jordi Pujol reprezentas kaj enkarnigas la popolan esencon de tiu regiono, ke, kiam oni malkovris ke tiu ulo, en sia epoko de bankisto defraŭdis multajn milionojn da pesetoj, ne eblis juĝprocesi lin tial ke la katalunanoj politike apogis lin *...kvankam li estu rabisto* laŭ esprimo de tiama popola slogano.
Nu, la politika re-venko de la Socialista Partio post la afero Guerra kondukis la socialistojn al la konvinko ke ĉio estas permesate al ili; ke ili libere povas fari profitajn negocojn ekde la pov-postenoj ĉar tio tute ne malefikos sur la popola estimo al ili. Do la lastaj kvar jaroj estis senbara elsuĉado de la lando fare de tiuj gesinjoroj de la Socialista Partio. Mi intencos mencii mallonge la ĉefajn el la lastaj skandaloj pri koruptado, sciante ke inter tiom da materialo mi sendube forgesos iujn el ili.
Mi memoras nun, ekzemple, la aferon de "la aĉet-agoj de RENFE". RENFE estas la nomo de la nacia fervoja reto. Tiu entrepreno estas landa, t. e. ŝtata; ties direktoro estas elektita de la regantaro. Sendube ĝi estas la plej granda entrepreno en la lando, kun multaj miloj da laboristoj. Nu, antaŭ kelkaj jaroj oni malkovris ke tiu entrepreno dum pluraj jaroj aĉetis terenojn, kies neceso por la fervoja reto ne estas klara, kaj pagis ilin je prezo multege pli alta ol ilia vera valoro. Ne estas necese aldoni ke la vendintoj de tiuj terenoj estis familianoj de socialistaj altranguloj. Eĉ okazis ke iuj el tiuj vendintoj estis akirintaj la terenon malmultajn monatojn antaŭ ties transvendado al RENFE je prezo centona ol tiu pagota de RENFE.
Nun mi memoras ankaŭ tiun kazon de "la ne-ekzistintaj labortagoj". Okazas ke en la sudaj regionoj de Hispanio, preskaŭ ne ekzistas industrio, kaj estas multege da senlaboruloj. Tie multaj el tiuj senlaboruloj ricevas neniun ŝtatan helpon tial ke, laŭ nia landa leĝaro, por rajti tiun monkompensojn oni devas esti kotizinta dum iom da tempo al la ŝtata servo pri Socia Sekureco, kaj tiu kotizado, kompreneble, povas okazi nur kiam oni pergajnas iom da mono laborante. Nu, al multaj personoj kiuj neniam laboris kaj plenumis tiun kotizadon, la solcialistaj urbestroj de tiuj regionoj aranĝis fraŭdan dokumentaron deklarante ke tiuj kaj tiuj senlaboruloj dum tiom kaj tiom da tempo laboris sub la kontrolo de la urbodomo kaj plenumis la koncernan kotizadon. Tia agado, eĉ se kontraŭleĝa, celas bonfaran rezulton: helpi malfeliĉulojn kiuj ne havas aliajn vivrimedojn; ne mi devas kondamni tion. Sed estas netolerebla tio ke per tiu agado oni serĉas premii kaj pliigi la politikan klientaron de la reganta partio. Kiam iu urbestro de alia partio volis fari la samon en sia urbo, la landa regantaro igis ke oni rigore aplikadu kontraŭ li la leĝon. Tiu naivulo devis ekscii ke en la Meksiko-tipaj reĝimoj oni permesas agi kontraŭleĝe nur al la reganta partio.
Kaj temante pri la privilegioj de la regantaro, nun venas al mia memoro ĉio kio koncernas al la Internacia Foiro de Seviljo. Kiel sciate, inter la grandaj eventoj de la pasintjara celebrado de la Kvinjarcenta Jubileo troviĝis la okazado en mia lando de la Internacia Foiro. Tiu ĉi estis asignita al la urbo Seviljo, la urbo de la plejaltaj lideroj de la Socialista Partio: Filipo González, Alfonso Guerra, k.a. Tiuj uloj uzis sian povon por specialmeniere favori ilian naskiĝurbon eĉ domaĝe al la

cetero de la lando. Grandega parto el la ŝtata budĝeto de la lastaj jaroj estis destinita al la farado de grandaj laboraĵoj de substrukturo, kiuj tre pretarpasis la postulojn de la Foiro mem. Ekzemple, tute ne estis pravigita la konstruo de speciala fervoja linio por rapid-trajno inter Madrido kaj Seviljo. Tiaj luksegaj kaj multekostaj trajnoj ne povas ankoraŭ esti instalitaj en Hispanio en ĉi-tiu epoko kiam ankoraŭ ne estis plenumitaj aliaj pli urĝaj kaj necesaj bezonoj. Kaj eĉ se oni devus instali unu el tiuj trajnoj, estus pli logike kaj racie ke la fervoj-linio estus inter Madrido kaj la franca land-limo. Tamen niaj Seviljaj regantoj preferis ke tiu luksaĵo, eĉ se superflua, alvenu al Seviljo. Ĝi ne estis tre uzata dum la daŭro de la Foiro, kaj de tiam oni ĝin uzas eĉ malpli. Simile okazis kun multaj aliaj faraonaj laboraĵoj de grandaj ŝoseoj al Seviljo. Dume en multaj aliaj anguloj de la lando, ĉefe en la nordo, estas gravaj malfacilaĵoj por la trafika interkomunikado por la antikveco, ne-taŭgeco kaj ne-sufiĉo de la fervoj-linioj, ŝoseoj... kaj ties renovigo ne povos esti entreprenita dum multaj jaroj pro la egaj elspezoj de la lasta epoko. Tio estas simila kvazaŭ iu patro cele de speciale favori unu solan el liaj filoj elspezus favore al li la havaĵon kiu dum 20 jaroj devus utili por la bonfarto de la tuta familio. Tiele kondutis niaj regantoj de la Socialista Partio.

Se la Internacia Foiro de Seviljo konstituis, per si mem, iu kolosa kazo de koruptado je ŝtata nivelo, krome, ĝi estis kaŭzo kaj okazo de multenombraj kazoj de partikulara koruptado. T. e. por la konstruado de la grandaj laboraĵoj destine al la Foiro kaj al la foirejo, oni asignis la koncernajn kontraktojn al tiuj entreprenoj kiuj pagis pli altajn maklerojn al la socpartiaj respondeculoj kiuj faris la asignadon. Oni malkovris dum la lastaj monatoj multajn el tiuj kazoj, kaj nun la tribunaloj okupiĝas pri iuj el ili. Ekzemple, la akirado de la menciita rapid-trajno estis kaŭzo de la riĉiĝo de la familioj de tri altranguloj de la Socialista Partio. Du entreprenoj: iu japana kaj alia franca, konkuris por provizi tiun trajnon. Fine la asignado al iu el ili ne dependis de la supera kvalito de la materialo nek de la malmultekosteco de la prezo, sed de la alteco de la makleroj pagitaj al la menciitaj tri socialistaj funkciuloj.

Verdire, ankoraŭ oni scias multe pri la maniero kiel estis demarŝita tiu kontrakto kaj la koncernaj makleroj, ĉar daŭre oni esploras ankoraŭ tiun temon. Kaj io simila okazas kun alia el la grandaj skandaloj de la lasttempa epoko, t. e. la "afero FILESA". FILESA estas iu entrepreno apartenanta al la Socialista Partio, kiu uzas ĝin por sia memfinancado. Nu estas gravaj malregulaĵoj en la agado kaj en la financado de tiu entrepreno. La fakto ke iu partio posedas entreno(j) por sia memfinancado estas tute deca kaj laŭleĝa. Ĉie en la mondo, ĉiuj politikaj partioj, kaj ankaŭ la eklezioj kaj aliaj entoj povas havi kaj fakte havas entreprenojn kaj negocojn por ilia memfinancado, kaj tio estas tute normala kondiĉe ke ankaŭ la agado de tiuj entreprenoj estu deca kaj laŭleĝa. Ŝajnas ke ĝuste tio ne okazis en la kazo de la socpartiaj entreprenoj. Ŝajnas ke la regantaj socialistoj profitis sian politikan povon por influi favore al iliajn propraj entreprenoj, asignante al ili multajn kontraktojn de la ŝtata budĝeto por la grandaj elspezoj de la Jubilea jaro 1993. Tio konstituas kontraŭleĝan manieron transverŝi publikan monon en la partian trezorejon. Se krome rezultas ke tiuj entreprenoj siavice pagis maklerojn al la influopovaj socialistaj funkciuloj de la ŝtato, la delikto estas eĉ pli grava ĉar la fina destino de tiuj publikaj fondusoj estis la privataj poŝoj de altrangaj malhonestuloj. Tamen, se gravaj estas tiuj ĉi faroj, eĉ pli grava kaj hontinda estas la fakto ke nun ekde la politika povo de la ŝtato oni baras la esploro-laboron de la juĝistoj kiuj okupiĝas pri la afero FILESA. La Socpartio rifuzis transdoni al la juĝistaro la konto-librojn de la institucio. La presaro de la lastaj semajnoj tre informadas pri la lukto inter la estraro de la Socialista Partio kaj la juĝistaro rilate al la dokumentaro de la rilatoj inter tiu partio kaj FILESA. Neniu alia politika forto estus povinta en ĉi-tiu lando plenumadi tiun defion al la jura sistemo kia tiu ĉi de la Socpartio, kiu sin apogas en sia kontrolo de la ŝtataparato.

Alia trouzo de la ŝtata kontrolo kaj politika povo estis la t.n. "kazo de la Eŭropa Banko



*La "socialista Registar-Prezidento di Hispanio, Felipo Gonzalez.*

de Negocoj". El la komplikaj kaj tro teknikismaj informoj pri tiu kazo mi venas al la konkludo ke en tiu "Eŭropa Banko pri Negocoj" koncentriĝis multaj interesoj de financistoj ligitaj al la reganta partio kaj riĉaj familianoj de elstaraj socpartianoj. Dank' al tio, tiu banko ĝuis, por siaj financaj operacioj, la altvaloran privilegion de rekta informado el la altaj sferoj de la ŝtato. Spit' al tio, la investo-fonduso de tiu banko bankrotis, sed kiam tio okazis jam estis retirintaj sian monon el tie la ĉefaj financistoj de la socpartiaj familioj. Ankaŭ ĉi-kaze funkciis ĝustatempe kaj ekzakte ilia informad-kanalo el la altaj sferoj de la ŝtato. La faritaj esploroj klarigis ke tre estis kulpa pri tiu informado la tiama direktoro de la ŝtata banko, S-ro Rubio. Li estis devigita demisii de tiu posteno antaŭ proksimume unu monato.

Inter la profitantoj de tiu afero de la Eŭropa Banko de Negocoj troviĝis, laŭ tiamaj informoj, la eks-Ministro pri Financoj, S-ro Boyer. Tiu ulo meritas ke mi iom pli detale okupiĝu pri li. Li estis Ministro pri Financoj en la unua socialista registaro, ekde aŭtuno de la jaro 1982. En tiu rolo li ofte faradis alvokon al la popolo por aŭstera (modera, modesta) vivmaniero; li tre emfazadis pri la malbona ekonomia situacio, pri la ekonomia krizo... kaj postulis ŝparemon kaj malaltajn salajrojn por la laboristoj, kaj dekretis iujn disponojn tiurilate. Sed la plej rimarkinda el liaj agoj kiel ministro estis la ekspropriigo kaj naciigo de la entreprenaro-grupo RUMASA, aparteninta al la granda entreprenisto Ruiz-Mateos. Tiu entreprenar-grupo konsistis el banko kaj multaj entreprenoj de la produktad-sektoro de la nutrado (vino-farejoj, biero-fabrikoj...) samkiel aliaj bazaroj de konsum-varoj. Tiu dekreto pri naciigo estis bone aplaŭdita de grandparto el la landa civitanaro, ĉefe en la sociaj tavoloj de Maldekstraro, ĉar ŝajnis ke tio estis vera socialista politiko, plifortigi la publikan sektoron de la produktado domaĝe

al la privata entreprenaro. Tamen la realaĵo ne alĝustiĝis al tiu espero. La ekonomia politiko de la Socialista Partio ekde tiam, estis plifortigi la novliberalismajn poziciojn de la monopolisma kapitalo. Se la Ministro Boyer kaj la tuta registaro de Filipo Gonzalez domaĝis la interesojn de S-ro Ruiz-Mateos, tio estis afero de malakordo kaj lukto inter malsamaj tipoj je entreprenistaro. Fakte, la entreprenoj de RUMASA estis poste reprivatigitaj, venditaj al entreprenistoj -landaj kaj fremdaj- kies stilo kaj interesoj alĝustiĝis al la modelo de la novliberalismo de la novaj superregantaj klasoj. Post kelkaj jaroj la Ministro Boyer fariĝis fama en la lando kiam li eksedziĝis el sia ĝisnuna edzino kaj poste edziĝis al tre famkonata virino, Elisabet Prejsler, kiu antaŭe estis edzino de la monde famkonata kantisto Julio Iglesias kaj poste de la Markizo de Grinjon. Dum multaj semajnoj la hispana presaro, ĉefe tiu fak-presaro specialigita en la aferoj de la famuloj, okupiĝis pri la geparo Boyer-Prejsler, destine al tiu parto el la publiko kiu amuziĝas per tiaj aferoj. En tiu epoko li demisiis kiel ministro kaj revenis al lia posteno kiel direktoro de la Ekstera Banko de Hispanio. Li nun estas tre riĉa homo, dank' al la grandaj negocoj kiuj rezultis sukcesaj pro la informado al kiu li aliris dum lia politika aktivado kaj pro la rilatoj kiujn li povis ligi de tiu influopova posteno. Antaŭ malmultaj monatoj li kaj lia edzino I.Prejsler denove fariĝis celo de intensa presara informado kaj publika atento tial ke ili faris pertelevidan prezentadon de ilia nova vilao. Ili konstruis grandegan kaj luksegan loĝejon. La televid-spektantoj, apartenantaj al lando kie multaj personoj ne havas decan loĝejon, povis vidi, miri kaj admiri la palaceton de tiu privilegia geparo. Multaj el ili surpriziĝis vidante la multekostan kaj luksegan banejon, multaj aliaj ŝokiĝis eksciante ke por la hundeto de Boyer-Prejsler oni konstruis komfortan dometon en kiu ne mankas klimatiz-aparatoj por reguligi la temperaturon. Dum multaj tagoj post tiu pertelevida elsendo la informmedioj pritemis ĝin malaprobe demandante kion signifas tiu vantomontrado de luksega vivmaniero en epoko kiam la ekonomia krizo kun ties sekvoj de senlaboreco, mizero kaj malsato forte skurĝas multajn milojn da hispanaj familioj. Aliaj sin demandas al si ĉu tio estas la fina rezulto de la aŭstereco kaj modereco kiujn tiu ulo postulis kiam li estis ministro. Krome okazis ke tiu provoka televid-elsendo okazis ĝuste en tiuj tagoj kiam la Socialista Partio festis la dekjariĝon de ĝia regado. Multaj tiamaj ŝercoj rilatigis ambaŭ eventoj kaj sugestis ke multaj socialistaj altranguloj povas festi tiamaniere ilian jardek-regadon ĉar al ili kaj al ilia familia ekonomio tiele profitis tiun periodon.



*La "modesta" geparo Bojer-Prejsler*

Kaj ĝuste hodiaŭ ni eksciis per la informiloj pri alia nova skandalo pri koruptado. Ĉi-foje temas pri la kazo de iu sinjorino nomata Aida Alvarez. Mi pensas ke dum la sekvaj tagoj kaj semajnoj multe la presaro temos pri tiu sinjorino, tamen ĝis hodiaŭ ŝi estis tute nekonata en la lando. Same estis okazinta kun Johano Guerra antaŭ la malkovro de lia kontraŭleĝa agado. La kazo de Aida Alvarez iome estas simila al tiu de la frato

















***Dum la pasinta jardeko, la "socialistaj" regantaroj sin sekvis unu la alian. La fakto ke grandparto el la popolo daŭre apogis ilin, igis tiujn sinjorojn pensi ke al ili ĉio estas permesate.***

de Alfonso Guerra. Fakte, tiu sinjorino estis sekretariino de Alfonso Guerra kiam li estis Vicprezidento de la registaro. Krome ŝi estis edzino de iu altranga socialista funkciulo. Eksedziniĝinte el li, poste ŝi edziniĝis al alia socialista alrangulo. Nu, ŝajnas ke ŝi lerte sciis profiti tiujn rilatojn kun la altaj sferoj de la politika povo ĉar oni eksciis lasttempe, kaj la hodiaŭaj ĵurnaloj publikigas tion, ke tiu ino igis konstrui por ŝi en Madrido luksekan vilaon bone provizitan je multekostaj komfortaĵoj. Kiel ekzempleroj de tiuj luksaĵoj la presaro mencias du faktojn; unue, ke en tiu vilao Sinjorino Aida havas specialan kaj altekostan fridujon por la konservado de ŝiaj egvaloraj fel-manteloj kaj fel-peltoj (el vizono, mustelo, ermeno...), kaj due, ke nur por la seruroj por tiu vilao tiu sinjorino elspezis 17 milionojn da pesetojn (preskaŭ 200.000 usonaj dolaroj). Ne estas necese aldoni ke kiam komencis la socialista regado en Hispanio, antaŭ iomete pli ol dek jaroj, la posedaĵo de tiu virino estis nenio eksteroninara. Ŝi pliriĉiĝis rapide dum la lasta jardeko simile al multaj aliaj socpartianoj de la ŝtataparato. Ŝajnas ke la fonto de ŝiaj eksterodinaraj enspezoj estis makleroj pro la kontraktoj de multaj el la laboraĵoj de la Jubilea jaro 1992; ŝi troviĝis, pro ŝiaj rilatoj, en bona pozicio por influi favore al la asignado de tiuj kontraktoj al la entreprenoj, kaj la favoritaj entreprenoj pagadis per makleroj tiun influon realigitan iliafavore.

Alia afero kiu eble tre estos inform-celo dum la sekvaj monatoj estas tiu de la bankroto de KIO, la Kuvajtia buroo por investado fremdlande. En Hispanio tiu financa agentejo alvenis al iu situacio de fiasko kaj bankroto tial ke la koncernaj demarŝantoj, la hispano S-ro De-la-Rosa kaj ankaŭ la tiama kuvjtia responsulo pri la hispanaj financaferoj, verŝajne defraŭdis multajn milionojn. Sed nun ŝajnas ke pri tiu afero ankaŭ estis respondeco en la oficialaj instancoj de mia lando. Ekzemple, oni ne bone povas kompreni ke la registaro de Filipo González, kiu tre lerte kaj rapide intervenis en la afero RUMASA de Sro Ruiz-Mateos, kaj eksproprigis el tiu ulo ties entreprenojn kiam ankoraŭ estis neniu perceptebla malregulaĵo, kaj tamen tiu sama registaro ne sciis vidi ĝustatempe la signojn de la misfunkciado de KIO-Hispanio. La tribunaloj devas priesplori ankaŭ tiun aferon kaj ŝajnas ke ekaperas spuroj de kunkulpeco de responsuloj de la ŝtata banko kaj aliaj altranguloj de la reganta partio.

Nu, tiu ĉi hodiaŭa raporto-parto rezultis pli longa ol esperite. Mi volis fari nur koncizan priskribon de la koruptad-aferoj de mia lando, kaj mi ja ne tro amplekse pritemis la diversajn kazojn de koruptado, sed mi ne kulpas pri tio ke ili tiom estas multenombraj. En la historio de mia lando tre abundas la kazoj de malhonesteco de niaj regantoj, sed temante pri la socialista jardeko oni povas diri ke... neniam tiom da uloj tiome prirabis dum tiom malloga tempo-daŭro.

Jes, mi scias ke simile kreskis lasttempe la koruptiĝo de la politikistoj ankaŭ en aliaj landoj: Italio, Germanio, Japanio, Usono... eble tio multe rilatas al la krizo de la etikaj valoroj de la socialista jarcento. En la kazo de Hispanio, konkrete, mi ne pensas ke tio solviĝos per la elektado de alipartiaj politikistoj. Nun ŝajnas ke definitive la politika balotado en mia lando okazos venonta aŭtuno, kaj kvankam la nun farataj enketoj respegulas la perdon de multaj voĉdonoj de la Socpartio, mi pensas ke eble tiuj uloj denove akiros sufiĉan popolan apogon por daŭre regadi la landon. Kaj kiel dirite, mi ne esperas grandajn ŝanĝojn pri tiu koruptadafero el ebla ŝanĝo de reganta partio. Sincere, nun mi fidas nenion pri la politikistoj, eĉ pri tiuj de mia propra partio, ĉar estas evidenta kiom facile la novaj regantoj baldaŭ falas en la malvirtojn de la antaŭaj regintoj, kej eĉ pretersuperas ilin. La ekzemplo de la hispana Socpartio estas tre klara kaj instrua. Tiurilate mi diras ke se politika venko de la komunistaj kandidataroj de Unuigita Maldekstro fine kundukus al situacio de koruptado kiel la nuntempa, mi preferus ke la komunistoj restu en la opozicio ankoraŭ dum kvarcent aŭ kvincent jaroj anstataŭ senhonorigi sin per malhonesta regado kiel faris la komunistoj de aliaj mondpartoj kaj nialandaj socialistoj.

la 11-a de decembro - 1993

Kara kamarado,

Vi povas konstati ke la ĉi-laste transskribita

teksto estis verkita de mi komence de la nuna jaro. Por kompletigi la informadon de la temoj pritraktitaj per tiu transskribita materialo, mi devus rakonti kiel disvolviĝis, dum ĉi-jaro 1993, la krizo de la ferindustrio kaj la politika situacio de mia lando.

En kio koncernas al la situacio en la fabriko kie mi laboras, la nuna jaro estis sufiĉe trankvila: preskaŭ ne estis strikoj, la subkontraktaj laboristoj normale laboradis dum ilia sindikataj perantoj prinegocadis kun la entreprenistaro siajn aferojn. Ŝajnas ke ili iom atingis en siaj postuloj pri la kondiĉoj de laboro kaj ties de eks-laboriĝo, kvankam ilia situacio daŭre estas pli malbona ol ties de la fiksaj laboristoj. El ĉi-lastaj, dum la nuna jaro perdis sian laborlokon en ENSIDESA pli ol 2500, t. e., ili estis tro frue emeritítaj. Tamen ne okazis rezisto ĉar oni aplikis al ili relative favorajn ekonomiajn kondiĉojn. Vi memoru ke tio estis la sola atingaĵo de nia batalado de la pasinta jaro. Tio signifas ke oni estas aplikante tiu plano de la registaro pri la iom-postioma likvidado de la hispana ŝtalo-industrio, kio tre grave domaĝas mian regionon. Tamen ne eblis artikigi pluan popolan reziston kontraŭ tiu katastrofa politiko. Plej grave estas tio ke ankoraŭ la ministraro de la Eŭropa Ekonomia Komunumo ne aprobis tiun planon kiu jam oni estas aplikante. La ceteraj landoj de la Eŭropa Komuna Merkato volas trudi al la hispanoj pli profundan kaj rapidan detruadon de nia ferindustrio. Por tion atingi, ili premas mian landon neante al ni la ekonomiajn subvenciojn por la ferindustrio. Rezulte de tio la ekonomia situacio de la hispana Ferindustria Korporacio, en kiu estas enkadrigita la entrepreno ENSIDESA pli malboniĝas, ĝiaj ŝuldoj kreskiĝas. Ĉi-jare oni devis revizii la salajro-kontrakton de la laboristoj, sed tiu temo restas ne-tuŝita ankoraŭ kiam la jaro finiĝas... la danĝero de bankroto de nia entrepreno pli kaj pli fariĝas granda kaj proksima...

La hispana registaro de la Soc.Partio, kiu tiom respondecas pri tiu situacio, kaj pri la multaj kazoj de koruptado kiujn mi priskribis, daŭre regas sur tiu ĉi malfeliĉa lando. En la printempo okazis ĝenerala politika balotado. Laŭ la enketoj tiam faritaj, la socialistoj estus perdonta granda nombro da voĉdonoj, kaj tial ankaŭ la kapablon pluregi la landon. Tamen savis la situacion la registar-prezidento Filipo Gonzalez. Pluafoje li pruvis ke li estas vera spertulo en la arto trompi la popolon. Lasttempe aperis en via lando simila trompisto kiu imitas lin. Nia Filipo faris ion, kio estis imitita lasttempe de Jelcin: en la lastaj tagoj antaŭ la balotado li adresiĝis pertelevide al la popolo. Per unusola interveno li trompis ankoraŭfoje grandparton el la hispanaj voĉdonantoj kaj ŝanĝigis ilian voĉdon-intencon. Li tre humile deklaris ke li tute estas senkulpa pri la multaj kazoj je koruptado de lia partio, kaj atribuis la respondecon pri tiuj fiagoj al liaj subuloj en la gvidado de la Socialista Partio. Li promesis ke se denove la popolo konfidos pri li, li faros purigadon en la Socpartio por ke estu punataj la koruptuloj, kaj prenos la disponojn por ke ne plu okazu tiaspecaj kazoj. Krome li adresiĝis al la publiko kiu estis preta voĉdoni favore al la komunista kandidataro de la koalicio "Unuigita Maldekstro" kaj timigis ilin pri la ebleco de venko de la dekstraro se oni ne kuncentrigas la voĉdonojn de la maldekstrularo en la plej potencan partion de Maldekstro. Eble ŝajnas al vi nekredeble, sed la fakto estis ke multaj miloj da hispanoj denove falis en la eraro konfidi pri tia ulo. Lia partio tamen perdis preskaŭ milionon da voĉdonoj kompare al antaŭaj balotoj kaj tio signifis ke ĝi perdis ankaŭ la absolutan plimulton kiu permesis al ĝi regadi ĝis tiam sen kolalicii kun aliaj parti(et)oj. Do por plu regadi sur Hispanio tiu ulo devis koalicii ĉi-foje kun aliaj politikaj fortoj. La unua trompo al lia voĉdonantoj de Maldekstrao estis ke li koaliciis, ne kun la maldekstra forto de la komunistoj sed kun partietoj naciismaj kaj desktremaj kaj sekve de tio lia registaro estas nun eĉ pli dekstrema ol antaŭe. Antaŭ malmultaj tagoj tiu ulo subskribis serion da dekretoj kiuj plifaciligas al la entreprenistoj la aferon de la maldungado de laboristoj kaj malpliigas la kvanton de la subvencioj al la senlaboruloj, samkiel aliaj ŝtataj subvencioj por sociaj servoj. Ĉio-ĉi enkadriĝas en procezo de ruinigo de la sistemo de la ĝisnuna Komfort-socio cele de ke la posedantoj de kapitalo eltiru el siaj investoj pli altan plusvaloron.

La dua trompo estas tio ke la afero de la koruptado estas same ol antaŭe. Oni faras nenion por eviti tiujn skandalojn, kaj krome ankaŭ ne oni punas la responsuloj de la defraŭdoj okazintaj antaŭe. La juĝistaro neniam estis vere sendependa de la regantaro en mia lando, kaj tio evidentiĝas denove nuntempe. Johano Guerra, la frato de la eks-Vicprezidento de la registaro estis jam juĝita kvarfoje pro la aferoj en kiu li estis implikita, kaj el ĉiuj kvar juĝoj li eliris senpune.

La koncernaj sentencoj estas io eksterordinare stranga kaj komika; unu aŭ du el tiuj sentencoj diras ke la menciita Johano Guerra estas vere kulpanto pri koruptaj aferoj, sed ke decas apliki al li neniun punon tial ke la koncernaj kazoj ne estis tipigitaj en la Jura Kodo (!!). La popolo denove estas tre elrevigita pri la regado de tiu Filipo kaj ties socialdemokratiaj ministroj kaj guberniestroj, sed vi ja vidos kiel en la lastaj momentoj de la sekva balot-procezo li denove trompas la hispanan loĝantaron kaj povos plue domaĝi nin regante sur ni.

Tiele funkcias tiuj ĉi demokratioj kiuj estas nur formale demokratiaj. La regantoj nur dum la balotkampanjo adresiĝas al la gecivitanoj, kaj tion faras krome nur per promesoj kiujn neniam estos plenumataj. Poste dum kvar jaroj ili povos senbare fari ĉion kion ili deziras ĉar la civitanaro ne estas organizita por kontroli la regadon kaj premi pri la plenumo de la konvenaj disponoj. Aliaj liberecoj, kiel la preslibero, estas nur formalaĵoj. Oni nomas preslibero al la fakto ke nuntempe la eldonantoj de ĵurnaloj ne devas prezenti ties enhavon al la politika cenzuro de la regantoj. Sed restas la fakto ke en la realo povas havi presliberon nur tiuj kiuj krome havas sufiĉe da monon por eldoni ĵurnalojn, t.e., la monposedantaj klasoj. En la urba organizaĵo de la Komunista Partio mi, inter aliaj respondecoj, havas la rolon trakti kun la urba presaro por la publikigado de niaj materialoj. Nu, foje la urba ĵurnalo publikigas iujn el la skribaĵojn kiujn nia partio sendas al ĝi, sed la redaktoro kaj la direktoro de tiu ĵurnalo decidas ĉiukaze kiuj artikoloj niaj povas esti publikigitaj kaj kiuj ne. Antaŭ unu monato kaj duono, proksimume, mi sendis tien por publikigo mian artikolon "La obstina realaĵo de la klasbatalo" kies esperantlingvan version mi sendis al vi. Se vi ricevis kaj legis ĝin, vi eble memoras ke ĝi temas pri la okazaĵoj de Moskvo kaj la poziciiĝo pri ili surbaze de klasa intereso. Ĉi-kaze la mastroj de la ĵurnalo ne volis publikigi la kompartian artikolon. Por ties disvastiĝo mi devis serĉi aliajn formojn malpli efikajn kaj multe pli kostajn. Ekzemple, mi faris per la fotokopiilo de la kompartiejo kelkcento da fotokopiaĵojn kaj distribuis ilin en kelkajn mediojn; multaj el ili estis surgluitaj en la muroj de la fabriko kie mi laboras. Por tion fari mi estis trairanta la fabrikon dum kelkaj horoj kune kun aliaj kamaradoj. Neniu malpermesis al ni tion fari; jen tio estas la sola enhavo de la nuna demokratia preslibero. En la epoko de la frankisma diktaturo mi estus kondamnita, pro tiu ago, al sesjara restado en malliberejo (ĉar tiu "delikto", ja, estis konvene tipigita en la Jura Kodo). Resume, en la formala demokratio, okazas kun la preslibero same ol kun la privata propraĵo, t.e., iuj personoj povas ĝui multe el ili, aliaj malpli, kaj multaj aliaj nenion; ĉio dependas de la monokvanto je kiu ĉiu disponas.

la 12-a de decembro - 1993

Kara kamarado,

Hodiaŭ mi volas pritrakti la parton plej feblan kaj kontraŭdiran de via letero de la 4-a de novembro. Mi temas pri tiu via diraĵo:

*Certe, estus tre bone, se ne estus klasoj kaj ĉiuj egalus, sed ili ekzistas kaj ni devas elekti sian klason.*

Unue, mi vidas taŭtologion en via aserto. Se vi vere opinias ke estus bone ke ne ekzistu klasoj, kaj ke regu la egaleco, kial, do, ne labori por la malaperigo de klasa socio, anstataŭ klopodi, kiel vi faras, restarigi kaj plifortigi mezan klason?

Kaj due, kio signifas via diraĵo ke ĉar la klasoj ekzistas, ĉiu devas elekti la sian? Vi komprenu ke miaj duboj konkretiĝas en tiuj du substrekitaj vortoj: ekzistas kaj sia. Ekzakte parolante, vi ne povas diri *Car la klasoj ekzistas...* tial ke nia diskutado ekstartas de situacio en kiu tiuj klasoj ne ekzistis, t.e. la Soveta reĝimo. Precize vi diris al mi per via unua skribaĵo ke via partio... *intencas esprimi la interesojn de t.n. "nova meza klaso"*, do via meza klaso estas nova en lando kie ĝi ne ekzistis antaŭe. Krome vi diris ke tiu klaso en Rusio estas tre malforta, kaj oni povas eltiri el via skribaĵo ke via partio intencas plifortigi tiun klason, al kiu vi atribuas serion da virtoj, realaj aŭ imagitaj, kiel stabileco kaj kapablo esti fundamento por trankvila kaj progresema socio. Pri tio mi diras al vi ke en la lokoj kie tiu klaso estas forta ne evidentiĝas tiuj virtoj kaj kvalitoj pri kiuj vi revas. Estas necesa tiom da fido por kredi en la virtoj kaj kapablo de tiu klaso, kiom por fidi pri la kvalitoj kaj kapablo de la proletaro. Ci skribaĵo ne estas konvena loko por disvolvi historian analizon de la socioj kie regis meza klaso kiel tiu kiun vi priskribis, sed se la temo interesas al vi, per miaj sekvaj poŝtaĵoj mi ja faros tiun analizadon post ĝisfunda studado de la temo.

Rilate al la alia vorto (sia) de via aserto, mi

demandas al vi: kiel la meza klaso fariĝas via klaso? Estas evidente ke vi asignas vian personon al tiu klaso, sed kial tiu fenomeno okazas? La socia realaĵo montras ke, ĝenerale, unu homo ne povas elekti la klason al kiu li/ŝi apartenas; oni naskas en iu klaso, aŭ oni atingas la rajton pasi al pli alta klaso, aŭ povas okazi ke oni faliĝas en pli malalta klaso. Ĉiukaze la aparteno al iu klaso aŭ la paso al alia ĉiam estas rezulto kaj sekvo de la mono kiun ĉiu posedas, ĉar temas pri sociaj (t.e. ekonomiaj) klasoj. En tiuj socioj, kiel la tradicia hindia (hinduisma) socio la klasoj estas "kastoj" t. e. ili havas ne nur ekonomian sed ankaŭ rasan kaj religian karakteron, do tie ne eblas la foriĝo de la klaso aŭ kasto en kiu ĉiu naskiĝas. Mi pensas ke en nuna Rusujo, kiu ajn estu la maniero kiel la klasisma socio rastariĝos, ne povos ĉiu homo elekti la klason al kiu li/ŝi volas aparteni. Do, kiel vi alvenis al la via? Kaj, cetere, ĉu vi daŭre sopiros al la plifortigo kaj plipotenciigo de la meza klaso, se vi estus devigita resti kiel proleto en tiu socio?

Alie, mi volas atentigi vin pri la fakto ke en la planoj por la nova Rusujo kiun vi volas konstrui, vi forgesis iun gravan faktoron: la mondo ekstera al Rusujo, t.e. mondo sesfoje pli granda ol Rusio de teritoria vidpunkoto, kaj eĉ pli de vidpunkto ekonomia kaj pro la kvanto de la loĝantaro. Por la konstruado de la Socialismo en Rusio, ne forgesis pri tiu ekstera mondo Lenin kaj siaj sekvintoj. Lenin kalkulis je revolucio en la alte industriigitaj landoj, por antaŭenpuŝi la revolucion kaj la socialismon en Rusio. Liaj sekvantoj, tial ke ne okazis la esperita revolucio en Okcidento, aranĝis sistemon de Socialismo en unusola lando en konkurenco kun la kapitalisma mondo. En ambaŭ kazoj oni kalkulis en Rusio kun la realaĵo de la ne-rusa mondo. En viaj planoj por la konstruado de riĉa kaj prospera Rusio mankas prikonsideroj pri la rolo de la ekstera mondo en tiu projekto. Ĉu vi pensas ke la monda kapitalismo lasos al vi, al la rusoj, fari socian sistemon kaj klas-strukturon laŭ via plaĉo kaj konveno?. En la monda ekonomia sistemo Ruslando okupos la lokon kiun asignos al ĝi la tutmonda gvidanta klaso, kaj Jelcin estas la lakeo kaj deĵoranto de tiu monopolisma kapitalista klaso. Ne al vi, sed al tiuj gvidaj centroj de la kapitalismo koncernas nun decidi la lokon kaj la rolon kiujn ludos via lando en la monda ekonomio. La sola forto kapabla sin oponi al tiu ekonomia potenco en la mondo estis, dum kelkaj jardekoj, la Socialista bloko subgvide la Komunista potenco de Sovetio. Ruininginte tiun obstaklon, vi bone servis al la monda kapitalista sistemo, kaj nun ĉi tiu jam ne plu bezonas vin; ĝi uzos Jelcin-n aŭ Popov-on aŭ iun alian similan por prem-detrui vin se vi konstituos minacon por la stabileco de ĝia sistemo. Sed vi ne timu, plejcerte okazos al vi nenio se via teniĝo daŭre estos eviti la revolucion kaj celos realigi viajn aspirojn *ekskluzive per leĝaj rimedoj uzante liberajn balotojn por preni la ŝtatpotencon*. Ĉu vi pensas ke Jelcin rezignos la ŝtatpotencon se li perdos la balotojn kiuj estas okazantaj en via lando hodiaŭ kiam mi skribas letero-parton? Via popolo, kiu ne estis inda je tiu revolucia slogano **La tuta ŝtat-povo por la sovetoj**, nun ricevas la justan punon konstituata de realaĵo kiu povas esti difinita kiel: **La tuta ŝtat-povo por Jelcin**. Tiel okazas ĉiam kiam unu popolo rifuzas plenumi sian historian kaj transcendan taskon, kaj kondutas egoisme.

la 13-an de decembro - 1993

Kara kamarado,

Hodiaŭ la informiloj raportas pri la rezultoj de la hieraŭa balotado en Rusio, rezultoj ne-definitivaj, ĉar oni ne konas ankoraŭ la datumojn de la tuta lando hodiaŭ kiam mi skribas ĉi-letero-parton. Via procezo? kiun rezulton vi atingis?

Krom la informo mem, estas en la ĵurnalaro ankaŭ artikoloj de la politikaj specialistoj, kiuj analizadas la balotadon, ties cirkonstancoj kaj ties rezultojn. Iuj el tiuj spertuloj pri politikaj aferoj eĉ spekulativas pri la politikaj eblecoj de la diversaj fortoj kun parlamenta ĉeesto. Pri tiu ĉi temo. mi havas tre difinitan (netan, klaran) opinion. Mi pensas ke kiom ajn estu la parlamenta forto de la diversaj partioj, neniu el ili kapablos efektivigi sian politikon; la politika povo de Rusio dum la sekvaj jaroj, ja, ne kuŝos en la Parlamento. La soci-politika sistemo ne estos ŝanĝita ekde la Parlamento, kaj ankaŭ ne estos defendita de tie. Kaj same okazos en la sekvontaj parlamentoj elektotaj sub la Konstitucio aprobita hieraŭ. Cetere tiu aprobo estas nur formala: tiu Konstitucio regis ĵam ekde antaŭ ties formulado, ĝuste ekde la tago kiam la antaŭa Parlamento estis nuligita pere de la kanonoj. De tiam la sola politika povo de la lando estas efektivigita de B.Jelcin kun la konsento de la armeo. Plej ĝuste, la ŝtat-povo de Rusujo nun kuŝas en la armeo (Jelcin, ja, ne vivos dumlonge).

Vi celas aliri al la politika povo pere de demokratia procedo kadre de laŭleĝa sistemo. De nun vi lernos ke la leĝoj estas farataj laŭ la intereso kaj profito de ties faranto. Neniam eblas ŝanĝigi la esencon de iu sistemo ekde la interno de ties institucioj. Tion scias bone Jelcin, kiu devis entrepreni kelkajn forto-iniciatojn por findetrui la komunistan reĝimon, kaj eble estos necese al li pliajn puĉojn por kompletigi tiun taskon. La unua el tiuj forto-agoj, estis la alsalto, kun popola mobilizo, al la soveta sistemo meze de la Perestrojk-procezo por ŝanĝigi kaj preterpasi ĉi-ties celojn, atingante ian politikan pluralismon kiu komence ne estis planita por la Perestrojko. La dua forto-provo estis vera puĉo, profitante la fiaskon de la Sovet-favora puĉo de Aŭgusto-1991, li, estante nur Prezidento de Rusio, entreprenis agojn kaj disponojn por la malaperigo de la Soveta Unio. La nuligo de la Komunista Partio de Soveta Unio, en tiu kadro, estis alia vera puĉo. Kaj fine, antaŭ du monatoj, li per kroma puĉo metis finon al la lastaj politikaj postrestaĵoj de la Perestrojko-procezo. Nun li posedas sufiĉe da povo por entrepreni pliajn forto-batojn kontraŭ la ankoraŭ ekzistantaj restaĵoj de la Socialista sistemo, kiel la ŝtata kontrolo kaj propraĵo de la industrio, k. s.

Vi konas la rusan realaĵon pli bone ol mi, do mi ne devas klarigi al vi ke la nova Parlamento ne povos, kvankam ĝi volus, eviti tiujn sekvan forto-agojn. La nova Konstitucio rajtigas la Prezidenton fari sian politikon, kaj eĉ se la konstitucio ne estus aprobita en la hieraŭa balotado, li havas povon por pluregi sen Parlamento kaj sen Konstitucio. Por depreni de li tiun povon estus necesa popola rezisto, revolucio, kiu krome venkus. La venkanta revolucio povus dikti sian propran leĝon, sian propran Konstitucion, kaj elekti sian propran Parlamenton.

Tio estas vero ne nur por Rusujo. Ĉiuj parlamentoj en la mondo ŝuldas sian leĝad-kapablon ne al la voĉdonantoj kiuj elektis ilin, sed al la ekster-leĝa ago kiu kreis ilin. Mi eksponos kelkajn historiajn ekzemplojn kiuj pravigas ĉi tiun teorion.

En la jaro 1789 en Francio, la Reĝo Ludoviko la 16-a kunvokis en Versajlo la Parlamenton laŭ la tiam funkcianta leĝaro. Dum kelkaj monatoj la perantoj de la nobelaro, ties de la pastraro kaj ties de la popolo (la t.n. "tria klaso": burĝuloj, kamparanoj, laboristoj kaj ceteraj popolaj tavoloj) pridiskutis senutile, ne-kapablaj interakordi ion utilan por la franca popolo. En tiu leĝa kadro ili povis nenion kontraŭ la reĝa povo. Ĉio ŝanĝiĝis subite per iu ago eksterleĝa, per-forta, revolucia: la 14-a de Julio de tiu jaro, la loĝantaro de Parizo alsaltis la Bastilion, simbolo de la reĝa povo. La Reĝo ne povis disponi je sia armeo. Tiu armeo estis tiam en krizo kaj ne disponis de iu vera armeestro, kaj la Reĝo mem ne kapablis estri tiun armeon. En tiuj kondiĉoj aperis en Francio iu nova ŝtat-povo kiu tute ne alĝustiĝis al la antikvaj tradicioj. Ĉiuj en la lando eksciis tiam ke aperis nova povo sur la tero. La Parlamento de Versajlo repidege preparis tiam novan Konstitucion laŭ la interesoj kaj la postuloj de la nova povo. Tiuj parlamentanoj estis la samaj kiel antaŭ la alsalto al la Bastilio; ankaŭ estis la sama Reĝo, sed la situacio estis tute alia post la 14-a de Julio de 1789. De tiam la parlamentanoj de la tri klasoj (nobelaro, pastraro kaj popolo), spite al siaj kontraŭdiroj, tutakorde preparis Konstitucion laŭ la bezonoj de la nova Povo; ili ja sciis ke ne eblis al ili fari alie: la nobeloj kaj la episkopoj rezignis "trevolonte" pri iliaj tradiciaj privilegioj. Kaj la Reĝo akceptis "tre-volonte" tiun Konstitucion; li ja komprenis ke nur sub la ombro de tiu konstitucio li povus daŭre reĝi. Sekve tiuj parlamentanoj demisiis por ĉiam cele de ke la nova povo elektu sia(j)n propra(j)n parlamento(j)n. La sekva Parlamento t. e. "La Konvencio" daŭrigis sian revolucian laboron ĉiam sub la impulso de la revolucia puĉo de la 14-a de Julio-1789, ĝis tute elĉerpiĝis la forto de tiu impulso, ĉefe pro tio ke la popola klaso ne estis unueca kaj stabila; ĝi estis konstituita de diversaj malsamaj klasoj kaj tavoloj kun kontraŭdiraj interesoj. Tiuj kontraŭdiroj signis la sangan kaj konvulsian historion de la revolucia reĝimo ĝis alia forto-bato, ĉi-kaze armea, sub vera militestro, establis alian ŝtat-povon kaj kreis sian propran leĝalecon. La nova povo naskiĝis kiam Napoleon Bonaparte bombardis la popolanojn de Parizo, kaj ĉi-tiuj ne kapablis kontraŭstari lin. De tiam la sekvaj parlamentoj, eĉ se elektitaj per popola balotado, estis siaj propraj parlamentoj (de Napoleono) ĝis alia povo venkis lin, sed temis ĉiam pri ekstera forto-bato, t. e. ekstera al la parlamento kiu agadas laŭ la leĝo.

Cele de ne tro ŝarĝi mian skribaĵon per historiaj ekzemploj, mi konkludas dirante ke ĉiu Parlamento funkcias sub la impulso de la forto-puĉo kiu kreis ĝin, laŭ la leĝo favora al la forto kiu rolis en la koncerna forto-bato. La usona parla-

mento funkcias ankoraŭ hodiaŭ (post pli ol 200 jaroj) sub la impulso de la per-forta ago de la ribelo kontraŭ Britio. Tiu sistemo restas ankoraŭ sub la kontrolo de la (burĝ)klaso kiu entreprenis tiam la kontraŭ-Britian militon.

Revenante al Rusio, dum la 7 jardekoj de la Komunista reĝimo, la posedanto de la ŝtat-povo estis la (Kom)Partio, kiu regis sub la impulso de la Oktobra Revolucio de la jaro 1917. Vi scias ke kiam la popolo elektis, post tiu revolucio, parlamenton kiu ne alĝustiĝis al la interesoj de la nova povo, La K.Partio subgvide de Lenin kaj Trockj povis senĝene kaj senpune nuligi tiun parlamenton, kaj de tiam ne estis en Rusio kaj en la tuta SovetUnio aliaj parlamentoj ol tiuj kiuj respegulis la volon de la Partio. Nek la popolo, nek la armeo, nek la Eklezio, nek iu ajn ento povis efektivigi iun ajn povon for de la Kom.Partio. Vi scias ke veraj kontraŭkomunistoj kiel Popov, Jelcin, k.a. devis komenci sian politikan karieron ene de la Komunista Partio. Tute ne estus ebla alia maniero. Tiu realaĵo de la ŝtat-povo de la KPSU plene evidentiĝis en la fakto ke kiam oni personigas la epokon de la soveta reĝimo, oni nomas nur la plejalt-rangulojn de la K.P.S.U., t.e.: Lenin, Stalin, Kruĉov, Breznev,... Gorbaĉov. Kiel sciate, dum tiu longa periodo, kelkfoje la pintoj de la ŝtato kaj de la registaro estis okupataj de aliaj personoj: Malenkov, Podgornj, Kossigin, Gromiko... Ili estis registar-prezidentoj kaj ŝtatestroj, kaj kiam ili vizitadis fremdajn landojn oni faris al ili la protokolajn honorojn kaj ceremoniojn koncernaj al iliaj rangoj. Sed nur kiam la vizitanto estis la Ĝenerala Sekretario de la K.P.S.U. oni faris verajn politikajn interakordojn, ĉar ĉie en la mondo oni sciis ke la vera ŝtatpovo de Sovetio estis enkarnigita de tiuj partiaj gvidantoj.

Jam mi menciis la forto-batojn (kompreneble ekster-leĝajn) kiuj metis veran ŝanĝon al tiu situacio. Ĉiam estas ekster-leĝaj kaj perfortaj (ĉu revoluciaj, ĉu kontraŭ-revoluciaj) la agoj kiuj okazigas veran ŝanĝon en la esenco de la ŝtatpovo. Kaj nun vi jam konas la esencon de la nova ŝtat-povo en Rusio. Ĝi, la povo, estos efektivigita de civila persono, kiel Jelcin, sed nur kun la konsento de la vera majstro de la ŝtato (la temo de la klaso al kiu servas tiu ŝtata povo estas alia afero), kaj la politika sistemo des pli estos stabila ju pli estos unueca la forto kiu kontrolas la ŝtat-povon: la armeo. La Soveta komunista sistemo estis firma kaj stabila tial ke la K.Partio estis kompakta organizaĵo. La rusa armeo ne tiel ŝajnas al mi kompakta, do mi antaŭvidas grandan malordon en Rusio estonte. Sed pri tio ĉi mi povas erari; mi agnoskas ke mi ne bone konas la rusan realaĵon. Tamen mi pensas ke la rusa armeo estas vera bombo, kiu povas eksplodi. Ne mankas en ĝi ĉiurangaj oficiroj kaj estroj kiuj simpatias al la estinta Sovetio kun ties komunista karaktero. Estas ankaŭ partianoj de la iama Rusa Imperio, kiuj volas fortan rusan potencon en Orienta Eŭropo kaj en la mondo. Alie la klasajn interesojn kiujn servas la nuna politika klaso estas sufiĉe kontraŭ-rusaj, en la linio de la servo al la interesoj de la tutmonda monopolisma kapitalo. Tio provokos sangajn disturbojn kaj revoluciojn en Rusio. Evitu ilin vi se vi povos, sed la tuta rusa armeo, ŝajnas al mi ke ne estas unueca tiurilate.

Sed laŭ mia prefero, la antaŭa situacio, tiu de la ŝtat-povo de la K.P.S.U., estis pli dezirinda ol la nuntempa, ne nur pro tio ke ĝi estis pli stabila, sed ankaŭ tial ke ĝi estis progresista, ĝi enkarnigis la intereson de la popolo kvankam ĝi ne estis vera ŝtat-povo de la popolo. Vi pravas dirante ke tiu soveta povo perfortis kontraŭ la popolo, sed la fakto estis ke tio estis farite favore al la popolo precize. Tio estas neniu serioza kontraŭdiro; en la normala vivo de ĉiu familio okazas la samo. Pli malpli, ĉiu patro aŭ patrino iam devas perforti kontraŭ siaj gefiloj kun eduka celo, ilia favore. Nu, la popoloj plejofte kondutas kiel ne-edukitaj infanoj, kaj konkrete la rusa popolo tre ofte, antaŭe kaj nuntempe, montris ke ĝi estas infana popolo (tute same, cetere, ol ĉiu ajn popolo el la mondo). Multaj personoj hodiaŭ en la mondo estas pretaj indulgi al Jelcin pro lia perforta teniĝo. Mi diras al vi ke la malbono ne estas en la metodoj kiujn Jelcin uzas, sed en la celoj al kiuj li aldirektiĝas. Liaj metodoj estus bonaj se bonaj estus liaj celoj.

Eble viaj propraj celoj ne estas tute la samaj ol ties de Jelcin, sed estas evidenta ke ili ne bone akordiĝas ankaŭ kun miaj preferoj. Mi pensas ke nun estas sufiĉe klara la grado de nia malakordo. Mi malkonsentas kun vi en tio kio koncernas al viaj celoj: potenciigo de la meza klaso, restarigo de sistemo de privata propraĵo... Kaj mi ankaŭ malsamopinias kun vi pri la metodoj. Per la metodoj kiujn vi preferas uzi: paca, laŭleĝa politika funkciado ene de la institucioj; kompromisoj... eblas fari nenion, nek bonan, nek malbonan. Mi estas paca kaj ne-perforta homo, kiu

neniam uzis nek uzos perforton kontraŭ iu ajn, sed pri tiu temo de la revolucio, ŝajnas al mi ke Lenin kaj Trockj vidis pli klare ol viaj Martov kaj Plejanov.

la 18-a de decembro - 1993

Kara kamarado,

Pasis kelkaj tagoj ekde mia antaùa skribado. Dum ĉi lastaj tagoj, kaj laŭ la pli preciza ekkonado de la rezulto de la pasint-dimanĉa baloto en via lando, la informiloj tre pritemas ĉi-tiun aferon kaj esprimas grandan surprizon kaj iom da sensacio pro la fakto ke la plej voĉdonita partio estis t. n. **Liberala-Demokratia**, al kiu oni atribuas faŝistan aŭ ultra-naciisman karakteron. Konsiderante ke tiu politika forto ĝis nun poziciiĝis kontraŭ la politiko de Jelcin kaj ĉi-ties gansteroj (Gaidar, Popov, k.s.), kaj ke aliaj fortoj de la kontraŭ-Jelcina opozicio, kiel la komunistoj kaj la agrara partio, atingis sufiĉe decan rezulton, kaj ke granda parto el la rusa loĝantaro ne volis partopreni en la voĉdonado, oni povas interpreti kiel rifuzo al Jelcin kaj ĉi-ties politiko la reago de la rusa popolo.

Tiurilate la rusa loĝantaro kodutis sufiĉe saĝe. Jelcin, ja estas lakeo de la (uson)imperiismo; li estas en Rusio la homo de la Internacia Mon-Fonduso. Li kaj liaj gansteroj celas rapidegi la procezon al la kapitalismo tiamaniere ke aperu nova kapitalista klaso en la linio de la interesoj de la monda kapitalismo. Li reprezentas kontraŭ-rusajn interesojn; mi ne povas kompreni kial la armeo de Rusio apogis lin en la lasta politika krizo de via lando.

Liaj politikaj malamikoj hodiaŭ post la balotado estas same multenombraj en la Parlamento, aŭ eĉ pli, ol antaŭ la Jelcina puĉo de Oktobro. Tamen li, kiel dirite, estas sufiĉe forta por disponi la regadon de la lando eĉ kontraŭ la majoritato (plimulto) el la Parlamento, tial ke la nova konstitucio tion disponas. Ĉar tiu parlamenta plimulto respegulas la politikan realaĵon de la lando, la povo de Jelcin, Gaidar, k.s. restos tre malstabila, sed por efektivigi ties likvidadon ne sufiĉos la parlamenta funkciado. La kontraŭantoj de la politiko de Jelcin, ĉu faŝistoj, ĉu komunistoj, aŭ ĉiuj kune, devos renversigi la situacion, ne en la Parlamento sed en la strato. Ĉiam estas en la surstrata batalado kie oni plenumas reale la renversigojn de la politika povo. Kaj tio estos nepre okazonta procezo en Rusio. Vi ne esperu, en la nunaj kondiĉoj de via lando, pacan disvolviĝon de la politika kaj sociekonomia evoluado. Kiam la povo de Jelcin estos kontraŭata en la stratoj, estas dubinde ke la rusa armeo daŭre volos apogi lin masakrante sian propran popolon.

Estas klare ke estas multaj kaj grandaj diferencoj kaj kontraŭdiroj inter la kontraŭ-Jelcinaj fortoj. Pri tio mi okupiĝos poste. Sed en la nuna situacio estas evidenta ke la ĉefa koincido inter ĉiuj tiuj fortoj estas multe pli grava ol la diferencoj. Ĉiuj kontraŭ-Jelcinaj fortoj estas patriotaj fortoj en la internaj kaj en la eksteraj aferoj de la lando. En la interno ili celas la konservadon de la heredaĵo de Lenin en kio koncernas al la ŝtata propraĵo kaj kontrolo de la industrio. Tio estas la unuaranga bezono por la grandamaso el la rusa loĝantaro, kiujn neniam povos esti burĝuloj. En la ekstera tereno, la kontraŭ-Jelcinaj fortoj volas meti finon al la rusa submetiĝo al la usona imperiismo. Eĉ la faŝista lidero Zhirinovskj pretendas la apogon al Irakio.

Mi ne simpatias al tiutipa rasisma partio de tiu rusa politikisto, kaj ankaŭ ne al la fanatika islama integrismo, sed en la nunaj malfeliĉaj cirkonstancoj de la mondo, estas dezirindaj eĉ tiutipaj diablaj fortoj por kontraŭbatali la satanan povon de la tutmonda burĝa imperiismo, la ĉefa kaj unuaranga danĝero de nia epoko, ĉar post la malapero de la Socialista bloko restis en la mondo iu granda malpleno en la opozicio al la plej potenca imperiismo el la mondo. Tiele malfacila estas nun por ni, por la revoluciaj fortoj, la monda situacio. Ni estas devigitaj elekti inter la rasisma kaj ekspluatanta sistemo de la superkapitalisma mondo kaj la rasismaj faŝismo kaj integrismo. Se en iuj mondpartoj ŝajnas prefera la venko de la unuaj el tiuj satanoj, en aliaj mondpartoj, tamen, ŝajnas dezirinda la venko de la duaj. Tiela estas la mondo de tiu ĉi malbeninda **Nova Internacia Ordo** naskita de la disfalo de la komunistaj reĝimoj. Tian frenezan mondon konstruis ĉiuj vi, ĉiuj kiuj iamaniere pelis la entreprenitajn ŝanĝojn de la lastaj jaroj: la uloj kiaj Gorvaĉov, Jelcin, Severnaze, Popov... Ĉiuj vi alportis ĉi tiun frenezan mondon per via malprudenta agado. Ne okazas senpune la ludado per la horloĝo de la Historio. Detruante la komunistajn reĝimojn, vi detruis la ĉefan progresistan elementon de la mondo. Nun la orfaj progresistoj de la mondo devas elekti kaj serĉi la malpli venenan kaj danĝeran inter la ekzistantaj venenaj kaj danĝeraj alternativoj. Ke Dio pardonu vin, sed via malprudenta politika agado igis ke la homa progreso

suferis haltiĝon kaj retroiron kies sekvoj perceptiĝos eble dum la du sekvaj jarcentoj. Simila historia bremso okazis kiam tute perdiĝis la atingojn de la Granda Franca Revolucio, post la malvenko de Napoleon kaj la reveno de la Borbon-Reĝoj al Francio, kaj la superregado de Metterniĉa "Sankta Alianco" sur la tuta Eŭropo. Estis tre malfacile poste rehavi la revoluciajn atingaĵojn, kaj por tio estis necesaj multaj aliaj revolucioj en la diversaj Eŭropaj landoj. La samo okazos post la eraroj de nia epoko. La revolucioj estas tre necesaj en la nuntempa mondo. Kaj vi volas meti finon al la okazado de revolucioj!

Hieraŭ mi ricevis leteron el mia slovakia korespondamiko. Li diras ke post la malapero de la komunista reĝimo en lia lando, la popolo spertis la rabadon fare de la novaj mastroj de la socio. Li diris ke tial ke tiuj nunaj superregantaj klasoj kaj ties politikaj perantoj nomiĝas "kristano-demokratoj", "social-demokratoj"... la popolo estas lernante malamegi la titolon "demokrato" kaj ĉio kio rilatas al la "demokratio". Dio volu ke el tiu nuntempa malprestiĝo de la demokratio, simila al tiu okazinta en la tridekaj jaroj de la nuna jarcento, ne rezultu la plifortiĝo de faŝismaj reĝimoj kiel tiuj de la menciita epoko. La estonteco de la homaro estos komunisma aŭ estos neniu vivinda estonteco por nia specio.

la 30-a de decembro - 1993

Kara kamarado,

Pasis preskaŭ du semajnoj ekde mia antaŭa skribado. Dum tiu tempo mi dediĉiĝis al la enkomputerigo de la teksto kaj ties presigado libro-forme. Dume mi ricevis kelkajn dokumentojn, de mia Komunista Partio, kiuj temas pri la aferoj pritraktitaj en ĉi skribaĵo mia. Multaj el la ideoj kaj opinioj esprimitaj en tiuj dokumentoj koincidas kun la miaj, kiujn mi aperigis en ĉi paĝoj. Tamen vi konstatos ke estas ankaŭ diferencoj. Ĉiukaze mi transskribas ĉi-tie la esperantigitan enhavon de tiuj dokumentoj, kiuj temas pri via lando kaj la eks-socialista zono ĝenerale, por ke vi havu kiel eble plej kompletan raporton pri la maniero kiel estas rigardataj de ĉi tie la okazintaĵoj ĉe vi.

**Novaj politikaj procezoj en la Orient-Eŭropaj landoj**

La atingo, en la balotado en Polio, de la absoluta parlamenta plimulto, fare de la t. n. "eks-komunistoj" kaj ties tradiciaj aliancanoj de la Kamparana Partio, estas parto de iu tendenco pli ĝenerala ol ties de ŝanĝado de politika rumbo en unu sola lando. Ĝi havis antaŭaĵon jam en **Litovio,** kie antaŭ kelkaj monatoj la eks-komunistoj balote venkis sur la naciistoj de la dekstraro kiuj estis atinginte la sendependigon de la lando. Post la flankeniro maldekstren en **Polio,** estas antaŭvideble ke povos okazi simile en kelkaj landoj el tiuj konstituintaj la "socialistan blokon". Multaj specialistoj pri politikaj aferoj taksas preskaŭ certa la venkon de la eks-komunistoj en la hungaraj balotoj de la jaro 1994.

En ambaŭ kameroj de la pola Parlamento, la deputitaro de la **Demokratia Uniĝo de la Maldekstro** (eks-komunistoj) plus la **Kamparana Partio** (naturaj aliancanoj de la komunistoj) plus la **Unuiĝo de la Laboro** (socialistoj de maldekstraro) konstituos maldekstran plimulton kiu ampleksas du trionoj el la Parlamentaj deputitoj. Malpli ol unu triono estos de iu centro dividita kaj malfortigita. La dekstraro estis forbalaita entute el la parlamentejo, same en ties versio profunde kontraŭkomunista kiel en la tradicia konservativa. Same okazis al la sindikato **Solidareco,** kies politika esprimo perdis sian tutan parlamentan forton. **Leĉ Valesa** spertis la duoblan fiaskon de siaj antaŭaj sindikataj kamaradoj kaj de la magra balota atingo de la bloko de prezidenta subteno kiun li organizis. Lia antaŭa populareco preskaŭ tute malaperis, ĝis la punkto ke, en laste farita enketo, 41 procento el la gepolanoj konsideras lin "malkapabla kaj neelteneble malsimpatia". Simila estas la malpliiĝo de la populareco de la Papo -laŭ aliaj enketoj- konfirmita krome de la fakto ke ankaŭ la katolikaj partioj estis forbalaitaj el la Parlamento. Kontraste al tio, laŭ ĵusa enketo, pli ol 51 procento el la poloj -ĉefe inter la junularo- konsideras la socialistan socian reĝimon supera al la kapitalista, "kvankam la unua estis malbone aplikita en Polujo". Ĉio-ĉi konstituas la naturan rezulton de la "bruta procezo" kiun oni aplikis al la pola popolo por konduki ĝin rapide al iu sovaĝa kapitalismo. La ultra-liberalaj receptoj, truditaj de la Internacia Mon-Fonduso, estis efektivigitaj en **Polio** senkonsidere al la sociaj suferoj kiujn oni okazigis al la laboristoj.

La nova pola maldekstro, aperinta plejparte el la Pola Laborista Unuigita Partio (POUM), de

la komunistoj, aŭ ĉi ties kamparanaj aliancanoj, ne intencas reveni al la burokratara socialismo. Ili intencos starigi reĝimon de miksita ekonomio (kaj publika kaj privata) en kiu oni konserviĝu la antaŭajn sociajn konkerojn de la laboristoj, sendomaĝe al la ekonomia efiko, kaj kun politikaj formoj plene demokratiaj.
Iuj politikaj specialistoj konsideras ke la rezulto de la balotado en Polio kontribuis antaŭigi la puĉon de **Jelcin**. Vere la nova ruza Caro ne bezonis tian stimulon. **B.Jelcin** meritoplene atingis la titolon de "konstanta puĉisto". Tiel, jam en aŭgusto-1991, tuj post la fiasko de la puĉo de la t.n. "Sav-Komitato", **Jelcin** komencigis sian karieron je puĉisto. Kaj ĉi tezon ne estas subjektiva prikonsiero nia. Iu ĵurnalo kiel "The Baltimore Sun", neniel sovet-favora, deklaris tiam: "estus simpla troigo temi pri dua puĉo en la sama semajno, sed la povo ekster-konstitucia kiun Jelcin arogis al si tre alproksimiĝas al tiu prikonsidero." Iomete poste, en decembro-1991, **Jelcin** efektivigante la dissolvigon de la Sovetunio, perfortis la volon de la sovetaj popoloj subteni la union, kia estis atestita en la referendumo okazinta samtempe al sia propra elektiĝo. Poste okazis liaj diversaj intencoj starigi unuflanke prezidentecan reĝimon aŭtoritateman aŭ diktatorecan. Ĉio ĉi ne nur serve de sia senmezura persona ambicio, sed ankaŭ kiel peranto de ensemblo de interesoj mafiaj kaj de la sociaj tavoloj kiuj volas starigi sovaĝan kapitalismon en Rusio.
Tiaj fortoj ne vere interesiĝas pri la demokratio ser nur pri siaj propraj ekonomiaj celoj. Unu el la plej elstaraj apogantoj de **Jelcin**, la eks-urbestro de Moskvo, **Gavril Popov**, klare eksponis tion en sia artikolo "Neceso de forta reĝimo en Rusio, publikigita en nia lando en majo-1992, el kiu ni transskribas iujn paragrafojn: "Estis malfacile pensi ke personoj naskiĝintaj kaj edikitaj sub totalitarisma reĝimo, kiu daŭris dum pli ol tri generacioj, kapablus adaptiĝi a ekonomiaj reguloj fundamente novaj, sen antaŭa politika liberaligo. Sepdek jaroj de komunismo lasis tre profundajn spurojn en la animo de la loĝantaro(...) Tamen, plejparto el la rusoj kontraŭrezistas la ekonomion de merkato. Ne rezultas facila malaperigi iun kutimojn akiritajn dum generacioj. En ĉi cirkonstancoj, iu politika sistemo en la Parlamento respegulus la nunan strukturon de la socio povus nur bremsi la starigon de iu vera ekonomio de merkato." Nu, ĉu eblas iu demokratia reĝimo en kiu la Parlamento ne respegulus la nunan strukturon de la socio? Sendube ne. Tamen oni intencis pravigi la kontraŭ-konstitucian puĉon de **Jelcin** argumentante ke temis pri demokratio-favora puĉo, kontraŭe al ties de **Fijimori**. Ne estas tia la opinio de la plej eminentaj konstitucio-specialistoj hispanaj, kiel la profesoro **Rubio-Llorente** kiu, en sia artikolo "La 18-a de Brumario de Boris Jelcin" deklaras ke "... tiel (fare de la Okcidenta ŝtatoj) oni laŭdas kiel defendanto de la demokratio kaj la libereco al tiu kiu estas ĉefrolanto, ĝin nun sukcesa, de vera puĉo, kulpanto de evidenta perfortigo de la ekzistinta leĝaleco. Ke estis perfortigo kaj, tiele, ankaŭ puĉo, oni tute ne povas nei".
Laŭ la profesoro **Manuel Garcia-Alvarez**, la plej kapabla hispana specialisto pri konstituciaj aferoj de la Orient-Eŭropaj landoj, kaj nuna konsilanto de de la rura Konstitucia Komisio, **Jelcin** ne nur perfortis la Konstitucion, la Parlamenton kaj la propran Konstituan Tribunalon, sed krome solviĝos nenion per la kunvokita balotado. Laŭ tiu spertulo. "Estas vere ke la prezidento promesas liberan balotadon baldaŭ estonte. Mi dubas ke tio povos okazi baldaŭ, ĉar nuntempe apenaŭ ekzistas partioj. Ankaŭ ne estis aprobita la nova pribalota leĝaro, kio, pro la malaperigo de la Parlamento, necese devos esti ellaborita de la registaro aŭ fare de ento kontrolita de ĉi tiu. Kaj, se okazos la balotado, kio okazos se la opoziciaj partioj atingas parlamentan plimulton? Tiu ĉi ebleco ne devas esti malatentita, spite al la kontrolo kiun Jelcin efektivigas sur la radio kaj la televido, ĉefe pro la rezulto de la partaj balotoj okazistaj la lastaj monatoj(...) ĉu li decidos kromfoje dissolvigi la Parlamenton? kiujn argumentoj li uzos tiukaze por pravigi alian perfortigon de la Konstitucio?." Ĉiukaze, estas klare ke **Klinton** kaj la ceteraj okcidentaj regantoj, kun honoraj esceptoj, senmaskigis sin per ilia apogo al la kontraŭkonstitucia puĉo de **Jalcin**. Malmulte interesas al ili la demokratio, kaj multe la restarigo de la kapitalismo en Rusio, kvankam ĝi alprenu formojn sovaĝajn kaj mafiajn. Siavice nia hispana ministro pri eksteraj aferoj, **Javier Solana**, evidentigis kromfoje sian senkondiĉan servilismon al la gvidlinioj de la usona regantaro. Anstataŭ manifestiĝi, en sia opinio pri la puĉismo de

**Jelcin,** kontraŭ la propra spirito de nia Konstitucio, la hispana registaro devus esti apoginta la solan solvon vere demokratia: la okazigon de samtempaj balotoj por la elektado de nova Parlamento kaj nova Prezidento en kondiĉoj de egalrajteco por ĉiuj partoprenantoj. Tio estas, postuli ke la rusa popolo libere decidu pri sia politika kaj socia estonto.

*Ĉu bonapartisma risko?*

Fine **Jelcin** imitis **Pinoĉet**-on, atakante pere de kanonoj, tankoj kaj armitaj helikopteroj la Blankan Domon. La masakro okazigita anoncas iun ne-malproksiman finiĝon de lia politika kariero. Krome, devigante la armeon interveni, kontraŭ ĝia komenca volo, li eble faris kiel ofico-lernanto de sorĉisto. Oni komparis la puĉon de **Jelcin** al la 18-a de Brumario; la kanon-pafado kontraŭ la rusa parlamentejo povas esti komparita ankaŭ al la 13-a de Vendimiario de 1795, kiam la **generalo Bonaparte** forbalais per siaj kanonoj la ribelantojn kontraŭ la Termidia Konvencio. **Jelcin** sufiĉe similas al **Barras**, kvankam ĉi tiu franca eks-revoluciulo estus pli inteligenta y multe pli rafinita ol **B.Jelcin**. Por **Barras**, uzi la spadon de **Bonaparte** konstituis nur dummomenta solvo, kiu baldaŭ poste kondukis lin al sia definitiva politika ruino. Kvankam la historio neniam ripetiĝas ekzakte, ĉio permesas supozi ke la sekvoj povos esti similaj. La alvoko al la armeo, kaj la masakro de Moskvo, sigelis le destinon de **Jelcin** kiel nura figuro de transirado kiu tre baldaŭ estos apartigita de la politika vivo. La nuna politika procezo multe povos fluktui ankoraŭ. Unue ĉio dependos de la homogeneco aŭ ne de la rusaj Armitaj Fortoj kaj de la influo kiun la okazintaĵoj de la 4-a de oktobro havos en la ceteraj respublikoj kaj teritorioj de la Rusa Federacio. Eĉ se, momente, plifirm- iĝos la puĉo de **Jelcin**, estas antaŭvideblaj novaj konvulsioj politikaj kaj sociaj multe pli gravaj ol la nuntempaj. Ĉio igas nin supozi ke se, kiel volas la ekonomia taĉmento de la nova Caro, oni intencas starigi rapid-paŝe iun sovaĝan kapitalismon sen socia kontrolo, iu alta procento el la popolo ne daŭre konsentos la iompostioman malboniĝon de sia vivkondiĉoj. Ĝi povas reagi kiel en **Polio, Litovio**, ktp, pere de la voĉdonado, aŭ en formo multe pli perforta. Ne malpli granda risko por **Jelcin** alportas la apogo de **Klinton**. Por la rusaj patriotoj, tio igas lin ne nur la ilo de fremda potenco sed de ĝia ĉefa kontraŭanto en la internacia areno.

. . . . . .

La balotado de la 12-a de decembro en Rusujo - kiam samtempe okazis poparlamenta balotado kaj konstitucia referendumone profunde modifis la analizon kiun ni faris antaŭ la okazado de la voĉdonado, nek la risko de bonapartismo. La kondiĉoj de efektivigo de la balot-procezo ne alĝustiĝis eĉ minimumje al la postuloj de egal-rajteco por ĉiuj politikaj fortoj, kiuj estas esencaj por ke la baloto povu esti konsiderita kiel demokratia. La mallegaligo de kelkaj politikaj partioj kaj ties forigo el la balot-procezo -ne per jura rezolucio sed per prezidenta dekreto- kompletiĝis per la malfermo, same per registara dispono kaj ne laŭ jura ago, de kelkaj ĵurnaloj. Tiele oni malebligis al multaj gerusoj havi parlamentan reprezenton. Kvankam oni permesis la uzadon de senpagaj periodoj en la televido, por la propagando de la diversaj kandidataroj, oni ne garantiis la egalrajtecon al ties partoprenantoj ĉar la cetero el dissend-tempo estis unuflanke uzitaj favore al la kandidataroj de la apogantoj de **Jelcin**. Same okazis en la radio kaj en preskaŭ la tuta presaro. Tiu malegaleco nuligis la demokratiecon de la balot-procezo, kaj eĉ pli domaĝis ĝin la senĉesajn minacojn de **Jelcin**, kaj ties kunlaborantoj, al la kandidatoj kiuj en la balot-kampanjo kritikus la projekton de Konstitucio. Tiele restas ĝuste situigitaj la "demokratoj" kiel **Klinton, Felipo González**...
kiuj estis pretaj pardoni ĉion al **Jelcin** -eĉ la masakron de la bombardado kontraŭ la rusa Parlamento- surbaze de sia promeso efektivigi demokratian baloton en decembro. Kvankam la suspektinda malrapideco de la Pribalota Komisio, provizi oficialan informon de la balot-rezulto, ne permesas al ni disponi ankoraŭ je la definitiva rezult-informo, ni povas tamen antaŭenigi iujn konkludojn de la balot-procezo.

Rilate al la referendumo, kiu devus ricevi la popolan apogon al la aŭtoritateca Konstitucio proponita de **Jelcin**, ekzistas raciaj duboj pri tio ĉu vere estis atingitaj la

procentoj necesaj por ĝin validigi. La alta procento de voĉdon-rifuzo, konstatita en diversaj teritorioj de la Rusa Federacia Respubliko, kaj la malgranda supereco de la voĉdonoj jesaj sur la neaj, permesas subteni seriozajn dubojn pri la popola apogo al la nova Konstitucio. Konstitucio kiu krome - kontraste al la hispana de la jaro 1978- ne estis rezulto de interkonsento inter la diversaj politikaj fortoj, sed konstitucia teksto trudita fare de la taĉmento de **Jelcin** kontraŭ gravan parton el la rusa popolo. Samkiel ĉiu Konstitucio trudita kontraŭ ampleksaj popolaj sektoroj, ĝi estos tre eble transira, eventuala, provizora... Fakte, se al la ampleksa nombro da ne-voĉdonintoj oni aldonas la altan procenton da nea voĉdonoj, oni povas certigi ke la Jelcina Konstitucio havas la apogon de nur 25 al 30 procento el la loĝantaro.

Malkonante ankoraŭ, en la momento kiam ni faras ĉi-analizon, la distribuon de la Parlamentaj sidlokoj en la estonta *Dumo*, prijuĝante la procentojn de voĉdononado provizitaj pri la atingitaj rezultoj de ĉiu kandidataro, oni povas ankaŭ antauenigi iujn konkludojn pri la por-parlamenta balotado. La unua, estus pritaksi ĉu la rusa polo rifuzis per sia voĉdonado la bombardadon kaj alsalton kontraŭ la Parlamento. La fortoj defendintaj la Blankan Domon de Moskvo restis plifortigitaj post la balot-procezo. La parlamente forto-interrilato en la estonta *Dumo* estos por ili pli favora ol tiu kiun ili ĝuis en la antaŭa Parlamento. Por tiu rezulto sendube pezis la hororo pro la masakrado efektivigita en la Blanka Domo la 4-a de oktbro, kaj la fakto ke kontraŭ la oficiala informo pli kaj pli fariĝas klare ke la nombro da mortintoj en la atako kontraŭ la Parlamento estis almenaŭ 1500. Tiusence, estas tre altsignifa tio ke dum la balotkampanjo preskaŭ ĉiuj kandidataroj akre kritikis tiun atakon, eĉ iuj el la proksimaj al la pozicioj de **Jelcin**. Nedudeble, en la balotaj rezultoj no nur pezis tiun dramecan faktoron, sed ankaŭ la tre ampleksan rifuzon popolan al la sistemo de ekonomia ŝanĝo aplikita de la ekonomia taĉmento neoliberala de **Gaidar**, apogita de **Jelcin**. Tia sistemo situigis sub la nivelo de malriĉeco granparton el la rusa popolo dum okazadis la skandala pliriĉiĝi de malmulto da uloj. Tio eksplikas la fakton ke la kandidataro "Opcio de Rusio", sub la nomo de **Gaidar**, spite al la privilegia pozicio kiun ĝi ĝuis en la balotkampanjo, ne sukcesis superi la 14 proceton el la voĉdonojn. Eĉ eblas ke je la fino de la voĉdon-kalkulado tiu forto restos triloke pro la rezulto atingita de la Komunista Partio de la Rusa Federacio kiun gvidas **Gennadi Ziuganov**. Tamen, eble la plej rimarkinda rezulto de la rusa balotado estas la 24 procento de la voĉdonoj atingitaj de la Liberala Demokratia Partio gvidata de **Vladimir Jirinovski**. Multaj specialistoj pri politikaj aferoj estis surprizitaj pro la fakto ke iu kandidataro naciisma radikala estus povinta rezulti la malplimulto pli voĉdonita fare de la rusa popolo. Tamen, ĝis difinita grado, tia rezulto estis antaŭvidebla. Por gravaj sektoroj de la rusa popolo konstituas veran traŭmon la fakto ke ilia patrujo kiu - sub la ŝtata formo soveta- konstituis mondan superpotencon, kun gravaj atingoj en la kampoj ekonomia, socia, kultura, scienca,, sporta, ktp. estus pasinta en la daŭro de malmulte pli ol jarkvino al ia triamonda situacio. Kaj tio ne kiel rezulto de milita malvenko, ĉar la Sovetia Armeo neniam estis definitive venkita fare de ekstera malamiko. Eble laŭ simpligita formo, estas milionoj la rusoj kiuj atribuas tian fiaskon ne nur al la antaŭaj misagoj de la Soveta Ŝtato sed ankaŭ al iu reformo, kiel la "perestrojko", necesa kaj alloga komence sed kiu poste estis malbone kulminita. Por tiuj milionoj da rusoj, tiel **Gorvaĉov** kiel **Jelcin** estas same respondecaj pri tiom katastrofa rezulto sendepende de iliaj subjektivaj intencoj.

Estas evidenta ke la pribalota programo de **Jirinovskj** -kaj la formoj kiuj li uzis en sia balotkampanjo- prezentas multajn trajtojn komunajn kun la faŝismo kaj nalanaziismo. Ankaŭ iuj el la fremdaj figuroj al kiuj li uzas kiel referaĵo, aŭ kies nunajn poziciojn li apogas, havas tian karakteron. Estas ankaŭ vero ke de la ultranaciismo al la faŝismo estas nur unu paŝo. Tamen, kvalifiki lin, sen pliaj nuancoj, kiel **faŝisto** eble estas tro simpligi la aferon. Almenaŭ tion opinias diversaj politikaj komentariistoj. Tiusence estas altsignifa la fakto ke **Jirinovskj**, male

ol faŝistoj kaj naziistoj, kiuj dekomece de iliaj respektivaj movadoj faris teorian kaj praktikan apologion de la perforto, rifuzas la perforton kiel politika rimedo. Ankaŭ tio ke li rifuzas la ekonomiajn reformojn ultraliberalajn, la privatigon de la tero kaj la laboran kaj socian malreguligon. Sendepende de ilia socia demagogio, la movadoj nazi-faŝcistaj ĉiam apogis la privatan proprajon kaj la grandan kapitalon. Lia ekstera politiko povas prezenti duoblan tranĉil-randon. Estus tute negativo se li intencus reveni perforte al la antaŭaj landlimoj de Sovetio, sed dume povas esti pozitiva ke la Rusa Respubliko revenu plenumi la rolon de kontraŭpovo por ekvilibrigi la imperiisman potencon de Usono. Aliflanke, la balota apogo kiun **Jirinovskj** atingis en la Armeo, eĉ en la elitaj armeo-unuoj, kiel la Tamanskaja divizio kaj la maraarmeo de la Nigra Maro. Akordo inter la politika forto de **Jirinovskj** kaj la Armeo povus iu eventuala bonapartista alternativo trovi sian socian bazon de apogo. Ĉiukaze, estas tro frue antaŭdiri ĝis tiu punkto la disvolviĝon de la eventoj. Pribalota apogo de 24 procento, kun balot-rifuzo kiu preskaŭ atingis la 50 procento en la loĝantaro ne konstiuas, momente, sufiĉan popolan apogon por tia politika operacio. Ĝi ankaŭ ne certigas al **Jirinovskj** sufiĉan apogon en la Parlamento. Nur pere de negocado kaj interakordo, kun aliaj politikaj fortoj, li povus regi. Alia afero estus si li venkus en la por-Prezidenta baloto de la jaro 1996, okazaĵo pri kiu oni devas ne malatenti se **Jelcin** kaj **Gaidar** obstine persistas en sia metodo por la starigo de sovaĝa kapitalismo.

La balota rezulto atingita de la Komunista Partio de la Rusa Federacio, povas esti konsiderita kiel tre kontentiga se oni ne forgesas la obstaklojn kiuj ĝi devis venki. Ekde la sinsekvaj intencoj malpermesigi ĝin kaj forigi ĝin el la balot-procezo, ĝis la evidenta fakto ke ĝi estis la ĉefa celo de la atakoj de la jelcinistoj. Kun pli ol 13 procento el la ĝin nun kalkulitaj voĉdonoj, kaj eĉ konsiderante ke la fina voĉnombrado ĝi povos resti kiel la dua kandidataro pli voĉdonita, ĝi havos gravan pezon en la *Dumo*. Facile ĝi povos konstitui parlamentan grupon kun la Agrara Partio (kiu atingis 9,59 procento el la ĝis nun kalkulitaj voĉdonoj) kaj, eĉ, kun la kanditarao de la Virinoj de Rusio, multej el kie gvidantinoj -kaj ties balota bazo- devenas el la inaj organizaĵoj SUKP. Tia parlamenta grupo, kiu povus enhavi preskaŭ trionon el la parlamentaj sidlokoj, povus posedi konsiderindan pezon por malpermesi la daŭrigadon de la reformisma metodo. Sed ne por eviti la daŭrigadon mem de la ekonomiaj reformoj. Tiel la Komunista Partio, kiel ĝiaj naturaj aliancanoj, postulas la starigon de miksita ekonomio -publika kaj privata- kiu aplikante demokratian planadon sukcesu certigi la ekonomian kaj socian disvolviĝon favore al la rusaj laboristoj. Kun tia parlamenta forto-interrilato, tial ke ankaŭ **Jirinovskj** poziciiĝas kontraŭ la drastaj ekonomiaj ŝanĝoj, tre malfacile oni povus plenumi la planojn de **Jelcin** kaj **Gaidar**, se ne estos ke ĉi tiuj decidos ignori la Parlamenton kaj regi nur pere de "ukasoj" (dekretoj), operacio tre danĝera kiu fine malstabiligus la ŝtaton.

**La Soveta Revolucio en sia historia perspektivo**

Okaze de la nunaj eventoj, konvenas situigi la sovetan Revolucion historie. La sociaj revolucioj akiras sian plenan dimension kiam oni situas ilin en sia reala historia perspektivo. Tiel la burĝaj revolucioj nederlanda kaj kaj brita, estas nuntempe konsideritaj kiel decidaj faktoroj en la potenca disvolviĝo posta de ambaŭ nacioj kaj en la alta nivelo de libereco kiun atingis siajn popolojn. Eĉ kiam la revoluciaj procezoj malflusas, kaj okazas restarigoj de la antaŭaj poliko-sociaj reĝimoj, la revolucia alporto al la socia progreso ne rezultas tute neŭtraligita. Tia estas la kazo de la Granda Franca Revolucio (jaroj 1789 al 1794). Spite al la termidora reago, la napoleona deformigo kaj la borbona restarigo, oni ne povis retroigi la historion. Preskaŭ ĉiuj bienoj eksproprigitaj al la aristokrataro restis kiel propraĵo de la kamparanoj, kaj la idealoj de libereco, egaleco kaj frateco plurestis laŭloge de la tuta 19-a jarceto ĝis la revolucia renoviĝo okazinta en Oktobro de la jaro 1917-a. Kiam okazadas la kreskiĝanta dekstriĝo de la burĝaro -sub la timo al la nova elmerĝiĝanta klaso kiun konstituis la proletaro-la laborista klaso anstataŭas ankaŭ en sia ĉefroleco la antaŭan suprenirantan klason.

La procezo de burokratara deformiĝo kiun

Sovetio suferas, sekve de la fiasko de la socialistaj revolucioj de Okcidento kaj la intenco konstrui la socialismon en unusola lando, kune kun la konstanta premo fare de la imperiismo pere de blokigo kaj sanec-barilo, nazia invado, "malvarma milito", vetarmado, aŭtoritateca retroiro, kaj ĝenerala kaj ne pravigita subpremado, nuligo de la necesaj liberecoj, ktp. enkondukis laŭlonge de amplek-sa historia procezo al la krizo kaj disfalo de Sovetunio. Pere de tio la apologistoj de la kapitalismo pretendis ne nur konsideri likvidita la marksismo sed ankaŭ la progresista historia signifo de la Socialista Revolucio de Oktobro-1917. Kaj ne nur pro teoriaj aŭ propagandaj kialoj, sed por alveni al la praktika politika konkludo ke je la malapero de la ĉefa produkt-aĵo de tia revolucio -SovetUnio- ĉio estas permesite kontraŭ la popoloj kaj la laboristoj.

Nu, pro siaj historia transcendeco kaj multaj sekvoj en la kampoj politika, socia, ekonomia, kultura, scienca, ideologia ktp. la rusa revolucio de oktobro de la jaro 1917-a havas ian eksterordinaran signifon por la Homaro.

Temas pri iu el tiuj okazaĵoj kiuj, per sia kvalita escepteco, nomiĝas "universal-historiaj okazaĵoj". Tio estas, okazaĵoj kiuj ŝanĝigas la destinon de la mondo, konstituante decidigan vojturniĝon ne nur por la popoloj kiuj komence rolis en ili sed ankaŭ por la cetero el la Homaro. Iuj el ĝiaj sekvoj por la Homaro -kiuj asignas al la soveta revolucio senmortan signifon- povus esti resumitaj tiele:

Unue) Kun la Oktobra Revolucio alvenas unuafoje al la povo en granda lando la laborista klaso -esceptante la mallongan periodon de la Pariza Komunumo- kaj tiu klaso montras ke ĝi kapablas alfronti la taskon je konstruado de nova socio.

Due) Tiel, kiel antaŭvidis **Lenin**, unu el la universal-historiaj sekvoj de la soveta revolucio estis tio ke ĝi rolis kiel vekilo de la popoloj de Oriento. Dank' al ĝia impulso, milionoj da orientanoj ekmarŝis ne nur por la politika sendependiĝo de siaj landoj sed ankaŭ por atingi sian socian liberiĝon.

Trie) Dank' al la soveta povo, kreita de la Oktobra Revolucio, kaj al la socia disvolviĝo de Sovetio, kiu estis ĝia sekvo, eblis venki la naziismon kaj tiel malebligi ke la Homaro falu sub la jugo ne nur de barbara rasismo sed de iu moderna formo de sklavismo multe pli subpremiga ol la antaŭaj. La kontribuo de la heroa batalado de la soveta popolo estis decidiga faktoro por la venko sur la 3-a Reiĉ. Plejparto el la germana armeo -du trionoj el ĝi- batalis en la orienta fronto kontraŭ la sovetanoj kaj suferis la decidajn malvenkojn de Stalingrado, Kursk kaj Berlino.

Kvare) Dank' al la ekzistado de SovetUnio, eblis la procezo de senkoloniigado de la popoloj de Afriko, Azio, LatinAmeriko kaj Oceanio. Sen la soveta kontraŭpovo en la monda ekvilibro, la imperiismo ne estus konsentite la procezon je senkoloniigado.

Kvine) Dank' al la soveta helpo -ekonomia, politika, kultura, scienca, teknika, de armiloj, ktp. kaj al ĝia nuklea ŝirmilo- povis plifirmiĝi sociaj revolucioj kiel tiuj okazintaj en Ĉinio, Vjetnamio, Kubo, Nikaragvo, ktp, kiuj male estus subpremitaj de la imperiismo.

Sese) Dank' al la Oktobra Revolucio, la soveta popolo superis sian grandegan analfabetismon y fariĝis unu el la plej kleraj popoloj en la mondo kaj kun la plej granda nombro da licenciuloj pri superaj studoj. Ankaŭ el tio rezultis ĝiaj gravaj konkeraĵoj en la kampoj de la saneco kaj la sporto, samkiel la fakto ke ĝi estis pioniro en la konkerado de la spaco kaj en teknikoj kiel la lasero kaj la okul-kirurgio.


Sepe) Dank' al la Oktobra Revolucio -kaj al la klasbatalo kiun la proletaro de ĉiu lando realigis sub la stimulo de tia okazaĵo- la laboristoj de la kapitalistaj landoj atingis serion da sociaj konkeraĵoj. Multenombraj sociologoj koincidas pri tio ke sen la timo kiu vekis la soveta revolucio, kaj la batalado de la amasoj stimulita de ĝi, la burĝaro de la disvolvigitaj landoj ne estus efektiviginta la koncesiojn kiuj alkondukis al la tiel nomata "Komfort-socio".

la 31-a de decembro - 1993

Kara kamarado,

Finiĝas ĉi-jaro, kaj mi volas meti finon ankaŭ al ĉi libr-raporto.

Pri la ĉi-tie laste transskribitaj tekstoj, ne estas necese ke mi diru al vi ke eĉ se ili esprimas multajn ideojn pri kiuj mi koincidas kun miaj kamaradoj, estas tamen aliaj grandaj diferencoj kun miaj propraj ideoj kaj opinioj. Vi povas konstati ke, ĝenerale, mi ne tiom estas optimista kiom la verkintoj de tiuj artikoloj. Mi taksas pli gravan kaj pli negativan la retroiron rezultantan el la disfalo de la Socialista Bloko, kaj pli malfacile





Nun denove estas la horo de la suĉantoj, la ekspluatantoj kaj sklavigantoj de la homaro.

rehavebla la antaŭa situacio en Eŭropo kaj en la mondo. Alie mi ne tiom estas optimisma pri la kapablo de la popoloj lerni el la historia sperto. La historio kaj la psikologio pri la amasoj instruas nin ke la popoloj (tiel la rusa kiel la ceteraj mondaj popoloj) estas ne-kapablaj lerni ion. La hispanaj enciklopedistoj de la 18-a jarcento (similaj al tiuj regintaj en via lando en la epoko de la Granda Katerino) havis maksimon diranta: *Ĉio por la popolo kaj favore al la popolo, sed sen la popolo*. Ŝajnas al mi tre saĝa tiu diraĵo. Lenin lernis tion el la praktika sperto dum la jaroj 1918 al 1921, kaj li serĉis ekster-popolan enton por demarŝi la aferojn de la revolucio. En la manoj de la popolo la soveta sistemo estus ruiniĝinta jam en 1920. La popoloj de Jugoslavio kulpas pri la civila milito nun ekzistanta en tiu lando. La popoloj de eks-Sovetio kulpas pri la malfeliĉa situacio nun ekzistanta en via lando. Kiam, iafoje la popoloj lernas ion preze de grandaj suferoj, fine ili forgesas, post du aŭ tri generacioj, ĉion lernintan.

Mi antaŭvidas ke la disvolviĝo de la situacio en Rusujo ne estos paca. La tempo pasinta ekde la baloto montras al ni ke Jelcin ne volas ŝanĝi sian politikon. Li havas la apogon la imperiismo de Okcidento: la vera venkinto de la sangaj eventoj de oktobro ĉi-jare. La rusa popolo estis vendita al la internacia kapitalistaro, kaj la liberiĝo estos nek facila, nek baldaŭa, nek malmultekosta.

Ankaŭ la popoloj de Okcidento kulpas pri la disfalo de la komunistaj reĝimoj. Ankaŭ ni pagos altpreze la perfidon al la revoluciaj idealoj. La progreso de Homaro suferis lasttempe haltiĝon kaj komenciĝas retroiro el kiu ne estos reveno en la nuna nek en la seva generacioj. Denove estas la horo de la suĉantoj de la popoloj, de la ekspluatantoj, de la sklavigantoj de la homaro. Feliĉaj okazaĵoj kiel la Oktobra Revolucio de la jaro 1917-a, kaj homoj kiaj Lenin, aperas en la mondo nur post multjara periodo, kaj nia homaro ne sciis profiti la feliĉan okazaĵon de nia jarcento. Kiam la 20-a jarcento p. K. finiĝas, la situacio de la mondo, post la granda espero vekita de la Oktobra Revolucio, denove fariĝas tiom tristan kiom je la komenciĝo de la jarcento. Eble mi tro estas estas subjektive influita de la nuna malfeliĉa situacio en mia lando, de la fakto ke mi eble perdos mian laboron post kelkaj monatoj aŭ kelkaj jaroj, de la ega ekonomia krizo kiu pli kaj pli akriĝas laŭ la pasado de la tempo.

Vi estas pli juna ol mi kaj eble ankaŭ pli optimisma. Mi volas scii kiel vi taksas miajn vidpunktojn kaj miajn antaŭvidojn.

Ĉiukaze mi deziras al vi kaj al via popolo pacon, prosperon kaj feliĉon, kaj saĝecon por alfronti vian situacion, eĉ pli malbona ol la nia. Ke Dio helpu vin kaj nin.

Elkore kaj kamaradece,
salutas vin,

Faustino Castaño Vallina